

V i l m o s   B e n c z i k

**PRI**

**LA NATURECO**

**KAJ**

**ARTEFARITECO**

**DE**

**LINGVOJ**

kaj aliaj studoj

Budapest 2016

Vilmos Benczik:  
PRI LA NATURECO  
KAJ ARTEFARITECO  
DE LINGVOJ  
kaj aliaj studoj



**Vilmos Benczik**

**PRI LA NATURECO  
KAJ ARTEFARITECO  
DE LINGVOJ**  
*kaj aliaj studoj*

**Eldonejo Trezor**

**Budapest 2016**

**ISBN 978-963-8144-47-8**

Kiadja a Trezor Könyv- és Lapkiadó, Terjesztő Bt.  
1149 Budapest, Egressy köz 6.  
Telefon/fax: 363-0276 E-mail: [trezorkiado@t-online.hu](mailto:trezorkiado@t-online.hu)  
Internet: <http://www.trezorkiado.fw.hu>  
Felelős kiadó: Benczik Mónika

## ENHAVO

Pri la natureco kaj artefariteco de lingvoj.	
Provo resumi la kriteriojn.....	7
Rilatoj inter la komunikadaj teknologioj	
kaj la homa lingvo .....	23
Lingvo, skribo, literaturo .....	35
Komunikteoriaj konsideroj pri Esperanto kaj ĝia leksiko .....	54
Komunikado kiel fonto kaj motoro de lingva evoluo .....	62
Ĉapitro el la historio de la komunikado:	
la ”revolucio de voĉo” .....	84
Skriba kaj voĉa Esperanto. La Internacia Lingvo	
en semiotika spegulo .....	96
La Esperanta literaturo tra la lupeo de kelkaj lingvoteorioj	
kaj literaturkonceptoj.....	111

## APENDICO

Pri la libroeldonado de Hungara Esperanto-Asocio	
inter 1976–1990.....	139
Esperanto kaj molaj diktaturoj.....	162



# PRI LA NATURECO KAJ ARTEFARITECO DE LINGVOJ\*

*Provo resumi la kriteriojn*

## 1. La nocio "natureco"

1.1 La plej multaj vortaroj difinas la sencon de la vorto 'natura' per opoziciigo al la vorto 'artefarita': natura estas tio, kio ne estas artefarita. La vorto 'artefarita' siaflanke ricevas difinojn tiaspecajn: "eco de io kreita per konscia homa ago, per konscia homa interveno".

Kiel ni povas konstati, vortaroj ordinare donas difinojn *laŭgenezajn*, ili aliras la signifon de la vorto el la vidpunkto de la estiĝo de la aferoj. Ĉi tiu aliro implicas plurajn suplementajn signifotavolojn de la vorto 'natura', ne okulfrapajn unuavide. Ni rigardas 'natura' nur la *primaran* ekzistoformon de la aferoj, ĉion diferencantan disde la primara formo ni emas nomi 'artefarita'. Krome, 'natura' povas esti nur io *konkreta*, ĉar abstraktaĵoj ekzistas nur en la homa konscio, ne en la naturo, jam pro tio, ke abstraktaĵoj povas kreiĝi nur per abstraktado – kaj abstraktado estas konscia homa ago, tre komplika kaj kompleksa.

1.2 Sed la opozicio natura-artefarita estas interpretebla ne nur laŭgeneze, do ne nur el la vidpunkto de la estiĝ-historio de la traktataj aferoj, sed ankaŭ el la vidpunkto de ties substanco, konsisto. Se oni aliras la nocioparon natura-artefarita kun semiotikaj konsideroj, oni spertas, ke tiuj aferoj, kiuj estas rigardataj naturaj, plejparte havas *kontinuan (analogan)* karakteron, kaj tiuj aferoj, kiuj estas rigardataj artefaritaj, ordinare havas *diskretan (digan)* karakteron. (Diskretaj aferoj pro sia klara apartiĝo – kiu apartiĝo konsistigas ilian esencan trajton – kreas la impreson de reguleco; kaj reguleco nekontesteble radikas en artefariteco.)

Ĉi tiu homa atitudo estas relative nova; ĝi formiĝis nur antaŭ apenaŭ pli ol du jarcentoj surbaze de la idearo de romantismo. Tute precize laŭ la idearo de Rousseau, kiu proklamis laŭtan, manifestan

---

\* Skriba versio de prelego farita printempe de 2005 dum la 15a Hungara Kongreso de Aplikata Lingvistiko kaj Lingvoinstruado. Iom pli konciza teksto de tiu ĉi prelego aperis en mia hungarlingva libro *Jel, hang, írás* (2006), p. 139–145.



defion al raciismo. Ĉi tiu defio implicis renesancan respekton al la parola lingvouzo, kiu ja estas primara formo de la lingvofunkciado. La surscenejiĝo de la ideo de Rousseau estas ankaŭ komenco de la deklarata homa inklino al la natureco, kaj ekde tiu tempo la vorto 'artefarita' havas negativan kromnuancon.

Ĉi tiu ŝanĝiĝo de atitudo respeguliĝas ankaŭ en la karaktero de la naskiĝantaj planlingvoj; dum en la 18a jarcento oni kreis ekskluzive apriorajn planlingvojn (tiuj klopodis logike reprezenti la nete diskretan konceptan hierarkion), la 19a jarcento jam estis epoko de la aposterioraj planlingvoj: tiuj klopodis adaptiĝi unuavice ne al la koncepta hierarkio de la logiko, sed al la funkcimodelo de la ekzistantaj etnaj lingvoj, en kiuj apud la diskretaj signoj havis signifan rolon ankaŭ kontinuaj signoj.

En ĉi tiu teksto ni provos inventarii, kian rolon ludas la kontinuaj kaj diskretaj signoj (la analoga kaj digita kodo) en la sistemo de la lingvaj signoj ĝenerale, krome ankaŭ tion, kiom diferencas tiu rolo en la etnaj lingvoj kaj en Esperanto. Dum tiu inventariado ni akceptos la tezon, ke la diskretaj signoj estas portantoj de la kvalito artefariteco.

## **2. Lingvo kiel signosistemo**

Indas noti, ke laŭ la kategoriado de Aŭgusteno ĉiu lingva signo estas artefarita signo, kontraste al la naturaj signoj, kia estas ekzemple fumo inundanta eksteren el brulanta loĝejo. Aŭgusteno en sia verko *Pri la kristana doktrino* (De doctrina christiana) dividas signojn je du grupoj: naturaj signoj, kaj artefaritaj (konvenciaj) signoj. Li nomas ĉiujn vortojn konvenciaj – do artefaritaj – signoj.

Laŭ la konsisto de la signoj lingva signosistemo havas heterogenan naturon: parto de la lingvaj signoj havas kontinuan karakteron, parto diskretan karakteron. La t. n. segmentaj lingvaj signoj estas grandparte (tamen ne senescepte) diskretaj signoj, la supersegmentaj lingvaj signoj estas ekskluzive kontinuaj signoj.

Laŭ aliaj opinioj el inter la lingvaj materialoj nur presita teksto estas rigardebla pure diskreta/digita, manskribo montras ankaŭ kon-

tinuajn trajtojn, kaj voĉata parolo estas grandparte kontinua/analog<sup>1</sup> (Nöth 2000: 201–202).

Dum Nöth nomas la parolan lingvon unuavice kontinua/analog<sup>a</sup>, troviĝas opinioj, laŭ kiuj intonacio pro sia kontinua karaktero ne estas parto de la lingva signosistemo: ekzemple la hungara muzikscienculo László Hunyady nomas intonacion kaj aliajn kontinuaajn signoelementojn de la parola lingvo elementoj fremdaj al la lingva sistemo. Tiuj opinioj evidente estas eraraj, ja intonacio neniel estas rigardebla 'eksterlingva rimedo': intonacio tiel same estas integra parto de la lingvo, kiel parolsonoĵoj, vortoj aŭ frazoj. Kontraste al parolo, skribo estas esence diskreta/digita *en ĉiuj siaj formoj* (kaj manskribo, kaj presita skribo, kaj komputila skribo), ĉar ĝi kapablas registri nur tiujn elementojn de la parolo, kiuj ankaŭ en sia origina, akustika formo jam estas diskretaj; kontinuaajn lingvoelementojn (intonacion) skribo povas registri nur etparte kaj tre malperfekte. Necesas averti, ke la interliteraj kunligaj strekoj en la kontinua manskribo neniel estas interpreteblaj kiel grafikaj registraĵoj de la kontinua signoj de la parola lingvo: tiuj strekoj havas la solan funkcion ebligi al la skribanta homo eviti la levon de sia kraĵono de sur la papero post ĉiu opa litero. Do, kontraste al la opinio de Nöth, manskribo estas tiel same diskreta/digita, kiel presita skribo.

Eĉ akustika lingvo ne estas rigardebla pliparte kontinua/analog<sup>a</sup>, ja en tipa parolsituacio la pliparton de la parolsignifo portas la diskretaj/digitaj lingvaj elementoj. Tio ne ekskludas, ke ankaŭ la kontinua/analogaj/supersegmentaj lingvaj signoj (tembro, intenseco, tempodaŭro) havu gravan rolon – ilin prave nomas Jespersen ne nur "termometro de sentoj", "barometro de la humoro", sed ankaŭ "sekcilo de pensoj, farita el plej fajna ŝtalo"<sup>2</sup> (Jespersen 1912: 181); aliloke li avertas pri tio, ke kaze de semantika diferenco inter la vortoj kaj intonacio, oni emas kredi al la intonacio (Jespersen 1904: 231) –

---

<sup>1</sup>"Digitale Sprachkodierung erfolgt in Reinform durch Druckbuchstaben. Schon in der handschriftlichen Sprache gibt es jedoch Übergänge zwischen digitaler und analoger Kodifizierung, und die gesprochene Sprache ist informationstheoretisch zunächst analog kodiert."

<sup>2</sup> "[...] der Ton ausser einem Gefühlsthermometer und Stimmungsbarometer auch eine Seziermesser vom feinsten Stahle für unsere Gedanken ist."

tamen la rolo de intonacio en la parola lingvouzo de eŭropaj lingvoj ordinare estas duaranga. Oni povas diri, ke homa lingvo estas sistemo de heterogenaj signoj (diskretaj kaj kontinuaj), tamen emfazon ricevas diskretaj signoj.

La lingvaj ŝanĝoj en longa tempa perspektivo montras daŭran kreskon de la relativa pezo de diskretaj signoj – kaj malkreskon de la pezo de kontinuaj signoj – en la lingva signosistemo. La diskretiĝa procezo konstateblas sur ĉiuj lingvaj niveloj: egale sur la nivelo de la parolsonoj, sur tiu de la vortsignifoj, kaj ankaŭ sur la nivelo de sintakso; paralele kun tio estas spertebla laŭgrada griziĝo de la intonacio.

En la komunikhistoria periodo antaŭ la invento de skribo – tiun periodon W. J. Ong nomas 'primara parollingveco' – la diskretiĝon de la lingvaj signoj eldevis antaŭ ĉio la konstante kreskanta signobezono de la ĉiam pli kompleksiganta, nuanciĝanta komunikado. Kiel rimedo kontentigi la kreskantan signobezonon proponis sin la disartikigo de la kontinuaj voĉsignoj; per tio gajniĝis pli granda kvanto de malpli ampleksaj signoj, kaj per ties kombinado grave kreskis la nombro de eblaj sonkombinaĵoj, utiligeblaj kiel signoj – pli simple dirite, tiel povis kreiĝi kaj ekfunkcii ĉiam pli kaj pli da vortoj. La kresko de la vortoformoj siavice ebligis semantikan diskretiĝon: la kompleksaj vortsignifoj de la praa lingvo ĉiam pli disartikiĝis.

Sur sintaksa nivelo diskretiĝo montriĝis per tio, ke apud la komence ekskluzive uzataj kunordigitaj propozicioj aperas ankaŭ subordigitaj propozicioj: per tiuj lastaj eblas esprimi multe pli fajnajn kaj nuancitajn rilatojn inter la elementoj de teksto. Tiun sintaksan diskretiĝon bele ekzemplas komparo de diversepokaj tradukoj de bazaj tekstoj, ekz. tiuj de la Biblio. En angla traduko (farita ĉ. 1600) de 70 vorta fragmento de Genezo la kunordiga konjunkcio 'and' ripetiĝas 13-foje, dum en pli posta (ĉ. 1970) traduko de la sama fragmento nur 5-foje (Ong 1982, 37). Mi mem faris komparon de frua kaj moderna hungaraj tradukoj de la sama fragmento: la frua traduko la hungara ekvivalento de 'and' aperis 12-foje, en la moderna traduko 5-foje. En la modernaj tradukoj (kaj en la angla, kaj en la hungara) pli

ol duonon de la originaj 'kaj'-oj (ankaŭ en la hebrea originalo rolas 'kaj'-oj) anstataŭas pli nuancitaj lingvaj rilatoj inter la kunligitaj pozicioj. Estas interese rimarki, ke la Zamenhofs traduko de la sama biblia tekstofragmento enhavas 13 'kaj'-ojn, do pli-malpli tiom, kiom la fruaj angla kaj hungara tradukoj. Ne facilas decidi, kial? Ĉu pro la relativa subevoluinteco de la esperanta lingvouzo en la tempo, kiam Zamenhof faris sian tradukon? Aŭ pro tio, ke tiutempe certa arkaikeco ĉe biblia teksto estis kvazaŭ baza postulo? Ĉiukaze estas fakto, ke la strebo traduki Biblion en modernan lingvaĵon aperis nur poste, iam post la dua mondmilito.

Rezulte de la kresko de la proporcio de diskretaj signoj en la homa lingvo, fakte kreskis la proporcio de tiaj signoj, kiujn homoj emas nomi artefaritaj. La progreso de la diskretiĝa procezo daŭre plimultigis en la homa lingvo tiajn elementojn, kiuj laŭ semiotika vidpunkto montriĝas artefaritaj.

Diskretiĝa procezo ekzistas en la lingvo ekde ĝia estiĝo, kaj tiu procezo ricevis plian elanon rezulte de la invento de la alfabeto skribo, kaj poste rezulte de la invento de preso, kiu lasta ja ebligis pli frue neimageblan disvastiĝon de la uzo de skribo. La plian diskretiĝon de lingvo rezultigis do ne preso, sed alfabeto skribo – preso siavice akcelis la disvastiĝon de skribo.

### 3. La rolo de skribo

Parolante pri skribo, ĉi tie ĉiam estos komprenata alfabeto skribo (nomata ankaŭ 'fonetika' skribo – ĝin estus pli precize nomi 'fonemika', ja ĝi ne registras ĉiujn apartajn parolsonojn, sed nur fonemojn). Alfabeto skribo montriĝis certe la plej efika kaj plej ekonomia el ĉiuj ekzistantaj sonregistraj ('cenemic'<sup>3</sup>) skribsistemoj. Senregistrajn (pleremic) skribsistemojn ĉi tie ni ignoras, ja ili kreas rektan rilaton inter grafikaj signoj kaj la signifataj aferoj, kvazaŭ transportante la akustikan lingvon; tiamaniere ili havas neniun rilaton al la primara,

---

<sup>3</sup> 'Cenemic' kaj 'pleremic' estas terminoj, el kiuj la unua etikedas sonregistrajn skribsistemojn (kiuj baze registras nur akustikajn informojn, kaj neniujn semantikajn), la dua senregistrajn skribsistemojn (kiuj baze registras nur semantikajn informojn, kaj neniujn akustikajn). Mi renkontis tiujn terminojn en la verko de Haas (1983), sed kiel Probal Daşgupta aŭfable avertis min, ili fakte radikas ĉe Louis Hjelmslev.

akustika formo de la lingvo, kaj tiamaniere ili ne povas ludi rolon en la diskretiĝa procezo de la homa lingvo. Silabskribo kaj konsonant-skribo estas sonregistraj sistemoj, sed ili estas malpli efikaj registriiloj de la akustika lingvo, ol estas alfabetaj skribo.

Skribo – kontraste al parolo – montrigas eĉ laŭ pluraj vidpunktoj fenomeno tre *artefarita*. Skribo estas komunikada *teknologio* – la 'teknologio de intelekto' (Goody–Watt 1968) – kiu jam pro siaj ecoj neniel povas esti rigardata natura: ne eblas skribi laŭ natura maniero<sup>4</sup> (Ong 1982: 81–82). Antaŭ ĉio pro tio ne, ĉar sistema kunligo de difinitaj parolsonoĵ kun difinitaj signoj povas esti nur *rezulto de konscia homa agado*. Skribo estas artefarita ankaŭ pro tio, ĉar skribo kompare al parolo estas *sekundara* lingva manifestiĝo, pri kiu cirkonstanco atentigas Saussure mem, kies pensado estis ĝisoste fonocentrisma, do li sentis profundan antipation al skribo (Saussure 2005: 44–54). Naturaj aferoj estas primaraj; io sekundara ne povas esti natura – tiun komune akceptitan tezon ne povas (fakte eĉ ne strebas) ŝanceli ankaŭ poststrukturisma pensado, kiu staras firme sur grafocentrisma bazo. Ankaŭ Vigotskij konfirmas la artefaritan karakteron de skribo, kiam li nomas ĝin 'algebro – t. e. abstrakta formo – de parolo' (Vigotskij 2000: 260).

Alfabetaj skriboj naskiĝis en la 8a jarcento a. K. En tiu jarcento grekoj transprenis fenician skribon, kiu estis konsonant-skrifa sistemo, do ĝi havis literojn por konsonantoj, por vokaloj ne. Fenicia lingvo – kiel ankaŭ la aliaj semidaj lingvoj – estis tre riĉa je konsonantoj, pli riĉa ol la greka. Sekve kelkaj el la feniciaj konsonant-literoj montriĝis superfluaĵ ĉe notado de greka teksto, aliflanke mankis literoj por la riĉa greka vokalsistemo. Grekoj do ekaplikis tiujn superfluaĵn feniciajn konsonant-literojn por signi per ili vokalojn: tiel kreiĝis alfabetaj skribo. Ĝi montriĝis tre sukcesa kaj temprezista sistemo, oni uzas ĝin kun senŝanĝaj bazaj principoj jam de preskaŭ tri jarmiloj.

---

<sup>4</sup> "Writing is a technology. [...] By contrast with natural, oral speech, writing is completely artificial. There is no way to write 'naturally'. Oral speech is fully natural to human beings in the sense that every human being in every culture who is not physiologically or psychologically impaired learns to talk."

La eblo de la kreigo de alfabeto skribo havis seriozajn antaŭkondiĉojn. Ĝi postulis alte evoluantan gradon de lingva diskreteco: la lingvouzantoj devis esti kapablaj percepti kaj apartigi ene de la parolfluo ĉiun opan parolsonon. Necesis krome ankaŭ iu ĝermo de konscio pri fonemoj<sup>5</sup>.

La diskreta/digita alfabeto skribo povas registri la parolon nur parte: unuflanke ĝi pli-mapli plene kapablas registri la segmentajn (diskretajn) lingvajn sonojn (tamen ne alofonojn), aliflanke ĝi nur tre etparte kapablas registri la supersegmentajn (kontinuaajn) lingvajn signojn (tion ĝi faras per demandosigno, krisigno ktp.). El ĉio tio sekvas, ke alfabeto skribo aplikeblas sukcese nur por tiuj lingvoj, en kiuj pli grandan parton de la komunikendaj enhavoj ankaŭ la voĉa lingvo kodas en segmentajn lingvajn signojn, kaj supersegmentaj lingvaj signoj ludas nur akompanan, suplementan rolon; do, en tiaj lingvoj, en kiuj la diskretiĝo de la lingvaj signoj atingis iun sufiĉe altan gradon jam en la antaŭskriba lingvo.

La naskiĝo – kaj ĉefe la disvastiĝo – de la alfabeto skribo donis enorman elanon al la diskretiĝa procezo de lingvaj signoj. En tio ludis gravan rolon ankaŭ la nova – pli frue neimagebla – komunikada situacio, en kiu la sendanto kaj la ricevanto de la komunikaĵo ne ĉeestas ambaŭ en difinita loko. Skriba komunikado malhavas tiun riĉan gamon de eksterlingvaj komunikaj rimedoj, kiu ludas tre gravan rolon en la vizaĝ-al-vizaĝa komunikado, krome skribo malhavas ankaŭ supersegmentajn lingvajn signojn, kiuj povas altgrade riĉigi kaj nuanci komunikaĵojn, kaj en skriba komunikado ordinare malĉeestas ankaŭ interaktiveco, kiu povas rapide kaj efike transponti stumbletojn de la komunikada procezo. La vortoj, diras Platono, en sia skribita formo ne plu povas kalkuli "pri la helpo de sia patro", tio estas, post kiam vortoj sendependiĝas de siaj kreantoj, ili devas mem solaj – sen interpreto, sen suplemento, sen ajna ekstera helpo – plenumi sian taskon: porti signifon de unu homo al la alia (Fedro 235e). La nova

---

<sup>5</sup> La ellaborita koncepto de fonemo aperis en la lingvoscienco nur fine de la 19a jarcento p. K., dank' al la laboroj de Jan Niecisław Baudouin de Courtenay (1845–1929) kaj Mikołaj Kruszewski (1851–1887). Tamen, neniel kontestblas, ke la sistemo de alfabeto skribo latente enhavas tiun koncepton jam depost preskaŭ tri jarmiloj.

komunikada situacio, kiun kreis skriba komunikado, postulis precizajn, segmentitajn, konturitajn vortsignifojn. Oni facile rekonas, ke precizeco, segmentiteco, konturiteco estas karakterizaj ecoj ne de naturaj, sed tiuj de artefaritaj aferoj. En semantika senco kontinuuaj signoj parencas al konotacioj, diskretaj signoj al denotacioj.

La postulo de precizeco, segmentiteco kaj konturiteco rezultigis jam tuj post la ekapliko de alfabeto skribo elanan kreskon de vortformoj. En la buŝa komunikado unu vortformo povis porti tre multajn signifojn: la aktuale komprenenda vortsignifo ĉiam difiniĝis en la konkreta komunikada situacio, per la helpo de intonacio, eksterlingvaj komunikaj rimedoj ktp. Ĉe skriba komunikado tiuj lastaj helpiloj ne funkcias. Al Sokrato, kiu estis nur apenaŭ tuŝita de la skriba kulturo, kaŭzis malfacilaĵojn iuj novaj vortoj, uzataj de kuntempuloj, pli intime ligitaj al skribo: tre ofte li demandas pri la signifo de tiuj vortoj, ĉar li ne komprenas ilin (Nyíri 1996: 6).

La ampleksiĝo de la vortprovizo – kaj la paralelanta semantika diskretiĝo – ankaŭ post la helena epoko restas daŭra akompananto de la disvastiĝo de skribouzo. Pierre Guiraud (1912–1983) skribas, ke la dramo *Cid* de Jean Racine (1639–1699), konsistanta el 15 130 vortoj, enhavas 1488 malsamajn leksemojn, dum similampleksa dramo, verkita en la 20a jarcento, enhavas minimume 2500 diversajn leksemojn (Guiraud 1956: 12).

Tiu nova komunikada situacio, kies estiĝon ebligis la uzo de skribo, kaj la daŭre kreskanta socia prestiĝo de skribo rezultigis, ke skribouzo ne nur kreis aŭtonomajn funkcioformojn en la skriba lingvo, sed tiuj skribe kreiĝintaj funkcioformoj komencis influi ankaŭ la parolan lingvouzon. ”Post la apero de skribo parola lingvo ne plu estis la sama”<sup>6</sup> – diras Ong; jes, ne plu la sama, ĉar ankaŭ en la parola lingvouzo kreskis la proporcio de la (skribeblaj!) diskretaj lingvaj signoj, La plej okulfrapa simptomo de tiu ĉi procezo estis la t. n. ’literprononcado’<sup>7</sup>, kiun komence oni rigardas prononceraro, sed liter-

<sup>6</sup> ”After writing [...] oral speech was never the same.” (Ong 1977: 87)

<sup>7</sup> Fenomeno konata en pluraj lingvoj; ĝi estas nomata ekz. en la angla *spelling pronunciation*, en la germana *Schriftbildaussprache*. En la kazo de Esperanto tiu fenomeno aperas en draste malsama kunteksto, pro la skriba genezo de la lingvo: la Esperantan modelan prononcon principe difinas skribo.

sekvaj prononcm manieroj post certa tempo ordinare fariĝas prononcnormoj.

Do, resume: la estiĝon de alfabeto skribo elvokas la socia bezono registri parolon, kaj ĝin ebligas la relative alta proporcio de diskretaj signoelementoj jam en la antaŭskriba parola lingvo. Skribo siavice signife plialtigas en la naturaj lingvoj (ekstintaj sen konscia homa agado: do neplanitaj lingvoj) la proporcion de lingvaj signoelementoj, rigardeblaj artefaritaj. Tiu plialtiĝo de diskretaj lingvaj signoelementoj unue okazas en la aŭtonomiĝanta skriba lingvouzo, poste pro la kresko de la socia prestiĝo de skribo tiuj specifaĵoj de la skriba lingvouzo komencas influi ankaŭ parolan lingvouzon. Oni spertas do, ke la sekundara funkcioformo (skriba uzo) havas fortan influon al la primara funkcioformo (buŝa uzo). Ĉi tiu procezo karakterizas la plimulton de la naturaj lingvoj.

Ekzistas tamen iuj kazoj, en kiuj ĉi tiu direkto de influado fariĝas ekskluziva, do la skriba uzo fariĝas ekskluziva normiganto de la buŝa uzado: unu el tiuj estas la kazo de la mezepoka latina lingvo.

#### **4. Postvivo de la latina lingvo**

La latina lingvo kiel ĉefa parolata lingvo de la Romia Imperio iris la regulan vojon de etnaj lingvoj: tiam, kiam venis ties tempo, el la ekzistanta parola lingvouzo elĝermis skribo, kaj ĝi daŭre floris dum plena jarmilo, kvankam inter relative malvastaj kadroj, ja dum la jarcentoj de la antikveco ĉiam dominis la parola kulturo, ne la skriba. Turno okazis iam inter la 8a kaj 9a jarcentoj, kiam la ŝanĝoj en la parolata latino atingis kritikan kvanton, dum la skriba uzo rigore sekvis la modelon de Vulgato (latina traduko de Biblio, farita de Hieronimo dum la 4a jarcento); do, la ŝanĝoj radikiĝintaj en la parola lingvo tute ne aperis en la skriba lingvouzo. Depost tiu momento la parolata lingvo ne plu estis nomebla latino, sed novlatina lingvo/dialekto, pli precize novlatinaj lingvoj/dialektoj, ja la postlatina parolata lingvo montris signifan teritorian variecon. Do, el la fono de la skribata latina<sup>8</sup> lingvo, sekvanta la modelon de Vulgato kaj tiun de

---

<sup>8</sup> Kompreneble ankaŭ la skribata latino ne estis unueca dum la mezepoko; ĝi sekvis samtempe plurajn modelojn, ĝi ĉerpis kaj el la klasika latino, kaj el la malfrua latino, kaj el la liturgia



klasikaj latinaj tekstoj – simple malaperis la denaska parolantaro. Tiamaniere skriba latino vivis plu kiel *lernita lingvo*. Lernita lingvo – kiun oni lernis el libroj, pere de skribo.

Lige kun ĉi tiu cirkonstanco povas lanĉiĝi la demando, ĉu mezepoka latino estis *vivanta lingvo*, aŭ ne? Por decidi tion ĉiukaze necesus pli longa, kaj precipe pli profunda rezonado: necesus antaŭ ĉio doni precizan difinon de tio, kio estas *vivanta lingvo*? Stecker emas nomi mezepokan latinon – prefere nur tiun de antaŭ la jaro 800 – almenaŭ duone vivanta lingvo, dum la latinon de humanismaj aŭtoroj – kiuj strikte imitis la antikvan lingvouzon – li diras morta lingvo<sup>9</sup>.

Formiĝis do la mezepoka dulingveco: kunekzistado de la parola loka/baza lingvo ('lingua vernacularis') kun la skriba latino. Tiu situacio eĉ pli firmigis la influon de la antikvaj, aŭtoritataj tekstoj al la skriba lingvouzo.

Tamen la praktiko postulis ankaŭ parolan uzon de la latino ĝuste en la plej altprestigaj medioj de la vivo (eklezio, ŝtata administrado, universitata instruado), ja la lokaj bazaj lingvoj – uzataj en la ĉiutaga vivo – ne estis taŭgaj por inde kaj efike peri kompleksajn enhavojn. Tiamaniere estiĝis nova – sekundara – parola uzo de latino, surbaze de la skribita latina lingvo, kaj ĝi montriĝis funkciokapabla (kvankam ne tute senprobleme) dum pluraj jarcentoj, ĝis la iompostioma forfalo de latino el la Eŭropa kultura vivo iam inter la jarcentoj 17a kaj 19a. La strebo de humanistoj (en la 14a kaj 15a jarcentoj) uzi la klasikan latinon anstataŭ la mezepoka latino – kiun lastan ili nomis degenerinta – ne tuŝis la esencon de la renversita situacio, kies esenco resumiĝis en tio, ke skriba lingvo servis kiel bazo de parola lingvouzo. En tiu kazo la artefarita (sekundara, skriba) lingva formo kontrolis la naturan (primaran, parolan) lingvan formon.

---

latino, uzata de la eklezio, ktp. (komparu: Traube 1911: 78; Stecker 1968: 38).

<sup>9</sup> "This Latin had, of course, learned in schools and thus its character became permanently fixed. We are, therefore, only half right when we enthusiastically call it a living language, for such a description is only true, in general, for the period before 800, but not later. On the other hand it is essentially quite different from Humanistic Latin, which can really be called »dead« in its slavish imitation of antiquity, while Medieval Latin was capable of change and was refashioned as the need occurred." (Stecker 1968, 35–36)

Estiĝis do la miraklo: surbaze de la ĝisoste artefarita skribo, rigardata kiel sekundara ekzistofomo de la homa lingvo, kreiĝis nova parollingveco, neniam ekzistinta en tiu formo. Tiun novan parollingvecon kreis nenio alia, ol tiu homa rezono, laŭ kiu lingvo povas esti nomata lingvo nur tiukaze, se ĝi kapablas funkcii ankaŭ voĉe, ja voĉa funkciado estas primara formo de la homa lingvo<sup>10</sup>.

## 5. Lingvotipoj en semiotika perspektivo

*Lingva signo estas arbitra* – tiu ĉi tezo depost Saussure (Saussure 2005: 100) estas baza principo de lingvistiko. En tiu senco lingva signo laŭ la signokategorioj de Peirce (*ikono*, *indico*, *simbolo*) havas *simbolan* karakteron. Tiu arbitreco tamen – kiel Saussure poste eksplikas – ne estas absoluta<sup>11</sup> (Saussure 2005: 180–181). Rimarkante, ke la arbitreco – nemotiviteco – de la opaj vortoj ne estas samgrada, li enkondukas la koncepton de *relative motivitaj*<sup>12</sup> vortoj. La vorto 'dek' aŭ 'du' estas plene arbitraj, nemotivitaj. Sed la arbitreco de la vorto 'dudek' jam ne estas plena, ĉar ĝiaj konsistigaj elementoj – 'du' kaj 'dek' – aludas al ĝia signifo; sekve 'dudek' estas *relative motivita* vorto. Laŭ lia koncepto plene arbitraj estas nur radikvortoj sen ajna komplemento ('frato', 'homo' ktp.), ĉiuj aliaj ('fratoj', 'fratino', 'homoj', 'homaro' ktp.) estas vortoj relative motivitaj. Relative motivitaj vortoj do – laŭ la Peirce-a signokategorioj – konservante sian baze *simbolan* karakteron, alprenas iujn *indicecajn* trajtojn, eĉ se ili ne senpere rilatas al sia signato, sed pere de siaj konsistigaj elementoj. Se estas tiel, do oni povas diri, ke *relative motivitaj vortoj portas trajtojn de artefariteco, ja ilia rilato al sia signifato estas segmentebla, do*

<sup>10</sup> La prononcon de la lernita latino evidente multe influis la gepatra lingvo de la parolantoj, kaj tio probable rezultigis kaoson. Likvidon de tiu kaoso celis la Erasmaj prononcreguloj en la 16a jarcento. Kvankam tiuj reguloj neniam estis reguloj de la vivanta latino, ili bone servis tra jarcentoj la praktikan parolan uzadon de la latina lingvo.

<sup>11</sup> "Le principe fondamental de l'arbitraire du signe n'empêche pas de distinguer dans chaque langue ce qui est radicalment arbitraire, c'est-à-dire immotivé, de ce qui ne l'est que relativement. Une partie seulement des signes est absolument arbitraire; chez d'autres intervient un phénomène qui permet de reconnaître des degrés dans l'arbitraire sans le supprimer: le signe peut être relativement motivé."

<sup>12</sup> Estas sufiĉe disvastiĝinta opinio nomi onomatopeojn '(plene) motivitaj' vortoj. La uzo de la vorto 'motivita' koncerne onomatopeojn tamen estas dubinda, ja tiuj vortoj ordinare nur similas iomete tiujn sonojn, kiujn ili imitas.

*diskreta, kontraste al nemotivitaj vortoj, kies rilato al sia signifato estas nesegmentebla, do kontinua.*

Saussure atentigas, ke neniuj lingvoj povas konsisti nure el vortoj arbitraj aŭ nure el vortoj motivitaj, sed li konstatas, ke la opaj lingvoj povas montri grandajn diferencojn koncerne la proporciojn de la du specoj de vortoj: inter la polusoj de maksimuma arbitreco kaj maksimuma organiziteco povas ekzisti ĉiaj versioj. Lingvojn, kiujn dominas arbitraj vortoj, li nomas 'leksikologiaj' lingvoj, kaj tiujn, kiujn dominas relative motivitaj vortoj, li nomas 'gramatikaj' lingvoj. Arbitreco kaj relativa motiviteco estas kvazaŭ du polusoj, inter kiuj povas moviĝi lingva sistemo; iuj lingvoj plie strebas al uzado de nemotivitaj signoj, dum aliaj al pli vasta apliko de la eblaj konstruimodoj de gramatiko. Eĉ, tiaspeca moviĝo povas okazi ene de la sama lingvo. Saussure trovas, ke la franca lingvo montras emon moviĝi al la direkto de arbitriĝo: dum en la latina la vorto 'inimīcus' memorigas pri 'in' kaj 'amīcus', kaj per tio ĝi fariĝas motivita, la franca 'ennemi' ne estas motivita. Simila arbitriĝemo konstateblas en la poezia vortaro de Parnaso (Gvidlibro, kaj en la strebado por elimini la prefikson 'mal-' ('aperti' anstataŭ 'malfermi', ktp.), kaj ĝenerale por anstataŭi derivitajn vortojn per radikvortoj ('kanono' anstataŭ 'pafilego').

Laŭ la supraj terminoj de Saussure la diversaj lingvotipoj montras malsamajn trajtojn: *izolaj* lingvoj – apenaŭ havante relative motivitajn vortojn – portas preskaŭ pure *leksikologian* karakteron; en *fleksiaj* lingvoj – kiuj havas konsiderindan kvanton da relative motivitaj vortoj – ĉeestas kaj *gramatika*, kaj *leksikologia* karaktero; en *aglutinaj* lingvoj – en kiuj altas la proporcio de relative motivitaj vortoj – dominas *gramatika* karaktero. Ĉio ĉi sekvigas, ke el semiotika vidpunkto izolaj lingvoj estas pli naturaj, ol fleksiaj kaj aglutinaj lingvoj; fleksiaj lingvoj montriĝas pli artefaritaj ol estas izolaj lingvoj, sed pli naturaj, ol estas aglutinaj lingvoj. Oni devas aldoni, ke signifaj diferencoj povas montriĝi ankaŭ ene de la sama lingvotipo: la angla kaj la germana klasiĝas ambaŭ fleksiaj lingvoj, tamen en la germana multe pli altas la proporcio de la relative motivitaj vortoj, ol en la angla;

sekve el semiotika vidpunkto la germana lingvo montriĝas pli artefarita, ol la angla.

La semiotikan karakteron de lingvo multe povas influi toneco. En tonlingvoj – en kiuj prononctono (type kontinua signo) povas havi leksike distingivan rolon – la proporcio de kontinuaĵaj signoj estas multe pli alta, ol en la tn. intonaciaj (unutonaj) lingvoj, sekve tonlingvoj el semiotika vidpunkto ĝenerale montriĝas pli naturaj, ol unutonaj lingvoj.

## **6. Artefariteco kaj natureco de Esperanto**

El genetika vidpunkto Esperanto estas sendube artefarita lingvo, ja ĝi estiĝis rezulte de konscia homa agado – la agado de Zamenhof. El semiotika vidpunkto tamen ĝi estas egalrajta partnero de etnaj lingvoj, ja ĝi enhavas tiel same artefaritajn, kiel naturajn trajtojn, simile al ajna etna lingvo. Ni provu do inventarii la trajtojn artefaritajn kaj naturajn de Esperanto.

6. 1. La cirkonstanco, ke la primara formo de Esperanto estas skribita, estas sendube trajto de artefariteco. La parola lingvo de Esperanto kreĝis surbaze de la skriba lingvo, kaj la esperanta parola lingvo ĝis nun estas tre strikte ligita al skribo, tiel striktege, kiel ĉe neniu etna lingvo. La esperanta alfabeto, kaj la skribmaniero (ortografio) de la vortoj estas rigardata kerna parto de la lingva sistemo: ili estas parto de la 'netuŝebla fundamento'. Bele atestas tion la preskaŭ plenjarcenta sensukcesa militado kontraŭ supersignoj; la defendantoj de supersignoj en la ŝanĝo de la skribmaniero de kelkaj parolsonoĵoj vidis ne simplan ortografian ŝanĝon sed lingvan reformon – kaj ni devas diri, ke laŭ teoria vidpunkto ili plene pravis. Post la disvastiĝo de la uzado de komputiloj tiu militado perdis sian ĉefan bazon, kvankam la antipation kontraŭ la supersignoj elvokis ne nur la presejaĵoj malfacilaĵoj, sed ankaŭ la fakto, ke la supersignitaj konsonantoj kreis la atmosferon de orient-eŭropaj lingvoj, kaj tiu atmosfero por multaj estis nete malelita kaj tial nesimpatia.

La naŭa regulo diras, ke *'ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita'*. Tiu regulo bele ilustras la primarecon de skribo: *legata* povas esti nur io, kio antaŭe jam estis *skribita*. Vorto laŭ la frua

esperantista mentaleco ne estis dirata, sed legata. Tiu regulo fidele estas sekvata ĝis nun, kaj modela esperanta prononcado strebas esti ĝis maksimumo literprononca: ĝi klopodas elimini ĉiujn fonetikajn interefektojn, kiel ekzemple kunfandiĝon aŭ asimiliĝon de konsonantoj. Principe tiu strebo estas kompreneble ĝusta, ja fonetikaj interefektoj ne estas universalaj fenomenoj, ili povas multe variu de lingvo al lingvo. Tamen, en la praktiko tiu strebo estas sukcesa nur parte: la esperantaj vortoj en la parola uzo povas havi – kaj efektive ili havas – sennombre multspecajn fonetikajn konkretiĝojn, inter la (sufiĉe vastaj) limoj de la komprenebleco. La parola uzo kompletigas la diskretan signaron de la skribita Esperanto per multaj kontinuaj signoj, kaj tiuj kontinuaj signoj puŝas la lingvon en la direkton de la natureco.

6. 2. La klara kaj logika vortfara sistemo de Esperanto portas esence diskretan karakteron, ĝi fortigas la trajtojn de artefariteco en la lingvo. Tial jam relative frue iujn logike derivitajn vortojn forigis el la uzado novaj radikvortoj, prenitaj el Eŭropaj lingvoj. '*Biblioteko*' baldaŭ eliminis el la lingvo '*librejon*', '*hospitalo*' siavice '*malsanulejon*'. Tamen, iuj derivitaj vortoj persiste restis, kvankam okazis multaj provoj anstataŭigi ilin per radikvortoj. Tia vorto estas ekzemple '*maldekstra*'. La komuna lingvo de Esperanto ĝis nun konservas amason da vortoj kun la prefikso '*mal-*': '*malproksima*', '*malgranda*', '*malbona*', '*malfermi*', '*malkovri*', '*malsukcesi*', '*mallaŭdi*' ktp. Estas konjekteble, ke ĉi tiuj vortoj pro la multa uzado en la komuna konscio ĉesis esti derivitaj – renkontante la vorton '*malfermi*' en la menso de ordinara lingvouzanto ne aperos la signifo '*fermi*', el kiu li/ŝi derivas la kontraŭon per la prefikso '*mal-*', sed nur la preta signifo de '*malfermi*', sen konscio pri la kunmetiteco de la vortoformo kaj tiu de la signifo.

Derivitaj vortoj tamen ĝenis antaŭ ĉio la uzadon de Esperanto por celoj artaj. Laŭ Eŭropa komuna koncepto en impresa artcela teksto la signifo devas kvazaŭ elŝpruci el la vortoformo – kiu mem devas esti monolita, nedividebla, potenca –, kaj ne ŝvite-logike kunmetiĝi el vico de sememoj. La malŝato al la artefariteco de derivitaj vortoj naskis la Poezian Fakvortaron, aldonitan al Parnasa Gvidlibro. Tiu vortaro

enhavis plurajn centojn da vortoj, tamen el ili nur parto eniris la efektivan uzadon.

6. 3. Plia artefariteca trajto de Esperanto estas la altgrada semantika segmentemo de la vortaro, t. e. la strebo reprezenti ĉiujn eblajn sencnuancojn de ĉiuj ekzistantaj etnaj lingvoj. Tiu strebo naskis tiajn radikduojn, eĉ radikbukedojn, kiel '*akcento-akĉento*', '*indekso-indico*', '*pesi-pezi*', '*procedo-proceso-procesio-procezo*'. Tiu fenomeno fontas parte el la bezono de tiuj lingvouzantoj, kiuj ne plene regas Esperanton, pensas en la gepatra lingvo, kaj bezonas trovi precizan Esperantan ekvivalenton por ĉiu vorto de sia gepatra lingvo; aliflanke nutras la semantikan precizemon ankaŭ la timo, ke manke de preciza ekvivalento por ĉiu nacilingva sencnuanco, oni povus nomi Esperanton malriĉa lingvo. Kompreneble relative alta nombro de simil-signifaj kaj similonaj vortoj – t. n. *paronimoj* – en neniuj lingvoj helpas la glatan uzadon.

## 7. Resumaj tezoj

Ĉiu lingvo havas kaj naturajn, kaj artefaritajn trajtojn; la proporcio de la du specoj de signoj povas estis malsama en la diversaj lingvoj.

Tiu heterogeneco ĉeestas en ĉiu lingvo kaj el laŭgeneza, kaj el semiotika vidpunkto.

Pro tio konceptojn *natura lingvo* / *artefarita lingvo* oni ne povas uzi kiel ekskludan opozicion; la realaĵojn multe pli fidele respegulas alia koncepto, kiu lokigas la lingvojn sur imagita skalo, kiu havas du ekstremajn punktojn; el tiuj ĉe unu ekstrema punkto troviĝas plena spontaneeco kun signoj senescepte analogaj (kontinuaĵ), dum ĉe la alia ekstrema punkto sidas senspontanea konscia planiteco kun kodo senmanke digita.

El la supre diritaj sekvas, ke pri lingvo plie ĝustas diri, ke ĝi havas pliparte naturajn, aŭ pliparte artefaritajn trajtojn – ja neniuj lingvoj havas nurnure naturajn aŭ nurnure artefaritajn karakterizaĵojn. Tio kompreneble validas nur por la prijuĝo laŭ semiotikaj trajtoj.

Oni povas diri, ke dum la pasinta duona jarmilo en ĉiu science studita lingvo plimultiĝis la trajtoj artefaritaj. Tiun fenomenon elvokis antaŭ ĉio la disvastiĝo de la skribo.

### Referencita literaturo:

- Goody, Jack & Watt, Ian (1968): The consequences of literacy. In Jack Goody, ed., *Literacy in Traditional Societies*. Cambridge: Cambridge University Press. 27–42
- Guiraud, Pierre (1969): *Essais de stylistique*. Paris: Éditions Klincksieck.
- Haas, William (1983): Determining a level of a script. In: Florian Coulmas & Konrad Ehlich (eds): *Writing in focus*. (Trends in linguistics, Studies & monographs, 24). Berlin: Mouton, 15–29.
- Jespersen, Otto (1904): *Lehrbuch der Phonetik*. Leipzig–Berlin: Teubner.
- Jespersen, Otto (1912): *Elementarbuch der Phonetik*. Berlin: Teubner.
- Nöth, Winfried (2000): *Handbuch der Semiotik*. 2., vollständig neu bearbeitete Auflage. Stuttgart/Weimar: Metzler.
- Nyíri Kristóf (1996): Bölcsészettudomány az írásbeliség után. In: *Világosság*. 1996/6. 3–16.
- Ong, Walter J. (1982): *Orality and Literacy. The Technologizing of the Word*. London – New York: Methuen
- Ong, Walter J. (1977): *Interfaces of the Word. Studies in the evolution of consciousness and culture*. Ithaca–London: Cornell University Press.
- Saussure, Ferdinand de (2005): *Cours de linguistique générale*. Paris: Payot.
- Stecker, Karl (1968): *Introduction to Medieval Latin*. Trans. R. B. Palmers. Dublin–Zürich: Weidmann.
- Traube, Ludwig (1911): *Einleitung in die lateinische Philologie des Mittelalters*. München: C. H. Beck'sche Verlagsbuchhandlung, Oskar Beck.
- Vigotszkij, Lev Szemjonovics (2000): *Gondolkodás és beszéd*. Budapest: Trezor Kiadó.

# RILATOJ INTER KOMUNIKADAJ TEKNOLOGIOJ KAJ LA HOMA LINGVO\*

## 1. LINGVO

### 1.1. Origino

Pri la origino de la homa lingvo ni ne povas havi certajn sciojn, ja el la longega periodo, kiu anticipis la aperon de la skribo, absolute mankas al ni ajnaj fontoj. Pro tiu malcerteco pri la temo povis naskiĝi plej diversaj teorioj, tre ofte plene kontraŭdiraj unu al la alia. Estas notinde, ke pro la inflacio de tiaj teorioj la Pariza Lingvistika Societo meze de la 19a jarcento rekte malpermesis al siaj membroj okupiĝi pri tiu nesolvebla problemo. En la 20a jarcento tiu malpermeso estis nuligita, tamen daŭre ekzistas pri la kreiĝo de la homa lingvo nur pli-mapli probablaj hipotezoj – nepruvitaj kaj nepruveblaj, samtempe nerefutitaj kaj nerefuteblaj.

### 1.2. Baza funkcio de la lingvo

La funkcioj de la lingvo jam permesas pli sekuran aliron al la esploranto. Kompreneble ankaŭ pri tiu temo abundas teorioj, kiujn ni ne citas ĉi tie.

La kerno de la demando estas, ĉu iu el la lingvaj funkcioj estas rigardebla baza, primara. Ĝenerale oni prenas, ke pleje gravas la komunikada funkcio, tamen la usonano Noam Chomsky opinias, ke lingvo havas nenion komunan kun komunikado, ĝi estas antaŭ ĉio ilo por la konado de la mondo. En tiu ĉi prelego ni akceptos tiun hipotezon, laŭ kiu lingvo kreiĝis pro kaj evoluas laŭ la komunikadaj bezonoj, kaj ĝia rolo en la kreo de konceptoj estas nur kromfenomeno, kvankam kompreneble gravega kaj nemalhavebla.

---

\* Skriba versio de prelego farita en Internacia Kongresa Universitato dum la 87a Universala Kongreso en Telavivo, 2000. Ĉi tiu skriba versio aperis la unuan fojon en Lipari, Michela (red.) (2000): *Internacia Kongresa Universitato Telavivo 26 Julio – 1 Aŭgusto 2000*. Rotterdam – Tel-Aviv: Universala Esperanto-Asocio, p. 63–74.



### **1.3. Karaktero de la lingvo**

#### **1.3.1. Fizika karaktero**

Lingvo estas primare akustika fenomeno, kiu kombiniĝas el aro da digitaj kaj analogaj signoj.

Digitaj lingvaj signoj estas baze fonemoj, opoziciantaj inter si, kaj la lingvaj elementoj, tipe vortoj, kiuj konstruiĝas el fonemoj. Tiujn elementojn lingvistiko nomas segmentaj elementoj de la lingvo. Mi aldonu, ke digitaj lingvaj signoj estas pure arbitraj: la signifo, senco de vorto havas nenian logikan aŭ alispecan rilaton kun la fonemoj, kiuj konsistigas ĝin, kaj mem la fonemoj havas nenian signifon.

Intonacio, vort- kaj frazmelodio ktp. estas nomataj supersegmentaj lingvaj elementoj. Tiuj elementoj estas laŭ sia karaktero analogaj signoj, kaj ili povas esti priskribataj per digitaj rimedoj nur malperfekte. Pro tio per la esence digita liter-skribo pli-malpli perfekte estas registreblaj vortoj, sed intonacio, toneco ktp. tute ne, aŭ nur tre-tre malperfekte.

Esence ankaŭ la supersegmenta tipo de lingvaj signoj estas arbitra, tamen la arbitreco ĉikaze ne estas tiel evidenta, kiel en la kazo de la digita signaro.

#### **1.3.2. Struktura karaktero**

Lingvo kiel strukturo estas esence aperta, kion oni komprenu tiel, ke ni kapablas krei senfine multajn, ĝis nun neniam eldiritajn frazojn.

En la lingva strukturo estas konstateblaj tri niveloj: el strikte difinita, ne tre granda nombro da fonemoj (tiu nombro en neniun konata lingvo superas sepdek, kaj en neniun lingvo restas sub dek) oni povas krei tre grandan, tamen ne senliman kvanton da vortoj, el kiuj lastaj eblas kombini senfine multajn frazojn.

### **1.4. Origina malperfekteco de la lingvo**

#### **1.4.1 Karaktero de la malperfekteco**

Lingvan malperfektecon oni komprenu en la senco, ke lingvo ne kapablas senmanke peri la enhavon de la konscio de unu homo al alia homo. Ĉar ni havas pli-malpli klarajn supozojn pri la dimensioj de la

enhavo de la homa konscio, la postulo pri ĝia senmanka respegulo povas ŝajni maljusta al la lingvo. Tamen oni konsciu, ke komunikado estas nenio alia, ol meto de sia konscio ekster sian korpon, sekve perfekta komunikado postulus la eblon meti la tuton de sia konscioenhavo ekster sian korpon.

Ni tre bone scias, ke tio ne eblas: por komuniki, ni ĉiam devas kompromisi.

### **1.4.2 Kompromiso por komuniki**

El kio konsistas tiu kompromiso? Antaŭ ol komuniki, ni devas fari minimume la jenajn procedojn:

- ni devas iel strukturi, disartiki nian origine amorfe kompaktan konscioenhavon

- elektante la komunikota(j)n konscioelemento(j)n ni devas formaligi ĝin/ilin: formaligo esence signifas modifon de la komunikota ero de la konscioenhavo cele al ĝia perlingva ‘kapto’; en tiu fazo heredita lingvo povas senteble influi la homan pensadon – sur tiu fazo bazas sin la fama, tamen vaste diskutata teorio de Whorf kaj Sapir pri lingva relativeco

- la tria ŝtupo de la kompromiso estas liniigo: tion oni devas fari eĉ pro du kaŭzoj. Unue pro tio, ĉar akustika lingvo estas strikte linia en tempa senco – lingvoelementojn oni povas eldiri nur unu post la alia, en sinsekvo. Kaj eĉ pli gravas tio, ke ankaŭ la adresato de la komunikanto, t.e. la aŭkultanto povas percepti en unu tempero nur unu lingveron. Se la fiziko kaj fiziologio jam trudis tiun liniigon al la komunikanta homo, li plenigis tiun skeletan liniecon per enhavo: linieco fariĝis baza, ĉefa, kaj dum longa tempo la sola maniero de la ordigo de la ‘elkorpigitaj konscioenhavoj’, t.e. informoj.

## **1.5 La homa lingvo antaŭ la invento de skribo**

Por ricevi ian imagon pri tio, kiel komunikadaj teknologioj influis la homan lingvon, estas necese iom konturi ĝian originan formon. Tion ni povas fari nur surbaze de teoriaj konsideroj, ja kompreneble ni ne havas magnetofonajn registraĵojn el la antaŭ-skriba epoko. Praktikan helpon por la kreado de hipotezo ni povas ricevi nur el la lingvo de

tiuj nuntempaj etnoj, kiuj malhavas ajnan formon de skribo, kaj praktike ne kontaktiĝas kun tiaj homoj, en kies vivo skribo havas eĉ plej etan rolon.

Dum la lastaj jardekoj oni vaste esploris la koneksojn de parollingveco kaj skriblingveco. Plej ĝenerale oni konas la nomon de Walter J. Ong, kiu la ĝisnunan ekzistadon de la homaro dividis je tri komunikhistoriaj periodoj. Ili estas la jenaj:

1. Primara parollingveco [primary orality] – periodo ĝis la invento de skribo; 2. Skriblingveco [literacy] – periodo ĝis antaŭ kelkaj jardekoj; 3. Sekundara parollingveco [secondary orality] – pli-malpli la lasta jarcento, kiam vaste ebligis la registrado, konservado kaj disvastigado de parola lingvomaterialo. (Mi nur mencias ĉi tie, ke ekzistas ankaŭ pli detalaj periodigoj, interalie tiu de la sviso Paul Zumthor.)

Ĉi tie nun ni koncentriĝos al la ĉefaj karakterizaĵoj de la lingvo en la t.n. primara parollingveco. Pri ĝi tute skize estas direbla la jeno:

– Ĝia ekskluziva dimensio estis la akustika dimensio. Tial akustikaj rimedoj estis en ĝi multe pli vaste uzataj, ol en la nuntempa homa lingvo. Intonacio, voĉkoloro, ritmo, prononcedaŭro estis gravaj sencportantoj, minimume egalrangaj kun la segmentaj lingvoelementoj. Tiuj rimedoj, kiel pli supre jam temis pri tio, havas esence nedigitan, t.e. analogan karakteron.

– Lingva materialo kaj parolago ekzistis en nedividebla unueco. La parolanta homo ne perceptis ian limon inter tiuj du, fakte li ne vidis tie du aferojn, sed nur unu. La koncepto ‘diri frazon aŭ vorton tiumaniere aŭ alimaniere’ simple ne ekzistis, ja se oni diris ion alimaniere – ekzemple per alia voĉkoloro, parolritmo, laŭteco ktp. – tio jam estis io alia, eĉ se la segmentaj elementoj mem estis la samaj. La apartiĝo de la lingva materialo disde la monolita parolago estis frukto de analizo, kiun trudis al la homo la uzo de la skribo.

– Kaŭze de tio, ke difinita lingva materialo – teksto – neniam produktiĝis pli ol unufoje, la vortsignifoj estis multe malpli fiksjaj, ol en nia nuna lingvo, ja ĉiu vortouzo malaperis fizike tuj post la eldiro, do ne povis servi kiel modelo, kiel referencloko. La signifo de iu fonemvico algrade dependis de la situacio kaj kunteksto, konstanteco

traarkanta la situacion kaj la kuntekston ekzistis nur en tre magra proporcio.

## 2. SKRIBO

Oni bone scias, ke lingvo ne nepre devas havi skribon. El la pluraj miloj da lingvoj, kiuj ekzistas nuntempe, nur malmultaj centoj havas skribon. Oni memoru, ke ĉiu lingvo estis ekskribata ordinaro post plurjarmila buŝa uzado – escepto estas ĝuste Esperanto kaj la aliaj planlingvoj, kiuj naskiĝis en skriba formo, kaj tiu skriba skeleto iom post iom riĉiĝis per la viva karno de la akustika uzado.

Antaŭ ol paroli pri skribsistemoj, necesas substreki, ke skribo naskiĝis ne kun la pretendo fiksi kaj konservi lingvomaterialojn, sed por fiksi kaj konservi la realaĵojn, pri kiuj homo komunikis pere de lingva materialo akustika. La unuaj skribsignoj estis fakte desegnaĵoj, kiuj bildigis la gravajn aferojn: ili estis ikonaj signoj de kiuj kondukis longega vojo ĝis la nunaj literkriboj, kiuj konsistas el simbolaj signoj.

### 2.1 Skribsistemoj

Paleografio – la scienco pri la historio de la skribsistemoj – dividas kribojn je du grandaj kategorioj: signif-havaj kriboj (per angla termino: *pleremic*; ili principe enhavas nur semantikajn, sed ne fonetikajn informojn) kaj sen-signifaj kriboj (per angla termino: *cenemic*; ili principe enhavas nur fonetikajn informojn, sed neniam semantikajn). Oni devas diri, ke tiuj du sistemoj neniam aperas en plene pura formo. Por la unua tipo povas esti ekzemplo la antikva hetita hieroglifa skribo, el kies 400 signoj tamen kvindeko peris nur fonetikajn informojn. Aliflanke en ĉiuj nuntempej literkriabaj sistemoj oni trovas abundon da tiaj signoj, kiuj donas semantikajn informojn, sed neniujn fonetikajn: tiaj estas ĉiuj ciferoj, krome signoj kiel &, %, \$ ktp.

Sen-signifaj kriboj – do tiuj, kiuj peras principe nur fonetikajn, sed ne semantikajn informojn – povas esti dividataj je tri subgrupoj: silabaj kriboj (tia estas ekzemple la japana kanao), konsonant-alfabetoj (tia estas ekzemple la hebrea aŭ araba skribo) kaj plenaj alfabetoj (en la ĉi lastaj ekzistas aparta litero aŭ literkombino por ĉiu

fonemo, do ankaŭ por la vokaloj). Tiuj du lastaj per komuna nomo estas nomataj liter-skribo.

Plenajn alfabetojn ordinare oni nomas fonetikaj alfabetoj, kio kompreneble estas troigo, ja vere neniu alfabeto estas fonetika, sed tion oni eĉ ne bezonus. Tamen lingvoj kun relative frua vasta alfabetizacio nuntempe jam komencas montri formon de speciala diglosio (du-lingveco) de skribo kaj parolo – tia estas antaŭ ĉio la angla.

Tie skribo fakte donas nur minimumajn fonetikajn informojn. Same povas okazi en lingvoj kun nestabila vortakcento ortografie ne prezentita, precipe kiam neakcenta silabo signifas reduktiĝas – ekzemplo por tio povas esti la rusa.

Oni notu, ke en la sekvaj partoj de la prelego parolante pri skribo ĉiam ni komprenos sub tio nur la liter-skribon, precipe ĝian plenalfabetan varianton.

## **2.2 La influoj de skribo al la lingvo**

### **2.2.1. Lingva materialo kaj parolago apartiĝas**

En la primara parollingveco – kiel pri tio jam temis supre – lingva materialo ne postvivis la parolagon. Skribo fakte trudis al la uzanto la analizon de la parolago, por apartigi el ĝi la skribe kapteblajn elementojn. Oni povas diri, ke skribo faris en tiu senco revolucion: ne estas troigo, ke esence nur skribo kreis la aŭtonomecon de la lingvo.

### **2.2.2 Influoj kiuj rezultas el la malperfekteco de skribo**

Liter-skribo – kontraste al la signif-havaj skriboj – celas kapti per grafikaj rimedoj ne la signifon, sed la fonetikan enkorpiĝon de la vortoj. Ĝi estas tre ekonomia sistemo, ja helpe de nur kelkaj dekoj da grafikaj signoj ĝi kapablas fiksi iun ajn lingvan materialon. Tamen la ekonomieco havas sian prezon. La digita liter-skribo kapablas kapti nur la segmentajn lingvoelementojn, dum ĝi absolute malkapablas registri la t.n. eksterlingvajn rimedojn de komunikado (gestojn, mimikon ktp.). Skribo ne povas registri ankaŭ la riĉan supersegmentan rimedaron de la lingvo, aŭ maksimume nur tre etproporcie (per demando- kaj krisignoj, komoj ktp.). La skribanta homo do devis enkodi ankaŭ tiujn signi-

fojn en la segmentajn lingvoelementojn, kiujn signifojn en la buŝa uzado peris la eksterlingvaj kaj supersegmentaj rimedoj.

Tiu bezono donis grandegan impulson al la evoluo de la segmenta lingva rimedaro, kiu evoluo okazis unuavice per la ampleksiĝo de la vortaro kaj la fajniĝo de la vortkombinaj, t.e. gramatikaj reguloj.

### **2.2.3 Influoj kiuj rezultas el la ŝanĝita komunikada situacio**

Kiam skribon oni uzas por komunikado – do ne simple por protekti ion kontraŭ la forgeso –, kreiĝas komunikada situacio multilate diferenca disde tiu de la parollingva komunikado. Ordinare skriba komunikanto ne vidas la adresaton de sia komunikaĵo, eble eĉ ne konas lin. Pli supre jam temis pri la formaliga kaj liniiga trudo, kiun kreas komunikado. Ĉe skriba komunikado tio estas eĉ pli forta, ja grandparte aŭ plene forfalas la interaktiveco de la buŝa komunikado. Pro tio en skribo la signifo de la vortoj devas ĉiam pli emfaze konturiĝi, kaj per tio certagrade abstraktiĝi. Tiu procezo akcelas kreiĝon de ĉiam pli fajnaj konceptoj, kaj per tio ĝi tre favore influas la evoluon de la pensado.

## **3. PRESADO**

La invento de preso signifis samtempe minimume tri aferojn. Unue: la eblon malmultekoste produkti legeblajn tekstojn; Due: plian formaligon kaj abstraktigon de la skribo. Trie: transiron el la dimensio tempo-aŭdo (kiuj estas la pilieroj de la parola lingvouzo) en la dimension de spaco-vido (kiuj estas la terenoj de la skriba lingvouzo).

### **3.1 Malmultekosta produktado de legeblaj tekstoj**

La disvastiĝon de skribo multe bremsis, ke legeblaj tekstoj estis produktaj nur per mana laboro, kaj tial ili ekzistis en tre malgranda kvanto: sekve ili estis alireblaj por nur malmultaj homoj. Fakuloj diskutas pri la proporcio de personoj kapablaj legi kaj skribi dum la fruaj historiaj tempoj: ekzemple taksoj por la imperiestra epoko de Romio varias inter 5-20 procentoj, kaj por Eŭropo en la jaro 1000 p. K. inter 0,5 kaj 1 procento.

Sen eldiri ian opinion pri tiuj ciferoj, mi tamen avertu pri tio, ke la kapablo legi kaj skribi en tiuj fruaj epokoj grave postrestis al tio, kion

nuntempe ni komprenas sub legkapablo. Ekz. la tipa formo de legado estis la laŭta legado – tion kaŭzis antaŭ ĉio la legteknikaj malfacilaĵoj. Por atingi fluan mutan legadon oni deveas esti traleginta tre grandan kvanton da tekstoj – kaj tiu granda kvanto da tekstoj antaŭ la invento de la presado ne estis disponebla.

Per la apero kaj daŭra teknologia pliperfektigo de la presado tiu obstaklo estis forigita, kaj ekde la 15a jarcento oni spertas suprenantan karieron de skribo.

### **3.2 Plia formaligo kaj abstraktigo de skribo**

Manskribitaj tekstoj neniam estis plene la samaj. Malgraŭ strebo al sameco ili diferencis inter si per literformoj, interspacoj, kaj eraroj faritaj dum la kopiado.

Grafologio instruas al ni, ke en manskribado ĉiam enestas multaj individuaj ecoj de la skribanta homo.

Kvankam Gutenberg per siaj unuaj produktoj deziris imiti manskribitajn kodeksojn, baldaŭ presado aŭtonomiĝis: ĝi aplikis literformojn plejeble simplajn, kiuj respondis al iu principo de ‘neceso kaj sufiĉo’, t.e. ili enhavis nur informojn necesajn por signi tiun fonemon, kiun ili reprezentis.

Kaj ĉar per presado la distanco inter la sendanto kaj ricevanto de la skribita mesaĝo signife grandiĝis – kaj space, kaj tempe – la sendanto de la mesaĝo devis eĉ pli formaligi kaj liniigi sian lingvaĵon.

### **3.3 Transiro el la dimensio tempo-aŭdo en la dimension spaco-vido**

Parolata teksto havas tempan dimension, skribita teksto havas dimension spacan. El tio sekvas, ke dum aŭda percepto de iu teksto oni estas kaptanta nur unu teksteron: la pli frue aŭditajn koneksajn teksterojn oni devas stoki en la memoro, kaj oni tute ne povas havi imagon pri la sekvaj teksteroj, kio povus faciligi la komprenon de la momente aŭdata tektero. Evidente tio metas striktajn limojn al la komplekseco de la teksto.

La space dimensianta skribo permesas samtempe ampleksi relative grandan kvanton da teksteroj, depende de la legrutino de la leganta

homo. Tiu cirkonstanco povas en signifa grado rapidigi kaj profundigi la fluadon de informoj.

Principe tiu ĉi ŝanĝiĝo de dimensioj devus rezulti el la apero de skribo, tamen ne okazis tiel. Manskribitaj tekstoj plejparte pretiĝis por laŭta lego, do ili strukture devis sekvi la regulojn de la parolataj tekstoj; krome, rapida okula trapromeno de plena alineo aŭ eĉ pli granda tekstoparto eblas nur kaze de optike tre unueca teksto-prezento, kiun povas certigi nur presado.

#### **4. Bilda komunikado**

Dum la lastaj jardekoj ŝajnas esti realiĝanta praa homa deziro: homo kapablas ĉiam pli efike produkti, fiksi kaj disvastigi bildojn. Sekve de tio bildoj okupas ĉiam pli gravan rolon en la interhoma informofluado. El la multegaj konsekvencoj de tiu evoluo estas unu grava fenomeno la senŝarĝiĝo de lingvo. Tion, kion oni povas prezenti bilde, oni ne bezonas priskribi lingve. Kaj tion, kion oni priskribis lingve, unue oni devis analizi, por trovi ties plej karakterizajn/gravajn trajtojn. Lingva priskribo ne povis kapti kaj peri ĉiujn erojn de iu fenomeno, ĝi devis serĉi kaj trovi ĝian esencon. Bilda komunikado kapablas peri (preskaŭ) la tuton de la fenomeno, sekve vidante bildon oni ne bezonas analizi por trovi la esencon.

Lingvo kaj pensado pro la bilda komunikado perdas konstantan, ĉiutagan trejniĝon. Perdas tiun intelektan trejniĝon kaj la informsendantoj, kaj la informricevantoj. Estas neimageble, ke la forfalo de tiu ĉiutaga mentala, intelekta trejniĝo ne influu negative la homan kapablon pensadi.

La konsumantojn de la bilda komunikado atingas ĉiutage amasego da informoj dise en la mondo. Sekve de tio multaj en la evolulandoj ne lernas legi kaj skribi, kaj en la evoluintaj landoj post la lernejoj jaroj tre multaj homoj praktike forgesas legi kaj skribi. Dume en la kapoj akumuliĝas amase amorfaj, ne prilaboritaj – ‘ne-digestitaj’ – konsci-enhavoj, kiujn la posedanto ne kapablas trakti logike; ili nur svarmas en lia kapo kaj generas streĉitecojn internajn, kiuj povas serĉi dissolviĝon en agresemo al-ekstera.



## 5. Reta komunikado

Reta komunikado estas lingve interesa en tiu senco, ke en retleteroj kombiniĝas trajtoj de la parola kaj skriba lingvouzo. Retleterojn nuntempe oni skribas – en tiu senco la lingvouzo estas skriba. (Kvankam verŝajne nur post kelkaj jaroj oni povos sendi samfacile retajn voĉleterojn, kiel nuntempe skribajn.) Ĉiuj aliaj trajtoj de retmesaĝoj memorigas pri la cirkonstancoj de la parola lingvouzo. Retmesaĝoj tuj post la naskiĝo estas ekspedebaj per la puŝo de unu klavo (sen iri al la poŝtoŝefo ktp), ili atingas la adresaton ene de tre kurta tempo, ili ne enkoriĝas materie (t.e. ili ne ‘objektiĝas’, kiel ordinara letero) ktp. Al tiuj cirkonstancoj ŝuldiĝas la fakto, ke retmesaĝoj enhavas multe pli da malprecizaj formuladoj, kaj ankaŭ lingvaj kaj ortografiajn erarojn. Tute simile al la leĝera parola lingvo.

En la reta komunikeblo vere nova fenomeno estas la tutgloba ampleksiĝo de la efiklimoj de la komunikado. Tio trudas al la komunikanta homo plian formaligon kaj liniigon de la mesaĝo, kaj lingve, kaj enhave, ja alimaniere la diversaj adresatoj ne komprenos ĝin. Oni konsciis tamen, ke tiu formaligo kaj liniigo estas atingebla dumaniere. La unua maniero estas, ke la sendanto per utiligo de altgradaj logikaj, psikologiaj kaj lingvaj kompetentoj analizas sian direndon, kaj faras la formaligon kaj liniigon tiamaniere, ke el la origina direndo forfalu kiel eble plej malmulte. La dua maniero estas pli simpla: oni mesaĝas tutglobe nur tuj kompreneblajn banalaĵojn.

## 6. Perspektivoj de la homa lingvo

Estas evidente, ke en la estonto la proporcia rolo de la lingvo en la homa komunikado kaj en la konservado de la scioj daŭre malkreskos. Eĉ pli rapidritme malkreskos la rolo de la skriba lingvo. Antaŭ kelkaj jardekoj eĉ minimumajn sciojn, necesajn por la baza socia integriĝo, oni povis akiri nur per konsumado de skribitaj tekstoj. Nuntempe fakte – dank' al son- kaj bildregistraĵoj – oni povas akiri pli ol mezan ĝeneralan klercon sen renkonti eĉ unusolan literon.

Principe ja estas imagebla tia socio, en kiu la kapablo legi kaj skribi limiĝas al malvasta intelekta elito, kiel tio okazis ĝis antaŭ ĉ. 500

jaroj. Estas tamen probable, ke tia ‘forglito’ de la skribo de malantaŭ la lingvo rezultigus daŭran malriĉiĝon de la lingvo, kaj paralele kun tio la malriĉiĝon de la homa pensado.

Vilém Flusser, germana filozofo skribas pri la lingvoevoluiga efiko de la skribo jene: “...la parolo, sendependiĝinta disde la alfabeto, barbariĝas. Niaj lingvoj dum longaj jarmiloj pasadis tra la raspa kaj freza filtrilo de la alfabeto, kaj per tio ili fariĝis iloj samtempe grandiozaj kaj belaj, fajnaj kaj precizaj.”

La vortoj de la psikologo kaj filozofo Karl Popper estas eble malpli poeziaj, sed ne malpli rekonaj: “Nia lingvo estas tute ne perfekta, sed ĝi estas surprize bona. Surprize efika. [...] Veras ankaŭ tio, ke nia lingvo neniam estos plena, kaj ankaŭ nia priskribo de la mondo ne estos tia. Ĉiu lingvo havas esencan malperfektecon. [...] Mi ne kredas, ke iu ajn asertus tion, ke pere de la lingvo estas kaptebla la tuto de la realaĵoj. Sed mi certas ke lingvo povas trafenetri kiel ajn profundan segmenton de tiu realaĵo.”

La spontaneaj tendencoj klare kondukas al iom post ioma marĝeniĝo de la skribo, kaj poste al tiu de la lingvo. Laŭ Flusser la ĉefa konkuranto de lingvo estas krom la bilda komunikado la pure koncepta ‘lingvaĵo’ de komputilprogramoj. Tiuj du reliefigas po unu econ – la bilda komunikado la sentimentan; la komputada programlingvaĵo la intelektan – de la homa mentaleco. Lingvo kapablas aperigi kaj inkluzivi tiujn ambaŭ, komplekse. Tial ĝia perdo estus fatala.

Komenciĝis iu procezo, kiun eblas haltigi aŭ almenaŭ bremsi nur per konscia homa interveno. Devus okazi io simila al tio, kio okazis antaŭ jardekoj, kiam homaro iom post iom konsciiĝis pri tio, ke la natura medio, kiun dum sia tuta historio homoj devis alfronti kiel kontraŭulon, estas praktike venkita, kaj la homaro devos en sia propra intereso ekde nun protekti ĝin, anstataŭ ataki. Nun necesas protekti skribon kaj legon, multe pli intense, ol tio okazas nuntempe. Se oni ne faros tion, la homaro estos ne nur analfabeta, sed povos realiĝi la koŝmara vizio de Flusser, laŭ kiu iam future en la komunikado de homoj la lingvo ludos tian – ĉarman, ŝatindan, tamen marĝenan – rolon, kian en la nuna komunikado de Napolanoj ludas mangestoj.

## Resumo kaj konkludoj

1. Ekzistas forta kontraŭeco inter unuflanke la karaktero (tipe nedigita) de la enhavo de la homa konscio, konstruita el ‘krudmaterialo’ alveninta tien per la kanaloj de la sensorganoj, aliflanke la karaktero (tipe digita) de la homa lingvo.
2. ‘Ideala’ komunikilo por la homo estus tia rimedo, kiu ebligus esprimon kaj plusendon de tiuj konsci-enhavo senŝanĝe kaj senmanke: sed neniuj homa lingvo estas tiel ideala komunikilo.
3. La tiusenca ‘malperfekteco’ de la lingvo trudis al la homo dis-artiki, formaligi kaj liniigi sian konsci-enhavon, por atingi lingvan komunik-eblon. Dum tio homo devis distingi inter gravaj kaj malpli gravaj komponantoj de sia konsci-enhavo – kaj per tio homo alproprigis la kapablon de abstraktado.
4. Per la apero de skribo kaj preso tiu kapablo abstrakti daŭre pliperfektigis kaj pliprofundigis, kaj ĝi servis kiel ĉefa bazo de la scienca evoluo dum la lastaj 2500 jaroj.
5. Dum la lastaj jardekoj homoj atingis grandegajn sukcesojn sur la kampo de farado, multobligado kaj disvastigado de bildoj. Tio ŝancelis la poziciojn de skriba lingvouzo.
6. La ŝrumpo de skriba lingvouzo povas rezultigi ŝrumpon de la kapablo de abstrakta pensado, kaj ties konsekvencoj verŝajne estus fatalaj por la homa raso. Necesas konscia homa interveno por haltigi tiun procezon.

# LINGVO, SKRIBO, LITERATURO\*

## Lingvo

Publiko kaj fakuloj ĝenerale konsentas pri tio, ke lingvo estas verŝajne la plej signifa kaj unika intelekta produkto de la homa raso, kiu produkto siavice estis nepra antaŭkondiĉo de ĉiuj aliaj homaj produktoj, ĉu materiaj, ĉu spiritaj. Ne estas mirinde do, ke tiu vere majesta plenumaĵo delonge obsedas nian narciseman rason: amasas la hipotezoj kaj pli-malpli funditaj teorioj pri la kreiĝo de la lingvo, pri la rilato inter homo kaj lingvo, kaj pri la detaloj de la funkciado de tiu fajna mekanismo. La multe kritikita kaj verŝajne ekstreme troiga teorio de Whorf asertas, ke la gramatika strukturo de la gepatra lingvo difinas la mondbildon de la individuo (vidu en Carrol 1956): li diras ekzemple, ke la *hopiaj* indianoj malhavas historian percepton pro tio, ĉar el ilia lingvo mankas tempokategorioj. La klarigo por tiu fenomeno verŝajne devus esti inversa: la hopia lingvo malhavas tempokategoriojn, ĉar la materia kaj socia evolugrado de ĝiaj parolantoj ne neprigis la kreon de tiaj kategorioj. Malgraŭ la facila refuto de la Whorfa tezo ni sentas, ke kuŝas en ĝi ankaŭ certa dozo da vero: infano per la alproprigo de la gepatra lingvo alproprigas ankaŭ iun specifan segmentadmanieron de la realo, kaj tiu maniero certgrade efektive influas tion, kiel li perceptas la mondon.

Por la homaro la komencoj de la lingvokrea procezo dronas en la nefacile trafenetrebla nebulo de la antaŭhistoriaj tempoj: tiu cirkonstanco fakte malebligas fundan ekzamenadon de tiu procezo, eblas aliri ĝin nur teorie, kaj tiaj aliroj ĉiam entenas la danĝeron de spekulacioj, foje-foje pli fantaziaj ol seriozaj. Estas tiel ne nur koncerne la homan lingvon mem, sed ja malmultas serioze studeblaj fidindaj materialoj ankaŭ pri la plej fruaj tempoj de la opaj lingvoj.

Esperantistoj estas tiurilate en unike privilegia situacio: ili plej detale povas studi la cirkonstancojn de la naskiĝo kaj evolua disvolviĝo de sia lingvo. Dum la cent dek jara historio de la Internacia Lingvo

---

\* Ĉi tiu studo aperis la unuan fojon en Benczik, Vilmos (red.): *Lingva arto. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 3–19.

kvazaŭ en dramece densiĝinta formo ripetiĝis antaŭ iliaj okuloj la kutime jarmilojn traarkanta kaj tial por la individuo malpli facile perceptebla miraklo de la kreiĝo de homa lingvo. Tiu senprecedenca travivaĵo certe estas inter la motivoj de tio, ke esperantistoj eĉ pli ol aliaj homoj havas profundajn emociajn sentojn al sia lingvo. Tia arda emocia sinteno povis naski la penson, ke lingvo mem estas arto, ne nur materialo de la perlingva arto, la literaturo<sup>1</sup>. Ankaŭ la tute evidenta cirkonstanco ne malpliigas la tute specialan rolon de lingvo en la pensaro de esperantistoj, ke Esperanto naskiĝis ne el vaka nenio, sed el tiu fekunda grundo, kiun prezentis la alte evoluinta homa lingvaro fine de la 19a jarcento.

Jes ja, fakte, kiom aĝas homa lingvo? Critchley skribas en sia resuma studo (Critchley 1960), ke la plej multaj hipotezoj supozas vidi nerektajn pruvojn pri la ekzisto de la homa lingvo en la tempoj inter 25 000 – 10 000 jaroj a. K., sed laŭ iuj teorioj la homo povis disponi pri parolkapablo jam antaŭ 100 000 eventuale eĉ 500 000 jaroj.

Sed krom la aĝo de la homa lingvo leviĝas ankaŭ pluraj interesaj demandoj pri ĝi. La unua certe estas tio, kial ĝi entute naskiĝis? Oni verŝajne ne multe eraras asertante, ke lingvon naskis antaŭ ĉio la komunuma vivmaniero de la homoj, kiu vivmaniero nepris komunikadon ianivelan. Kaj kompreneble funde de tiu vivmaniero devis ekzisti la kapablo uzi kaj eĉ prepari ilojn, kiel ankaŭ iu primara formo de specialiĝo en la vivtenaj aktivadoj (ekz. inter viroj kaj virinoj).

Pli interesa demando estas, kial homoj elektis akustikan formon por sia komunikado, ja la akustika dimensio certe neniam havis distingitan rolon en la perceptado fare de la homo. (La prioritata sensorgano de homo ĉiam estis la okuloj: niaj kontaktoj kun la ekstera mondo grandparte – laŭ iuj 70-85 procente – efektiviĝas vide, aŭdado havas la pezon de 5-15 procentoj, kaj la ceteraj tri sensoj – flarado, gustumado kaj tuŝado – dividas inter si la restintajn procentojn.

La ideala formo de komunikado estus tio, se homo kapablus sendi informe la sensitajn sensacojn al siaj kunuloj kvazaŭ "analoge": ekz. kiam li volus averti sian kunulon pri tigro, tiam li plusendus al li la

---

<sup>1</sup> "Pri lingvo kaj aliaj artoj" titoliĝas unu el la brilaj esearoj de William Auld.

bildon (eventuale eĉ odoron ktp.) de la tigro. Sed estas evidente, ke tion fari frutempa homo neniel kapablis. (Nuntempe estas celanta tiaspecan transporton de informoj la tn. *virtuala realeco*.)

Se la ideala formo de komunikado ne estis atingebla, la homo do elektis iun alian, se ne idealan, almenaŭ taŭgan formon. Laŭ la sens-organa dotiteco de la homo oni atendus, ke la elektita formo ligiĝos al la vido, sed ne okazis tiel. Pli funde pripensante la aferon ni venas al la konkludo, ke la elekto de la akustika dimensio estis vere trafa. La produktado de voĉo ĉe la mamuloj estas duagrada funkcio: produkti voĉon ĉiam eblas, tio ĝenas nenium alian agadon (krom iomete la manĝadon), dum voĉado la manoj restas liberaj por alia agado, kaj krome voĉsignoj estas uzeblaj ankaŭ nokte, kaj grandparte sendepende de la tereno (Greenberg 1957: 56–65). La ne ideala, sed praktike tre taŭga elekto – kiun laŭ Saussure iasence trudis al ni la naturo (Saussure 2005: 26) – estis uverturo de longega sed seninterrompa evoluo, kies nuna stadio estas ne nur la spirhaltige esprimpova homa lingvaro, sed ankaŭ la pensokapablo de la homo.

Tiu evoluo certe startis kun neartikitaj krioj, per kiuj probable eblis kodi nur kelkajn dekojn da mesaĝoj. La neartikitaj voĉaĵoj diferencis inter si per tono, melodio ktp., ĉiukaze la voĉaĵoj estis kompaktaj, nedivideblaj. Tamen, tiel kiel plimultiĝis la mesaĝendaĵoj, iom post iom elĉerpiĝis la varieblaj intonaciaj elementoj, kaj la homo devis komenci artiki sian voĉaĵon. Tiu artikado komence certe estis tre malfajna, kaj ĝi komencis fajniĝi nur paralele kun la ampleksiĝo de la komunikadaj bezonoj. La procezo kompreneble estis tre malrapida, ja ĝi starigis malfacilajn postulojn por la artikulaciaj organoj. Fakuloj opinias, ke en la pralingvo abundis vokaloj, guturaloj kaj uvulaj sonoj, kaj plej probable tute mankis senvoĉaj konsonantoj. Verŝajnas ankaŭ tio, ke la komence uzitaj vortoj estis unusilabaj, ja la dusilabaj kombinaĵoj postulas de la artikulaciaj organoj almenaŭ duoble pli komplikan laboron.

Sed la akustika signaro, ekuzita de la homo, kiel jam dirite, ne estis perfekta<sup>2</sup>. Ne eblis per ĝi kapti kaj peri ĉiujn opajn fenomenojn de la senfine varia realo. Tiu malperfekteco trudis al la homo la bezonon distingi inter la esencaj, substancaj kaj malpli gravaj trajtoj de la opaj fenomenoj, kaj tiamaniere krei kategoriojn: fakte *primarajn abstraktaĵojn*. Estis ja facile vidi, ke sango estas ruĝa, lakto estas blanka; sed abstrakti la ruĝecon de la sango el la kompleksa perceptaĵo, kaj retrovi tiun saman econ en la ruĝa frambo, kaj malgraŭ la sennombre multaj diferencaj trajtoj de sango kaj frambo krei la koncepton de *ruĝo* – tio estas jam tute nova nivelo: la *pensado* (Critchley 1960). Estas notinde do, ke ĝuste la malperfekteco de la komunikilo donis al la homo grandan puŝon en sia intelekta evoluo<sup>3</sup>. Cetere la malperfekteco de la lingvo (manko de unusola perfekta lingva rimedo por ĉiu opa esprimendaĵo) donas bazon por *stilo*, t.e. individua elekto el inter diversaj – laŭ adekvateco diferencaj, sed neniam perfektaj – lingvaj rimedoj.

Necesas atenti ĉi tie almenaŭ unu plian aspekton. Nome tiun diferencon, eĉ kontraŭecon, kiu ekzistas inter la karaktero de la homa pensado kaj tiu de la lingvo. Nome la origina – sensace bazita – pensado estas *malregule cirkula*, dum la parola lingvo *tempe linia*. La parole komunikanta homo do devas iom ”kombi” siajn individue malregulajn pensozizgagojn, t.e. *liniigi* ilin, por povi ilin kodi per la tempe linia lingvo, kaj tiel fari ilin kompreneblaj al la adresato. Tiamaniere la pensoj certe multe perdas el sia originala formo, individua unikeco, oni povas diri, ke ili certgrade uniformiĝas, sed tio estas la kosto de interkompreniĝo. Inter du diversmaniere malregulaj pensomekanismoj

---

<sup>2</sup> La malperfektecon bele pravas interalie la malsamnivelaj ebloj koncerne lingvan formuladon de la diversaj sensacoj. Vidajn sensacojn relative detale kaj elvokive ni povas enlingvigi, aŭdajn jam malpli, kaj ni tute fiaskas, kiam ni volas klarigi al iu ekzemple la tuŝsensacon de iu specifa arbofolio. Oni povas diri, ke homa lingvo nepre havas originan malriĉecon (’inopia’).

<sup>3</sup> Tamen ne estas ĝuste supozi, ke pensado estas nur lingva, kiel faras Wittgenstein (”la limoj de mia lingvo estas ankaŭ la limoj de mia mondo”), ja pensado povas esti ankaŭ bilda, pli precize baziĝanta sur sensorganaj sensacoj. Tiu pensadformo – vivanta ĝis nun kun ni – certe anticipis lingvan pensadon. (F. Klix nomas ĝin ”arkaika pensado”, aliaj ”mita pensado”.) La abstrakta, koncepta – iasence ”superlingva” – pensado certe formiĝis surbaze de la lingva, do certe ĝi aperis pli malfrue.

– tiu de la adresanto kaj tiu de la adresato – nur rekta linio povas esti la plej malgranda komuna denominatoro.

### **Primara parollingveco**

Nuntempe, kiam lingvo aperas por ni ĉiutage en du alternativaj formoj, t.e. parola lingvo kaj skriba lingvo, nur malfacile ni povas imagi, kia povis esti frua lingvo, malhavanta skribon. Walter J. Ong en 1971 kreis la konceptojn *primara parollingveco* (‘primary orality’) kaj *sekundara parollingveco* (‘secondary orality’), nomante *primara* la parollingvecon antaŭ la apero de la skribo, kaj *sekundara* tiun parollingvecon, kiun ni alfrontas dum la lasta jarcento dank’ al la disvastiĝo de radiofonio, magnetofono, televido kaj interreto.

Ĉar pri la lingvostato de la primara parollingveco ni malhavas rektajn pruvojn, ni povas iom konturi ĝin nur per teoriaj metodoj. Oni povas diri ekzemple sen riski eraron, ke en ĝi lingvo havis *pure akustikan* karakteron. Tio verŝajnigas, ke la lingvouzanta homo tiam pli vaste utiligis la disponeblan akustikan rimedaron (tono, sonalto, melodio), ol nuntempe. La primara parollingveco probable estis kanteca,<sup>4</sup> akustike pli riĉe modulita, ol la nuntempa parolo. Certe la tiamaj tekstoj havis iatipan akustikan organizitecon, kiu similis al niaj nunaj konceptoj pri verso. (Ekzemple en la araba kulturo, pro historiaj kaŭzoj malmulte tuŝita de skribo, longe floris la tekstoformo de *makamo* – rimita prozo.)

En la primara parollingveco ankaŭ vortoj havas alian rolon. Mankas al ili vortare difinitaj, precizaj signifoj, kaj ne povas sedimentiĝi sur ili tiaj historiaj signifotavoloj, kiel post la invento de la skribo. La signifon de la vortoj konturas intonacio, mimiko, gestoj, kaj kompreneble ĉiam la konkreta situacio, en kiu ili estas prononcataj (Goody–Watt 1968). En la primara parollingveco ludas multe pli gravan rolon ol nuntempe la eksterligvaj rimedoj de komunikado, kaj el la lingvaj elementoj la tn. *supersegmentaj rimedoj*, kiel tono, sonalto, melodio. Rajte ni supozas, ke la vortoj havis multe pli vastan signifoareon, ol nuntempe, kaj la vortsignifon konkretigis antaŭ ĉio mem la situacio, la

---

<sup>4</sup> Tiu kanteca lingvo pluvivas en la liturgio de multaj religiaj ceremonioj.



emocia enhavo injektita en la vorton, kaj kompreneble vasta aro de supersegmentaj kaj eksterlingvaj elementoj.

La lingvouzo de la primara parollingveco montras karakterizajn specifaĵojn ankaŭ sur la nivelo de frazoj kaj teksto. Ong jene skribas pri tio: *"En primare parollingvaj kulturoj oni solvas la problemon de konservado kaj revoko de pensoj nur tiam, se oni pensas en skemoj, kiuj facile transformiĝas parolo. La pensoj devas aperi en emfaze ritmitaj, ekvilibritaj formoj, en ripetoj aŭ kontraŭecoj, en aliteracioj aŭ asonancoj, en ofte ripetiĝantaj epitetaj sintagmoj kaj aliaj formuloj, kiujn ĉiam oni aŭdas nove kaj denove, kaj tial ĉiam facile oni revokas ilin. [...] En parollingvaj kulturoj[...] la substancon de pensado difinas la fiksiĝintaj esprimoj."* (Ong 1982: 33–34)<sup>5</sup>

Do en la primara parollingveco estas diferenca ankaŭ la pensado, naskanta la parolon: tiu pensado havas antaŭ ĉio operacian karakteron, ĝi ne aplikas ĝeneraligajn silogismojn, ne perceptas logikan identecon aŭ kontraŭdiron, kaj plej ofte ligiĝas al fizikaj agoj. La formuleca stilo, karakterizinta la parollingvecon reprezentis ne nur certajn lingvajn kaj metrikajn kutimojn, sed ankaŭ certan pensomanieron kaj spiritan staton (Havelock 1963).

La primaran parollingvecon do karakterizis lingvostato funde diferencanta disde la nuntempa homa lingvo. Ĉe la apero de la literiskriba sistemo la skribanta homo provis kapti kaj fiksi helpe de manpleno da grafemoj tiun ĉi specifan lingvon, kiu forte ligiĝis al situacioj, kiu malavare, kvazaŭ diboĉe utiligis muzikajn elementojn, kaj kiu donis dominantan rolon al supersegmentaj kaj eksterlingvaj rimedoj.

## **Skribo**

Parolante pri skribo, ĉi tie ĉiam ni komprenos *literiskribon*. La aliaj skribsistemoj ja apenaŭ rilatas la lingvon mem, ili plejparte nur trararkas ĝin, kreante senperan kontakton inter konceptoj kaj skribo. Vera skribo – el la vidpunkto de la lingvo – aperis eĉ ne tiam, kiam meze de la dua jarmilo a. K. fenicianoj kreis sian literiskribon, sed nur kiam ĉ.

---

<sup>5</sup> Jack Goody demonstras la samon ankaŭ pri la nuntempaj lingvoj, malhavantaj skribon. en sia verko *The Domestication of Savage Mind* (Cambridge University Press, 1977)

la oka jarcento a. K. grekoj kompletigis ĝin per vokaloj. Nur tiam nome skribo fariĝis vere preciza ilo por la fiksado de lingvo. (La vorton *preciza* ĉi tie oni komprenu en lingva, kaj ne en akustika senco: la ŝparema literaskribo kreis apartajn grafikajn signojn nur por tiuj parolsonoj, kiuj posedas sencdistingan rolon – ilin oni nomas *fonemoj*. Tiamaniere la nombro de necesaj grafikaj signoj povis proksimume kvinoniĝi.)

La literaskribo en sia nuna formo estas sistemo efike funkcia kaj ekonomia: helpe de kelkaj dekoj da grafikaj signoj ni povas fiksi kian ajn tekston. Al tio ŝuldiĝas, ke ĝi servas grandan parton de la homaro jam depost preskaŭ tri jarmiloj<sup>6</sup>.

Estas kurioze, kiom fortan kontraŭstaron trovis skribo eĉ ĉe grandaj scienculoj, malgraŭ tio, ke scienco entute ne povus ekzisti sen skribo. Platono diras jene en *Phaidros*: "*Naivegas tiu kiu kredas, ke li povas postlasi sian arton en skriba formo; kaj ne mapli tiu kiu esperas akiri surbaze de skribo klaran kaj solidan scion; kaj naivegas ankaŭ tiu kiu atribuas al la skribo plian signifon ol tio, ke ĝi memorigu nin pri io, kion ni jam sciis sen la skribo.*" La germana lingvisto Humboldt en la 19a jarcento opinias simile, kiam li diras, ke skribo kapablas konservi la lingvon nur malperfekte, mumiece.

La supraj malŝataj vortoj pri skribo ne estas tute senfundaj, ja la ekonomieco de la literaskribo havis sian prezon<sup>7</sup>. Skribo eĉ parte ne kapablas fiksi la eksterlingvajn elementojn de parolo: mimikon, gestojn ktp. Tio estas grava manko, ĉar ties proporcia pezo en la komunikada procezo foje povas atingi eĉ 60-70 procentojn.

---

<sup>6</sup> Tamen oni konsciu, ke dum tiu tempo la literaskriba sistemo daŭre evoluis. Komence skribo estis vere nur la fiksado de parolo: oni skribis la tekston sen spacoj inter la vortoj (ja ankaŭ en la parolo vortoj ne apartiĝas), mankis interpunkciaj signoj. Intervortaj spacoj probable aperis unufoje en la 8a jc. p. K. sur la britaj insuloj, ĉar la saksaj kaj keltaj pastroj ne regis bone la latinan, kaj sen interspacoj ili ne sciis orientiĝi en la latinaj tekstoj. Grava antaŭpaŝo estis la apero de la Karolinga minusklo (sed tio praktike duobligis la nombron de la literoj), kaj ankaŭ la stabiligo de la uzado de interpunkciaj signoj fare de Aldus Manutius fine de la 15a jc. – ĉi-lastan perfektigon, kaj la postajn ortografiajn unuecigojn eldevigis presado.

<sup>7</sup> Foje tamen mire oni konstatas, ke eĉ brilaj scienculoj ne rimarkas, ke skribo malkapablas kapti tre gravajn komponantojn de la parola komunikado. Friedhart Klix skribas en sia jam citita verko jene: "*La fikso de difinita signo por ĉiu sono, distingita en la parolo, levigas skribon sur la esprimnivelo de parolo. Ĉio esprimeblas per parolo, esprimeblas ankaŭ per skribo.*" (Klix 1989) Estas evidente, ke Klix eraras.

Nur fragmentece kaj pale kapablas fiksi skribo la supersegmentajn elementojn (tono, sonalto, melodio ktp.) de parolo. Ĉar tiuj elementoj gravas eĉ pli ol eksterlingvaj, tial la skribanta homo daŭre strebis iom tamen kapti el ili. Sur tiu kampo la pasintaj tri jarmiloj kaj duono alportis certajn, tamen ne esencajn rezultojn.

Skribo plej sukcese kaptas kaj registras la segmentajn elementojn de la parolo – la vortojn. Tiu cirkonstanco instigis la skribantan homon esprimi per segmentaj elementoj ankaŭ tiujn signifojn de sia teksto, kiuj en parolo ordinaro esprimiĝis per eksterlingvaj kaj supersegmentaj rimedoj.

### **Influo de la skribo al la lingvo**

Skribo influis lingvon sur ĉiuj niveloj: sur tiu de *akustiko*, *morfemoj*, *vortoj*, *sintagmoj*, *frazoj* kaj – rezulte de la influo de skribo al la pensado – ankaŭ sur la nivelo de *teksto*. La fonto de tiu influo antaŭ ĉio estis la supre aludita *malperfekteco de la skribo*; krome ankaŭ la *liberigo de la memoro*, kaj la *novaj komunikadaj situacioj*, kreiĝintaj dank’ al la skribo.

Por ke tiu influo efiku, necesis, ke skribo sufiĉe disvastiĝu, kaj havu aŭtoritaton inter la lingvouzantoj. Skribo ŝuldas sian aŭtoritaton ĉefe al tio, ke prestiĝaj institucioj (ŝtata administrado, eklezioj, scienco) vaste aplikis ĝin. Tamen certe venis en konsideron ankaŭ tio, ke la homo rekonis: skribe li kapablas efektiviĝi pli altgradan lingvan plenumon ol parole, kaj tial li komencis strebi por alsimiligi sian parolon al la skribo. Tiu strebado elvokis la malaprobos de multaj, precipe lingvistoj, sed ankaŭ la germana filozofo Spengler en *La subiro de okcidento* (*Der Untergang des Abendlandes*) grumbas jene: "... la antikvan prozon oni kreis rekte por la oreloj. Oni laŭtleĝis tiujn verkojn, kvazaŭ oni parolus; kontraste al tio ĉiuj ni parolas, kvazaŭ ni legus niajn vortojn el libro." La alsimiliĝo de parolo al skribo ofte elvokas riproĉojn ankaŭ el pedagogiaj rondoj.

La malperfekteco de skribo influis pleje – malriĉige – la *akustikan* dimension de lingvo. La skribe neregistrebla varia akustika modult-

eco iom post iom malaperis ankaŭ el la parolo<sup>8</sup>. Rezulte de tio klare apartiĝas *kanto* kaj *parolo*, kaj kreiĝis kiel transira formo inter ili *verso*, konservanta certan gradon de akustika organiziteco. (Notindas, ke versa epiko pli longe vivis en tiuj kulturoj, en kiuj skribo fariĝis nur malfrue ero de la ĉiutaga vivo por la plimulto de la loĝantoj.)

Sur akustika nivelo interesa influo de skribo al lingvo estas la fenomeno de *literprononcado*. Ĝi aperas precipe en tiaj lingvoj, kies ortografio aplikas pli-malpli fonetikan principon (fakte plej ofte iun miksiĝon de fonetikaj kaj morfologiaj principoj). La hungara lingvo estas tia: kaj dum la lasta jarcento la hungara prononco plej signife modifiĝis ĝuste pro literprononcado, kiun la lingvokulturo kondamnas, sed senrezulte; tio, kio antaŭ kelkaj jardekoj kalkuliĝis prononcopeko, nuntempe estas normo. La sama procezo povas okazi tamen ankaŭ en lingvoj kun tradicia ortografio<sup>9</sup>.

Probable konsiderindan – kvankam ne ĉefan – rolon havas skribo en la spertebla rapidiĝo de parolo.<sup>10</sup> Verŝajne temas pri tio, ke la signife pli rapida muta legado alkiutimigis la lingvouzanton al la pli rapida tekstoaperceptado. Tio siavice plirapidigas la tekstokreadon, kaj sekve de tio plirapidiĝas ankaŭ parolo. (Kompreneble tiu plirapidigado havas iujn – kvankam ne absolute rigidajn – anatomiajn limojn; kaj kompreneble ĝi povas ankaŭ malklarigi prononcon.)

La influo de skribo sur la nivelo de vortoj konstateblas precipe ĉe la fiksiĝo de vortsignifoj. Kiel pli supre jam temis pri tio, en la primara parollingveco neniu teksto estis prononcata plurfoje en senŝanĝa formo, aŭ eĉ se la teksto mem estis tamen senŝanĝa, la situacio certe ne estis tia. Male, la skribitaj vortoj konserviĝis en senŝanĝa formo,

---

<sup>8</sup> Rimarkindas, ke en tiuj lingvokomunumoj, en kiuj granda parto de la komunumanoj alproprigis skrib- kaj legkapablon nur malfrue (aŭ eble tute ne alproprigis ĝin), lingvo utiligas ĝis nun pli vastan spektron de la akustika rimedaro. Ekz. la ĉina skribsistemo ekskludis la eblon de ĝenerala disvastiĝo de funda skrib- kaj legokapablo; en la ĉina lingvo toneco havas gravan rolon. Kaj eĉ interne de Eŭropo rimarkeblas diferencoj: la hispana, itala kaj rusa – kies lingvokomunumanojn konkeris skribo pli poste – posedas pli riĉan intonacion, ol la tiusence iom pli griza germana aŭ angla, sur kies teritorioj skribo pli frue enhejmiĝis.

<sup>9</sup> Franca vortaro el 1874 malprobe skribas, ke en la vorto *legs* (postlasaĵo) multaj – malĝuste – prononcas *g* [*lèg*]; la ĝusta prononco devus esti [*lè*]. Nuntempaj vortaroj donas kiel ĝustan prononcon [*lèg*], kaj la formon [*lè*] ili mencias kiel malofte renkonteblan prononcvarianton.

<sup>10</sup> En la hungara lingvo komence de la 1960-aj jaroj oni prononcis averaĝe 11 parolsonojn dum sekundo, fine de la 1980-aj jaroj 15-16.

restis konstantaj, kaj tial ene de la konkreta teksto la signifo de la vortoj estis klare priskribebla, tiel ke la skribita vorto povis fariĝi referenco koncerne la signifon. Tiu nova situacio tute certe rezultigis la pliiĝon de la nombro de vortoj, ja vorton pruveble okupitan por difinita signifo ne plu eblis uzi libere en alia senco, tial por tiu nova senco necesis krei novan vorton.

La fenomeno de plursignifeco de vortoj kompreneble ne malaperis el la lingvo, ĝi nur ŝanĝiĝis. Inter la opaj signifoj de la sama vorto ekzistas logike interpreteblaj rilatoj, diference disde la senkontureco de vortsignifoj en la primara parollingveco. La skribanta homo devis enkodi en la segmentajn elementojn ĉion tion, kion la lingvo de la primara parollingveco esprimis per la riĉa arsenalo de eksterlingvaj kaj supersegmentaj rimedoj. Tiu defio elvokis grandegan evoluon koncerne la segmentan rimedaron. Tio kompreneble ne signifis nure la kreskon de la vortprovizo, sed ankaŭ tiun de la nivelo de sintaksa prilaboriteco.

Jack Goody faris konkretajn esplorojn (per anglalingvaj tekstoj) pri la lingvaj ecoj de parolaj kaj skribitaj tekstoj. Li formulis la sekvajn konstatojn pri skribitaj tekstoj: 1. pli ofta uzo de abstraktaj esprimoj; 2. pli granda vortprovizo; 3. vortouzo malpli persona, kaj tial malpli kunteksto-dependa; 4. pli granda egzaktecio; 5. pli fajna sintaksa prilaboriteco; 6. pli granda formaleco; 7. pli granda fido al la mortintaj lingvoj [tio aludas la pli grandan proporcion de vortoj latindevenaj] (Goody 1987: 258–289). El la supraj konstatoj la 2a, 4a kaj 5a pravas, ke skribita teksto laŭ gravaj lingvaj kriterioj superas parolan tekston.

Skribo komence servis nur por fiksi, konstantigi tekston, ĝia uzo por komunikado disvolviĝis nur pli malfrue.<sup>11</sup> Tamen ankaŭ la fiksadcela skribo alportas ŝanĝon en la cirkonstancoj de tekstokreo: ĝi liberigas la memoron disde la tasko de la konservado de tradicioj. Tion, kio estas skribita, ni povas forgesi sen la risko perdi ĝin. Platono (en Phaidros) skribas pri tio jene: *”[la skribo] injektos ĝuste forgeson en*

---

<sup>11</sup> Tion konfirmas ankaŭ la plimulto de la hipotezoj pri la celo de la kreo de skribo. Vaste estas akceptata la hipotezo, ke skribon oni uzis unue por komercaj kontraktoj; aliaj opinias, ke skribon elvokis la bezono en la ŝtata administrado – tiu ĉi lasta hipotezo jam inkluzivas ankaŭ la komunikadan funkcion.

*la animon de tiuj, kiuj lernos ĝin, ĉar ili ne plu ekzercos sin en la memorado, ja fidante je la skribo, ili memoros deekstere, helpe de fremdaj signoj, ne elinterne, per la propraj fortoj*". Tio, kio por Platono ŝajnas malavantaĝo, por Ong montriĝas ĝuste granda avantaĝo. Li trovas, ke la forfalo de la deviga memorado efikas liberige al la homa konscio, kaj ebligas la aperon de pensmaniero pli profunda, pli originala, pli abstrakta (Ong 1982: 16–30).

La pli altnivelan lingvouzon subtenas ankaŭ la nova komunikada situacio, kreita de la skribo. Parolante por krei sian tekston oni disponas proksimume tiom da tempo, dum kiom oni prononcas ĝin. De tempo al tempo kompreneble oni povas halti por serĉi la taŭgan vorton aŭ formulon, sed se oni faras tion ofte, la aŭskultanto komencos enui. La koncizon, nuancricĥon kaj kompleksecon de la teksto limigas tamen ne nur la kapabloj de la parolanto, sed ankaŭ tiuj de la aŭskultanto – ja ankaŭ li disponas pli-malpli nur tiom da tempo por kompreni la aŭdatan tekston, dum kiom da tempo ĝi estas prononcata. Ja certe ankaŭ aŭskultanto povas peti la parolanton ripeti siajn vortojn, sed se li faras tion tro ofte, la komunikada procezo paneos.

Dum skribo la situacio estas alia. La kreado de teksto principe ne havas tempajn limojn: oni povas dediĉi plurajn horojn aŭ eĉ tagojn por fajli unusolan frazon, kaj dank' al tio oni povas lingve formuli siajn pensojn pli precize, pli nuancite kaj pli koncize<sup>12</sup>. Parolan tekston oni povas artiki nur unudimensie, inter la limoj fiksitaj far la homa memoro; la skribo ofertas dudimensian kaj principe senliman spacon. Eĉ, rezulte de la nova komunikada situacio povas profundiĝi ankaŭ mem la direndo, ja la tekstokreanto havas tempon por konturigi siajn nebule ŝvebantajn pensojn. (Francis Bacon diris, ke skribado kutimigas al precizeco.)

La kompleksecon de la skribita teksto malpli limigas la kapabloj de la leganto, ja ankaŭ li havas laŭplaĉan tempodaŭron por kompreni iun tekston. Tion subtenas ankaŭ la cirkonstanco, ke skribita teksto kontraste al la *tempokarakterata* parola teksto havas *spacan karakteron*;

---

<sup>12</sup> Tial pli komplikaj lingvaj formoj (ekz. kompleksaj subordigitaj propozicioj) unuafoje verŝajne aperis en skribitaj tekstoj.

dum aŭskultanto en ĉiu momento aŭdas nur solan teksteron, kaj la jam aŭditajn li devas stoki en sia memoro, leganto – depende de sia rutino – povas percepti samtempe tutan linion aŭ eĉ plenan alineon. Skribo do ebligas kaj al la tekstokreanto, kaj al la tekstoaperceptanto fruktuzon de pli nuancita, pli riĉa lingvaĵo.

Kun la komunikada situacio ekestinta per la naskiĝo de skribo signife intensiĝis la postulo pri la ordigo, reguligo, "liniigo" de la eldirotaj pensoj. Kiel pli frue ni jam tuŝis tion, tian postulon starigis la naskiĝo de la lingvo mem. Parolante oni vidis sian alparolaton, ties mimiko daŭre orientis parolanton, ĉu li estas komprenata aŭ ne, kaj en nea kazo li povis reformuli sian diraĵon, krome li vaste povis helpi sin per eksterlingvaj kaj supersegmentaj elementoj. Tial li povis riski prezentante ankaŭ ne tute "kombitajn" pensojn. Ĉe skribita teksto oni ne vidas la alparolaton, eble eĉ ne konas lin; kaj unu sama skribo povas sinsekve trafi en la manojn de multaj tute diversaj "alskribatoj". Kaj tiam, kiam oni presas la skribon, tiuj ebloj eksponente plimultiĝas. Tial diris McLuhan – tamen iom troige –, ke "komunikilo estas la mesaĝo mem" (McLuhan 1964).

La lingva riĉiĝo, startinta kun la apero de skribo, kompreneble efikis ankaŭ al la parola lingvouzo: estas konata fakto, ke tiu, kiu legas multe, parolas pli nuancite, pli riĉe, pli esprime. Kaj li skribas eĉ pli nuancite, riĉe kaj esprime. Tio rezultigis ekde la apero de la skribo superbe suprenantan spiralon de la nivelo de lingvouzo – kaj ankaŭ de pensado.

Oni devas tamen noti, ke ankaŭ parola lingvo influas skriban lingvon: bremsas ĝian troan riĉiĝon, komplikiĝon – kvazaŭ "zorgas" pri tio, ke tiu konservu "homan aspekton".

## **Lego**

Skribo dum longa tempo estis por la homo kvazaŭ *glaciigita parolo*. Legado estis sekve nenio alia, ol *degeligo* de tiu parol-glacio: tial legado dum longega tempo estis preskaŭ ekskluzive laŭta. En la antikva rakonto *Satyricon* de Petronius la protagonisto Trimalchio estas ravita de sia sklavo-skribisto, ĉar tiu "kapablas dividi per dek, kaj nure perokule [t.e. ne perbuŝe] kapablas legi tutan libron". Aŭgusteno

skribas rekone pri la episkopo Ambrozio, ĉar tiu kapablis mute legi: *"eum legentem vidimus tacite"*. Muta legado ĝis la 8a jarcento p. K. okazis nur sporade, poste ĝi jam ne estis tiel malofta (probable akcelis ĝian plioftiĝon la apero de intervortaj spacoj en la skribita tekstoj), tamen ĝi disvastiĝas nur post la invento de la presado en la 15a jarcento. Legado mutiĝis plej verŝajne pro la multiĝo de legeblaĵoj, pro kio necesis plirapidigi legoritmon. Kaj tiu plirapidigo siavice unue kondukis al la malklariĝo de artikulacio kaj malpliigo de la voĉoforto: laŭta legado reduktiĝis je iaspeca murmurado, kaj tio kondukis fine al plena mutiĝo.

Tamen tiu mutiĝo ne estis plena, kaj centprocente muta legado ankaŭ nuntempe okazas nur malofte. Nian legadon ĉiam akompanas pli-mapli forta subvokalado, t.e. tre malklara kaj malforta funkciado de la parolorganoj, aŭ almenaŭ la "interna laŭtigo" de la legitaĵoj helpe de la akustikaj memorskemoj, kiujn ni stokas en nia cerbo. Plenan eliminon de la akustika dimensio celas la arto de la t.n. *rapidlegado* nomata ankaŭ *vertikala legado*; ĝiaj kursoj konsistas ĉefe el strebado plene subpremi subvokaladon, dezirante tiel signife rapidigi legadon. Tio bele pravas, ke nia ordinara "muta" legado neniam estas vere muta<sup>13</sup>.

Indas noti tion, ke parola lingvo konservas siajn poziciojn ankaŭ en la "skribepoko", ekzemple en la instruado, eĉ supera. (Akademiaj prelegserioj estas tute kurioza ekzemplo por tio, ja en ili prononciĝas tekstoj tipe skribaj, kiujn ofte eĉ la specialisto aŭskultantaro ne ĉiam kapaplas sekvi senmanke.) Ĉiukaze estas tre atentinda fenomeno, kiel intense homo persistas ĉe la akustika dimensio de la lingvo. Tamen, se oni pripensas, ke en la historio de nia raso parola lingvouzo ampleksas minimume 15-20 mil jarojn, dum la relative vasta aplikado de skribo apenaŭ duonan jarmilon, tiu persisto ne estas mirinda.

---

<sup>13</sup> Indas noti, ke personoj kun malmulta legrutino ankaŭ nuntempe preferas legi laŭte. Kaj eĉ rutinaj legantoj ofte faras tion, kiam ili ne komprenas klare la legitaĵojn je la unua (muta) lego; ĉu pro la komplikeco de la teksto, ĉu pro tio, ĉar la teksto estas skribita per iom konfuza manskribo.



## Sekundara parollingveco

Ong nomas *sekundara parollingveco* tiun staton, kiu aperis dank' al la apero de radiofonio, telefono kaj televido. Ankaŭ sekundara parollingveco grave influas la homan lingvon: tiuj konservaj kaj unuecigaj efikoj, kiuj aperis kun la disvastiĝo de skribo koncerne la segmentajn elementojn de la lingvo, nun validiĝas ankaŭ rilate la supersegmentajn elementojn.

Ong opinias, ke la kulturo de la sekundara parollingveco ne anstataŭas la kulturon de skribo, sed kompletigos ĝin. Li skribas jene: *"La nova parollingveco [...] laŭ sia esenco estas pli volita kaj konscia parollingveco, kiu konstante baziĝas sur la apliko de skribo kaj preso"* (Ong 1982). Li skribis tion antaŭ preskaŭ tri jardekoj, kaj nuntempe liaj vortoj ŝajnas iom tro optimismaj. Mi emus kredi prefere al Bloomfield, kiuj jam en 1933 – tri jardekojn antaŭ McLuhan! – lanĉas la eblon, ke la mekanikaj iloj servantaj por la reproduktado de parolo iom post iom marĝenigos la nunan kutimon de skribado kaj presado (Bloomfield 1933: 503). La degenerantajn poziciojn de la skriba kulturo bele demonstras la malkresko de la nombro de presitaj libroj kaj gazetoj en la plej multaj landoj<sup>14</sup>.

Esence tio ja ne mirindas, se oni pripensas, ke skribo kreiĝis por registri kaj transsendi parolon. Tiun bezonon nuntempe oni povas kontentigi pli simple, ol per la aplikado de simbolaj grafikaj signoj: per telefono, magnetofono, sondiskoj, televido ktp. Multaj intelektuloj eĉ rigardas la regreson de la skriba kulturo kun stoika kvieto: ili vidas en ĝi ne pli ol simplan ŝanĝiĝon de komunikada teknologio.

Tamen supozoble temas ne pri simpla teknologia ŝanĝiĝo. Skribo tiel funde reformis, riĉigis la homan lingvon – inkluzive la parolan lingvon! – ke ĝia "elglito" elsub la lingvo povus havi fatalajn konsekvencojn. Tre facile la nivelo de la homa lingvouzo – kaj ankaŭ tiu de la lingva pensado! – povos refali al tiu de la praa primara parollingveco. Super tia malfortiĝinta, degenerinta lingvo facile triumfos la

---

<sup>14</sup> En iuj ekssocialismaj landoj tiu malkresko estas eĉ ŝoka. En Hungario ekzemple en la jaro 1990 presiĝis 92 milionoj kaj 406 mil libroj, en 1997 nur 29 milionoj kaj 505 miloj (ambaŭ ciferoj sen lernolibroj, kies nombro estis en ambaŭ jaroj senŝanĝe ĉ. 16 milionoj).

konkurencaj kodoj: la facile digesteblaj analogaj bildsignoj kaj la programadaj kodoj, kiuj siavice eliminas lingvon. Kaj tiam tute facile povos realiĝi la fantazia vizio de Flusser, laŭ kiu iam future en la komunikado de homo la lingvo ludos tian – ĉarman, ŝatindan, tamen marĝenan – rolon, kian en la nuna komunikado de Napolanoj ludas mangestoj (Flusser 1989).

## Literaturo

Literaturo estas lingva arto – pri tio verŝajne ĉiuj konsentas. Ni pri-pensu iom, kial ĝi estas entute arto? Ja se lingvo servis interalie por informi al iu pri iuj okazaĵoj, ĉe kiuj li ne ĉeestis, tiamaniere, ke almenaŭ *simbole* tiu travivu la okazaĵojn, kvazaŭ li estus ĉeestinta ilin, tiam literaturo celis la samon, nur en tiu kazo temis pri *neokazintaj, fikciaj okazaĵoj*. La celo de la plej fruaj literaturaj ĝenroj – fabeloj, mitoj – estis certigi al la homoj *simbolan travivadon*<sup>15</sup> de eventoj, kiuj en la realo kutime ne okazis. (Herder nomis fabelon ”korekto de la realo”.) La arteco de tiu frua literaturo – kiun oni ne apartigis disde religio ktp., sed tiu cirkonstanco el nia vidpunkto estas preterlasebla – dependis de la nivelo de la inventita historio mem, kaj ĝia sensacelvoka lingva formulado. La unua komponanto ne havas koneksojn kun la lingvo, sed la dua tiom pli: ĝi estis kontinua lukto kun la esenca maltaŭgeco (malperfekteco) de la lingvo por tiu celo. Kaj la arto estis tio: per simbolaj akustikaj sonoj elvoki en iu alia homo la sensacon de malvarma venta pluvo, ŝprucanta en la vizaĝon, de tepide velura tuŝo de virina mano sur la haroj – tiam, kiam reale ĉeestis nek unu, nek la alia. La sukcesgrado de tiu provo ne malmulte dependis de la sagaco kaj lingva lerteco de la rakontanto. Temis ja pri provo efektivigi maleblaĵon – kaj ĉia arto ĉiam celis ĝuste tion<sup>16</sup>. Ĉi tie indas mencii, ke en tiu senco ĉia lingvouzo – ankaŭ ne literaturcela – estas *arto*, do la komence citita titolo de la Aulda esearo ne troigas.

---

<sup>15</sup> Simbola travivado – kompreneble depende de la aperceptanta individuo – povas esti efektive tre intensa: tion pruvas la fakto, ke foje-foje ĝi povas elvoki eĉ per volo ne direkteblajn fiziologiajn reagojn. Legante ekzemple pri danĝero trafanta romanheroon, nia pulso povas rapidiĝi, ktp.

<sup>16</sup> Pentroatro celis prezenti la trian dimension, skulptarto movon, ktp.

Literaturo ĉe sia ekesto kaj dum longa tempo poste celis rakonton de eventoj, kiuj okazis en la *ekstera mondo*, do ne en la homo mem. Tio certe havis minimume du kaŭzojn. La unua estis tio, ke eksteraj eventoj tiel funde difinis ĉiun momenton de la homa ekzistado, ke la internaj, animaj procezoj ne povis ricevi atenton. La dua kaŭzo estis lingva: mankis lingva rimedaro kapti tiujn apenaŭ konturiĝintajn, ŝvebantajn, malmulte objektivajn internajn okazaĵojn. Bone ilustras tion popolfabeloj: ili rakontas nur eventojn, kaj se tamen aperas en ili sentoj – ekzemple amo – tute mankas ties detala priskribo, ili rakontas ekz. ekeston de amo kiel okazaĵon. Tio karakterizas fakte la tutan antikvan literaturon – eĉ en la liriko –; esceptoj, kiel la kvara kanto de *Eneido* aŭ *Konfeso*j de Aŭgusteno kalkuliĝas raraj pioniraj esceptoj. La interna mondo de homo fariĝas protagonisto de literatura verko nur en la 18a jarcento, en *The Sentimental Journey Through France and Italy of Yorick* [Sentimentala taglibro de Yorick tra Francio kaj Italio] de Sterne. Kaj romantiko daŭrigis tiun tendencon, kiu cetere validas ĝis nun. Tio, kion ni nomas literatura moderniĝo, estas ĉefe la ŝanĝiĝo de la temaro: la atento de verkistoj ĉiam pli emfaze direktiĝas al tio, kio okazas *en* la homo, anstataŭ tio, kio okazas *inter* la homoj. Se tamen rakontiĝas ankaŭ inter-homaj okazaĵoj, ili ricevas sian veran signifon per sia efiko al la interna mondo de la agantoj.

Pli frue ni atentigis pri tio, ke lingvo, kaj poste skribo eĉ pli, devigis homon ordigi, reguligi, ”liniigi” siajn pensojn antaŭ ol eldiri ilin, por tiel certigi komprenon fare de la aperceptanto de la mesaĝo. El tiu neceso rezultis certe subpremo de la homa memo. Ĝis la 18a jarcento skriba kulturo tiel vaste konkeris tutan Eŭropon, ke devis aperi ia intenco kontraŭpesi la ”liniigan” efikon de skribo. Tia kontraŭpeso estis ne nur mem la verko de Sterne, sed ankaŭ la fakto, ke en tiu jarcento klare kaj konscie oni apartigas beletron disde la cetera literaturo. Per tio homo volis kvazaŭ protekti sin kontraŭ la daŭra atenco fare de la komunikada teknologio. Estas paradokse tamen, ke ĝuste tiu komunikada teknologio – skribo kaj preso – efektivigis la grandskalan lingvan evoluon, kiu ebligis ĉiam pli efikan kaj adekvatan perlingvan esprimon de internaj eventoj de la homa animo.

Oni povas diri, ke moderna literaturo klopodas kiel eble plej multe liberiĝi disde la devo de "liniigo" de pensoj: ĝi strebas prezenti ilin en stato plejeble proksima al ilia origina malregule cirkulanta formo. Tiu-cele aperis interalie la renverso de la linia tempa ordo en romanoj, ja en la interna mondo de la homo tempa linieco ne ekzistas. Iuj opinias, ke per la tekniko de hiperteksto estas bone prezentebla la origina naturo de la enhoma penso- kaj sentokavalkado<sup>17</sup>, sed tio estas almenaŭ dubinda, ĉar hierarkieco estas esenca trajto de hiperteksto, kaj la interna mondo de homo neniel estas regule hierarkia; ĝin karakterizas plie malregula simultaneco.

Kompreneble liberiĝo disde liniigo kostas tion, ke multaj homoj simple ne povas apercepti la neliniigitan literaturan mesaĝon. Ja valida "pakto" inter sendanto kaj ricevanto de mesaĝo estas liniigo. Moderna literaturo daŭre strebas krei novan pakton inter verkanto kaj leganto, sed tiu strebo alportas nur partan sukceson.

Ĉi tie indas tuŝi ankaŭ *tekstoformojn* de literaturo. La fruan fazon de literaturoj dominas esence la *rakonta* tekstoformo: specifa varianto de tio, *dialogo* – kiun eblus nomi *dialogita rakonto* – aperas en la fruaj verkoj tre malvivece. *Priskriboj*, eĉ se ili koncernas per vido percepteblan realaĵon, maloftas, kaj se tamen ili aperas, ili estas supraĵaj kaj ne vere elvokivaj. Priskriboj de sensacoj, percepteblaj per aliaj sentorganoj praktike ne aperas en fruaj literaturaj verkoj.<sup>18</sup> Nenio mirindas en tio, se oni konscias, ke rakonto kaj dialogo estas esence dinamismaj, dum priskriboj rilatas staton: la interesiĝon de homo plie altiras ŝanĝoj, movoj, ol senŝanĝaj statoj. *Refleksaj tekstoj*, tre oftaj en la moderna literaturo, reprezentas alian kvaliton: nome, ili rakontas dinamikaĵojn, tamen *internajn*, por kiuj la eroj de la ekstera mondo estas kvazaŭ nur pretekstoj. Pro tio, ekzistas palpebla tendenco en la literatura evoluo, kiu arkas ekde *rakonto* tra *priskriboj* al *refleksaj tekstoj*.

---

<sup>17</sup> Ie mi legis, ke oni kreis hipertekstan eldonon kompaktdisken de *Der Mann ohne Eigenschaften* [Homo sen proprecoj] de Musil, pretendante, ke tiu prezento povas proksimigi la leganton al la verko.

<sup>18</sup> *Gusto* ekzemple ne ricevas signifan rolon en literatura verko ĝis la kuko en *À la recherche du temps perdu* [Serĉante tempojn perditajn] de Proust.

Estas notinda diferenco inter informcelaj kaj beletraj tekstoj, ke en la ĉi lastaj *signifo* (enhavo) kaj *signokorpoj* estas pli-malpli samgravaj, dum ĉe informcelaj tekstoj oni atentis nur la signifon, kaj ordinare ignoras la signojn mem. (Sub *signokorpoj* oni komprenu unuavice la *akustikan* signokorpon; la vida aspekto – bildpoemoj ktp. – restis periferia almenaŭ en la beletroj, uzantaj literiskribon.)

Male, la akustika aspekto estas treege grava. Ne nur en la antikva literaturo, pri kiuj pluraj fakuloj malkovris, ke ĝi estis verkita unuavice por la oreloj<sup>19</sup>, sed ankaŭ en la plej moderna. *"Mi skribas laŭte"* – asertis Mihály Babits, hungara poeto, eseisto, romanisto, vivinta en la dudeka jarcento (komp. Éder 1996): tion li asertis ne pri siaj poemoj, sed pri unu el siaj romanoj. Marcel Proust – same prozisto – skribas jene: *"Komencante legi aŭtoron, rapide mi ekperceptas malantaŭ la vortoj la melodian linion, kiu malsamas ĉe ĉiu aŭtoro; kaj dum mi legas, eĉ ne atentante, daŭre mi zumas, mi akcelas, malakcelas aŭ interrompas la sonfluan por frapi la ritmon ĝis la reapero de la sono, tiel same kiel okazas dum kantado, kiam laŭ la ritmo de l' melodio ni ofte longe tiras sonon antaŭ ol fini la vorton. [...] Se verkisto trovas sian melodion, vortoj venas jam per si mem"* (Proust 1996<sup>20</sup>).

Oni povas do konstati, ke literaturo celas savi kaj eternigi fenomenojn, kiujn la evoluo trudas al la homo "transpasi": la unuavide kaosan, zigzagan, sed spirhaltige belan kaj neniam ripetigantan zigzagadon de pensoj, sentoj kaj sentimentoj, kiujn unue pedanteme ordigadis lingvo, kaj poste eĉ pli skribo; kaj same la akustikan arsenalon de lingvo, kiun siavice skribo kripligis, tamen samtempe plej vaste profitante tiujn avantaĝojn, kiujn ofertas skribo. Per tio ĝi fariĝis plej bela sintezo de la akustika kaj grafika lingvo, kaj samtempe fekunda eksperimenta laboratorio de lingva evoluo.

<sup>19</sup> Milman Parry demonstras pri la Homeraj epopeoj, ke ili en ĉiu sia ero estas produktoj de la parola literaturo. El liaj pioniraj konstatoj tiras multajn pliajn konkludojn interalie Marshall McLuhan kaj Walter J. Ong. Nietzsche malkovras tion saman pri la antikva prozo, tiel ankaŭ trovante klarigon por ties tro retorika karaktero.

<sup>20</sup> La tekston mi citas laŭ hungara traduko, aperinta en la hungara revuo *Világosság*. La francan originalon malgraŭ longaj klopodoj mi ne sukcesis trovi.

### Referencita literaturo:

- Bloomfield, Leonard (1933): *Language*. New York: Henry Holt and Co.
- Carroll, J. B. (red.) (1956): *Language, Thought and Reality. Selected Writings of Benjamin Lee Whorf*. Cambridge (Massachusetts): The MIT Press.
- Critchley, M. (1960): The Evolution of Man's Capacity for Language. In: Sol Tax (ed.): *Evolution after Darwin. Vol. II*. Chicago: University of Chicago Press, 289–309.
- Éder Zoltán (1996): „Én hangosan írok”. Hangzás és írásképp viszonya Babits Mihály *A gólyakalifa* című regényében. In: Bolla Kálmán (szerk.): *Írott szöveg – hangzó forma*. Egyetemi Fonetikai Füzetek 18. Budapest: ELTE BTK Fonetikai Tanszék. 31–35.
- Flusser, Vilém (1989): *Die Schrift: hat Schreiben Zukunft?* Zweite, ergänzte Auflage. Göttingen: Imatrix Publications.
- Goody, J. – Watt, I. (1968): The consequences of literacy. In: Jack Goody (ed.): *Literacy in Traditional Societies*. Cambridge: Cambridge University Press, p. 27–84.
- Goody, J. (1977): *The Domestication of Savage Mind*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Goody, J. (1987): *The Interface between the Written and the Oral*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Greenberg, J. H. (1957): *Essays in Linguistics*. Chicago: University of Chicago Press.
- Havelock, E. A. (1963): *Preface to Plato*. Cambridge (Mass.): Belknap Press of Harvard University Press.
- Klix, Friedhart (1983): *Erwachendes Denken: eine Entwicklungsgeschichte der menschlichen Intelligenz*. Berlin: VEB Deutscher Verlag der Wissenschaften.
- McLuhan, Marshall (1964) *Understanding Media: The Extensions of Man*. New York: McGraw-Hill.
- Ong, Walter J. (1982): *Orality and Literacy: The Technologizing of Word*. London: Methuen.
- Proust, Marcel (1996): Ahogy olvasni kezdek egy szerzőt... In: *Világosság*, 1996/3. p. 73–79.
- Saussure, Ferdinand de (2005): *Cours de linguistique générale*. Paris: Payot.

## KOMUNIKTEORIAJ KONSIDEROJ PRI ESPERANTO KAJ ĜIA LEKSIKO\*

1. Komunikado estas esence la meto de la enhavo de sia konscio ekster sian korpon. Tamen, por atingi tion, oni devas apliki specifan procedon. Tiu procedo aspektas proksimume jene: 1. fokusigo de certa parto de la konscienhavo → 2. elekto de la komunikenda enhavero → 3. diskretigo de tiu enhavero → 4. formaligo de la enhavero (t. e. adapto al la spertoj de la komunumo) → 5. liniigo (vicigo de la jam diskretigitaj kaj formaligitaj enhaveroj en unudimensian linion) → 6. lingva enkodigo, t. e. vortumo.<sup>1</sup> Kvankam ĉiu el tiuj paŝoj estas esence nemalhavebla por la sukcesa komunikado, oni povas diri, ke la du unuaj paŝoj estas nur *konturigo de la deziro* komuniki, do paŝoj esence pli-malpli spontanaj, la efektiva *konscia* procedo mem komenciĝas nur per la paŝo 3, kiu servas ankaŭ kiel bazo de ĉio plua.

2. Interhoma lingva komunikado en sia primara, parola formo okazas fakte en tri dimensioj. El tiuj tri dimensioj lingvo ampleksas du, la tria dimensio estas tiu de la eksterlingvaj komunikadaj rimedoj.

La du lingvaj dimensioj dividiĝas jene: unu dimension okupas la t. n. supersegmentaj lingvaj rimedoj (*voĉa sonalto, laŭteco, tempodaŭro* ktp.), la alia dimensio estas tiu de la segmentaj lingvaj rimedoj, t. e. la vortoj, konsistigataj de fonemoj. Eksterlingvaj komunikadaj rimedoj estas antaŭ ĉio mimiko, gestoj, korpoteno ktp.

En la antaŭskriba epoko, en tiu de la t. n. primara parollingveco<sup>2</sup> tiuj tri dimensioj funkciis en kompleta kaj kompleksa unueco – la

---

\* Skriba versio de prelego farita en Zagrebo, en la simpozio Lingva planado kaj Leksikologio (28–30 de julio, 2001). En presita formo aperis en Kiselman, Christer – Mattos, Geraldo (red.): *Lingva Planado kaj Leksikologio – Language Planning and Lexicology*. Chapecó-SC: Fonto, p. 55–64).

<sup>1</sup> Ekzistas ankaŭ aliaj detaligoj de la procedo. Germana aŭtorino ekzemple skizas la jenan sinsekvon: “Wissenaktualisierung und -fokussierung → Selektion und Linearisierung → verbale Einkodierung”. (Molitor-Lübbert 1996, 1016)

<sup>2</sup> “*Primary orality*” – termino de W. J. Ong. Ong dividas la historion de la komunikado je tri epokoj: primara parollingveco (*primary orality*), skriblingveco (literacy) kaj sekundara parollingveco (*secondary orality*) – tiu ĉi lasta estas la epoko de la renesanco de parollingveco, elvokita de la invento de radio, magnetofono ktp. (Ong 1982, 136) Paul Zumthor faras pli fajnan dividon. Li distingas *oralité primaire, écriture, oralité mixte* kaj *oralité seconde*. (Zumthor 1984, 48–49)

komunikanta homo tute ne konsciis pri la apartigeblo de la tri dimensioj. Tamen jam antaŭ la apero de la skribo okazis konstanta ŝanĝiĝo de la proporcia pezo de tiuj tri dimensioj ene de la komunikado. La ĉefa direkto de la evoluo estas priskribebla jene: *eksterlingvaj rimedoj* → *supersegmentaj lingvaj rimedoj* → *segmentaj lingvaj rimedoj*.

Tiuj tri tipoj de rimedoj el *semiotika* – signoteoria – vidpunkto montras la sekvajn trajtojn: eksterlingvaj komunikadaj rimedoj kaj supersegmentaj lingvaj rimedoj estas esence *kontinuaĵ* signoj, ili estas registreblaj nur per *analog*a maniero; dum la segmentaj lingvaj rimedoj estas *diskretaj* signoj, kiujn oni povas adekvate registri per *diĝita* maniero. Oni povas diri do, ke en la homa komunikado kun la paso de la tempo daŭre kreskas la proporcia pezo de la *diskretaj* signoj, kaj malkreskas tiu de la *kontinuaĵ* signoj. Diskretigon – alivorte: artikulacian procedon – oni ĝenerale rigardas ĉefa kriterio de lingvo. (Matos 2000, 15)

En la antaŭskriba epoko ekzistis relative malmultaj vortoformoj, do unu vortoformo portis multajn signifojn. Oni tamen ne imagu tion kiel nuntempajn metaforojn, ja tiuj lastaj ponte kunligas fakte du aŭ pli multajn diversajn aferojn, pri kies diverseco la lingvouzanto ordinare konscias. En la primara parollingveco ne ekzistis tiaspeca apartiĝo inter la signifoj portataj de la sama vortoformo: la aktuala signifo ĉiam aperis kiel la sol sola. Tiu difiniĝis helpe de “rekta semantika konfirmo”<sup>3</sup>, t. e. per la konkreta situacio, precizigita fare de pluraj eksterlingvaj rimedoj kaj supersegmentaj lingvaj elementoj.

3. La evoluo *eksterlingvaj rimedoj* → *supersegmentaj lingvaj rimedoj* → *segmentaj lingvaj rimedoj* karakterizis la homan komunikadon jam antaŭ la invento de la skribo. El tiu ŝanĝoserio por nia vidpunkto gravas la evoluo *supersegmentaj lingvaj rimedoj* → *segmentaj lingvaj rimedoj* t. e. la *diskretiĝa procezo* de la lingvaj rimedoj. Tiun procezon eldevis la kontstante ampleksiĝanta *signobezono* de la homo. Komunikendaĵoj ĉiam pliiĝis, do necesis novaj kaj novaj signoj. La ekonomie uzablaj variebloj de la disponataj supersegmentaj lingvaj rimedoj komencis elĉerpiĝi, kaj elirvojon ofertis nur la ĉiam pli fajna diskret-

---

<sup>3</sup> “direct semantic ratification” (Goody–Watt 1968, 29)



igo de la disponeblaj kontinuaj signoj, ja tiamaniere oni povus signife kreskigi la nombron de variebloj.

4. Donis tre grandan elanon al la diskretiĝa procezo la invento de la alfabeto. Alfabeto ja estas tipe diĝita signaro, kiu kapablis registri nur la diskretajn elementojn de la homa komunikprocezo. Tio signifas, ke io, kion oni volis skribi, devis esti esprimita nepre per diskretaj signoj. Kaj pro la fakto, ke skribo baldaŭ ricevis altan prestiĝon en la homa komunikado, la diskretiĝa procezo de la lingvaj signoj signife rapidiĝis – kaj paralele kun tio la relativa pezo de la supersegmentaj lingvaj rimedoj ŝrumpis.

La diskretiĝa procezo antaŭ la invento de skribo tuŝis esence nur la sonan dimension de la lingvo. Per la apero de skribo tio ŝanĝiĝis. Skribo nome kreis komunikadan situacion tute ne konatan pli frue. Situacion tian, en kiu la sendanto kaj la ricevanto de la komunikaĵo ordinare ne ĉeestas samtempe kaj samloke, ili povas esti eĉ neniam vidintaj unu la alian. En tia komunikado ne povis sukcese funkcii vortoformoj, kiuj koncentris en si amason da signifoj. Tial ne, ĉar forestas konkreta parolsituacio, kaj forestas ankaŭ supersegmentaj lingvaj rimedoj, kiuj povus kontribui per “rekta semantika konfirmo” por difini la aktualan signifon de la uzata vortoformo.

Necesis do, ke la diskretiĝa procezo komenciĝu ankaŭ sur semantika kampo, t. e. koncerne la vortsignifojn. Tiu procezo devis rezultigi fajnan disartikigon, dissegmentadon de la kompaktaj vortsignifoj, kio kompreneble kondukis al tio, ke la disponataj vortoformoj montriĝis nesufiĉaj por la plimultiĝintaj apartigitaj signifoj. Oni povas bele konstati en la historio de iu ajn lingvo, ke la pli vasta uzado de skribo ĉiam rezultigas ampleksiĝon de la vortaro.

5. La procezo de semantika diskretiĝo tiel intime ligiĝas al la koncepto de skribo, ke Derrida – kiu celas demonstri, ke skribo tute ne estas sekundara fenomeno de la lingvo, kiel oni ĝenerale opinias – nomas la fruktojn de la semantika diskretiĝo en la antaŭskriba epoko *archi-écriture*, “pra-skribo”. Tia koncepto estas nete kontraŭa al tiu de Rousseau, kies ĉitema sinteno esence influas ankaŭ nuntempe la publikan pensadon. Rousseau vidis en skribo – kaj en ĉiaspeca disartikig-

iteco, diskreteco – ian *artefaritecon* fremdan al la homa naturo. Tamen Christopher Norris atentigas pri tio, ke, serĉante la originon de la lingvo, ankaŭ Rousseau devis (certe ne kun plezuro) antaŭsupozi iajn disartikigitajn, diskretigitajn – t. e. esence “artefaritajn” – movojn de la produktado.<sup>4</sup> Ekzistis do ia *pre-disartikigiteco*, *pre-diskreteco*, kiu anticipis la inventon de skribo.

La historio de komunikado produktis ankaŭ fenomenon kontrastan al la supre skizita, t. e. iaspecan “maldiskretigan procezon”. Tiu procezo ekis meze-fine de la 18a jarcento kun sentimentalismo (pionirita interalie de Rousseau), kaj disvolviĝis en la romantisma epoko. Bele karakterizas tiun komunik-konceptan turnopunkton la remalkovro de la parolaj kulturoj.<sup>5</sup> Rezulte de tio en la skriba komunikado – antaŭ ĉio en la beletraj tekstoj – renaskiĝas la vortokoncepto de la primara parollingveco, nome la kompleksaj vortsignifoj, kaj tio eĉ fariĝas unu el la plej gravaj valorkriterioj de beletro. Oni povas do diri, ke en la plene disvolviĝinta skriblingveco rekreiĝas iaspeca *post-neartikigiteco*, *post-maldiskreteco*.

6. La genezo de Esperanto akre diferencas disde tiu de la etnaj lingvoj, nome ĝi kreiĝis en skriba formo, kaj la parola varianto naskiĝis nur iom poste, surbaze de la skribita formo. Tia evoluo ne estas senprecedenca en la historio de la homaj lingvoj, ja la mezepoka buŝa uzado de la latina lingvo montras similajn trajtojn. Tiu buŝa uzado estis same sekundara, ĝi baziĝis sur skribitaj tekstoj, ja la primara buŝa uzado de la latina estis plene formortinta.

En la Derrida senco de la vorto – se *écriture* estas metaforo por disartikigiteco, diskreteco – Esperanton oni povas nomi iasence “*hyper-écriture*”, t. e. “hiper-skribo”. Kial? Ne simple pro la fakto, ke en ĝia funkciado la skriba aplikado proporcie estas multe pli granda, ol en iu ajn etna lingvo, sed plie pro la konsekvencoj de tiu fakto, kaj ankaŭ pro la tre specifa komunikada situacio, en kiu Esperanto funkcias.

---

<sup>4</sup> “... to presuppose an already articulate movement of production which must be cut off at source from any originating presence” (Norris 1982, 35)

<sup>5</sup> Oni pensu interalie pri la aktivado de Herder en kolektado de popola poezio.

7. Antaŭ ĉio oni devas diri, ke en la parola esperanta lingvouzo la rolo de eksterlingvaj komunikrimedoj (gestoj, mimiko ktp.) estas relative modesta, pro la simpla fakto, ke tiuj rimedoj ne havas ian universalecon. La tasko porti la komunikaĵon de ĝia ekspedanto al ĝia celato tre grandparte restas por la lingvaj rimedoj, supersegmentaj kaj segmentaj.

La buŝa uzado de Esperanto ordinare funkcias kontentige en la praktiko, tamen ne eblas preteratenti iujn gravajn teoriajn aspektojn, kiuj diferencigas la sekundaran buŝan uzadon de Esperanto disde la primara buŝa uzado de la etnaj lingvoj.

Oni devas konscii, ke normoj de la parola Esperanto konturiĝis klare nur sur la nivelo de la esence diskretaj parolsonoj, sed ne sur tiu de la supersegmentaj lingvaj elementoj. Almenaŭ tion sugestas la fakto, ke Plena Analiza Gramatiko diras nenion pri tiaj elementoj de lingva akustiko. La vorto *intonacio* ekzemple tute ne troviĝas en PAG. Oni devas diri, ke PAG montriĝas tre singarda eĉ rilate la diskretajn parolsonojn: ĝi ne kuraĝas klare eldiri, ke en Esperanto ekzistas laŭ *fonema* kriterio kvin vokaloj, sed laŭ *parolsona* kriterio almenaŭ dek – nome, en akcentitaj silaboj vokaloj prononciĝas alimaniere.

La praktika sperto montras, ke en la buŝa uzado de Esperanto kompreneble ĉeestas *ia* intonacio – la esence abstraktajn diskretajn parolsignojn oni povas uzi nur enkadre de supersegmenta signokontinuo – tamen tiu signokontinuo apenaŭ havas evidentecon por la komunumo, kaj tial ĝi restas pli-malpli neŭtrala, sekve ĝi malmulte partoprenas en la perado de la komunikaĵo.

Ĉar la kontinua signaro de la homaj lingvoj entenas ne malmulte da universalaĵoj – ties nombro eĉ pli altas, se oni restas inter la kadroj de unu geografia regiono –, tiuj intonaciaj universalaĵoj povas krei en konkretaj komunikadaj situacioj la impreson de intonacia kompleteco, tamen oni devas konscii, ke tia kompleteco en Esperanto ne ekzistas.

8. Oni povas do diri, ke en esperantlingva komunikado la dimensio de la diskretaj lingvaj signoj partoprenas pli altproporcie, ol en komunikado okazanta en etnaj lingvoj. Tio bele konstateblas ankaŭ sur fonetika nivelo, per la strebo de multaj parolantoj de Esperanto al

“liter-pronocado” aŭ “ortografia prononcado”, t. e. al evito de sonkonformiĝoj kiel ekzemple *absoluta*→*apsoluta*. Tiuj sonkonformiĝoj signifus fakte ian kaŝan enpenetron de signoj de kontinua karaktero en la dimension de la diskreta signaro.

La tre emfaze diskreta karaktero de la esperantlingva komunikado montriĝas kompreneble antaŭ ĉio sur la kampo de la *vortsignifoj*. La vortaro en la Unua Libro kaj Universala Vortaro aliras la taskon praktike, kaj donas la signifon de la esperantaj vortoj en kvin eŭropaj lingvoj, en la rusa, angla, franca, germana kaj pola. Tia aliro, utila el praktika vidpunkto, lanĉis tamen problemojn, nome, la semantikaj kampoj de la vortoj estis malsamaj en la kvin traduklingvoj, apartenantaj al tri diversaj lingvogrupoj. La demando povus stariĝi tiel, ĉu la signifo de la esperanta vorto ampleksas la *tuton* de la semantikaj kampoj de la vicigitaj kvin traduklingvaj “ekvivalentoj”, aŭ male: la signifo de la esperanta vorto limiĝas nur al tio, kio estas komuna en tiuj “ekvivalentoj”.

Tiun demandon laŭ mia scio neniu metis, en la praktiko tamen ĝi respondiĝis – konforme al la karaktero kaj destinitaj komunikadaj funkcioj de Esperanto – en la dua senco, t. e. la signifo de la esperantaj vortoj ne etendiĝis tre vaste; male, la esperanta vortsignifo strebis konturiĝi relative *malvaste* kaj *klare*. La fakto, ke la reguloj de metafora uzado de vortoj ne estas priskribeblaj unusence kaj nemiskompreneble, diktis singardemon al la lingvouzantoj koncerne metaforigon. La semantika diskretigo unuflanke, kaj la grandparta evito de metafora vortouzo aliflanke generis signomankon, kiu postulis plimultigon de la vortoformoj, kio propre estis postulo kontraŭa al la koncepto, kiun la plej multaj uzantoj havis pri internacia lingvo.

La evoluo de la esperanta leksiko disvolviĝis do premite de tiel kontraŭaj postuloj. La emo al semantika diskretigo naskis *pesi* apud *mezuri*, *responsi* apud *respondi* aŭ *respondeci*, *procezo* apud *proceso* (kaj *procedo*), *prezidento* apud *prezidanto* ktp. Estas atentinde, ke la vortokreoj, elvokitaj de la semantika diskretigo, rezultigis tro ofte *paronimojn* kun tre similaj signifoj, kio vere ne estas avantaĝa por lingvo kiun oni prezentas kiel facile lerneblan.

Kreadon de novaj vortoformoj multe helpas ankaŭ la riĉa kaj elasta vortfara sistemo de Esperanto. Tiamaniere eblas kreiĝo de apartaj vortoformoj por la du nocioj kiel *disciplinita* kaj *disciplinema*, esprimataj en la plej multaj lingvoj per la sama vorto.

La semantika diskretigo efektiviĝas ne nur per leksikaj, sed ankaŭ per gramatikaj rimedoj. Eblus vicigi ĉi tie sennombrajn ekzemplojn por tio, tamen ni kontentiĝu je du. La plej okulfrapa el tiuj rimedoj estas la *pleneco de la participa tabelo*, t. e. ke en Esperanto ekzistas ĉiuj ses normale eblaj participoj, krom kiuj sporade aperas en la lingvouzo eĉ la principe ebla kondicionala formo *farunta* aŭ *faruta*. La riĉa participaro ebligas esprimon de semantike tiel fajne diskretigitaj signifoj (*estus estinta legonta*), kiujn la komunikado praktike neniam bezonas. Alia, semantike tre diskretiga gramatika rimedo, kiun ni volas montri ĉi tie, estas tio, ke en la kazoj, se subjekto esprimiĝas per infinitivo aŭ propozicio, aŭ se subjekto tute malestas, la adjektiva predikativo alprenas adverbajn finaĵon (*“resti kun leono estas danĝere”*). Oftaj uzaroj en tiaspecaj frazoj certe dubindigas la neceson de tiel fajna semantika diskretigo; aliflanke estas fakto, ke multaj uzantoj de Esperanto konstante ĉasas – kaj trovas – tru(et)ojn sur la semantika reto, kaj tuj klopodas ŝtopi ilin, pli-malpli sendepende de la efektivaj komunikbezonoj.

9. Ĉio supre dirita fakte neniel deziras esti en iu ajn senco kritiko kontraŭ Esperanto, ĉar, kiel ni montris tion sub punkto 2, la ĉefa direkto de la evoluo de homa komunikado estas karakterizebla per la ŝanĝovico de *eksterlingvaj rimedoj* → *supersegmentaj lingvaj rimedoj* → *segmentaj lingvaj rimedoj*. Se tiu karakterizo estas ĝusta, Esperanto simple avangardas en la universala lingvoevolua procezo – kaj en tiu senco ĝi estas vere speco de *“hyper-écriture”*.

**Referencita literaturo:**

- Goody, Jack – Watt, Ian (1968): The consequences of literacy. In: Goody, Jack (ed.): *Literacy in Traditional Societies*. Cambridge (England): Cambridge University Press, p. 27–84.
- Mattos, Geraldo (2000): *En la komenco estas la vorto*. Chapecó-SC (Brazilo): Fonto.
- Molitor-Lübbert, Sylvie (1996): Schreiben als mentaler und sprachlicher Prozeß. = Günther, Hartmut – Ludwig, Otto: *Schrift und Schriftlichkeit – Writing and Its Use. Ein interdisziplinäres Handbuch internationaler Forschung / An Interdisciplinary Handbook of International Research*. Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft. Band 10.2. Berlin – New York, p. 1005–1026.
- Norris, Christopher (1982): *Deconstruction: Theory & Practice*. London & New York: Meuthen.
- Ong, Walter J. (1982): *Orality and Literacy. The Technologizing of the Word*. London – New York: Methuen.
- Zumthor, Paul (1984): *La poésie et la voix dans la civilisation médiévale*. Paris: Presses Universitaires de France.

# KOMUNIKADO KIEL FONTO KAJ MOTORO DE LINGVA EVOLUO\*

## 1 De la primara parollingveco<sup>1</sup> al la skriblingveco

### Komunikado kiel fonto de lingvaj ŝanĝoj

En la suba teksto lingvo estos rigardata kiel primare komunikcela fenomeno, kiun, per la vortoj de Martinet, ”formas sole la komunikado” (Martinet 1967: 178)<sup>2</sup>. Estos koncedate, ke lingvo krom la komunikada rolo plenumas ankaŭ aliajn funkciojn – antaŭ ĉio servas kiel bazo por formado de konceptoj – tamen tiuj funkcioj estos rigardataj kiel ”kromproduktoj” de la komunikada rolo, kiel ajn gravaj ili estas. Pri la kreiĝo de la homa pensado ankaŭ filogeneze ni akceptas tiun eksperimente subtenitan hipotezon, kiun – refutante la tezon de Piaget – disvolvis ontogeneze Vygotsky en sia verko ”Penso kaj Parolo” (Vigotszkij 2000: 25-87). Laŭ tio la evoluo priskribeblas jene: socia (t.e. komunikcela) parolo → egocentra parolo → interna parolo, kiu pluevoluas por fariĝi pensado, lingva kaj senlingva (Vigotszkij 2000: 101-134). Egocentra parolo estas specifa transira fazo inter komunikado kaj pensado: *psike* ĝi estas interna parolo, dum *fiziologie* ekstera parolo (ja ĝi aŭdeblas).

Laŭ la supra elirpunkto la propraĵoj de komunikado – ĝiaj teknologioj, celoj, funkciaj formoj ktp. – estas la ĉefa formanto ne nur de la homa lingvo, sed ankaŭ tiu de la homa pensado.

### Niveloj de la vizaĝ-al-vizaĝa homa komunikado

La homa komunikado realiĝas kompreneble ne ekskluzive per lingvo. La protoformo de tiu komunikado – vizaĝ-al-vizaĝa homa komu-

---

\* Ĉiu tiu teksto aperis esperantlingve unue en *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin* (red. Detlev Blanke kaj Ulrich Lins; UEA, Rotterdam, 2010), 63–75. Pli frue ĝi aperis anglalingve (dank’ al profesoro Tonkin) en *Language Problems & Language Planning*, Volume 27 (2003), Number 3, 249–268. Hungarlingve ĝi estis presita en Donáth, Péter (red.): *Filozófia–Művelődés–Történet 2004* (Trezor, Budapest, 2004), 33–54.

<sup>1</sup> Termino de W. J. Ong, lanĉita en la libro *”Orality and Literacy: The Technologizing of the Word”* (1982). Ĝi rilatas la lingvon kaj ĝian uzon antaŭ la invento de la skribo.

<sup>2</sup> ”La communication seul façonne la langue”.

nikado (t. e. interparolado de homoj, troviĝantaj samtempe en la sama loko) – estas dividebla je tri niveloj:

1. tiu de segmentaj lingvaj rimedoj (t. e. la vortoj mem, konsistantaj el ĉeno de parolsonoj)
2. tiu de supersegmentaj lingvaj rimedoj (intonacio, parolrapideco, tono ktp.)
3. tiu de eksterlingvaj rimedoj (kiel ekz. mimiko, gestoj, korpoteno ktp.).

Estas necese fiksi, ke ĉiuj komunikadaj teknologioj, inventitaj de homoj, havas *duoblan* strebon. *Unuflanke*, signife ampleksigi la efikecon de iu difinita nivelo de la komunikado; *aliflanke*, minimumigi la plene neniam eviteblan malampleksiĝon de ĉiuj aliaj niveloj. Kerne de ĉiuj komunikadaj teknologioj kuŝas la deziro rekrei – almenaŭ virtuale, kiel iluzion – la vizaĝ-al-vizaĝan homan komunikadon. Okazas tiel, ĉar la homoj – kvankam ili relative facile adaptiĝas al la uzado de plej diversaj teknologioj – subkonscie rigardas vizaĝ-al-vizaĝan homan komunikadon kiel la *solan veran kaj naturan formon* de komunikado.

### **Anatomio de la komunikada procedo**

Tial ĉiu nove inventita teknologio ofertas al la homo kaj gajnon, kaj perdon. Tamen, komunikado jam en si mem havas iujn neeviteblajn perdojn, ĝi do neprigas kompromison. Komunikado estas nenio alia, ol meto de sia konsci(er)o ekster sian korpon. La procedo de tiu "meto" realiĝas proksimume en la jenaj etapoj: 1. fokusigo de certa parto de la konscienhavo; → 2. elekto de la komunikenda enhavero; → 3. diskretigo de tiu enhavero; → 4. formaligo de la enhavero (t. e. adapto al la spertoj de la komunumo); → 5. liniigo (vicigo de la jam diskretigitaj kaj formaligitaj enhaveroj en unudimensian linion); → 6. lingva enkodigo (t. e. vortumo). Estas evidente, ke la origina formo de la komunikota konsci-enhavero ŝanĝiĝas/leziĝas almenaŭ iomete en ĉiu etapo de tiu procedo.



## Ĉu ankaŭ lingvo estas teknologio?

Mem la lingvon oni ordinare ne rigardas teknologio, ja parolo, ĝia primara formo, estas ”la produktaĵo de nia korpo”, sed la subaj vortoj de Michael Polanyi devas almenaŭ pensigi nin, ĉu lingvo mem ne estas tamen teknologio:

[...] ĉe apliko de formalaj reguloj al la homa sperto, ĉiam aperas ioma malcerteco, kiun devas dissolvi la aplikanto mem laŭ kriterioj anticipe nedifineblaj; ni povas aldoni [...] al tio, ke ankaŭ la apliko de la lingvo al la aferoj estas ne-formaligita kaj ne-disartikigita. Sekve nomi ion estas arto; parolo pri aferoj ĉiam implicas la rekonon de la propra kapablo praktiki tiun arton (Polanyi 1958: 81).<sup>3</sup>

Polanyi sugestas, ke la ekzistanta homa sperto havas *kontinuan* karakteron, ĝi ne estas *diskretigita*, kaj do la aplikado de formalaj (lingvaj) reguloj al ĝi postulas de la aplikanto samspecan *arton*, kiel la aplikado de kiu ajn alia *teknologio*. En tiu senco la lingvo eĉ en sia primara (parola) formo estas rigardebla kiel teknologio, kies funkciado – same kiel tiu de ĉiuj aliaj komunikadaj teknologioj – rezultigas ankaŭ perdojn.

## Skribo: la unua vera komunikada teknologio

Tamen la unua tia afero, kiu laŭ ĉies opinio estas teknologio, estis *skribo*. Oni devas klare distingi inter du specoj de skriboj. Tiujn du specojn Haas nomas per grekdevenaj terminoj '*pleremic*' kaj '*cenemic*'.<sup>4</sup>

---

<sup>3</sup> ”We have seen that in all application of a formalism to experience there is an indeterminacy involved, which must be resolved by observer on the ground of unspecifiable criteria. Now we may say further that the process of applying language to things also necessarily unformalized: that it is inarticulate. Denotation, then, is an art, and whatever we say about things assumes our endorsement of our own skill in practising this art...”

<sup>4</sup> *pleremic*: Termino formita de la greka vorto πλήρης ('plena'), por nomi tiujn skribsistemojn, kiuj notas nur la signifon de la vortoj, sed ne ties sonadon. Skribsistemoj kiel la antikva Egipta, Sumera aŭ ĉina – starantaj parte sur leksika aŭ morfema bazo – estas rigardataj pleremic-sistemoj; *cenemic*: termino formita de la greka vorto κενός ('malplena') estas uzata por nomi tiujn skribsistemojn, kiuj notas ja la sonadon de la vortoj, sed neniom notas el ties

Oni devas noti, ke *pleremic*-skriboj havas malmulton komunan kun lingvo: ili fakte transpontas lingvon, kaj kreas senperan kontakton inter skribo kaj la reprezentataj aferoj, tute ignorante la akustikan lingvon. (Iasencan kaj partan escepton formas nur *logogramoj*, kiuj per unusola kompleksa skribsigno registras plenan vorton, – do *lingvan* unuon kune kun ties semantika riĉo –, tamen sen ties akustika ”ŝelo”). *Cenemic*-skriboj siaflanke registras nur fonetikajn informojn, kaj neniujn semantikajn. Al tiu kategorio apartenas silab-skriboj, konsonantalfabetoj kaj fonetikaj alfabetoj. Fonetika alfabeto naskiĝis kiam grekoj en la 8a jarcento a. K. kompletigis la fenician konsonantalfabeton per signoj por vokaloj. Fonetika alfabeto iasence estas pinta produkto de la akustika lingvoanalizo: ĝi povis aperi nur tiam, kiam la akustika diskretiĝa procezo de la lingvo atingis iun relative altan nivelon. (Ekde nun, parolante pri *skribo*, sub tio ĉiam ni komprenos fonetikan alfabeton.)

Skribo ne estas perfekta komunikada teknologio, ja krom ne povi peri la *eksterlingvajn komunikadajn rimedojn*, ĝi plene malkapablas registri ankaŭ la *supersegmentajn* rimedojn de la akustika lingvouzo. La segmentajn rimedojn *principe* ĝi kapablas registri, en la praktiko tamen multo ŝarĝiĝas al la akustika memoro de la leganto. Eric Havelock jene skribas pri tio: ”Iom da dusenceco restas. Ĝin eblas forigi nur per memoro pri la parola lingvo. [...] La revivigo de tiu memoro estas ĉio, kion povas fari ajna alfabeto. La originala funkcio de la alfabeto estis ne anstataŭi la primaran scion de la parolo, sed ĝuste revoki tiun scion. La efika uzo de la alfabeto postulas ke la buŝlingva vortaro de la parolanto estu jam pli frue flua kaj edukita. Alfabeto ĉiam estis kaj estas ilo de akustika rekonigo, kaj sole nur tio” (Havelock 1982: 318)<sup>5</sup>.

---

signifo. Ni ĉerpas la terminojn el Haas 1983, sed profesoro Probal Dasgupta avertis, ke tiuj terminoj aperas jam pli frue ĉe Louis Hjelmslev.

<sup>5</sup> ”Some ambiguity will remain. They can be supplied only by the memory of the spoken tongue [...]. But to revive this memory is all that any alphabet is expected to do, any way. The function of the original model was not to replace a prior knowledge of spoken speech but to trigger a recall of that knowledge. Its effective use depended upon the requirement that the oral vocabulary of the reader first be fluent and educated. The alphabet was and is an instrument of acoustic recognition, and only that.”

Alia grava malperfekteco de skribo estas *manko de interaktiveco*. Tion rimarkis jam Platono, kiu skribas en Phaedrus (275d), ke la skribita teksto "majeste silentas", "kaj se oni demandas pri iu el ĝiaj vortoj, por pli bone kompreni, ĉiam ĝi diras nur la samon".

### **Malperfektecoj de skribo perfektigas la lingvon**

Tiuj du ĉefaj [malperfektecoj] malperfektaĵoj de skribo signife influis la skriban lingvouzon, kaj la komunikadon ĝenerale. La nekapablo de skribo registri la supersegmentajn lingvajn rimedojn kaj la eksterlingvaj rimedojn de komunikado, trudis al la skribanta homo enkodi ĉiun sian direndon en la segmentan lingvan rimedaron. Tiamaniere la vasta apliko de skribo signife malriĉigis la arsenalon de la eksterlingvaj komunikadaj rimedoj (ekz. tiun de la *gestoj*), kiel ankaŭ la supersegmentajn rimedojn (la akustika lingvouzo fariĝis pli monotona); aliflanke ĝi enorme riĉigis la segmentan rimedaron, kiu devis porti la tuton de la mesaĝo.


Tiu cirkonstanco, krome la manko de interaktiveco, post la akustika dimensio ankaŭ en la semantika dimensio de la homa lingvo eldevigis daŭran kaj profundan diskretiĝan procezon. En la skribo ne povis funkcii tiu procedo, kiun Goody-Watt (1968: 29) nomas *rekta semantika aprobo* ('direct semantic ratification'), kaj kiu en la primara parollingveco plenumis la aktualigon de la signifo de la vortoj, sekve nepris distranĉi la kompleksajn vortsignifojn de la primara parollingveco, kaj ligi apartan segmentan lingvan signon al ĉiu aparta signifero. Tiuj signiferoj devis esti klare konturitaj, koncentritaj al la esenco, kaj liberaj je fenomenkarakteraj komponantoj. Memkompreneble rezulte de tio plimultiĝis la vortoformoj, kaj samtempe la skriba lingvo fariĝis pli abstrakta. (Tiun abstraktecon respegulas la metaforo de Vygotsky, kiu nomis skribon "algebro de la parolo" (Vigotszkij 2000: 265).

### **Dudimensia opozicio de parollingveco kaj skriblingveco**

La abstraktiĝo tuŝis ne nur la skribitan lingvon, sed ankaŭ la parolan, unuavice pro la alta prestiĝo, kiun skribo iom post iom akiris en la homa socio. *Esti skribota* signifis por parolo iasencan gloriĝon – pro

tio en la homoj aperis strebo paroli tiel, ke la parolo estu plej facile skribebla. Aliflanke, ankaŭ la parola lingvo havis sian influon al la skriba, ĉefe pro la fakto, ke parola lingvouzo ĉiam konservis sian kvantan superpezon en la homa komunikado. Tio rezultigis, ke lingvouzo povis karakteriziĝi *parola* aŭ *skriba* laŭ du vidpunktoj: *media* kaj *koncipa*. En la media dimensio opozicias la sonanta parolo al la grafika signaro de skribo; dum en la koncipa dimensio la lingvouzo parole fasonita, vaste sin apoganta je la kunteksto, opozicias al la skribe planata kaj fasonata, abstrakta lingvouzo, al la “algebro de la parolo”. Tiel ebliĝas riĉaj variaĵoj de kombinado de skriblingveco kaj parollingveco, kiel evidentigas tion la suba skemo:

**Figuro 1**




<i>a</i> = familiara babilo	<i>b</i> = telefona interparolo	<i>c</i> = privata letero
<i>d</i> = teksto de prezento	<i>e</i> = intervjuo en gazeto	<i>f</i> = prediko
<i>g</i> = scienca prelego	<i>h</i> = gvidartikolo	<i>i</i> = jura teksto

(Laŭ Koch–Osterreicher 1994: 588)

### La skemo de perceptado-lingvouzo-pensado

Lokigante la riĉe nuancitan homan lingvouzon en la pli vastaj kadroj de *perceptado-lingvouzo-pensado*, oni venas al la sekva skemo, kiu provas iel desegni la kognan arkon, kiu havas sian komencon en la “antaŭ-“ aŭ “sublingva” sektoro de la sense bazitaj konscienhavoĵoj (sektoro “a”), por sekvi tra la lingva sektoro (sektoro “e”), kaj alveni al la “super-lingva” aŭ “translingva” sektoro (sektoro “f”).

**Figuro 2**



En la skemo cirklo "A" reprezentas tiujn partojn de la enhavo de la konscio, kiuj rezultis el sensaĵoj, kaj ili ankaŭ konservis sian ligitecon al la mondo de sensoj. Oni povas fari pensooperaciojn ankaŭ per tiuj ĉi enhavoj, sen lingve formuli ilin. Tiaspecan pensadon oni plenumas ekzemple revokante en la memoron la itineron, kiun ĉiutage oni plenumas veturante al sia laboro (Crystal 1997: 14). Cirklo "A" ekzistis jam antaŭ la kreiĝo de cirkloj "B" kaj "C".

Kiel dua kreiĝis la cirklo "C", sed ĉe sia kreiĝo ĝi ne havis la nunan pozicion, sed ĝi tanĝis la cirklon "A". Cirklo "C" reprezentas la tuton de la lingvouzaj aktivadoj (egale kaj parolan, kaj skriban), sendepende de tio, ĉu tiun aktivadon akompanas pensado, aŭ ne. Kompreneble la radikoj de ĉiuj enhaveroj de cirklo "C" troviĝas en la cirklo "A": cirklo "C" entute ne povus ekzisti sen la cirklo "A". Cirklo "C" [kreske] pli kaj pli penetras en la cirklon "A" ĉefe rezulte de la artcela lingvouzo: tiel kreiĝas la sektoro "b". Estas grave noti, ke tiu penetro okazas ne per glito maldekstren de la cirklo "C", sed plie per ĝia ŝvela konvekŝiĝo. La dekstra limo de cirklo "C" kaze de normala lingva evoluo malrapide, sed daŭre ŝoviĝas dekstren. Profunde alproprigita kaj vaste uzata skribo povas signife akceli tiun ŝoviĝon. En normala kazo cirklo "C" daŭre kreskas kaj dekstren, kaj maldekstren. (Ĝia eventuala ŝrumpo reprezentus lingvan kaj konceptan malriĉiĝon.)


Cirklo "B" reprezentas la tuton de tiuj konsci-enhaveroj, kiuj havas karakteron de iagrade abstraktaj konceptoj, naskiĝintaj trudite de la kognia ekonomio. Cirklo "B" komence koincidas plene kun cirklo "C", tiel ankaŭ por cirklo "B" validas la konstato, ke la radikoj de ĉiuj ĝiaj elementoj troviĝas en la cirklo "A". Tamen, pasante dekstren en la cirklo "B" (kiel ankaŭ en la cirklo "C") oni povas konstati laŭgradan paliĝon de la ligiteco de la opaj konsciero al la sensobazaj konsciero en la cirklo "A". Post certa tempo cirklo "B" (regiono de la koncepta pensado) kvazaŭ elkreskas el sub cirklo "C". Tio okazas en la momento, kiam la evoluo de lingvo kaj pensado atingas kritikan punkton, en kiu la piramido de abstraktaĵoj, enkondukitaj ĝuste far la skriba lingvo, kreskas tiel alten, ke la lingvo ne plu kapablas ekonomie trakti ĝin. Rezulte de tiu "elkresko" kreiĝas sektoro "f". Sur la dekstra rando de sektoro "f" lokiĝas la tiel nomataj "puraj konceptoj", kiuj fakte ja neniam estas plene puraj kaj senkorpaj, tamen kiujn absolute maleblas kapti per lingvaj rimedoj. En kulturoj kun evoluintaj lingvo kaj pensado cirklo "B" ĉiam estas nepre pli granda, ol cirklo "C"<sup>6</sup>.

La procezo kondukanta al la formiĝo de *Figuro 2* estas prezentebila jene:


---

<sup>6</sup> *Rimarko:* La grandeco de la cirkloj sur la desegno ne precize proporcias kun la kvantoj de la reprezentataj konscienhavo, tamen provas doni iun imagon pri tiuj proporcioj. Plej grandas probable la enhavo de cirklo "A": ĝi povas esti speciale granda kaze de artistoj aŭ personoj, kies pensadon pli-malpli dominas la dekstra hemisfero de la cerebro. La grandeco de la cirklo "C" povas varii laŭ la lingva kompetento de la opaj personoj, tamen ĝia grandeco postrestas kaj al tiu de cirklo "A", kaj al tiu de cirklo "B". Cirklo "C" ĉe iuj individuoj povas gliti iom dekstren aŭ maldekstren; en la kazo de glito maldekstren verŝajnas la ŝrumpo de cirklo "B", en la kazo de glito dekstren ŝrumpo de cirklo "A".

1. Cirklo "A"



2. Cirklo "A"




Cirkloj "C" kaj  
"B" kongruaj

3. Cirklo "A"



Cirkloj "C"  
(malpli granda)  
kaj "B"  
(pli granda)

4. Cirklo "A"



Cirkloj "C"  
(malpli granda)  
kaj "B"  
(pli granda)

1. Komence ekzistas nur cirklo "A"; ĝin posedas ankaŭ animaloj.

2. Kreiĝas cirklo "C", la regiono de la lingvo: ĝi tanĝas la cirklon "A", ne sekcas ĝin. Samtempe kun la kreiĝo de cirklo "C" kreiĝas ankaŭ cirklo "B" (la regiono de abstraktaj konceptoj), kiu estas plene kongrua kun cirklo "C", tial cirkloj "C" kaj "B" kaŝas unu la alian sur la figuro. En tiu momento ne ekzistas tiaj konceptoj, kiuj ne havas lingvan reprezenton.

3. Ĉar kreiĝas konceptoj, kiuj ne plu kapteblas lingve, cirklo "B" elŝvelas el sub cirklo "C". Tiu ŝvelado daŭras, dum kreskas la nombro de la t. n. puraj konceptoj, ne kapteblaj-trakteblaj lingve.

4. La cirklo "C" sekve de la disvolviĝo de la artcela lingvouzo enŝvelas en la cirklon "A", sektoro "b", kiu kreiĝas sekve de tiu enŝvelo, estas tipe sektoro de estetikcela lingvouzo, strebanta kapti lingve tion, kio pli frue montriĝis nekaptebla.

En la sektoro "a" troviĝas lingve ne kaptitaj, kaj nur apenaŭ aŭ tute ne disartikigitaj konsci-elementoj. (Io tia povas estiodoro iam flarita kaj memorata, kiun oni ne kapablas lingve reprezenti, sed flarante ĝin denove, oni rekonas ĝin; estas io simila ankaŭ tio, kion oni nomas "déjà vu"-sento.)

En la sektoro "b" troviĝas tiuj lingve kaptitaj konsciero, kiujn la lingvouzanto – por konservi la originalecon, unikecon de la koncerna konsciero – intence liberigis el sub la efiko de la redukta kognakonomio. Tiamaniere evitiĝas skemiĝo, konceptiĝo de la sensaĵo, okazanta ĉe ordinara lingva formulado. Sektoro "b" estas tipe sektoro de arta lingvouzo. (Sektoro "b" – pro individua karaktero de sia enhavo – ne povis ekzisti en la buŝa literaturo, ĉar, kiel Jakobson diras<sup>7</sup> [Jakobson 1966: 7], tiu literaturo estas plene submetita al la "cenzuro de la komunumo". Tiu cenzuro signifas, ke kaj enhave, kaj lingve ĝi devas enteni senmankan socian evidentecon, t. e. ĝi devas strikte ligiĝi al la komunumaj spertoj.) La lingva kapto de tiuj individuaj enhavoj povas okazi nur per originalaj, antaŭe neniam uzitaj vortoj aŭ vortkombinoj, kiuj tamen ne povas esti senradike novaj. (Tiaj procezoj estas la ĉefa fonto ekzemple por kreiĝo de metaforoj kaj sinestezi<sup>8</sup>.)

La sektoroj "c" kaj "d" reprezentas la lingvouzon, kiu ne kombiniĝas kun pensa aktivado kaj ne rilatas konsci-enhavon: ekzemple kiam oni recitas (aŭ kantas) parkeratan tekston tiel, ke dume oni pensas pri io alia. Ankaŭ laŭta legado povas okazi tiel, ke la laŭtleĝanto ne scias, kion li aŭ ŝi laŭtleĝas. Profesiaj tajpistoj, kompostistoj kapablas senerare retajpi tekston sen havi iun imagon pri ĝia enhavo. Eĉ

---

<sup>7</sup> "Die Rolle der von der Gemeinschaft ausgeübten Zensur ist [...] in der Literatur und in der Folklore verschieden. In der letzteren ist die Zensur imperativ und bildet eine unumgängliche Voraussetzung für die Entstehung von Kunstwerken."

<sup>8</sup> Rimarko: La kresko de la sektoro "b" okazas esence paralele kun la evoluo de la literatura lingvo: la lingvo konkeras ĉiam pli grandajn teritoriojn el la neelĉerpeble riĉa enhavo de la cirklo "A". Tamen eĉ ĉe la sama individuo oni neniel prenu konstanta la amplekson de la enhavo de cirklo "A". Tiu arsenalo ampleksiĝas de tago al tago: la individua konscio, fariĝanta ĉiam pli sentema rezulte de la kresko de la sektoro "b", perceptas ĉiam pli multe el la mondo, kaj metas ĉiam pli multe da materialo en la cirklon "A". Verŝajnas, ke la ampleksiĝo de la sektoro "b" rezultigas eĉ pli multan pligrandiĝon de la cirklo "A", kaj kune kun tio ankaŭ tiun de la sektoro "a"; tial, ĉar la ampleksiĝo de la sektoro "b" eĉ iu individuo fajnigas ties perceptkapablon.



sinkronaj interpretistoj kapablas traduki tiel, ke pense ili ne perceptas la enhavon de la tradukata teksto.

La sektoro "e" reprezentas la ordinaran lingvouzon kaj la lingvan pensadon per komunuzaj aŭ sciencaj konceptoj: tiu sektoro estas la regiono de la baza funkcio de lingvo. Tiuj konceptoj povas varii laŭ tre vasta skalo, ekde la plej simplaj ĝis la plej komplikaj, kiuj tamen ankoraŭ ekonomie trakteblas per la lingvo. De maldekstre al dekstre oni pasas de la simplaj konceptoj al la pli komplikaj. Pasante disde maldekstre al dekstre, oni trapasas ankaŭ vojon disde koncipa parollingveco al koncipa skriblingveco. "*Ĉi tiu pano estas nemangebla*" – estas frazo uzanta simplajn konceptojn, kiujn lingvo kapablas trakti senpene. "*La socia farto dependas tiel same de la kvanto de la disponeblaj materiaj rimedoj, kiel de la grado de politika libereco*" – ĉi tiu frazo jam enhavas pli komplikajn konceptojn, sed lingvo tamen montriĝas la plej efika ilo por esprimi ilin: certe malfaciligus la komprenon, se la enhavon de tiu frazo oni provus esprimi per matematike konstruita formulo. Tamen tiu ĉi frazo estas jam la frukto de koncipa skriblingveco; ni entute komprenas ĝin aŭde nur pro tio, ĉar dum la pasintaj jarcentoj skriba lingvo signifis interferencis kun la parola lingvo, kaj la enhejmiĝo de la pli kompleksaj skriblingvaj en la parola lingvouzo signifis trejnigis nian aŭdan komprenkapablon. "*La sumo de adicio ne dependas de tio, ĉu oni aldonas la duan kvanton al la unua, aŭ la unuan kvanton al la dua*" – ĉi tie oni renkontas eĉ pli altan nivelon de konceptoj, tamen lingvo povas trakti ĝin (kvankam buŝe jam nur iom peze). Tiu ĉi frazo certe pli ekonomie trakteblas per algebraj simboloj:  $a + b = b + a$ .

Komprenoble la lingvouzo en iu ajn parto de la sektoro "e" povas esti el *media* vidpunkto tiel same *parola*, kiel *skriba*. El *koncipa* vidpunkto ne estas tiel: paso de maldekstre → dekstren estas samtempe paso de *koncipa parollingveco* → al *koncipa skriblingveco*. Evidentas, ke frazo kiel la supre ekzemplita "*La sumo de adicio ne dependas de tio, ĉu oni aldonas la duan kvanton al la unua, aŭ la unuan kvanton al la dua*" lokiĝas en la dekstra ekstremo de sektoro "e", kiel tipa frukto de koncipa skriblingveco.

La sektoro "f" entenas tiujn plej abstraktajn konsci-enhavojn, kiuj jam ne trakteblas lingve, aŭ almenaŭ ne ekonomie. Tiuj enhavoj estas ĉefe fruktoj de la matematika pensado; matematiko kreis apartan simbolsistemon por povi fari operaciojn per tiuj konceptoj jam en si mem pluroble abstraktaj. Estas interese konstati, ke la ŝiriĝo disde la lingvo eĉ ĉi tie ne estas senmanka, ĉar matematiko elektas tiujn simbolojn grandparte el la krudmaterialo de la skriba lingvo, el la literoj. (Kompreneble literoj en matematikaj formuloj funkcias *ne* kiel lingvaj signoj, en sia nova funkcio tamen ili prezentas la familiarecon de konata afero al la uzantoj.)

### **Koncipa skriblingveco bazas fajnan konceptan pensadon**

Estas grave diri, ke **la sektoro "f" tute ne povus ekzisti sen la sektoro "e", kaj tute speciale ne sen ĝia dekstra regiono, en kiu situas koncipa skriblingveco.** La kreado de konceptoj komenciĝas en la sektoro "e", kaj la evoluado de konceptoj longe okazas ene de la sektoro "e", t. e. la ekzistantaj konceptoj estas adekvate trakteblaj lingve. La sektoro "f" (kaj iasence ankaŭ la cirklo "B", klare apartiĝanta disde la cirklo "C") vere kreiĝas nur tiam, kiam ekestas novaj, ĉiam pli komplikaj konceptoj, kiuj kvazaŭ "transverŝiĝas" trans la dekstra limo de la sektoro "e", limo, kiu estas samtempe ankaŭ la limo de la lingva esprimeblo<sup>9</sup>.

La spertoj montras, ke la dekstra limo de la sektoro "e" ne estas fiksa: ĝi ŝoviĝas daŭre dekstren; lingvo ja konstante strebas esprimi per la propraj rimedoj konceptojn kiuj ja originas el la lingva pensado, sed kiuj intertempe superis ĝin. (Tre probable tio ne malampleksigas sektoron "f"; male, povas eĉ kreskigi ĝin, ja pli granda sektoro "e" povas nutri pli grandan sektoron "f".) Krome estas evidente, ke la ŝoviĝo dekstren de la dekstra limo de la sektoro "e" okazas dank' al la koncipa skriblingveco, al kies fajniĝo kontribuas antaŭ ĉio la profunda semantika diskretiĝa procezo, aludita jam supre.

---

<sup>9</sup> Notindas, ke estis Descartes, kiu la unua malkovris, ke la matematika pensado originas el la lingvo, sed ĝi ankaŭ superas la lingvon. Estas atentinde sed ne surprize, ke ĝuste en la epoko de Descartes – dank' al la disvastiĝo de la aplikado de pensado – skribo signife ekspansias en okcidenta Eŭropo, kaj precize en la sama tempo la progreso de matematiko elane akceliĝas.

## **2 De la skriblingveco al sekundara parollingveco kaj postlitereco**

### **Fendoj sur la monopolon de skribo**

Ĝis ĉ. la mezo de la 20a jarcento skribo estis la sola vaste kaj efike funkciinta komunikada teknologio. La sinsekva apero de telefono, radio, gramofono, kapablaj registri, stori kaj plusendi la homan parolon en ĝia akustika natureco kaj kompleteco, principe ŝancelis la poziciojn de skribo. Praktike tiu ŝanceliĝo tamen dum longa tempo ne rimarkeblis. Jam en la jaro 1933 Bloomfield (1933: 503)<sup>10</sup> profetas eblan malaperon de skribo; laŭ li povos okazi, ke la mekanikaj iloj por la reproduktado de la parolo ĉesigos la nunan kutimon de skribado kaj presado – tamen pro sia (tiutempe ĝenerala) opinio, laŭ kiu skribo havas nenion komunan kun lingvo, li ne profundiĝis en la temo.

La turnopunktan ŝanĝon en la komunikada teknologio signifas la apero kaj iom post ioma disvastiĝo de televido. Nome, televido per sia multmedieco kapablas preskaŭ senmanke rekrei la cirkonstancojn de la senpera homa komunikado: ĝi scias peri ĉiujn tri dimensiojn de tiu komunikado (t. e. segmentajn lingvajn rimedojn, supersegmentajn lingvajn rimedojn kaj grandan parton de la eksterlingvaj komunikadaj rimedoj). Sekve de tio segmentaj lingvaj rimedoj – kaj kune kun ili diskretaj signoj – estas perdantaj sian relative monopolan pezon ene de la komunikado.

### **Sekundara parollingveco**

Ĉi tiun novan epokon de komunikado Ong nomas ‘sekundara parollingveco’ (‘secondary orality’). En 1982 li vidas la aferon ankoraŭ tiel, ke ĉi tiu nova parollingveco similas la primaran per sia koncentriĝo al la aktuala momento, kaj ankaŭ per sia uzado de formuloj. Sed esence ĝi estas pli intencata kaj konscia parollingveco, kiu daŭre baziĝas sur la uzo de skribo kaj preso, kiuj havas esencan

---

<sup>10</sup> ”We may expect that at some time in the future our social organism will reach a degree of coordination and flexibility where a concerted change becomes possible, or else that mechanical devices for reproducing speech will supersede our present habits of writing and printing.”

rolon en ĝia kreiĝo kaj uzo (Ong 1982: 136).<sup>11</sup> Post du jardekoj tiu opinio ŝajnas iom tro optimisma koncerne la ”bazan” rolon de skribo kaj presado en la sekundara parollingveco. La rapida disvastiĝo de funkcia analfabetismo konfirmas la supozon, ke signifa parto de la plenkreskaj homoj, kiuj finis lernejon, bone povas vivi senskribe kaj senlege.

## **Ikona turno**

Tamen la komunikad-teknologia revolucio de la 20a jarcento ne sole konsistas el la apero de eblo registri kaj plusendi la homan parolon, kaj per tio ankaŭ la supersegmentan lingvan dimension de la komunikado, kion skribo ne kapablis. Gramofono (magnetofono), telefono kaj radio tiusence ”korektis” unu mankon de skribo. Almenaŭ tiel grava evento estis en la historio de la komunikado tio, kion oni nomas *ikona turno* (’ikonische Wende’) (Boehm 1995: 13) aŭ *bilda turno* (’pictorial turn’) (Mitchell 1994: 11) – ĝi ebligis registron kaj plusendon de eksterlingvaj komunikadaj rimedoj, kaj tiamaniere do ”korektiĝis” plia manko de skribo.

Tiu turno komenciĝas ankoraŭ en la 19a jarcento per la invento de fotografado. Joyce nomas fotadon tre trafe ’aŭtomata skribo’ (’automatic writing’), kaj trovas, ke fotografaĵo estas rivalo, eĉ uzurpanto de la vorto, ĉu skribita, ĉu parolata (McLuhan 1964: 163)<sup>12</sup>. Bildo do konkurencas ne nur kun la skribo, sed kun la lingvo entute; ja, kiel demonstras la sektoro ”a” sur *Figuro 2*, primara pensado okazas per sensaĵoj, inter kiuj privilegiitan lokon havas *vid-sensaĵoj*, t. e. bildoj. (Oni pensu pri la etimologio de la Platonaj vortoj *idea*, *eidós* – uzitaj por nomi abstraktajn konceptojn –: ili parencas kun la vorto *’idein’*, kiu signifas ’vidi’; komp. Nyíri 2001: 243). Oni ankaŭ povas diri, ke se gramofono kaj radio korektis mankon, malperfektecon de skribo, fotado (kaj bildofarado ĝenerale) tiel same korektas mankon, malperfektecon de la lingvo mem.

<sup>11</sup> ”This new orality has striking resemblances of a communal sense, its concentration on the present moment, and even its use of formulas. But it is essentially a more deliberate and self-conscious orality, based permanently on the use of writing and print, which are essential for operation of the equipment and for its use as well.”

<sup>12</sup> “[...]a rival, and perhaps a usurper, of the word, whether written or spoken”.

Homoj dum tre longa tempo povis fari bildojn nur kun tre malmulta efikeco: bildofarado postulis tre longan laboradon de homoj kun escepta talento. Kaj la tiel faritaj bildoj havis gravan mankon: ili ne estis senŝanĝe ripeteblaj. William Ivins atentigas en sia "Prints and Visual Communication" ['Preso kaj vida komunikado'] (1953), ke Lessing, kiam li skribis pri la Laokoon-skulptaĵo, ne nur ne vidis la skulptaĵon mem, sed laŭ la tiutempe disponeblaj bildoj eĉ ne povis havi fidindan imagon pri tio, kiel ĝi vere aspektas. En la uverturo de la homa ekzistado manke de la kapablo produkti ikonajn signojn pri sia konscienhavo, trudiĝis al la homoj akcepti kiel komunikilon *simbolan akustikan signaron (la parolatan lingvon), kaj poste ĝian grafikan varianton: skribon*.

Pliaj ĉefaj etapoj de la ikona turno post fotografado estis filmo, televido kaj laste komputila bildoproduktado kaj -transformado: oni spertas konstantan perfektigon kaj simpligon de bildoproduktado. El tio rezultas, ke scioj kaj faktoj de vida karaktero povas komunikiĝi en sia originala formo, sen unue trairi la deformantan kaj simpligantan procedon de disartikigo (diskretigo), abstraktigo, formaligo, simboligo kaj liniigo, kiu procedo estas nepra antaŭkondiĉo de la lingva komunikado. La eviteblo de deformigoj kaj simpligoj perfektigas kaj ankaŭ signifas komfortigas komunikadon, tamen samtempe sekvigas la forfalon de *analizo*, nepra akompananto de lingva komunikado. Finfine perbilda komunikado ebligas eĉ sendon de tiaj mesaĝoj, kiujn la sendanto ne disartikigis, diskretigis – fakte mem ne komprenis.

Michael Polanyi atentigas pri la diferencoj inter ne-disarkigita inteligento, kaj disartikigita pensokapablo. Li trovas, ke ne-disarkigitan inteligenton posedas ankaŭ animaloj, eĉ, sur tiu kampo homoj apenaŭ superas animalojn. Ekzemple, ankaŭ animaloj estas instrueblaj percepti kvantojn, sed ties supra limo estas 7-8 – ne mapli, ol kiom kapablas homo sen apliki sian disartikigan scion, la nombradon. Polanyi trovas, ke la kapturna progreso de la homa scio ŝuldiĝas ekskluzive al tio, ke homo kapablas dis-artikigi, diskretigi la aferojn (Polanyi 1958: 69–102).

Ikona aŭ bilda turno eliminis parte aŭ plene *ĝuste la disartikigan bezonon*, kaj se Polanyi pravus, la nuna evoludirekto en la komunikado necese kondukos al la ŝrumpo de la homa pensokapablo.

## Postlitereco

Pli trafe ol "sekundara parollingveco" la komunikadon de la nuna epoko karakterizas la vorto "postlitereco" ['post-literacy']. Ĉar kvankam parola lingvouzo vere renesancas, la esenco ne kuŝas tiom en tiu renesanco, kiom en tio, ke skribo draste perdas poziciojn.

Ne temas pri tio, ke en postlitereco ĉiuj komplete forgesas skribi kaj legi. Postlitereco karakteriziĝas [de] per tio, ke "[...] la novaj elektraĵoj kaj elektronikaj komunikiloj ekkonkurencis kun la presita libro, kiel kun reganta ilo de la komunikado"<sup>13</sup> (Nyíri 2002). Kaj tiu situacio karakterizas preskaŭ la tuton de la 20a jarcento. Tamen filozofio ekribelas kontraŭ skribo eĉ pli frue. Nietzsche jam en siaj prelegoj pri la greka literaturo, faritaj en Bazelo en 1874/75, grumblias pro tio, ke literaturhistorio okupiĝas pri la "skribitaĵoj" ("*Schriften-thum*") de la popoloj, anstataŭ dediĉi sin al iliaj "parolitaĵoj" ("*Sprachthum*"). En la verkoj de Heidegger [Heideggeraj verkoj] abunde aperas la vortoj *Rede* kaj *Sage*, klare ligitaj al la buŝa lingvouzo. La plej granda ribelanto kontraŭ skribo tamen estis Wittgenstein. Lia ribelo havis siajn radikojn ne en filozofiaj konsideroj, sed plie en la fakto, ke li havis legperturbojn ('dyslexic'), kiel tion demonstris Jaakko Hintikka<sup>14</sup>. La hungara profesoro J. C. Nyíri atentigas pri tio, ke Wittgenstein ne sukcesis ordigi siajn pensojn en senbreĉan *linian vicon*, kiu estas norma formo de la presita libro. La pensoj aperantaj en liaj verkoj aperas kiel komplika kaj kompleksa *reto de rilatoj*. J. C. Nyíri aldonas, ke "[...] en nia leviĝanta epoko de postlitereco iuj legperturbaj simptomoj simple ĉesas esti eksterordinaraj. Legperturboj fariĝas kultura skemo" (Nyíri 2002)<sup>15</sup>.

---

<sup>13</sup> "[...] the dominance of the printed book as the medium of communication has become challenged by the rise of the new, electric and electronic media".

<sup>14</sup> Jaakko Hintikka, "Ludwig Wittgenstein - A Case Study in Dyslexia" – manuskripto citita en Nyíri 2002.

<sup>15</sup> "[...] in our emerging age of post-literacy some characteristically dyslexic symptoms simply cease to be extraordinary. Dyslexia is becoming a cultural pattern."

## La senskriba lingvo

Post-literacy – kiel jam aludite – ne rezultigas la plenan malaperon de skribo: ja homaj inventaĵoj, funkciintaj longe, neniam plene malaperas. (Ekzemple ĉaroj tirataj de ĉevaloj kaj rajdado postvivas kiel sportoj en la epoko de aŭtomobiloj.)

La parolo, sendependiĝanta disde skribo, ”inundos ĉion”. En la orelojn de la homoj konstante krios kaj flustros ”diskoj, magnetofonbendoj kaj parolantaj bildoj”, diras Flusser (1989: 55-56)<sup>16</sup>. Li trovas, ke la forfalo de tiu kontrolo, kiu estas skribo, nepre kondukos al plena barbariĝo de la lingvo.

Flusser verŝajne pravas, ja senskriba lingvo necese devas perdi tiujn ecojn, kiujn ĝi ricevis de skribo – fakte ecojn, kiujn skribo *trudis* al ĝi. Tiuj ecoj antaŭ ĉio estas akustika kaj semantika konturitecoj, kiujn neprigis la skriba uzo kaj nurnure tio. McLuhan diras, ke ”preso” – t. e. la vaste aplikata skribo – ”ŝanĝis ne nur la ortografion kaj la gramatikon, sed ankaŭ la prononcadon kaj la deklinaciojn/konjugaciojn de la lingvoj, kaj faris ebla gramatikan eraron” (McLuhan 1962: 231)<sup>17</sup>. En postlitereco la eblo de gramatikaj eraroj denove malaperas: kiel komencon de la malapera procezo oni povas preni la elastiĝon de la lingvaj reguloj kaj la ampleksiĝon de la lingva toleremo.

Skribo fiksas kaj materie objektigas la lingvon, kaj preso siavice plie emfazas tiun fiksatecon kaj objektecon. Tio klarigas, ke skribe fiksita teksto fariĝis la bazo de la humanecaj sciencoj. Per la uzo de komputiloj por skribo, teksto perdas la materian objektecon, kaj leziĝas ankaŭ ĝia fikseco.<sup>18</sup> Prese publikigita teksto restas konstanta, al kiu eblas referenci eĉ el la tempa distanco de jarcentoj, dum rete publikigita teksto povas ŝanĝiĝi eĉ ĉiutage: la aŭtoro povas daŭre korekti, plibonigi, eĉ reverki sian tekston. Tiu eblo unuflanke estas gajno por la scienco, aliflanke la perdiĝo de la konstanteco komplete renversas la ĝisnunan ordon de la funkciado de la scienca vivo. Vere bona solvo

---

<sup>16</sup> ”Schallplatten, Tonbänder und sprechende Bilder werden die Gesellschaft anschreien und ihr zuflüstern.”

<sup>17</sup> “[...] print altered not only the spelling and grammar but the accentuation and inflection of languages, and made bad grammar possible”.

<sup>18</sup> Komparu J. C. Nyiri: The Humanities in the Age of Post-Literacy.  
<http://www.uniworld.hu/nyiri/muenster/m-text.htm>

de tiu dilemo verŝajne ne ekzistas. La avantaĝoj de la publikigo en *la reto* estas tiel multnombraj – minimuma mona investo, teknika simpl-eco, facila, konstanta kaj preskaŭ senpaga alireblo por ĉiuj potencialaj konsumantoj de la teksto –, ke malfacilas imagi alian solvon, ol adaptiĝon de la mekanismoj kaj principoj de la funkciado de la scienca vivo al la nova teknologio.

### **De unumedieco al multmedieco: hiperteksto**

La ordinara ekzistofomo de la elektronika teksto – hiperteksto – ebligas proksimiĝon de la skribita teksto al la multmedieco de la senpera homa komunikado. Unue tial, ĉar hiperteksto povas enteni ligilojn [‘links’] al aliaj tekstoj, kaj tiamaniere malpliigis la severa unudimensia liniigiteco de la skribita teksto. Sed plie gravas, ke tiuj kontaktigoj povas rilati ankaŭ al bildoj – inkluzive al movbildoj – kaj sonoj, kreante tiel *efektivan* multmediecon. Skribita teksto *virtuale* ja ĉiam estis multimedia: ekzemple bona literatura teksto ĉiam celis kaj povis krei iluzion de sensaĵoj en ĉiuj sensiloj de la leganto. En la nuna momento tiel ŝajnas, ke la tipa estonta formo de teksto estos hiperteksto (dum kompreneble plimultiĝos kaj plivastiĝos la aplikado de la senteksta komunikado).

Hiperteksto estas la formo de la transvivo de teksto, sed oni ne rajtas preteratenti, ke tiu transvivo kostas cedeojn kaj kompromisojn. Teksto, kiu en la epoko de la preskulturo – ĝis la disvolviĝo de ikona turno – estis praktike la ekskluziva portanto de komunikaĵoj, devas cedi el sia monopola pozicio, kaj kontentiĝi je la portado de ties duono-triono. Estas probable, ke eĉ tiu proporcio malkreskos kun la ampleksiĝo, fajniĝo kaj simpliĝo de la teknikaj ebloj pri elektronika manipulado de bildoj kaj sonoj. Kaj ne malfacilas antaŭdiri, ke tiuj teknikaj ebloj certe ampleksiĝos, fajniĝos kaj simpliĝos.

### **Ŝrumpo de skribo kaj lingvo ŝrumpigas pensadon**

Ŝajnas do tiel, ke la pozicioperdo de skribo – kaj ankaŭ de lingvo – estas neevitebla. Restas nur la demando, kiel ĉio ĉi efikos al la homa pensado kaj entute al la homa penskapablo? Pli precize formulante la



demandon: ĉu la homa penskapablo povus transvivi, se la lingvo elglitus el sub ĝi?

Ekzistas ankaŭ jesaj respondoj al tiu ĉi demando. Flusser ekzemple skribas jene: "[...] eliro el la skribo eblas al du direktoj: ĉu retro al la bildoj, ĉu antaŭen al la nombroj"<sup>19</sup> (Flusser 1989: 159). Aliloke li eksplikas iom pli: "Post kiam oni superis la alfabeton, pensado sendependiĝos disde la parolo, kaj aliaj, ne-lingvaj pensmanieroj (matematika, bilda kaj ia supozeble tute nova) komencos nekredeble evolui"<sup>20</sup> (Flusser 1989: 65).

Tio ŝajnas almenaŭ dubinda, ĉar prezentante la procedon per la elementoj de **Figuro 2**, ĉio ĉi signifus, ke cirklo "C" – reprezentanto de la parolo – plene malaperus, kaj restus nur cirklo "A" (kiu entenas konscienhavojn senskarakterajn), kaj cirklo "B" (kiu entenas konceptojn). La enhaverojn de cirklo "A" oni komunikus per ikonaj signoj (antaŭ ĉio per bildoj), la enhaverojn de cirklo "B" ĉefe per numer-kodoj. Ankaŭ nuntempe ni ofte faras tiel, sed nuntempe emfaze ĉeestas lingvo, kiu kapablas integri tiujn du (en si mem antagonisme diferencajn) pensmanierojn, certigante ilian daŭran interferencon, kaj per tio plenecon, kompleksecon de la homa estado. La malapero de la "hibridkaraktera" lingvo (hipotezante la samtempan paralelan pluvivadon de la sensbazita kaj koncepta pensmanieroj) kondukus al ia speco de *kogna, sensa kaj komunikada skizofrenio*. Tio rezultigus radikalan spiritan ŝanĝiĝon de la homo.

Estas tamen pli ol dubinde, ĉu cirklo "B" povus plu ekzisti post la malapero de la lingvo, kiun reprezentas cirklo "C"? Laŭ niaj nunaj scioj certe ne, ja la formadon de konceptoj – t. e. la reduktadon de la sensbazaj konscienhavo – eldevigis ĝuste la lingvo per sia neperfekteco. Kiel pli frue jam estis aludite, cirklo "C" ekestis pli frue, ol cirklo "B" – tiu ĉi lasta ŝuldas sian ekziston ĝuste al cirklo "C". Komence ili du kreskis samritme kaj samgrande, kaj nur post la apero de koncipa

---

<sup>19</sup> "[...] es im Grunde nur zwei Ausbruchsrichtungen aus der Schrift gibt: zurück zum Bild oder vorwärts zu den Zahlen."

<sup>20</sup> "Beim Überholen des Alphabets wird sich das Denken vom Sprechen emanzipieren, andere nicht-sprachliche Denkart (mathematische und bildnerische, vermutlich auch völlig neue) werden zu noch ungeahnter Entfaltung kommen."

skriblingveco la ampleksiĝo de cirklo "B" rapidiĝis, rezulte de kio ĝi "elkreskis" el sub cirklo "C". Metaforece oni povus diri ke koncepta pensado estas "floro de la lingvo".

Kompreneble estus malfacile imagi la abruptan malaperon de cirklo "C", t. e. malaperon de la lingvo. Pri lingvoj nenio okazas abrupte. Sed iom post ioman malriĉiĝon, erodiĝon de la lingvoj oni daŭre spertas. La cirklo "C" komencis ŝrumpi. Kaj ni ne havas kaŭzon supozi, ke la itinero de eventuale disvolviĝanta *regresa procedo* diferencus disde la itinero, kiun trapasis la *progresas procedo* en la pasinteco. Kaj se estas tiel, tiukaze la ŝrumpo de cirklo "C" devas rezultigi almenaŭ samproportcian malkreskon de cirklo "B", kaj fine de la procedo nepra postsekvo de la (probable neniam plena) malapero de cirklo "C" estus la (same neniam plena) malapero de cirklo "B".

Bildoj estas pli komfortaj kaj pli oportunaj komunikiloj ol la segmentaj lingvaj rimedoj: la vortoj. Kaj ekzemploj pravas, ke pli komforta kaj oportuna komunikilo povas elpoziciigi la malpli komfortan kaj oportunan. Tiel la segmenta lingva rimedaro post la invento de la skribo preskaŭ komplete elpoziciigis supersegmentajn lingvajn rimedojn, kaj lasis pluvivi nur triagradajn, akompanajn funkciojn el la iam riĉaj gestolingvoj. Ne estas do nur teoria hipotezaĵo, ke tiagrada elpoziciigo povus okazi ankaŭ al la segmentaj lingvaj rimedoj.

## **Strategio pri komunikteknologioj**

Por eviti katastrofon sur tiu kampo, necesus komunik-strategioj, kiuj donu emfazitan atenton al la komunikadaj teknologioj, kun speciala konsidero de tio, kiel iu difinita teknologio povas efiki al la lingvo kaj ĝia uzado. Per pozitiva diskriminacio oni devas doni avantaĝojn al tiuj teknologioj, kies uzado pozitive efikas al la lingvo.

En la nuna momento tia teknologio estas la skribo. Dum la lastaj jardekoj signife mallongiĝis la renkontodaŭro de homoj kun la semantike diskretigitaj kaj konturitaj skribitaj tekstoj – pli simple dirite, homoj legas grave malpli multe ol antaŭe. Librolegado preskaŭ komplete elfalis el inter la kutimaj formoj de amuzado. Tio ne endanĝerigas la klerecon – kleriĝi oni ja povas ankaŭ sen literoj. Ne-legado

– manko de ripetataj, longdaŭraj kontaktoj kun skriba teksto – inside, nerimarkeble erodas la nuancitan pensokapablon. Tial relojigo de librolegado inter la amuzformoj povus esti la unua utila celo de efika komunikstrategio.

## Referencita literaturo

- Bloomfield, Leonard. 1933. *Language*. New York: Henry Holt and Co.
- Boehm, Gottfried, ed. 1995. *Was ist ein Bild?* 2<sup>nd</sup> ed. München: Wilhelm Fink Verlag.
- Cipolla, Carlo M. 1969. *Literacy and development in the West*. London: Penguin Books.
- Crystal, David. 1997. *The Cambridge Encyclopedia of Language*. 2<sup>nd</sup> ed. Cambridge and New York: Cambridge University Press.
- Flusser, Vilém. 1989. *Die Schrift: hat Schreiben Zukunft?* Zweite, ergänzte Auflage. Göttingen: Immatrix Publications.
- Goody, Jack & Ian Watt. 1968. The consequences of literacy. In Jack Goody, ed., *Literacy in Traditional Societies*. Cambridge: Cambridge University Press. 27-42.
- Haas, William. 1983. Determining a level of a script. In: *Writing in focus*. (Trends in linguistics, Studies & monographs, 24), edited by Florian Coulmas & Konrad Ehlich, pp. 15–29. Berlin: Mouton.
- Havelock, Eric A. 1982. *The Literate Revolution in Greece and Its Cultural Consequences*. Princeton: Princeton University Press.
- Ivins, William M. Jr 1953. *Prints and Visual Communication*. Cambridge: Harvard University Press.
- Jakobson, Roman (with P. Bogatyrev). 1966. Die Folklore als eine besondere Form des Schaffens. In *Selected Writings IV. Slavic Epic Studies*. The Hague & Paris: Mouton. 1-15.
- Koch, Peter & Wulf Osterreicher. 1994. Schriftlichkeit und Sprache. In Hartmut Günther & Otto Ludwig, ed. *Schrift und Schriftlichkeit — Writing and Its Use. Ein interdisziplinäres Handbuch internationaler Forschung / An Interdisciplinary Handbook of International Research*. Handbücher zur Sprach- und Kommu-

- nikationswissenschaft. Herausgeben von Hugo Steger, Herbert Enst Wiegand. Band 10.1. Berlin & New York: Walter de Gruyter. 587-604.
- Martinet, André. 1967. *Éléments de linguistique générale*. Paris: Armand Colin.
- McLuhan, Marshall. 1962. *The Gutenberg Galaxy: The Making of Typographic Man*. Toronto: University of Toronto Press.
- McLuhan, Marshall. 1964. *Understanding Media: The Extensions of Man*. New York: McGraw-Hill.
- Mitchell, William J. T. 1994. *Picture Theory: Essays on Verbal and Visual Representation*. Chicago & London: University of Chicago Press.
- Nyíri, Kristóf. 1996. The humanities in the age of post-literacy. *Budapest Review of Books*, 6/3: 110-116.
- Nyíri, Kristóf. 2001. The picture theory of reason. In Berit Brogaard & Barry Smith, eds. *Rationality and Irrationality*. Wien: öbv-hpt. 242-266.
- Nyíri, Kristóf. 2002. Post-literacy as a source of twentieth-century philosophy. *Synthese* 2: 185-199.
- Ong, Walter J. 1967. *The Presence of the Word. Some Prolegomena for Cultural and Religious History*. New Haven & London: Yale University Press.
- Ong, Walter J. 1977. *The Interfaces of the Word. Studies in the Evolution of Consciousness and Culture*. Ithaca & London: Cornell University Press.
- Ong, Walter J. 1982. *Orality and Literacy: The Technologizing of the Word*. London: Methuen.
- Polanyi, Michael. 1958. *Personal Knowledge: Towards a Post-Critical Philosophy*. London: Routledge & Kegan Paul.
- Vigotszkij, Lev Szemjonovics 2000. *Gondolkodás és beszéd*. Fordította Páll Erna és dr. Tóth Tiborné. Utószó: Benczik Vilmos. Budapest: Trezor Kiadó.

# ĈAPITRO EL LA HISTORIO DE LA KOMUNIKADO: ”LA REVOLUCIO DE VOĈO”\*

## 1. La loko de sono kaj voĉo inter la sensoj

Por la moderna homo depost la tempo de Johano Gutenberg la plej grava sensorgano estas la okuloj: per la termino de Marshall McLuhan li vivas en *vid-spaco*, kontraste al siaj antaŭuloj, kiuj vivis en *aŭda-tuŝa spaco*. La tezon de McLuhan subtenas pluraj spertoj: interalie ekzemple tio, ke en la antikva epoko blindeco ne estis rigardata kiel plago por la homo. Male, blindeco ofte estis rigardata organika akompananto de esceptaj kapabloj: blindulo estis Homero mem, la poeto de l’ poetoj, kaj ankaŭ la mitaj aŭguristoj, ordinare nomataj *Theiresias*. La fenomeno implicas supozon, laŭ kiu vido nur konfuzas la homon: per vido oni perceptas amason da sensignifaj aferoj, kiuj malhelpas koncentriĝi al la vere gravaj, esencaj.

Ong faras la sekvan skalon de sensoj, kie → signas la pliiĝantan fizikan distancon de la sensanto al la sensata objekto (Ong 1977: 136):

*tuŝado* → *gustumado* → *flarado* → *aŭdado* → *vidado*

Li diras krome ke → signas ankaŭ pliiĝantan abstraktecon, formaligon, objektecon, kaj krome proksimiĝon al idealismo, forŝirita disde la aktuala ekzistado.

Oni povas grandparte konsenti pri liaj konstatoj, kiel ankaŭ diskuti pri ili; tamen, en tiu skalo surprize okulfrapas tio, ke tiuj du sensoj, kiujn McLuhan nomas bazaj por la homo de la antaŭskriba/presa epoko, troviĝas je signifa distanco unu de la alia. La kontraŭdiro povas malaperi tiel, se ni konscias, ke la mezaj tri sensoj – *gustumado*, *flarado*, *aŭdado* – fakte estas koncepteblaj kiel *specialaj kazoj de tuŝado*. Ja en la kazoj de gustumo kaj flaro baze okazas tute la samo kiel ĉe tuŝado: la fizika renkontiĝo de la sensanto kun la sensata objekto. La diferenco kuŝas en tio, ke dum tuŝado povas realiĝi egale

---

\* Skriba versio de prelego farita en Fortaleza (Brazilo) en Internacia Kongresa Universitato dum la 87a Universala Kongreso de Esperanto. Unua skriba apero en McCoy, Roy (red.) (2002): *Internacia Kongresa Universitato, Fortalezo, Brazilo, 3–10 aŭgusto 2002*. Rotterdam-Fortaleza, p. 35–45.

koncerne solidan, likvan kaj (en difinitaj kazoj) gasan objekton, gustumado povas realiĝi nur koncerne likvan, flarado nur koncerne gasan objekton.

Ĉe aŭdado la afero staras iom difference, ja la aŭdorgano ne renkontiĝas fizike kun la fonto de la aŭdata sono aŭ voĉo. Sono kaj voĉo – kontraste al la objektoj de tuŝado, gustumado kaj flarado – ne estas materio, sed *vibrado* de materio, kiun peras la aero al la timpana membrano de la aŭdanto. La timpanan membranon do atingas tipa tuŝosensaĵo: variiganta *premo* (alia speco de tuŝosensaĵoj estas sensado de temperaturo). Sekve aŭdado – malgraŭ la ŝajno – eĉ plie ol gustumado kaj flarado koncepteblas kiel *speciala formo de tuŝado*. Tion konfirmas ankaŭ la ĉiutagaj spertoj: tro laŭtaj aŭ akraj sonoj elvokas dolorsenton similan al tiu, kiun elvokas bato aŭ piko.

Tiu ĉi supraĵa superrigardo eble tamen povas konvinki nin, ke la kvin klasikaj sensoj povas esti klasifikeblaj je du grupoj, el kiuj unu estas tiu de *tuŝospecaj sensoj* (tuŝado, gustumado, flarado kaj aŭdado), la alia – tute diferenca – *vidado*. La kunligiĝon de tiuj du grupoj tre interese formulis antaŭ pluraj centoj da jaroj George Berkeley, kiu – en sia *Traktaĵo pri la principoj de la homa scio* – diras ke vidado estas signalo por tuŝado, krome ke ”...la ideoj de vidado formas tiun lingvon, per kiu la Reganta Sipirito, de kiu ni dependas, anticipe informas nin pri tio, kiajn tuŝ-ideojn li enstamos en nin en la kazo, se ni faros certajn movojn per nia korpo<sup>1</sup>”.

Revenante al sono kaj voĉo, necesas noti ĉi tie iliajn bazajn trajtojn, nome:

- ĝi ekzistas nur en tempo, kaj nur dum ĝi estas produktata<sup>2</sup>
- ĝi estas fenomeno dinamisma, ĉar ĝia ekzisto eblas nur per produktita agado; voĉo tial neprigas la ĉeeston de vivulo
- ĝia efikcirklo en la spaco estas limigita<sup>3</sup>.

---

<sup>1</sup> [...] visible Ideas are the Language whereby the governing Spirit, on whom we depend, informs us what tangible Ideas he is about to imprint upon us, in case we excite this or that Motion in our own Bodies (Berkeley 1710: 23).

<sup>2</sup> Tion, ke ekster la tempo sono kaj voĉo ne ekzistas, pruvas la fakto, ke, se oni haltigas magnetofonon, oni aŭdos nur silenton, dum ekzemple haltigita filmprojekciilo prezentas statikan bildon.

<sup>3</sup> Aristotelo skribis, ke la limoj de la antikva greka urbo estis tie, ĝis kie aŭdeblis la voĉo de la heroldo.

## 2. Voĉo kiel baza paradigmo de sono

Hindoeŭropaj lingvoj – kiel ankaŭ Esperanto – klare apartigas *voĉon* kaj *sonon*. Tion tamen ne faras ĉiuj lingvoj: ekzemple la hungara vorto *hang* povas signifi kaj sonon, kaj voĉon. Kiam la kunteksto ne klare orientas, por esprimi la signifon *voĉo* oni devas aldoni la epiteton *homa*.

Male al la hungara semantiko, kiu malhavas precizan vorton por *voĉo*, voĉo ordinare estas rigardata de la homo kiel *baza paradigmo de sono*.<sup>4</sup> Kaj en tiu senco voĉo kvazaŭ estas ĉefa manifestiĝo de la homa ĉeesto.

## 3. La du signoniveleoj de voĉo: kontinua kaj diskreta

La baza formo de la interhoma komunikado estas la senpera parola komunikado. Ĝi okazas en tri signoniveleoj, kiuj estas la jenaj: 1. segmentaj lingvaj rimedoj (la vortoj mem) 2. supersegmentaj lingvaj rimedoj (tono, tembro ktp.) 3. eksterlingvaj komunikadaj rimedoj (gestoj, grimacoj ktp.). El la tri niveleoj la unuaj du estas lingvaj, kaj samtempe voĉaj.

Segmentaj lingvaj rimedoj estas vortoj, konsistigitaj de parolsonoj, kiuj estas diskretaj signoj. Ili povas esti adekvate reprezentataj per digita kodo, t. e. literoj.<sup>5</sup>

Supersegmentaj lingvaj rimedoj estas tono, tembro, rapideco, laŭteco ktp. de la parolo. Eĉ la plej senkolora parolo havas ian tonon: fakte supersegmenta lingva rimedaro donas la kadron, en kiu realiĝas la prononcado de vortoj. Supersegmentaj lingvaj rimedoj krome tiel same portas signifojn, kiel la segmentaj rimedoj. Ekzistas amaso da eksperimentoj pri tio, ke bona aktoro prononcas 20-30-maniere

---

<sup>4</sup> "...voice, [...] being the paradigm of all sound for man, sound itself of itself suggests presence. Voice is not inhabited by presence as by something added: it simply conveys presence as nothing else does." "Voice is not peopled with presence. It itself is the manifestation of presence..." (Ong 1967: 114, 168)

<sup>5</sup> Necesas rimarkigi, ke ankaŭ vortoj ne estas pure diskretaj signoj, la apudestantaj parolsonoj ja multilate efikas unu al la alia, kaj ĝuste la kontinua prononcado de la vortoj havas karakteron de *kontinuaĵ signoj*: ekzemple la vorto *seniĝis* ne estas simpla sumo de s+e+n+i+ĝ-+i+s. Literiskribaj sistemoj tamen havas pure diskretajn signojn, ĉar ili ignoras la kontinuaĵajn signojn de la prononcataj vortoj; ili notas ne parolsonojn, sed fonemojn, abstraktitajn el la parolsonoj.

simplan frazon (ekz. "Estas oka horo."), atribuante diversajn signifojn al la apartaj prononcm manieroj, kaj la aŭdantoj kun 70-80 procenta certeco rekonas tiujn atribuitajn signifojn. La signifoportan kapablon de la supersegmentaj lingvaj rimedoj pruvas tiu sperto, ke en la kazo, se la signifo de la segmentaj lingvaj rimedoj kontraŭdiras al tiu de la supersegmentaj lingvaj rimedoj, la aŭdanto preferas kredi al la lasta. (Ekz. la frazeto "Vi estas tre afabla!" prononcata per minaca tono ordinare vekas en la aŭdanto senton de minacateco kaj ne tiun de laŭdateco.)

Supersegmentaj lingvaj rimedoj estas kontinuaj signoj, kaj ili povus esti adekvate reprezentataj nur per analoga kodo. La pure digita literiskriba sistemo – kun malmultaj esceptoj, kiel *demandosigno* kaj *krisigno* – plene malkapablas registri supersegmentajn lingvaj rimedojn. Pro tio ne maloftas la erara supozo, laŭ kiu supersegmentaj rimedoj estas ne estas parto de la lingvo, sed ili kvazaŭ deekstere servas ĝin<sup>6</sup>.

#### 4. La sankteco kaj magio de sono kaj voĉo

La naturo ankaŭ sen homo ne mutas, oni povus eĉ diri, ke "*In principio erat sonus.*". Rabindranath Tagore pri tio skribis jene: "En la komenco la Kreado ekvoĉis per la lingvo de l' akvoj, per la sonoj de l' vento." Unue imitante, poste superante la naturon, la homo jam ekde la plej fruaj tempoj trovis plezuron en produktado de sonoj, precipe de ritmaj sonoj. Tiucele li eĉ kreis ilojn. Li atribuis magian forton al la sonoj, pri tio atestas pluraj mitoj. Ekzemple tiun de Amfiono, kies liuta ludo devigis la ŝtonojn metiĝi unu sur la alian, kaj formiĝi je muro ĉirkaŭ Tebo. Miraklajn reagojn elvokis ankaŭ la muzikludado de Väinämöinen en la finna epopeo Kalevala.

Amfiono per la sonoj de sia liuto konstruis muron, male la muroj de Jeriĥo en la Biblio ĝuste falis kaŭze de krioj. La Sinjoro donis la jenan instrukcion al la judoj: "Kaj kiam oni ektrumpetos per la jubilea korno kaj vi ekaŭdos la sonadon de la trumpeto, tiam la tuta popolo ekkriu per laŭta voĉo; kaj la muro de la urbo falos malsupren..."

---

<sup>6</sup> 'a half-tamed servant of language' (Bolinger 1972)



(Josuo 6.5) Kaj tiel efektive okazis. Estas notinde, ke la muroj de Jeriĥo falis ne pro la trumpetsono, sed pro la laŭtkria voĉo de la popolo.

Se oni atribuis magian forton al sono, eĉ pli firme tion oni faris koncerne la homan voĉon. La komunikcelan uzon de la voĉo – kiel skribas tion Ferdinand de Saussure en sia *Kurso de ĝenerala lingvistiko* – iasence trudiĝis al ni la naturo<sup>7</sup>: principe ja la homa komunikado povus disvolviĝi ankŭ per gestoj aŭ bildoj. Tamen la homa komunikado disvolviĝis surbaze de la voĉo, kiu estas produkto de nia korpo, ĝi eliĝas el ni mem por atingi sia celon en la korpo (t. e. en la orelo) de alia homo; la voĉo tiamaniere kvazaŭ entenas la sanktecon de la vivo, kaj tial nia sinteno al ĝi estas pli intima – certgrade eĉ magia –, ol ekzemple al niaj gestoj. Estas natura fenomeno, ke tiu intima rilato ampleksiĝis ankaŭ al la voĉe portata vorto, kaj tiel siavice ankaŭ la eldirita vorto alprenis sanktecan karakteron.

La sankteco de la voĉo kaj vorto pliiĝas, se ne videblas la fonto de la voĉo, t. e. homo.<sup>8</sup> Tiel eksonis orakoloj en la templo de Apolono en Delfoj, kaj tiel ekparolis la Sinjoro en la Biblio: ”Kaj la Eternulo parolis al vi meze de la fajro; la voĉon de la vortoj vi aŭdis, sed figuron vi ne vidis, nur voĉon.” ”Gardu do bone viajn animojn: ĉar vi vidis nenian figuron en tiu tago, kiam la Eternulo parolis al vi sur Ĥoreb meze de la fajro”. (Readmono 4.12, 4.15) La senfigura, senkorpa voĉo fariĝis en la plej multaj kulturoj baza paradigmo de la manifestiĝo de transcendaj fortoj.

Apartigo de la voĉo disde ĝia produktanto kaj disde la tempo de la produktado estis ĉiama sopiro de la homoj, ja la sukceso pri tio ŝajnus por ili iel parafrazo de la Kreado. Tiu sama sopiro respeguliĝas en la admiro, kiun homo ĝis nun sentas al la simpla – kaj ekde la fruaj tempoj plene komprenata – fenomeno de *eĥo*, kiu iomete (je kelkaj sekundoj nur) malstrikigas la ligitcon de la ekzisto de voĉo al la tempo de la produktado. Tiun saman sopiron oni povas rekoni krome en la parolinstruado de birdoj aŭ en la ventroparolado. Dum la historio

---

<sup>7</sup> ”il nous étaient bien en quelque sorte imposés par la nature” (Saussure 2005: 26)

<sup>8</sup> ”Sound of itself generates a sense of mystery...” (Ong 1967: 163)

ekzistis multaj provoj konstrui parolmaŝinon, eble la plej konata el ili estis tiu de la hungaro Farkas Kempelen fine de la 18a jarcento. La nuna parolsintezado, ĉiam pli vaste aplikata, malhavas ajnan magian aspekton, ĝi havas klare praktikajn celojn. La plimulto de la homoj ĉiukaze sentas antipation al la "maŝinvoĉoj" de la telefoncentraloj.

## 5. Senvoĉigo de la universo

La senvoĉigo de la universo<sup>9</sup> komenciĝis antaŭ jarmiloj per la invento de la literaskribo, tamen la procezo ricevis suprenantan elanon nur post la disvastiĝo de la presado, do ekde la 16a jarcento. Pro la elstara loko, kiun la milionoj da etaj, nigraj literoj elbatalis por si en la homa vivo, la pli frua, akustika sintezo de la mondo tute perdis sian allogan forton. Homoj – per la terminoj de McLuhan – paŝis el la pli frua "aŭda-tuŝa spaco" en la preskaŭ ekskluzive "vidan spacon" de la Gutenberga epoko. La senvoĉigo ne limiĝis al la Tero, sed etendiĝis al la tuta universo: la "harmonio de la sferoj" – organika parto de la kosmo, skizita de la tradicia pensmaniero de la senskribaj socioj – tute perdis sian signifon en la nova mondo, fasonita de la Neŭtona fiziko.

Skribo elŝiris la homan lingvon el ĝia origina kaj natura ligiteco al la voĉo. Lingvo, kiu pli frue estis neimagebla sen voĉo, ekde nun povas ekzisti senvoĉe, en skriba formo, eĉ se nenature kaj nekomplete. Kompletecon lingvo perdas en skriba formo pro la malhavo de la kontinua signaro.

Kulmina punkto de la senvoĉiga procezo estis la plena silentiĝo de legado, kiu okazis fine de la 18a jarcento. Pli frue – ekzemple en la antikveco – homoj ankaŭ por si mem legis laŭte: skribo servis kvazaŭ nur memorigi pri la prononcendaj sonoj. Silenta legado kompreneble estis renkontebla ankaŭ pli frue, sed ĝi estis fenomeno escepta, admirata. La ĝeneralan silentiĝon de la legado diktis antaŭ ĉio la kresko de la legeblaj tekstoj post la invento de la presado, kaj tiel montriĝis bezono por la pliigo de la rapideco de legado: silenta legado estas almenaŭ kvinoble pli rapida, ol laŭta. Evidente havis rolon en la silentiĝo ankaŭ la ĝenerala strebo al ŝparado pri la homa forto: laŭta

---

<sup>9</sup> Esprimo de Ong: 'devocalization of the universe' (Ong 1967: 72).

legado forprenas de la leganto ne malmultan energion. Je la fino de la 18a jarcento elformiĝis tia situacio, ke ĝuste la tekstoj, rigardataj plej valoraj, estis kreitaj skribe-silente, kaj konsumitaj lege-silente. La plimulto el tiuj tekstoj neniam alprenis voĉan formon.

## 6. Revolucio de la virtuala voĉo

Tia situacio evidente estis kulmine nenatura, artefarita, sed ĝi bone kongruis kun la principaro de la raciismo de la 18a jarcento. La situacion ŝanĝis la apero de romantikismo, kiu remalkovris la valorojn de la parola lingvo. Oni komencas kolekti popolan poezion, kaj la ekkonsciiĝon pri la graveco de voĉo atestas interalie la fakto, ke la popolpoezia kolekto de Johann Gottfried Herder, kiu en 1778/79 aperas kun la titolo *Volkslieder* ('Popolkantoj'), en posta eldono de 1808 ricevas la titolon *Stimmen der Völker in Liedern* ('Voĉoj de popoloj en kantoj'). La rehonoriĝon de la parola lingvo ekzempligas ankaŭ Wordsworth és Coleridge, kiuj en la antaŭparolo de sia *Lirikaj baladoj* (1799) skribas pri tio, ke ili eksperimente provas, kiel la *konversacia lingvo* de la mezaj kaj subaj sociaj klasoj povas funkcii kiel iloj de poezia esprimado.<sup>10</sup>

En tiu ĉi epoko establiĝis en la Eŭropa kulturo tiu koncepto, laŭ kiu beletro estas io parola, io voĉa. La fenomeno estas ja certgrade paradoksa: dum literaturo ĉiam pli kreiĝas skribe-silente, kaj konsumiĝas lege-silente, la verkistoj – kaj ne nur poetoj, sed ankaŭ prozistoj – komencas aparte zorgi pri la akustika arkitekturo de la frazoj kaj alineoj en sia teksto. La rusa literaturkritikisto Boris Eĵhenbaum en sia fama studo "Kiel verkiĝis la *Mantelo* de Gogol?" priskribas, kiel multe influis la verkadon de Gogol la sonado de la vortoj. La franca verkisto Balzac en la antaŭparolo al sia romano *Les chouans* skribas pri tio, ke li volus restarigi la kutimon de la akustika legado. Evidente li ne celas tion, ke oni legu laŭte plurcentpaĝajn romanojn, li trovas dezirinde nur, ke la leganto interne, virtuale voĉigu tion, kion li le-

---

<sup>10</sup> "The majority of the following poems are to be considered as experiments. They were written chiefly with a view to ascertain how far the *language of conversation* in the middle and lower classes of society is adapted to the purposes of poetic pleasure."

gas.<sup>11</sup> La apero de la virtuala voĉo en la beletraj tekstoj donas la bazon de unu el la ĉefaj kriterioj de literatura valoro, laŭ kiu kriterio en literatura teksto la signifanto kaj signifato estas egale gravaj.<sup>12</sup> Tiu virtuala reapero de la lingva akustiko en la beletraj tekstoj<sup>13</sup> kvazaŭ antaŭpreparis tion, ke ankaŭ la reala voĉo reakiru en la homa komunikado tiun lokon, kiun ĝi perdis pro la vasta aplikado de skribo.

## 7. Revolucio de la reala voĉo

Skribo akiris privilegian lokon en la homa komunikado dank' al tio, ke ĝi estas libera je tiuj striktaj tempaj kaj spacaj limoj, kiujn ja havas la homa voĉo. La malavantaĝoj de skribo – la teknologia karaktero/artefariteco kaj nekompleteco koncerne iujn lingvajn rimedojn – montriĝis malpli gravaj kompare al la avantaĝoj: la sendependiĝo de la lingva komunikado disde la tempo kaj la spaco.

Tian sendependecon atingas ankaŭ la homa voĉo per du sinsekvaj inventoj en la jaro 1875 kaj 1877. En varma junia posttagmezo de 1875 en Bostono junulo nomata Alexander Graham Bell sukcesis per kablo plusendi la sonon de bato de horloĝo. Post du jaroj kaj duono, la 6an de decembro 1877 Edison registras unuafoje en la historio homan voĉon – sur cilindro kovrita per stanfolio. La frazo tekstis jene: *Mary had a little lamb*. ("Maria havis ŝafideton.") La germandevena kunlaboranto de Edison, John Kruesi aŭdinte la registritan voĉon, ekkriis: *Gott in Himmel!* ("Dio en la ĉielo!") (Casson 1910: 12–14). La kunlaboranto ne eraris, efektive okazis miraklo, same kiel ankaŭ du jarojn antaŭe en Bostono. Estas notinde, ke tiujn du inventojn antaŭ-

<sup>11</sup> Tio kompreneble implicas la postulon, ke la skribitaj tekstoj ne tro diferencu disde la parola lingvouzo. Ja virtuale voĉigi eblas nur tion, por kio en la memoro troviĝas sonskemoj, abstraktitaj el la aŭditaj komunikaĵoj.

<sup>12</sup> "... con la voz, o su ilusión, se restablece la unidad del significante y del significado..." (Marcone 1997: 9)

<sup>13</sup> La poststrukturisma literatura kritiko ofte plendas pro la "fonocentrismo" sinteno, kiu kvazaŭ ignoras la fakton, ke la literaturaj tekstoj de nia epoko kreigas *skribe*. La pravecon de tiu plendo dubigas, ke la virtuala akustikeco ŝajnas pluvivi ankaŭ en la postmodernaj tekstoj. Basilio Losada, hispana tradukanto de la portugala verkisto José Saramago skribas, ke la malfacilo kompreni la tekston de Saramago tuj malaperas, kiam oni legas la tekston laŭte. ("Penetré, como los *seringueiros* de la Amazonía, en la maraña aparentemente complicada de la sintaxis de Saramago. Hasta que me di cuenta de que la voz clarificaba cualquier aparente dificultad. Entendí que una página de Saramago hay que leerla en voz alta.") (Losada)

vidis neniuj utopioj, neniaj sciencaj revadoj; antaŭvidis ilin eĉ ne Jules Verne, kiu en siaj romanoj priskribis amason da postaj teknikaj inventoj. Verŝajne eĉ la plej aŭdacaj revantoj trovis tro fantazia tiaspecan liberigon de la voĉo el ĝiaj tempaj kaj spacaj katenoj.

Tamen la telefono de Bell venkis la spacajn limojn de la homa voĉo, la fonografo de Edison faris la samon pri la tempaj limoj, kiel ajn fantazia tio ŝajnis pli frue. Tiuj du inventoj – kaj iliaj postaj derivaĵoj, kiel radio, magnetofono ktp. – komplete restrukturis la homan komunikadon, kaj inaŭguris novan komunikhistorian epokon, kiun per la termino de Ong oni nomas *sekundara parollingveco* ('secondary orality').<sup>14</sup>

Kiel jam dirite, ĝis la apero de la supraj inventoj voĉo kvazaŭ kunfandiĝis kun sia produktanto, tiel ĉirkaŭ la voĉo firmiĝis ia sankta aŭreolo de la vivo. Per la du inventoj tiu aŭreolo malaperis por ĉiam, ja tiuj inventoj disŝiris la organikajn ligojn kiuj ekzistis inter komunikaĵo kaj la komunikanta homo. Io simila okazis jam ĉe la ekapliko de skribo, tamen nun la ŝoko estis pli granda: skribon ĉiam oni sentis nura lernita teknologio, dum voĉo estas la produkto de nia korpo. Voĉo do profaniĝis – tamen tio estis la prezo, kiun necesis pagi por la vastigo de ĝia efikpovo.

## 8. Lingvo fariĝas memstara komunika kanalo

La du inventoj havis enormajn konsekvencojn ankaŭ por la homa lingvo. Oni konsciu, ke lingvo nur dank' al la telefono fariĝas memstara komunika kanalo: en telefona parolado oni ja uzas ambaŭ lingvajn dimensiojn – kaj tiun de la segmentaj lingvaj signoj, kaj tiun de la supersegmentaj –, dum eksterlingvaj signoj preskaŭ tute ne estas uzataj.<sup>15</sup> En la senpera parola komunikado partoprenas ja amaso da eksterlingvaj komunikaj rimedoj – ilia proporcio en leĝera komunikado laŭ Albert Mehrabian povas atingi eĉ 55 procentojn. (Li trovas, ke la supersegmentaj lingvaj rimedoj ampleksas 38 procentojn, kaj la

---

<sup>14</sup> La terminon unuafoje li uzis en la studo *The Literate Orality of Popular Culture Today*, aperinta en la jaro 1971.

<sup>15</sup> Tamen teorie povas esti uzataj voĉaj/sonaj eksterlingvaj signoj, kiel tusetoj, klakoj per la lango ktp., sed la nombro de tiaj signoj estas tre malgranda.

segmentaj lingvaj rimedoj entute nur 7 procentojn.)<sup>16</sup> Skribo ankaŭ uzas nur lingvajn rimedojn, tamen el tiuj nur la segmentajn lingvajn rimedojn; la supersegmentajn rimedojn – kiel jam menciite – skribo entute malkapablas trakti<sup>17</sup>. Telefona parolado estis la unua tiaspeca formo de komunikado, en kiu la tutan ŝarĝon de la komunikado devis porti lingvo. Tio prezentis grandan defion por la lingvo: necesis ja formuli per lingvaj rimedoj ankaŭ tiajn komunikerojn, kiujn en la senpera homa komunikado ordinare oni esprimas per eksterlingvaj komunikrimedoj, ekzemple per gestoj. Multe pli grandan defion por la lingvo poste prezentis radio, ja ĝi konstante trudis la bezonon al la tie laborantaj homoj formuli lingve aferojn, pli frue neniam formulitajn lingve. (Amason da tiaj taskoj prezentis ekzemple samtempa raporto pri futbalmatĉo.)

Sonregistro eliminis samtempe kaj la spacajn, kaj la tempajn limojn de voĉo, ja registraĵon oni povas transporti kaj aŭskulti en loko, kie la posedanto de la registrita voĉo neniam estis. Kaj oni povas aŭskulti ĝin en ajna tempo, eĉ post la morto de la posedanto de la voĉo – tiu ĉi lasta eblo plej okulfrape demonstras la dispartitiĝon de voĉo kaj homo.

Sonregistro malfermas novan ĉapitron en la historio de la studado de lingvo. Lingva produktaĵo, utiliganta la tuton de la lingva rimedaro (do ankaŭ la supersegmentajn rimedojn), nur per sonregistro povas fariĝi konstanta, senŝanĝe ripetebla, komparebla, reflektebla kaj analizebla. Entute: nur pere de sonregistro povas kreiĝi veraj lingvaj korpusoj, kiuj prezentas eblon por sinteza studo de la tuto de la lingva funkciado.

Skribo kaj sonregistro havas almenaŭ unu gravan komunan trajton: ili ambaŭ kreiĝis por registri lingvan produktaĵon ekzakte tiel, kiel ĝi estis produktita. Skribo rapide aŭtonomiĝis kaj fariĝis sendependa ilo de tekstokreado. Tiu cirkonstanco, ke skribanta homo povas dediĉi

<sup>16</sup> Allan Pease citas tion en sia tre multfoje eldonita fama verko *Body language* ('Korpa lingvo').

<sup>17</sup> Tiun mankon de la literaskribo homoj ĉiam sentis, kaj la historio de skribo plenas je provoj registri intonaciajn elementojn, sed ĉiuj tiuj provoj fiaskis, ĉefe pro du kialoj: 1. La intonacia arsenalo de la lingvo estas neelĉerpeble riĉa, kaj sekve tre malfacile katalogebla. 2. La granda nombro de la enkondukotaj signoj multe malfaciligis skribon; la malavantaĝoj de la enkonduko grave superis la avantaĝojn.

principe senliman tempon al la kreado de difinita teksto, rezultigis skriban kreîĝon de tekstoj tiel kompleksaj, enhavriĉaj, kun optimuma lingva formulado, kiaj per la improviza tekstokreado de la parola lingvouzo neniam povus kreîĝi. La teknika perfektigo de la sonregistraj iloj – antaŭ ĉio la eblo de muntado – alportis ion similan ankaŭ sur la kampo de la voĉataj tekstoj. Ebligis la elsarkado de artikulaciaj aŭ prononceraroj, stumbloj de la voĉo ktp. ĝuste tiel, kiel tio eblas ĉe kreado de skriba teksto. Muntado ebligas senliman perfektigadon de registritaj parolproduktaĵoj, kiu procedo povas rezultigi preskaŭ perfektan parolproduktaĵon, tian, kia reale neniam estis prononcita. La kreîĝo de tiaj materialoj certe efikis tiel same evoluige al la uzo de la akustika rimedaro de la lingvo, kiel skribo efikas evoluige al la segmentaj lingvaj rimedoj.

## **9. Kelkaj aspektoj de la digita revolucio**

Kiel ilo de la storado de la homa scio dum longaj jarmiloj servis skribo, kiu estas pure digita kodo. Per la invento de telefono, sonregistro – kaj fotograŝio – la unuan fojon dum la historio de la homaro analoga kodo enkondukiĝis sur la kampo de la storado kaj movado de la homa scio. Tamen analoga kodo daŭre montriĝis ne tre efika sur la kampo de la retrovo de la scieroj, ja ĝi ne respondas al la Karteziaj postuloj *klare kaj distinge*.

Digita revolucio disvolviĝis sur komputada bazo ekde la 70aj jaroj de la 20a jarcento. Ĝi rezultigis digitecon tute alispecan, ol homo ĝis tiam konis per literaskribo aŭ per muziknotoj. Ja literaskribo kaj muziknotoj distranĉis la kontinuecan tuton je diskretaj signounuoj sufiĉe grandaj por tio, ke homo ankoraŭ rekonu en tiuj diskretaj unuoj la trajtojn de la tuto. La signounuoj devis esti relative grandaj ankaŭ tiucele, por ke la nombro de la signotipoj – literoj, muziknotoj – ne superu la limon, kiun homo ankoraŭ kapablas trakti.

La bazo de komputado estas la kapablo de komputilo trakti samtempe enorme multajn unuojn. Tio ebligas la distranĉadon de la kontinueca tuto je la absolute bazaj diskretaj unuoj, je kapture multaj opozicioj *jes↔ne*. En tiuj unuoj kompreneble rekoneblas neniuj trajtoj de la tuto: ĉe digitaj sonregistraĵoj kaj digitigitaj bildoj digiteco ĉeestas nur

kiel storada tekniko, por la uzanto la storitaj materialoj aperas en sia kontinua tuteca formo. Tiamaniere kreigas la paradoksa situacio, ke la digita revolucio kreas ĝuste la impreson de la triumfado de la analogaj kodoj. Dum la digiteco de la literskribita teksto estas alirebla por la homo, tiu de la digitaj sonregistraĵoj kaj bildoj efektive ne alireblas. Uzante la komputilan teknikon oni povas en teksto trovi difinitajn vortojn, difinitajn literojn, simila elserĉado de karakterizaj konsistigaj sonelementoj aŭ bildelementoj ne eblas, ĉar tiaj elementoj – ankoraŭ trakteblaj fare de homo – eble mem konsistas el specifa kombiniĝo de pluraj milionoj da bazaj opozicioj *jes↔ne*. Dum literskribo kaj muziknotoj helpas al la homo kompreni kaj influi la internan mekanismon de la funkciado de lingvo kaj muziko, la komputila absolutigo de digitigo ĝuste kaŝas tion de antaŭ la homaj okuloj.

#### **Referencita literaturo:**

- Berkeley, G. (1710): *A Treatise Concerning The Principles Of Human Knowledge*.  
<http://www.maths.tcd.ie/~dwilkins/Berkeley/HumanKnowledge/1734/HumKno.pdf>,  
 parto XLIV, p. 23.
- Bolinger, Dwight (ed.) (1972): *Around the Edge of Language: Intonation. Selected Readings*. Harmondsworth: Penguin Books.
- Casson Herbert N. (1910): *The History of the Telephone*. Chicago: A. C. McClurg & Co.
- Losada, Basilio: El alentador testimonio de José Saramago  
<http://www.ctv.es/USERS/borobar/saramago.htm>)
- Marcone, Jorge (1997): *La oralidad escrita. Sobre la inscripción literaria del discurso oral*. Lima: Pontificia Universidad Católica del Perú Fondo Editorial.
- Ong, Walter J. (1967): *The Presence of the Word. Some Prolegomena for Cultural and Religious History*. New Haven and London: Yale University Press.
- Ong, Walter J. (1977): "I See What You Say": Sense Analogues for Intellect. In: *Interfaces of the Word. Studies in the Evolution of Consciousness and Culture*, Ithaca: Cornell Univ. Press.
- Saussure, Ferdinand de (2005): *Cours de linguistique générale*. Paris: Payot.



# SKRIBA KAJ VOĈA ESPERANTO\*

## *La Internacia Lingvo en semiotika spegulo*

### 1. Iom pri semiotiko

Semiotiko estas scienco pri signoj. Ĉar ankaŭ lingvo estas signosistemo, fakte ankaŭ lingvistiko estas parto de semiotiko. Lingvistiko ekzamenas lingvon laŭ specifaj kriterioj de la lingva signospeco. Tamen, lingvo estas ekzamenbla ne nur laŭ tiuj specifaj kriterioj, sed ankaŭ laŭ la ĝeneralaj kriterioj de semiotiko. Tia ĝenerala ekzameno povas direkti la atenton al tiaj trajtoj de la ekzamenata lingvo, kiuj povas esti kaŝitaj aŭ ne sufiĉe reliefigantaj ĉe ordinara lingvistika ekzameno.

### 2. Pri signokategorioj

Semiotiko kategorias signojn laŭ pluraj vidpunktoj: ĉi tie ni parolos pri du tiaj dividoj.

2.1. Unu el tiaj kategoriadoj okazas laŭ la rilato inter *signanto* kaj *signato*, t. e. inter la signo mem kaj la afero kiun ĝi signas. Laŭ tiu kategoriado signoj povas esti ĉu *ikonoj*, ĉu *indeksoj*, ĉu *simboloj*. Peirce, kreanto de tiu ĉi kategoriado, atentigis, ke tiuj kategorioj neniam aperas en pura formo: en la realo neniam oni trovas signon, kiu estas nurnure ikono, indico aŭ simbolo, sed nur tiajn, kiuj havas *grandparte* ikonajn (indicaĵajn, simbolaĵajn) trajtojn, sed apud la dominantaj trajtoj ĉiam troveblas ankaŭ dozetoj da trajtoj de la du aliaj kategorioj.

Signojn oni nomas *ikonoj*<sup>1</sup>, kiam signanto *similas* la signaton. Iko-  
no tipe estas fotografiaĵo aŭ desegnaĵo. La deĉifron de ikonoj kutime

---

\* Skriba versio de prelego farita en la Internacia Kongresa Universitato de la 92a Universala Kongreso en Vilnius, 2005. La skriba versio aperis la unuan fojon en Wandel, Amri (red.) (2005): *Internacia Kongresa Universitato 2005*. Rotterdam-Vilnius: Universala Esperanto-Asocio, p. 37–46.

<sup>1</sup> „... I had observed that the most frequently useful division of signs is by trichotomy into firstly Likenesses, or, as I prefer to say, *Icons*, which serve to represent their objects only in so far as they resemble them in themselves; secondly, *Indices*, which represent their objects independently of any resemblance to them, only by virtue of real connections with them, and thirdly *Symbols*, which represent their objects, independently alike of any resemblance or any real connection, because dispositions or factitious habits of their interpreters insure their being so understood.” (Peirce 1998: 460–461)

oni ne bezonas lerni, tamen, necesas konscii pri tio, ke simileco ne estas tiel memevidenta koncepto, kia ĝi aspektas unuavide – ankaŭ tiu koncepto entenas multajn aspektojn de socie kaj kulture difinita arbitreco.

*Indicoj* oni nomas tiun specon de signoj, ĉe kiuj inter signanto kaj signato konstateblas ia koneksa (eble logika) rilato. Indicoj estas ekzemple sagoj – piktogramoj, indikantaj direkton –, aŭ movoj kaj korpoteno de policisto, direktanta trafikon. Indicoj ordinare gajnas sian signifon nur enkadre de ia rilataro. La signifo de indicoj ne estas evidenta, tamen plej ofte divenebla.

*Simboloj* nomiĝas tiuj signoj, ĉe kiuj la rilato inter signanto kaj signato estas arbitra, aŭ alinome: konvencia. La esenco kuŝas en tio, ke inter signanto kaj signato konstateblas nek simileco, nek ajna logike konstatebla interrilato. Lingvaj signoj estas esence simboloj, ja arbitreco de lingvaj signoj estas la bazo de ekzisteblo de diversaj lingvoj. Tamen ankaŭ lingvaj signoj povas havi trajtojn de la aliaj du signokategorioj: kvanton da *ikonaj* trajtoj el ili montras *onomatopeoj*, dum en *pronomoj* eblas malkovri *indicaĵn* trajtojn, ja pronomoj gajnas sian signifon nur en la kunteksto de ia rilataro.

Gravas ankaŭ, ke la kategorio de konkreta signo difiniĝas nur en konkreta kunteksto. Ekzemple foto de aŭtomobilo Rolls Royce povas esti *ikono*, kiel signo de konkreta aŭtomobilo. La sama foto en alia kunteksto povas servi kiel *indico* pri la riĉeco de iu konkreta homo, dum en tria kunteksto la foto povas funkcii kiel *simbolo* de riĉeco ĝenerale (Culler 1975: 17).

La funkciadtereno de konkreta signo povas dependi ankaŭ de la konoj de la interpretanto. Serpo kaj martelo aŭ kvinpinta ruĝa stelo por la plej multaj estas *simboloj* de komunismo, dum por tiuj, kiuj vivis en komunismaj sistemoj kaj ricevis abundajn instruojn pri tiuj signoj, ambaŭ estas *indicoj*: por ili serpo kaj martelo estas signo pri kunagado de laboristoj kaj kamparanoj, kvinpinta ruĝa stelo signo pri kvin-kontinenta internaciismo de proletoj.

2.2. Signoj povas esti klasifikataj ankaŭ laŭ ilia interna konsisto (senkonsidere al la rilato inter signanto kaj signato). Laŭ tiu vidpunkto

oni devas diferencigi inter *kontinua*j signoj kaj *diskretaj* signoj. Kontinua signo estas ekzemple foto aŭ (sencifera) diagramo, diskreta signo estas cifero aŭ lingva unuo, kiel vorto. Kontinua j signoj principe ne havas limojn, konturojn, dum la ĉefa trajto de diskretaj signoj estas ĝuste tio, ke ili klare apartiĝas disde sia ĉirkaŭaĵo. Kontinua j signoj estas ne-disartikigitaj, dum diskretaj signoj estas disartikigitaj.

Esenca trajto de kontinua signo estas tio, ke ĝi gajnas sian signifon nur en la kadro de iu hierarkio. Ekzemple, kvadratcentimetra kolorpuktaro (parto de foto) estas interpretebla nur enkadre de la tuto de la foto; kolono de diagramo ricevas signifon nur per komparo al alia kolono de la sama diagramo, t. e. nur tiel klariĝas, kiu el la du estas pli granda. La signifo de diskretaj signoj estas difinita en si mem: cifero havas ekzaktan signifon (valoron). Elementa, ne plu dividebla formo de diskreta signo estas *bito*. La diskreteco de vortoj ne estas absoluta: ilia formo jes, estas tia, sed ilia signifo ne nepre, tio povas konturiĝi nur ene de kunteksto. Vortelementoj aliflanke – ekzemple la finaĵo ‘-o’ – estas tute diskretaj, kaj laŭ formo, kaj laŭ signifo.

Kontinua j signoj formas *analogan kodon*, diskretaj signoj *digitan kodon*<sup>2</sup>.

Kontinua jn signojn karakterizas semantika riĉeco kaj sintaksa malriĉeco, dum diskretajn signojn inverse: sintaksa riĉeco kaj semantika malriĉeco<sup>3</sup> (Chandler 2002: 47; Mitchell 1986: 86). Tio tute evidente sekvas el la karaktero de la signoj mem: kontinua signo per sia senkontureco prezentas neelĉerpeblajn eblojn por interpretado, kaj ĝuste pro la senkontureco tiuj signoj ne povas havi sintaksajn rilatojn al aliaj signoj. Diskreta signo pro siaj klaraj konturoj, drasta difiniteco prezentas eblon nur por unusola interpreto, dum ĝuste pro tio povas havi variajn sintaksajn rilatojn kun la ceteraj diskretaj signoj.

<sup>2</sup> Oni ofte uzas la terminojn ‘analogaj’ kaj ‘digita’ ankaŭ por la signoj mem. Ŝajnas tamen pli prudente rezervi tiujn terminojn por la kodoj, ja la vortoj ‘kontinua’ kaj ‘diskreta’ pli elokvente respegulas la karakterojn de la koncernaj signoj.

<sup>3</sup> „... the graded quality of analogue codes may make them rich in meaning but it also renders them somewhat impoverished in syntactical complexity or semantic precision. By contrast the discrete units of digital codes may be somewhat impoverished in meaning but capable of much greater complexity or semantic signification...”

Kontinuaĵoj estas diskretegeblaj, sed tia diskretigo ĉiam signifas redukton, perdon de parto de la signifoj, sekve semantikan malriĉiĝon. Tia diskretigo okazas ekzemple ĉe digitigo de son- aŭ bildregistraĵoj. Ĉe tiaj digitigoj ĉiam okazas semantika malriĉiĝo, sed ties grado dependas de la fajneco de la diskretigo (mezurunuo por tio estas 'kilobito por sekundo' ĉe son- kaj movbild-dosieroj, kaj 'dpi' ('punkto por colo') por bilddosieroj – ĉi lastan influas ankaŭ la kolorprofundeco, esprimata per bitoj; 24 bita registraĵo disartikigas la kontinuan kolorskalon je  $2^{24}$ , t. e. je preskaŭ 17 milionoj da apartaj koloroj).

### 3. Pri lingvaj signoj

Lingvaj signoj lokeblas sur du signoebenoj: sur tiu de kontinuaĵoj, kaj sur tiu de diskretaj signoj. Parolsonoj, vortoj kaj ĉiuj aliaj lingvaj unuoj apartigeblaj estas diskretaj signoj, dum intonacio (variado de sonalteco), paŭzoj, tempodaŭro de prononco ktp. estas kontinuaĵoj<sup>4</sup>. Do, t. n. segmentaj elementoj de lingvo estas diskretaj signoj, dum supersegmentaj elementoj estas kontinuaĵoj.

Ekzistas opinioj<sup>5</sup> (Nöth 2000, 201–202), kiuj diras, ke nur presitaj literoj havas pure diskretan karakteron, kaj en manskribo diskretaj trajtoj miksiĝas kun kontinuaĵoj; krome ke parola lingvo havas ĉefe kontinuan karakteron. Kio koncernas skribon, al ĝi ni revenos poste; ĉi tie ni reflektu pri la kontinueco de la sonanta parola lingvo. Nöth evidente eraras, kiam li ne rimarkas la diskretajn trajtojn de la parola lingvo, en kiu ankaŭ klare apartiĝas parolsonoj kaj vortoj kiel strikte diskretaj fenomenoj. Estas fakto, ke ili aperas kune kun kontinuaĵoj (kiel frazmelodio ktp.), sed tiuj lastaj ne povas disfandi la diskretecon de parolsonoj kaj vortoj; se tamen ili povus disfandi ĝin, la parolo ne plu povus esti komprenata. (Io tia povas okazi nur escepte, ekzemple ĉe iuj operarioj, kiam teksto tiel plene integriĝas en la muzikon, ke ni ne plu povas kompreni la vortojn, sed fakte eĉ ne tre volas

---

<sup>4</sup> Kompreneble, krom en tonlingvoj, kiel ekzemple la ĉina. En tiuj lingvoj la tonalteco kaj ties variado pli konkrete partoprenas en la signifokreado.

<sup>5</sup> „Digitale Sprachkodierung erfolgt in Reinform durch Druckbuchstaben. Schon in der handschriftlichen Sprache gibt es jedoch Übergänge zwischen digitaler und analoger Kodifizierung, und die gesprochene Sprache ist informationstheoretisch zunächst analog kodiert.“

tion.) En normalaj kazoj parola lingvo estas sistemo de heterogenaj (t.e. kontinuaj kaj diskretaj) signoj, kiun bele montras la figuro de Saussure el *Kurso de ĝenerala lingvistiko*, en kiu figuro horizontala linio reprezentas la kontinuecon de la parolĉeno, dum la interliteraj vertikalaj linietoj la diskretecon de la parolsonoĵoj:

|B|A|P|B|A|P|O|Σ|

#### 4. Lingva evoluo kiel diskretiĝa procezo

La estiĝo kaj evoluo de la homa lingvo estas priskribebla kiel longa diskretiĝa procezo. La praaj homaj voĉaĵoj – ululoj – esti ne-disartikigitaj, kontinuaj: la voĉaĵo natura estas ne-disartikigita – opinias Rousseau<sup>6</sup>. Sed la nombro de eblaj kontinuaj, ne-disartikigitaj voĉaĵoj estas limigita, kaj nepre nesufiĉa por komuniki la ĉiam pli kompleksigantan konsci-enhavon de la homoj. La kreskanta komunikbezono de homo eldevigis la diskretigon de kontinuaj voĉsignaloj, ĉar tiuj lastaj ne montris la necesan varieblon por komuniki la ĉiam pli riĉigantan kaj kompleksigantan konsci-enhavon de la homo. (Kiel pli supre temis jam pri tio, kontinuaj signoj estas riĉaj semantike, kaj malriĉaj sintakse, do ili povas esprimi rilatojn nur limigite, dum la homa konsci-enhavo riĉiĝis unuavice ĝuste per la la malkovro kaj konstato de rilatoj inter la aferoj.) Por adekvatigi la komunikilon – la voĉon – al la tasko solvenda, necesis diskretigi, disartikigi ĝin. La diskretigo, disartikigo de la kontinua voĉsigno multobligis la nombron de la disponeblaj signoj, ofertante al la komunikanta homo ĉiam pli grandan combineblon de la signoj. Kompreneble, la diskretigo, disartikigo de la kontinuaj voĉsignaloj ne estis evento okazinta unufoje por ĉiam, sed seninterrompa procezo, daŭranta eĉ nun. Ĝia relativa evoluinteco estis antaŭkondiĉo de la apero de alfabeto, t. e. literaskribo, kiu siavice ankaŭ grave akcelis la pluan diskretiĝon, disartikiĝon.

#### 5. Skribo

Kiam skribo estis inventita, kreiĝis por la lingvo alternativa ekzistformo. Fakte nur ekde tiu invento havas sencon uzi la terminon 'paro-

<sup>6</sup> „Les voix naturelles son inarticulées.” (Rousseau 1995, 383)

la lingvo', ja antaŭe lingvaj produktoj povis ekzisti nur en parola formo.

Necesas tamen distingi inter specoj de skribo. En la komenco aperis skribsistemoj, kiuj estis *senregistraj*: ili kvazaŭ traarkis la voĉan lingvon, kaj kreis rektan, senperan rilaton inter la grafika signo kaj la reprezentata objekto. Tiuj skribsistemoj do peris al la leganto semantikajn informojn, sed neniun fonetikan informon. Al tiu kategorio de skribo apartenas egiptaj hieroglifoj, la ĉina skribo, kaj la arabaj ciferoj, kiujn ni uzas kaj komprenas mondscale.

La alia kategorio de skriboj estas *sonregistra*: la sistemoj, apartenantaj al tiu ĉi kategorio, peras al la leganto fonetikajn informojn, sed neniun semantikan informon. Ekzistas tri subtipoj de sonregistra skribo: *silabskribo*, *konsonantskribo* kaj *plena alfabeto* (Haas 1983). Plue, kiam ni parolos pri skribo, ni komprenos sub ĝi nur la plenan alfabeton.

Plena alfabeto aperis ĉ. 800 a. Kr., kiam grekoj ekuzis iujn signojn de la konsonantskribo, pruntita de la fenicianoj, por reprezenti vokalojn. La invento estis grandioza, kion bele ilustras la fakto, ke alfabeto funkcias jam preskaŭ trimil jarojn surbaze de la esence samaj principoj. Alfabeto havas nenian rilaton al la lingve reprezentataj aferoj, ĝi reprezentas ne la aferojn, sed iliajn lingvajn (akustikajn) reprezentantojn. Tiamaniere skribo tre intime ligiĝis kun la lingvo, kaj komenciĝis ĝis nun daŭranta reciproka influado inter la du sistemoj. Ne nur la parola lingvo influis la skribon – kio ja estis tute atendebla fenomeno –, sed ankaŭ skribo la parolan lingvon<sup>7</sup> (Ong 1977: 87). Tiu lasta influo fortiĝis paralele kun la disvastiĝo de la skribouzo, kaj daŭras ĝis nun.

La alfabeto, kiun ni uzas, el semiotika vidpunkto estas tipe diskreta fenomeno<sup>8</sup>. La diskretan karakteron de nia skribo pruvas ankaŭ la fakto, ke la kontinuajn signojn (la supersegmentajn lingvajn elementojn: intonacio ktp.) de la parolo fakte ni ne povas aperiĝi adekvate en skri-

<sup>7</sup> „After writing [...] oral speech was never the same.”

<sup>8</sup> Kaj kompreneble estas nete diskreta ankaŭ manskribo, malgraŭ la supre citita opinio de Winfried Nöth, ja la interliteraj pure teknikaj kunligaj strekoj ne estas signoj, ja ili reprezentas nenion. Ili ekzistas nur por ke la skribanta mano ne bezonu levi la krajonon antaŭ kaj post ĉiu litero.

bo. Per nia skribo eblas registri nur tiujn lingvoelementojn, kiuj estas per si mem diskretaj. Estas klare do, ke tiu ĉi cirkonstanco – pro la alta socia prestiĝo de skribo – instigis ankaŭ la parolantan homon paroli tiel, ke lia parolo estu kiel eble plej plene skribebla, kaj sekve de tio ankaŭ en la parolata lingvo malgrandiĝis la relativa pezo de la kontinuaj signoj.

Krome skribo trudas al la lingvo diskretiĝon ne nur en fonetika, sed ankaŭ en semantika senco. En parola lingvouzo vortsignifoj povas esti kompleksaj kaj nekonturitaj: la parolsituacio kaj la intonaciaj rimedoj ordinare helpas trovi la aktualan vortsignifon, kaj se tamen ne, la interaktiveco ebligas al la aŭskultanto fari precizigan demandon. En la kazo de skriba teksto tiuj cirkonstancoj mankas, do la vortsignifoj devas esti per si mem unusencaj kaj klare konturitaj – do *diskretaj*.

Pli supre jam estis aludite, ke diskretaj signoj estas per sia naturo semantike malriĉaj. El tio sekvas, ke ili draste reduktas la trajtojn de la reprezentata afero: literoj fakte ne peras al ni la kvalitaron de la parolsonoj, nur memorigas nin pri ili<sup>9</sup> (Havelock 1982: 318). La kvalitaro kuŝas en nia akustika memoro, tute certe en formo de kontinua signo.

Estas notinde, ke en la homa pensado la signokategorioj *kontinua* kaj *diskreta* ligiĝas kun la konceptoj *natura* kaj *artefarita*. *Kontinuajn* signojn ni emas rigardi *naturaj*, dum *diskretajn* signojn ni sentas *artefaritaj*<sup>10</sup>. En tiu senco skribo estas pure artefarita<sup>11</sup>: skribi en natura maniero maleblas. Se estas tiel, rezulte de la influo de la skribo ĉiu lingvo alprenas amason da artefaritaj trajtoj: plene naturaj oni povas rigardi nur tiujn lingvojn, kiuj ne havas skribon.

---

<sup>9</sup> „The alphabet was and is an instrument of acoustic recognition, and only that.”

<sup>10</sup> „We have deep attachment to analogical modes and we tend to regard digital representations as ‘less real’ or ‘less authentic’ & at least initially [...] The analogue-digital distinction is frequently represented as ‘natural’ versus ‘artificial’. The privileging of the analogical may be linked with the defiance of rationality in romantic ideology (which still dominates our conception of ourselves as ‘individuals’).” (Chandler 2002: 46)

<sup>11</sup> „Writing is a technology. [...] By contrast with natural, oral speech, writing is completely artificial. There is no way to write ‘naturally’.” (Ong 1999: 82)

## 6. Skribo alprenas la ĉefan rolon

Tute unikan rolon ricevis skribo, kiam ĉ. 700 p. Kr. el la latinaj dialektoj kreiĝis la fruaj variantoj de la lingvoj itala, franca, kataluna, hispana, kies parolantoj ne plu komprenis la skribitajn latinajn tekstojn. La latina fariĝis por ĉiuj lernita lingvo, eĉ lingvo lernita el skribo. Ekde tiam dum ĉ. mil jaroj la latinan lingvouzon ne nur regas, sed plene *difinas* skribo. Surbaze de skribo, surbaze de diskreta signaro evoluas la mezepoka latina parola lingvouzo, do la kontinua signaro. Inversiĝas la normala semiotika procezo en kiu kontinuaĵ signoj diskretiĝas: nun *kontinuiĝas signoj origine diskretaj*.

La kazo de la latina ne estas tute unika: io simila okazas ankaŭ koncerne la rabenisman hebrean, klasikan araban, sanskritan, klasikan ĉinan kaj bizancan grekan lingvojn (Ong 1999, 114–115).

## 7. Esperanto kreiĝis en skriba formo

Esperanto kreiĝis en skriba formo, kaj tiu cirkonstanco ĝis nun ne estis sufiĉe atentata. La Unua Libro estis diskreta signaro: la lingvo aperis en semantike malriĉa formo, ja diskreta skribo povis prezenti nur tian.

Se literoj servas nur por elvoki el nia akustika memoro la signatan sonon, la unuaj laŭtlekantoj de Esperantaj tekstoj estis certe perpleksaj, ja la fonetikaj difinoj en la Unua Libro estis treege vortŝparaj.

Zamenhof en la sekcio „A” de la Unua Libro prezentas la 28 literojn de la Esperanta alfabeto, kaj aldonas rimarkojn koncerne la prononcon, adaptitajn en la diverslingvaj variantoj al la supozeblaj bezonoj de tiulingvaj parolantoj. La ĉefa maniero de la Zamenhofaj fonetikaj rimarkoj estis doni paralelojn de la opaj parolsono en naciaj lingvoj, sed tiuj rimarkoj fakte povis tre malmulte orienti la lernantojn, eĉ povis ofte misorienti ilin; ja ekzemple angla kaj germana ’t’ tute ne identas kun pola aŭ rusa ’t’, kiel oni povus supozi laŭ la identigoj en la Unua Libro.

Tamen la procedo de Zamenhof estis esence saĝa, pro pluraj kaŭzoj. *Unue* pro tio, ke preciza fonetika-fonologia difino de la parolsono – kion li mem, pro manko de konoj, ne kapablus fari – povus fortimigi interesiĝantojn. *Due*, ĉar la tuto de la lingvoprojekto estis tre skiza,



sen multaj detaloj, estus do treege senproporcie apudmeti al ĝi ellaboritan fonetikon. *Trie*, ĉar fakte en la momento, kiam Zamenhof entreprenis la Unuan Libron, li ne povis vidi la optimumajn konturojn de tiu fonetiko. Ni bone scias, ke la nuna norma Esperanta prononco ne estas la prononco de Zamenhof, kaj eĉ tio certas, ke ĝi ne identas kun tiu prononco, kiu vivis en la kapo de Zamenhof, kiel ideala elparolo. La konturiĝo de la Esperantaj parolsonoj estis plurjardeka procezo, en kiu decida stacio estis la unua Universala Kongreso de Esperanto, okazinta antaŭ ĝuste cent jaroj en Bulonjo-sur-Maró.

Bulonjo-sur-Maró estis grandioza praktika pruvo pri la funkcio-kapablo de la voĉa Esperanto. Preskaŭ 700 kongresanoj el dekoj da landoj superis ĉiun ĝistiaman Esperanto-renkontiĝon. Amasis ankaŭ formalaj parolaj eventoj, en kiuj la parola lingvo estis elmetita al pli altaj postuloj, ol en familiaraj konversacioj, kaj al tiuj pli altaj postuloj la voĉa Esperanto respondis adekvate.

Dum la pasintaj 100 jaroj estis multaj laŭdoj prononcitaj pri Bulonjo-sur-Maró, sed tiuj plej ofte aludas ĝin kiel efektivan starton de la internacia Esperanto-movado, kaj fondanton de la grandioza kultura tradicio de la Universalaj Kongresoj. En tiu impona bukedo de ating-aĵoj oni iel emas forgesi pri tio, kio estas la plej grava ĉar plej baza el ili: la praviĝo de la parola funkcipovo de la lingvo. La forgesemo pri tio estas komprenebla, ĉar tiu funkcipovo por la postaj esperantistaj generacioj estas afero komplete evidenta; tamen oni notu, ke tiam, somere de 1905 pri tio oni povis havi nur esperojn kaj atendojn, sed certecon ne.

## **8. Magra Esperanta fonetiko**

Iom ellaboritan fonetikon de Esperanto la publiko ricevis nur tri jardekojn poste, kiam en 1935 aperis Plena Gramatiko. La fonetika ĉapitro de Plena Gramatiko ampleksas tamen entute nur 11 paĝojn, kaj tiu ĉapitro ne montras kreskon ankaŭ en la kvara eldono de la libro, aperinta sub la titolo Plena Analiza Gramatiko en 1980.

Tiuj ĉi fonetikaj ĉapitroj estas prudente maldetalemaj, skizaj, oni povus diri, malriĉaj, tamen sufiĉaj por konstati la efektive funkciantajn fenomenojn de la komune uzata bona Esperanta prononco.

Eble la plej grava kontribuo de Plena Gramatiko estas la konstato de po du alofonoj por la Esperantaj fonemoj 'a', 'i', 'u' kaj po tri alofonoj por la fonemoj 'e' kaj 'o'. Kalocsay kaj Waringhien ankaŭ difinas la fonologiajn regulojn, laŭ kiuj tiuj alofonoj devas esti uzataj. Tiamaniere Esperanto ja havas nur kvin vokalajn fonemojn, sed entute dek du vokalajn parolsonojn: interalie tiu varieco garantias la multe laŭdatan belsonecon de la lingvo. Tia 'plimultigo' de la Esperantaj vokaloj ĝis nun elvokas – ĉefe principajn – malkonsentojn, sed granda plimulto de la personoj, rigardataj bonaj parolantoj, sekvas tiujn regulojn de Plena Gramatiko.

Estis tre bone kaj prudente, ke la aŭtoroj de Plena Gramatiko kontraŭstaris la tenton „diskretigi ĉion kontinuan”, t. e. difini la la opajn sonojn abstrakte; ili sekvis la spurojn de Zamenhof, kaj prezentis prononcmodelon de la menciitaj 12 vokalaj parolsonoj per ekzemploj el la plej divastiĝintaj naciaj lingvoj (angla, franca, germana, itala). Per tio fakte ili instinkte obeis la aposterioran karakteron de Esperanto.

*Plena Gramatiko* (kaj ankaŭ la posta *Plena Analiza Gramatiko*) fakte ignoras/preteriras aŭ apenaŭ tuŝas amason da teorie tre gravaj, tamen praktike ignoreblaj/pretereblaj fenomenoj. Tia estas la demando pri sonkonformiĝoj, alofonoj de konsonantoj (ekz. diferenca prononco de 'k' en 'kalo' kaj 'kelo'), frazmelodio ktp. Kompromisoj tiuterenaj ja helpas la funkciadon de la akustika Esperanto.

## **9. Iuj koneksoj kaj konsekvencoj de la skriba genezo de Esperanto**

9. 1. La plej grava tia konekso estas ke la lingva fundamento de Esperanto implicas ankaŭ la skribon, t. e. la alfabeton. Tio estas sufiĉe unika fenomeno en la mondo de la lingvoj, kvankam estas vaste konata la tre intima – plejparte emocia – ligo inter lingvoj kaj la uzata alfabeto. Estas tute klare, ke rusoj, grekoj, armenoj aŭ kartveloj montras nenian emon rezigni pri la nun uzata alfabeto kaj ekapliki ekzemple la latinan alfabeton. Sed ni ankaŭ scias, ke alfabetŝanĝoj grandnombre okazis en la historio de la lingvoj, kaj la nova alfabeto povis preskaŭ ĉiam bone enradikiĝi (oni pensu nur pri la ekzemplo de turkoj, rumanoj, vjetnamoj ktp.).

Tiu emocia rilato inter skribo kaj lingvo ekzistas ankaŭ koncerne Esperanton, sed ĝi kompletigas ankaŭ per speco de jureca rilato. Fundamento de Esperanto estas kvazaŭ leĝo por esperantistoj, kaj ĝi implicas ankaŭ la alfabeton. En etnaj lingvoj la parolsonoj de la lingvoj estas notataj per difinitaj literoj; eventuala dubo por la lingvo-kaj skribouzanto lanĉiĝas jene: „Kiel oni devas skribi tiun ĉi vorton?” Tio, kio estas fiksa, certa, estas la sonanta vorto.

En Esperanto estas la parolsonoj, kiuj ŝuldas sian ekziston al la literoj, kaj por la skribo- kaj lingvouzanta esperantisto dubo ordinare lanĉiĝas inverse: „Kiel oni prononcu tiun ĉi vorton?”

La prioritaton de skribo antaŭ voĉa lingvo bele ilustras la fakto, ke *Plenan Analizan Gramatikon* uverturas la ĉapitro „Ortografio kaj interpunkcio”, kaj nur poste sekvas la ĉapitro „Fonetiko”. Verŝajne en neniuj simila libro de nacia lingvo estus imagebla tia vicordo.

9.2. Koneksas kun la skriba genezo de la lingvo kaj la netuŝebleco de la alfabeto, ke en Esperanto maleblis fari ortografian reformon, almenaŭ tian, kiu tuŝus la alfabeton. Ortografiaj reformoj kompreneble en ĉiuj lingvoj estas tre malfacile efektiveblaj, sed en Esperanto ili montriĝis tute maleblaj, kvankam klopodoj por la forigo de la ĉapelitaj literoj neniam plene ĉesis.

9.3. Daŭre vivas opinioj, laŭ kiuj en la Esperanta prononco ne rajtas havi lokon konsonant-konformiĝoj (‘egzisti’, ‘lonktempe’), moliĝoj/kunfandiĝoj (‘panjo’, ‘sinjoro’), iuj alofonoj, kiel guturala ‘n’ en ekzemple ‘anglo’. Laŭ tiuj opinioj oni prononcu ‘ekzisti’, ‘longtempe’, ‘pan+jo’ ‘sin+joro’ (kun aparte prononcataj ‘n+j’), *anglo* (kun dentala ‘n’, kiel ekzemple en la vorto ‘normo’). Krome laŭ tiu principo en vortoj kiel ‘ekkuri’, ‘mallumo’, ‘sammetode’ oni ne rajtus prononci longan ‘kk’, ‘ll’, ‘mm’, sed oni devus per paŭzeto apartigi (diskretigi) la longan parolsonon je ‘k+k’, ‘l+l’, ‘m+m’.

Principe tiu opinio estas prava, ja la naŭa regulo (‘Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita’) implicas la postulon, ke la sama litero estu legata ĉiam sammaniere, senkonsidere al ĝia fonologia pozicio. Se ni volas obei la naŭan regulon sen kompromiso, ni devus absolutigi en Esperanto tiun fenomenon, kiun ni konas en ĉiuj naciaj lingvoj,

vaste aplikantaj skribon, kiun ni povas nomi *laŭlitera prononcado* (angle: *spelling pronunciation*; germane: *Schriftbildaussprache*).<sup>12</sup>

Tiam, kiam en la praktiko ni ne obeas centprocente la naŭan regulon, ni fakte kontinuigas iomete la diskretan skriban kernon de Esperanto, ja tiagrada regado de skribo super parolo, kian implicas la naŭa regulo, povus paneigi la parolan funkciadon.

9.4. Se ne rekte sekvas el la skriba genezo, almenaŭ koneksas kun ĝi la ekstrema semantika diskreteco de Esperanto. Nome, la apliko de skribo en ĉiuj lingvoj fortigis tian tendencon: la kompleksaj vortsignifoj de la primara parollingveco (antaŭskriba epoko) displitiĝis. Tion eldevigis la draste diferenca komunikada situacio, kiu aperis kun skribo. En parola lingvouzo la referencan – senc-portantan – funkcion de vorto subtenas amaso da eksterlingvaj komunikrimedoj (mimiko, gestoj ktp.) kaj ankaŭ supersegmentaj lingvaj rimedoj (intonacio ktp.), kiuj helpas konstati la aktualan signifon de multisenca vorto. En skribo tiuj du lastaj forestas: la sencon devas porti sola la t. n. 'vortara signifo' de la vorto.

Ĉar Esperanto funkcias eĉ nuntempe plie skribe ol parole, la semantika diskreteco estas evidente necesa trajto de la lingvo. Aldoniĝas al tio la cirkonstanco, ke la uzantoj de Esperanto estas personoj, en kies konscio la signifokampojn pli frue jam kreis alia lingvo (ilia gepatra lingvo): por ili estus malfacile akcepti alividpunktan „parceligon” de la mondo. La maksimumo, por kio ili pretas, estas la analizo kaj plia dis-artikigo de la gepatralingvaj signifokampoj je *sememoj* (signifounuoj). Tiu ekstrema semantika diskreteco kreas en Esperanto sufiĉe multajn *paronimojn* (paralelajn vortojn). Tiaj estas: 'respondi – respondi', 'pezi – pesi', 'impliki – impliki', 'imposto – imposto', 'proceso – procezo – procedo' ktp. Similaj paralelecoj aperas iam per la

---

<sup>12</sup> Notindas, ke la literprononcaj opinioj persekutas ne ĉiujn alofonojn. Ekzemple neniam ĝis nun iu avertis min pro tio, ĉar mi – kiel praktike ĉiuj – prononcas 'k' diversmaniere en 'kilo' kaj 'kulo', aŭ 'g' malsammaniere en 'giĉeto' kaj 'gurdo'. Kvankam inter la estiĝlokoj de la du 'g'-oj kaj 'k'-oj estas plurcentimetra distanco, kaj tia prononcmankado estas evidenta ofendo al la naŭa regulo. Sammaniera prononco de 'k' en ĉiuj pozicioj maleblus kompreneble ankaŭ pro tio, ĉar neniuj povas diri, kiu el la alofonoj de 'k' aŭ 'g' estas la unusola vera, ĝusta prononco. Temas pri tio, ke la litero 'k' estas signo de la *fonemo* 'k' (ne tiu de la realaj parolsonojoj), kaj fonemo estas nur abstraktaĵo de fonologio, kiel konkreta parolsono ĝi ne ekzistas.

utiligo de la nominativa kaj genitiva radikoj de la sama latina vorto, kiel ĉe 'indekso – indico'. Inter la sufiksoj elstaras la diferencigo inter la '-ec-' kaj '-aĵ-'-konceptoj ('propreco – propraĵo'), kiuj ne rezultigas formajn (paronimajn) paralelaĵojn, sed postulas de la lingvo-uzanto konstante semantikajn diferencigojn, praktike plej ofte tute superflujajn. Tiaj fajnaj semantikaj distingoj multe kontribuas al la precizeco de la esprimado, aliflanke ili konsiderinde malfaciligas la lingvouzadon.

La diskreteco sperteblas ankaŭ sur sintaksa kampo. La plej konata ekzemplo estas la diferencigo inter frazoj kiel 'Mi iras lace sur la vojo. – Mi iras laca sur la vojo.'. La plimulto de la lingvoj forme ne distingas inter la rilatigo al la subjekto, respektive al la verba predikato.

Grandparte pro la supre montritaj kialoj en Esperanto nur tre limigitaj funkcias *metaforiga procezo*, tre produktiva kreanto de novaj vortsignifoj en la plimulto de la lingvoj. Metaforo ja estas tropo, kies bazo estas *simileco*, kaj simileco ne havas siajn objektivajn, logike kaptoblajn kriteriojn. Tial en Esperanto mankas multaj metaforaj signifoj, komunuzaj en la plej multaj Eŭropaj lingvoj: tia estas ekzemple 'peco' en la senco de 'teatraĵo'. Se ĉe iuj vortoj fruaj Esperantaj vortaroj eĉ notis iujn metaforajn signifojn, komunuzajn en aliaj lingvoj (kiel ekzemple ĉe la vorto 'estimi' la signifon 'taksi'), tiujn metaforajn uzojn la Esperanta lingvokomunumo ne akceptis, tial ili iom post iom malaperis ankaŭ el la vortaroj. Male, Esperanto senrezerve akceptas metonimiojn (ekzemple: 'Vaŝingtono havas la opinion...' en la senco 'La usona registaro havas la opinion...' el aliaj lingvoj, simple ĉar la metonimia procezo iras vojon, logike ĉiam sekveblan.

9. 5. Alia interesa reveliĝo de la semantika – kaj morfologia – diskreteco de Esperanto estas ĝia vortfara sistemo. Vortoj de ajna lingvo povas esti *motivitaj*, *relative motivitaj*, kaj *nemotivitaj*<sup>13</sup> (Saussure 2005: 180–184). *Nemotivitaj* estas la plej granda parto de la vortoj de ĉiu lingvo, ĉar nemotiviteco estas la baza trajto de homaj lingvoj, ja, kiel ni scias, lingvaj signoj estas esence arbitraj, do, el semiotika vidpunkto

<sup>13</sup> „motivé”, „relativement motivé”, „immotivé”

to ili montras *simbolecan* karakteron<sup>14</sup>. *Motivitaj* estas onomatopeoj ('kokeriki', 'zumi' ktp.): ĉi tie la signanto similas al la signato, do tiuj vortoj montras *ikonecajn* trajtojn (la rilato inter signanto kaj signato iel memorigas metaforajn, asociadecajn rilatojn). *Relative motivitaj* estas kunmetitaj kaj derivitaj vortoj: la vortoj 'du', 'dek' kaj 'manĝi' estas nemotivitaj vortoj, dum 'dudek' kaj manĝilaro' estas relative motivitaj. Relative motivitaj vortoj el semiotika vidpunkto havas *indicecajn* trajtojn, ja la interrilito de la vortelementoj de tiaj vortoj similas la esence sintagmegan rilaton, kiun havas signanto kaj signato en la kazo de indicoj.

La rilato inter signanto kaj signato en la kazo de nemotivitaj kaj motivitaj vortoj aperas kiel io *kontinua*: nedividebla, ne-disartikigebla. Male, en la kazo de relative motivitaj vortoj tiu rilato portas abundajn diskretajn trajtojn, ĉar ekzemple en la vorto 'manĝ+il+ar+o' la vortelementoj dispartiĝas – diskretiĝas – ne nur forme, sed ankaŭ semantike.

Kiel ni scias, en Esperanto la proporcio de la relative motivitaj vortoj estas pli alta, ol en la plej multaj etnaj lingvoj: tiu propraĵo estas unu plia subtenanto de la baze diskreta karaktero de la Internacia Lingvo<sup>15</sup>.

## Konkludo

La semiotika ekzamenado de Esperanto ne estas pura teoria ludo: ĝi povas riveli al ni tiajn aspektojn de la Internacia Lingvo, kiuj restas kaŝitaj antaŭ ni ne nur en la procezo de ĝia ĉiutaga praktika uzado, sed eĉ tiam, kiam ni submetas ĝin al nura lingvistika analizo. Semiotikan ekzamenadon faras utila ankaŭ tiu nenebla cirkonstanco, ke Espe-

<sup>14</sup> Notindas tamen, ke por persono, kiu ne parolas alian lingvon krom la gepatra, ankaŭ nemotivitaj vortoj povas aperi kiel ikonecaj, ĉar manke de alternativaj signoj por la sama objekto/koncepto, la vortoj signantaj tiujn objektojn/konceptojn povas aspekti kvazaŭ „naturaj”, neanstataŭigeblaj. Oni konscii, ke la diferenco inter *simileco* kaj *arbitreco* ne estas tiel granda, kiel oni pensus unuavide, ĉar, kiel jam menciite, simileco ne havas objektivajn kriteriojn, do rilato, kiu por unu persono ŝajnas esti baziĝanta sur simileco, por alia povas aperi kiel arbitra; aliflanke, rilato, kiu por unu persono ŝajnas esti arbitra, por alia persono povas esti perceptata kiel rilato baziĝanta sur simileco.

<sup>15</sup> Dum la historio de Esperanto plurfoje ekflagris kampanjoj kontraŭ la derivitaj vortoj: en ili fakte manifestiĝis la forta homa prefero de la kontinuaj signoj (analoga kodo) al la diskretaj signoj (digita kodo).

ranto pro sia pozicio de intergenta lingvo situas iom pli proksime al la nelingvaj signosistemoj, ol tiuj lingvoj, kiuj uziĝas ĉefe enkadre de teritorie kaj kulture homogena lingvokomunumo.

Esperanto el semiotika vidpunkto karakterizeblas plej trafe per la terminaj epitetoj *diskreta* kaj *indica*. Sed la parola lingvo, triumfinta antaŭ cent jaroj en Bulonjo-sur-Mar, pruntas al ĝi ankaŭ amason da *kontinuaĵ* trajtoj.

### Referencita literaturo:

- Chandler, Daniel (2002): *Semiotics. The Basics*. London: Routledge.
- Culler, Jonathan (1975): *Structuralist Poetics: Structuralism, Linguistics, and the Study of Literature*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Haas, William (1983): Determining a level of a script. In: *Writing in focus*. (Trends in linguistics, Studies & monographs, 24), edited by Florian Coulmas & Konrad Ehlich. Berlin: Mouton 15–29.
- Havelock, Eric A. (1982): *The Literate Revolution in Greece and Its Cultural Consequences*. Princeton: Princeton University Press.
- Mitchell, W. J. T. (1986): *Iconology: Image, Text, Ideology*. Chicago: The University of Chicago Press, 1986.
- Nöth, Winfried (2000): *Handbuch der Semiotik*. Stuttgart: Metzler.
- Ong, W. J. (1977): *Interfaces of the Word. Studies on the evolution of consciousness and culture*. Ithaca–London: Cornell University Press.
- Ong, W. J. (1999): *The Orality and Literacy. The Technologizing of the Word*. London and New York: Routledge.
- Peirce, Charles Sanders (1998): *The Essential Peirce. Selected Philosophical Writings*. Vol. 2 (1893–1913), edited by the Peirce Edition Project, 1998. Bloomington and Indianapolis: Indiana University Press.
- Rousseau, J.-J. (1995): Essai sur l'origine des langues. In: Rousseau, J.-J. *Œuvres complètes V*. Paris: Gallimard, 375–429.
- Saussure, Ferdinand de (2005): *Cours de linguistique générale*. Édition critique préparée par Tullio de Mauro. Paris: Payot.

# LA ESPERANTA LITERATURO TRA LA LUPEO DE KELKAJ LINGVOTEORIOJ KAJ LITERATURKONCEPTOJ\*

## Resumo:

La tradiciaj lingvoterrorioj kaj literaturkonceptoj baziĝas sur la organika unueco de *signifanto* (t. e. sonkorpuso de vorto) kaj *signifato* (tiu objekto, koncepto ktp. en kies loko staras la koncerna vorto kiel signo) – temas pri terminoj de Saussure: *signifiant* kaj *signifié*. En tiu organika unueco signifanto elvokas la signifaton, dum ĝi mem paliĝas, kvazaŭ malaperas, kaj en la proscenio staras nurnure la signifato. Esperanta literatura verko laŭ tiu koncepto – dum longa tempo reganta en la literaturscienco – ne povas esti plenvolara, ĉar la rilato inter signifanto kaj signifato en Esperanto estas malpli fiksa kaj intima, ol en la etnaj lingvoj; sekve esperanta signifanto ne kapablas elvoki tiel firman kaj potencon signifaton, kiu likvidus ĝin (la signifanton), kaj mem kaj starus sola antaŭ la okuloj de la leganto.

Sed la novaj lingvoterrorioj kaj la post-strukturismaj literaturkonceptoj pridubas tiun organikecon kaj intimecon en la rilato inter signifanto kaj signifato (kiel ankaŭ la ĉefrolon de la signifato) ankaŭ koncerne la etnajn lingvojn; fariĝis ĝenerala la koncepto, laŭ kiu per la vortoj de la homa lingvo ne eblas konfidinde referenci al la realo. Laŭ tiuj tezoj en la semiotika procezo, funkcianta ĉe la kreado kaj legado de literatura teksto, la ĉefrolon transprenas signifanto, kies firma ligiteco al difinita signifato estas tre dubinda. Literatura verko laŭ tiu koncepto estas antaŭ ĉio *teksto*, konsistanta el *signifantoj*, kiuj signifantoj interrilatas multe pli kun la signifantoj de aliaj tekstoj ('interteksteco'), ol kun iuj 'dubindaj', 'transcendaj' – sense ne kapt-eblaj – signifatoj.

---

\* Ĉi tiu studo estas skriba versio de prelego farita en 2010 en Havano, dum la Esperantologia Konferenco okazinta enkadre de la 95a Universala Kongreso. Ĉi tiu skriba versio aperis unuafoje en *Esperantologio/Esperanto Studies*, kajero 5 (2011), redaktata de Christer Kiselman. Mi ŝuldas al li dankon pro liaj tre utilaj konsiloj, kiuj multe helpis al mi definitivigi la tekston.



Rezulte de tiu paradigmoŝanĝo en la teorio de lingvo kaj de literaturo fakte forfalas la bazo de ĉiuj rezervoj, pli frue alfrontantaj la esperantan literaturon. La suba studo deziras skize prezenti la esencon de tiu ĉi paradigmoŝanĝo, kaj montri ĝiajn teoriajn konsekvencojn rilate la pritakson de la esperanta literaturo kaj rilate la prijuĝon de Esperanto kiel lingvo.

## **1. Konciza terminologia enkonduko:**

### **1.1. Elementaj semiotikaj nocioj de Ch. S. Peirce**

Peirce dividis la signojn plurmaniere; el tiuj dividoj la plej konata – kaj fakte plej fruktodona – estas la divido laŭ la rilato inter signo kaj signato<sup>1</sup>. Peirce nomas

*1.1.1. ikono* tiun signon, kiu similas aŭ imitas sian signaton. Ikonoj reprezentas siajn signatojn esence per aludo al ties kvalito. Ikono estas ekzemple foto. Notidas, ke ikonoj povas ekzisti ne nur en la sensa dimensio de vido, sed principe en ĉiuj kvin sensaj dimensioj. (Ekzemple: sintetika rozparfumo estas odor-ikono.) En la homa lingvo – kiu estas baze *simbola* signosistemo – apud la baza simbola karaktero onomatopeoj havas ikonecajn trajtojn. Metaforo – unu el la bazaj stilistikaj tropoj – konstituĝas per principoj ikonaj.

*1.1.2. indico* tiun signon, kiu havas iujn realajn kontaktojn kun sia signato aŭ aludojn al ĝi. Indicoj estas ekzemple voĵmontraj sagoj, fumo kiel signo de fajro, aŭ man- kaj korpotenoj de policistoj, direktantaj trafikon. Ankaŭ indicoj povas ekzisti principe en ĉiuj sensodimensioj. En la homa lingvo – apud sia baze simbola karaktero – pronomoj montras certajn indicecajn trajtojn, ja ili gajnas sian signifon enkadre de aluda procezo. Metonimio – unu el la bazaj stilistikaj tropoj – konstituĝas per principoj indicaj.

---

<sup>1</sup> „[...] I had observed that the most frequently useful division of signs is by trichotomy into firstly Likenesses, or, as I prefer to say, *Icons*, which serve to represent their objects only in so far as they resemble them in themselves; secondly, *Indices*, which represent their objects independently of any resemblance to them, only by virtue of real connections with them, and thirdly *Symbols*, which represent their objects, independently alike of any resemblance or any real connection, because dispositions or factitious habits of their interpreters insure their being so understood” (Peirce 1998: 460–461; teksto verkita en 1909).

1.1.3. *simbolo* tiun signon, kiu nek similas sian signaton, nek havas realajn kontaktojn kun ĝi: do la rilato inter simbolo kaj sia signato estas esence arbitra. Simboloj estas ekzemple naciaj flagoj aŭ la kolo-roj de semaforlanternoj. Male, la pozicioj de la semaforbrakoj estas indicoj. La lingvaj signoj baze estas arbitraj, do homa lingvo estas simbola signosistemo, kies iuj elementoj povas havi ankaŭ ikonecajn aŭ indicecajn trajtojn. (Rimarko: estas konsilinde klare diferencigi inter la signifoj semiotika, stilistika kaj komunlingva de la vorto 'simbolo'!)

1.1.4. Per la supraj tri kategorioj estas priskribebla ajna konkreta signo. Peirce atentigas, ke konkretaj signoj neniam apartenas centprocente al nur unu kategorio. Ekzemple foto estas dominante ikono, sed la simileco al sia signato ne estas plena, ja ĝi nur aludas ekzemple al la realaj mezuroj de la reprezentata signato (foto estas ordinare malpli granda, ol tio, kion ĝi reprezentas), do en foto aperas apud la dominantanta ikoneco ankaŭ indicecaj trajtoj.

1.1.5. El la tri signospecoj klare diferencas disde la aliaj du *indico*. La klara diferenceco kuŝas en tio, ke en la kazo de indico la rilato inter signo kaj signato estas priskribebla laŭ logike kapteblaj pozitivaj kriterioj. En la kazo de *ikono* kaj *simbolo* tiaj kriterioj ne ekzistas, ja 'simileco' tute ne havas objektivajn kriteriojn (al tiu senlimeco de simileco ŝuldiĝas la kreblo de surprizaj kaj aŭdacaj metaforoj<sup>2</sup>), dum la koncepto 'arbitreco' priskribeblas nur per negativaj kriterioj. Kvankam je la unua vido ikono kaj simbolo ŝajnas esti forte diferencantaj unu de la alia, tamen la limo inter ili ne facile difineblas, ĉar firma limo ankaŭ inter simileco kaj arbitreco ne ekzistas. Ĉi tiu parenceco inter ikono kaj simbolo ebligas la fenomenon vidi la vortojn de la gepatra lingvo ikonoj, priskribita en 1.3.3.

## 1.2. Signoj laŭ sia konsisto povas esti *kontinuuaj* aŭ *diskretaj*

Kontinuuaj signoj ofte estas nomataj analogaj signoj, dum diskretaj signoj nomatas digitaj signoj. Preferindas nomi signojn *kontinuuaj* ↔ *dis-*

---

<sup>2</sup> „Da die *similitudo* keine Grenzen kennt, stehen auch der Metapher alle Möglichkeiten offen [...]” (Lausberg 1990: 285).

*kretaj*, kaj la paron *analog*a↔*digita* apliki por la kodoj, en kiujn ili organiziĝas. Laŭ tio kontinuaj signoj organiziĝas en analogan kodon, diskretaj signoj organiziĝas en digitan kodon. Kontinuaj signoj ne havas precizajn limojn, ili interpreteblas nur enkadre de iu hierarkio, karakterizata ne de opozicioj, sed de gradeco; diskretaj signoj havas siajn precizajn limojn, ili opozicias kun aliaj signoj, kaj ili estas bone interpreteblaj ankaŭ memstare, senkonsidere al aliaj signoj. Por kontinuaj signoj povas servi kiel ekzemploj analogaj horloĝoj aŭ ordinara frakcio, por diskretaj signoj digita horloĝo aŭ decimala frakcio.

Kontinuajn signojn karakterizas riĉeco, komplekseco je signifo (larĝa interpreteblo), samtempe malprecizeco pri semantiko kaj pri sintakso. Diskretajn signojn male, karakterizas malriĉeco je signifo, samtempe altgrada semantika precizeco kaj vasta sintaksa varieblo<sup>3</sup> (Chandler 2002: 47). Principe ikonoj, indicoj kaj simboloj povas esti egale kontinuaj aŭ diskretaj. Tamen ikonoj pli ofte estas kontinuaj, dum indicoj pli ofte diskretaj signoj; koncerne simbolojn tia dominanteco ne konstateblas: ili kun simila ofteco estas kontinuaj aŭ diskretaj signoj.

Grava diskretigo en la lingvoscienco estas la transiro de la akustikaj parolsonoj (studataj en fonetiko) al la fonemoj (studataj en fonologio). En la gamo de vokaloj [i – e – a] ekzistas fonetike, akustike nefinia nombro de vokalaj sonoj, priskribeblaj per la uzataj frekvencoj de la ondoj; en la gamo de vokalaj fonemoj kapteblaj per la homa orelo nur finia nombro – en la okazo de Esperanto la tri /i, e, a/, en la okazo de iuj aliaj lingvoj malpli (ekzemple nur /i, a/ aŭ pli, sed ĉiam nur finia nombro.

En la homa lingvo la skribeblaj lingvounuoj – parolsonoj, vortoj, frazoj – estas diskretaj signoj, dum intonacio, parolritmo ktp. kontinuaj signoj. Oni povas do diri, ke homa lingvo estas sistemo de heterogenaj signoj.

---

<sup>3</sup> „[...] the graded quality of analogue codes may make them rich in meaning but it also renders them somewhat impoverished in syntactical complexity or semantic precision. By contrast the discrete units of digital codes may be somewhat impoverished in meaning but capable of much greater complexity or semantic signification [...]”

### 1.3. Signifanto kaj signifato – bazaj terminoj enkondukitaj de Saussure

1.3.1. Saussure insistas, ke la vorto 'signo' estu konservata por nomi la tuton de la semantika procezo. Li demonstras, ke en tiu procezo fakte partoprenas du komponentoj. Unu komponento estas la koncepto, kiun ni havas en nia menso pri difinita objekto, kaj dua komponento estas la akustika bildo de la vorto, kiun ni aplikas al tiu objekto. La koncepton Saussure nomas 'signifato', la akustikan bildon 'signifanto' (Saussure 2005: 99). Koncepto kaj sono – t. e. signifato kaj signifanto – reciproke kaj nedisigeble ligiĝas unu al la alia, kiel ekz. du flankoj de paperfolio<sup>4</sup>. La terminoj 'signifanto' kaj 'signifato' havas longan antaŭhistorion: spuroj de la nocioj aperas jam ĉe Gorgio antaŭ 2500 jaroj, kaj mil jarojn poste Aŭgustino en la 3a kaj 4a libroj de sia verko „Pri la kristana doktrino” relative detale eksplikas pri la anatomio de la semantika procezo. La ligo inter signifanto kaj signifato estas arbitra, pro tio, kiel jam dirite supre, lingvo estas signosistemo *simbola*.

1.3.2. La signifo de la esperantaj vortoj originas el Universala Vortaro, en kiu aperas ekvivalentoj de la esperantaj vortoj en kvin lingvoj (franca, angla, germana, rusa, pola). Tiu difinmaniero de la signifatoj de la esperantaj signifantoj el praktika vidpunkto povis esti kontentiga, sed evidente ĝi implicis malcertecojn. La malcerteco kuŝas en tio, ke la semantika kampo de la kvin nacilingvaj ekvivalentoj ne estas la sama; la diferencoj montriĝas kaj rilate la denotaciojn, kaj rilate la konotaciojn. La diferencoj rilate denotaciojn povas aspekti ne signifaj, sed la konotaciaj diferencoj povas esti tre grandaj, kaj tiuj ĉi diferencoj re-efikas ankaŭ al la denotaciaj signifoj, ja la limoj inter denotacioj kaj konotacioj ne estas fiksaj. En la menso de la lingvouzantoj la du signifospecoj ne apartiĝas – ili daŭre interefikas kaj interludas. Tiamaniere la sama esperanta signifanto povas generi en la menso de la individuaj lingvouzantoj signifatojn tre diferencajn inter si.

---

<sup>4</sup> La langue est [...] comparable à une feuille de papier: la pensée est le recto et le son le verso; on ne peut découper le recto sans découper le verso [...] (Saussure 2005: 157)

1.3.3. Denaskaj uzantoj de lingvo emas vidi la vortojn de sia lingvo ikonaj. Ĉi ti fenomeno konstateblas precipe ĉe tiuj, kiuj ne ricevis gramatikan edukadon, kaj/aŭ ne konas/uzas alian lingvon krom la gepatra; tamen, iagrade tiu fenomeno aperas ĉe la plimulto de la lingvouzantoj, ankaŭ ĉe lingve edukitaj individuoj, se la lingva influo, kiu atingas ilin, estas dominante monolita – kaj finfine gravega plimulto de la homoj vivas en tia lingve monolita medio: en tiu de la gepatra lingvo. En tiuj lingvouzantoj formiĝas la impresoj, ke vortoj de ilia lingvo, la 'akustikaj bildoj' – *signifantoj* – similas al tio, kion ili signifas, t. e. al la 'konceptoj', do al la *signifatoj*. La kunaparteno de signifanto kaj signifato en la gepatra lingvo povas ŝajni memevidenta, natura, la signifanto virtuale identiĝas kun la signifato<sup>5</sup>, dum alilingva signifanto de la sama signifato povas aspekti stranga kaj nenatura. Ekzemple, la akustika bildo de la vorto 'leche' por denaska hispanlingvano povas esti kvazaŭ *simila* al la blanka likvaĵo, dum por denaska germanlingvano ĝi povas soni fremdece; similecon al la blanka likvaĵo tiu lasta trovas en la akustika bildo de la vorto 'Milch'. (Vidu pri tio ankaŭ 1.1.4.) La supre priskribita fenomeno estas karakterizaĵo ĉefe de la parola lingvofunkciado, sed ĉar akustikaj bildoj persiste akompanas ankaŭ la skriban lingvouzon (kaj skribadon, kaj legadon) en la formo de interna parolo aŭ apenaŭ voĉita parolo, ĉi tiu fenomeno ne limiĝas ekskluzive al la buŝa lingvouzo. La supre skizita 'ikonismo' – teorie nepre erara – lingvokoncepto servas kiel bazo por la romantisma literaturkoncepto, kiu hipotezas iaspecan organikan rilaton – kvazaŭan 'similecon' – inter signifanto kaj signifato, dum tiu rilato estas efektive arbitra.

Tiaspeca 'ikonismo' en la kazo de Esperanto-parolantoj ne povas formiĝi, pro almenaŭ tri kaŭzoj. Unue pro tio, ĉar Esperanto por la grandega plimulto estas lernita, do sekundara lingvo; due, ĉar eĉ por denaskaj esperantistoj la lingva medio ne estas monolite esperanta, ankaŭ ilin daŭre atingas alilingvaj influoj; kaj trie, ĉar en la tipa espe-

---

<sup>5</sup> Ong diras, ke en la primara parollingveco (historia epoko antaŭ la invento de skribo) „vortoj ne estas signoj” ('words are not signs' Ong 1982: 75), t. e. signifanto kaj signifato ne apartiĝas, signifanto estas mem la afero, kiun ĝi signifas.

ranta lingvouzado la proporcio de parola uzo grave postrestas al la skriba uzo, dum en la tipa nacilingva uzado estas inverse.

#### 1.4. Fonocentrismo, logocentrismo, grafocentrismo

La tri nocioj intime ligiĝas unu al la alia.

1.4.1. *Fonocentrismo* oni nomas la ideon pli alte taksi parolan lingvon ol skriban lingvon, nomante la unuan 'natura', la duan 'artefarita' (pri tio pli detale en la subĉapitro 1.). Fonocentrisma sinteno arkas el la fora pasinteco ĝis la 20a jarcento: ekde Platono tra Aŭgustino kaj Rousseau ĝis Saussure kaj Bloomfield, tamen mejloŝtono en ĝia historio estas romantismo, kiu kun ĝisnuna valideco metis ĝin en la centron de la Eŭropa publika pensado. Fonocentrismo memevidente metas en la centron de la lingvouzo la *personan ĉeeston*<sup>6</sup>, kaj tio laŭ postmodernismaj teoriuloj almenaŭ trimaniere ofendas la aŭtonomion de la teksto: unue per la uzo de eksterlingvaj komunikrimedoj (gestoj, mimiko ktp.); due, per la voĉado de la parolo, absolute ligita al la korpa ĉeesto (oni ĉi tie preteratentu teknikajn rimedojn, kiel telefono ktp.); kaj trie, per la neripetebleco, unikeco de la voĉa lingvouzo (dum skriba teksto estas fiksa kaj fidine ripetebla; ankaŭ ĉifoje oni ignoru teknikaj rimedojn).

1.4.2. La termino *logocentrismo* estis inventita de la germana germana filozofo Ludwig Krages (1872–1956) en la tria jardeko de la pasinta jarcento, por termini tiun sintenon, kiu metas en la *centron* de ĉiu teksto '*logos*', t. e. la sencoplenan, enhaviĉan vorton. Logocentrismo estas baza trajto de la okcidenta pensmaniero: sur ĝi bazas sin tiaj elementaj opoziciaj nocioparoj de la okcidenta kulturo, kiel *formo-enhavo*, *fenomeno-esenco*, *materio-spirito* ktp., en kiuj paroj prioritaton kaj preferon ĉiam ricevas la dua membro de la paro. Logocentrismo ŝuldas sian ekziston al la diferencigo inter signifanto kaj signifato, ja *logos* estas nenio alia, ol *signifato*, kaj logocentrismo iasence estas 'signifat-centrismo'.

---

<sup>6</sup> Derrida longe kaj pasie argumentas kontraŭ la "ĉeesto" en sia libro *La voix et la phénomène* ('La voĉo kaj la fenomeno', Paris: Presses Universitaires de France, 1967b).

Fonocentrismo estas naskanto de logocentrismo, ja en la parola lingvouzo signifanto – la prononcata vorto – forvaporigās tuj en la momento de sia naskiĝo, kaj en la menso de la aŭdintoj de la vorto postrestas nur la signifato. Tiu cirkonstanco de la parola lingvouzo aŭtomate donis prioritaton al la signifato, kaj direktis la atenton al ĝi, dum la efemera signifanto estis rigardata duaranga.

1.4.3. *Grafocentrismo* estas antonimo de fonocentrismo: ĝi signas sintenon, kiu taksas skribon pli alte ol parolon. Paralele kun la deklarita fonocentrismo, ne deklarita, praktika grafocentrismo vivas en la Eŭropaj socioj de post multaj jarcentoj, ja la plej gravajn aktojn de la homa vivo devige akompanas skribaj dokumentoj: naskiĝon, geedziĝon, morton. Kaj skribitaj estas ankaŭ ĉiuj reguloj – leĝoj – kiuj direktas nian vivon. Malgraŭ tiu praktiko la publika pensado pli alte taksas parolon ol skribon. Tiun ĝeneralan sintenon defiis Jacques Derrida, kiam en la lingvo mem li malkovris la latentan modelon de skribo, kreante la nocion *archi-écriture* ('pra-skribo'). Li priskribas homan lingvon kiel *specon de skribo*, argumentante, ke lingvo kun sia reguleco multe pli similas al la same regulita skribo, ol al la parola lingvouzo, en kiu svarmas senregulaĵoj, hazardaĵoj, spontaneaĵoj. Do, laŭ li skribo, malgraŭ sia ŝajna deriviteco, estas fakte la origina formo de lingvo, kaj la 'vulgara' skribo – li nomas per tiu termino la grafikan skribon, kiun ni konas – neniam povus naskiĝi, se la bazaj ecoj de skribo ne nestus en la lingvo mem jam ekde la komencoj<sup>7</sup>.

## 2. La paradigmo natureco ↔ artefariteco

Tiu paradigmo havas du aspektojn: laŭgenezan kaj semiotikan.

### 2.1. Laŭgeneze natura aŭ artefarita

Laŭ sia genezo *natura* oni nomas tion, kio estiĝis spontanee, sen konscia homa interveno, kaj *artefarita* tion, kies estiĝo ŝuldigas al konscia

---

<sup>7</sup> „Nous voudrions plutôt suggérer que la prétendue dérivation de l'écriture, si réelle et si massive qu'elle soit, n'a été possible qu'à une condition: que le langage «originel», «naturel», etc, n'ait jamais existé, qu'il n'ait jamais été intact, intouché par l'écriture, qu'il ait toujours été lui-même une écriture. *Archi-écriture* dont nous voulons indiquer la nécessité et dessiner le nouveau concept; et que nous ne continuons à appeler écriture que parce qu'elle communique essentiellement avec le concept vulgaire de l'écriture” (Derrida 1967a: 82–83).

homa ago. Ordinare 'natura' oni nomas ies originan, primaran formon. Io natura povas esti nur konkreta, jam pro tio, ĉar io abstrakta povas estiĝi nur rezulte de abstraktado, kaj abstraktado estas nepre konscia homa ago. En la laŭgeneza aspekto la nocioj natureco kaj artefariteco formas opozician paron, kaj ili ekskludas unu la alian: io estas aŭ natura, aŭ artefarita.

## 2.2. Laŭkonsiste natura aŭ artefarita

Naturecon aŭ artefaritecon oni konstatas ne nur laŭ la genezo, sed ankaŭ laŭ la konsisto de la aferoj. Tion, kion ni spertas *kontinua*, ni trovas 'natura', kaj male, tion kion ni spertas *diskreta*, ni trovas malnatura, 'artefarita'. Tiu juĝo rilatas ankaŭ signojn: kontinuajn signojn ni trovas naturaj, diskretajn signojn ni trovas artefaritaj. Homo havas klaran preferon por kontinueco: tiu favoro al kontinueco verŝajne radikas en la ribelo de romantismo kontraŭ raciismo antaŭ ducent kaj iom da jaroj<sup>8</sup>. En la semiotika aspekto, kontraste al la laŭgeneza aspekto, ne funkcias ekskluda opozicieco: en iu aĵo povas miksiĝi kontinuaj kaj diskretaj elementoj, kaj pro tio ni povas trovi ĝin parte natura, parte artefarita. La romantisma koncepto kaj sinteno pri natureco kaj artefariteco bele reliefigas en la *Eseo pri la origino de lingvoj* de Rousseau; oni povas diri, ke tiu sinteno ĝis nun regas la publikan pensadon pri lingvo, kaj la rifuzoj al Esperanto kiel artefarita lingvo radikas ĉefe en tiu romantisma sinteno.

## 2.3. Prioritato de la artefarita skribo

Tiam, kiam Derrida kreis la nocion de 'pra-skribo', li fakte rifuzis la logike nemotiveblan homan inklinon al natureco. La nocio 'pra-skribo', difinanta la esencan karakteron de lingvo, implicas la aserton, ke lingvo montras esence artefaritan karakteron. En sia argumentado Derrida – citante Saussure, kaj diskutante kun li – foje aludas ankaŭ al Esperanto: „La perverseco de artefariteco generas monstrojn. La skribo, kiel ĉiuj artefaritaj lingvoj, kiujn oni volas fiksi kaj abstrakti el

<sup>8</sup> 'We have deep attachment to analogical modes...[...]... The analogue–digital distinction is frequently represented as »natural« versus »artificial«. The privileging of the analogical may be linked with the defiance of rationality in romantic ideology (which still dominates our conception of ourselves as »individuals«).' (Chandler 2002: 45)



la vivanta historio de la naturaj lingvoj, estas partoprenanto de la monstreco. Ĝi estas devio disde la naturo. [Ĝis ĉi tie Derrida citas/resumas la opinion de Saussure.] La karakteristiko de Leibniz kaj Esperanto ĉi tie estus rigardataj samkategoriaj aferoj<sup>9</sup>”. Derrida, pledante por la prioritato de la artefarita skribo, pledas ankaŭ por la artefariteco ĝenerale. Li argumentas por la malkonstruo de la piedestalo, kiun romantismo konstruis por natureco.

### **3. La paradigmo parolo ↔ skribo**

Tiu ĉi paradigmo havas certajn evidentajn paralelojn kun la paradigmo natureco ↔ artefariteco. Parolon oni emas taksi afero natura, dum skribo por la plej multaj el ni ŝajnas esti artefarita. (Per tio mi ne kontestas la eblon, ke por iu la propraj alfabeto kaj ortografio aspektu naturaj, kvazaŭ similaj al la vortoj, kiujn ili registras, dum aliaj alfabetoj aŭ ortografioj ŝajnu nenaturaj; iom simile al la ikonisma sinteno rilate la gepatran lingvon – vidu 1.3.3.)

#### **3.1. Parolo: vivofunkcio**

Tio, ke parolon oni trovas natura, fontas el pluraj faktoj. Unue el tiu fakto, ke parolo estas la produkto de nia korpo, kaj tial ĝi estas interpretebla ankaŭ kiel vivofunkcio de la homo, kaj vivofunkcio estas memkompreneble io natura (parolan lingvouzon alproprigas sen konscia klopodado ĉiu homa individuo, esceptiĝas nur suferantoj pro certaj mensaj aŭ korpaj malsanoj); due el tiu fakto, ke parolo efektive estas la primara formo de lingvo; kaj trie, sed ne laste el tiu fakto, ke voĉa lingvo montras abundajn trajtojn de kontinueco (intonacio, parolritmo ktp. estas tipe kontinuaj signoj), kaj kontinuecon oni emas identigi kun natureco, kiel tio estis jam aludita sub punkto 2.2.

#### **3.2. Skribo: diskreta fenomeno**

Skribo, kontraste al parolo, aperas por ni ne kiel natura, sed plie kiel artefarita fenomeno. Ties kaŭzo ankaŭ fontas el pluraj faktoj. Unue el

---

<sup>9</sup> „La perversion de l'artifice engendre des monstres. L'écriture comme toutes les langues artificielles qu'on voudrait fixer et soustraire à l'histoire vivante de la langue naturelle, participe de la monstruosité. C'est un décart de la nature. La caractéristique de type leibnizien et l'espéranto seraient ici dans le même cas.” (Derrida 1967a: 57)

tiu fakto, ke skribo estas homa invento, ĝia alproprigo postulas longdaŭran konscian klopodadon, kaj signifa parto de la homoj neniam alproprigas ĝin, tamen tiuj ne-alproprigintoj neniam estas rigardataj malsanuloj (dum jes ja, nehavantoj de parolkapablo estas rigardataj malsanaj). Due el tiu fakto, ke skribo efektive estas sekundara formo de lingvouzo. Trie, skribo (almenaŭ alfabetita skribo) estas nete diskreta fenomeno: el la lingvaj signoj ĝi kapablas fiksi nur la diskretajn elementojn (parolsonojn, vortojn, frazojn ktp.), sed ne – aŭ nur tre nekomplete – la kontinuajn elementojn (intonacion). Resume: kontraste al parola lingvofunkciado, nomata natura, skribo estas esence artefarita. Ong diras: „Skribo estas teknologio. [...] Kontraste al la natura, buŝa parolo, skribo estas komplete artefarita. Ne eblas skribi 'nature'<sup>10</sup>”. Tiu ĉi cirkonstanco estas multe pli grava, ol ĝi ŝajnas esti unuavide.

### 3.3. Skribo transformas la lingvon

La artefarita skribo signife transformas la lingvon; la specifaj manieroj de la skribaj tekstoj refasonas ankaŭ buŝan lingvouzon. „Post la naskiĝo de skribo buŝa lingvo neniam plu estis la sama<sup>11</sup>” – skribas Ong. Kaj vere ĝi ne estis la sama. La daŭre kreskanta prestiĝo de skribo forte influas la parolan lingvo. Ĉar skribo ne kapablas registri intonacion, la pli frue variaj frazmelodioj de la parola lingvo griziĝas, paliĝas. Rimarkeblas, ke tiuj lingvoj, kiuj posedas pli longtempan kaj socie ampleksan skriban uzon, nuntempe estas akustike malpli riĉaj, ol tiuj, inter kies uzantoj socie ampleksa skribouzo disvolviĝis nur pli malfrue<sup>12</sup>. La antaŭskriban epokon karakterizas relative malgranda nombro de vortoj, kiuj ĉiuj posedas aron da signifoj, ne klare konturitaj: la parolsituacio, la eksterlingvaj komunikrimedoj (mimiko, gestoj ktp.) kaj la intonacio en la buŝa lingvofunkciado ĉiam eviden-

<sup>10</sup> „Writing is a technology. [...] By contrast with natural, oral speech, writing is completely artificial. There is no way to write 'naturally' (Ong 1982: 81–82).”

<sup>11</sup> 'after writing [...] oral speech was never the same' (Ong 1977: 87).

<sup>12</sup> Nuntempa angla aŭ germana buŝa lingvouzo estas akustike malpli modulita, ol ekzemple la rusa, hispana aŭ itala. Ĉe la itala diferencoj rimarkeblas eĉ laŭ regionoj. En la nordaj regionoj (ekz. en Piemonto), en kiuj uzado de skribo disvastiĝis relative frue, oni parolas malpli melodie, ol en la sudaj regionoj (ekz. Kalabrio), en kiuj skriba kulturo eĉ nun havas malpli profundajn radikojn.

tigas, kiu el la pluraj signifoj de la prononcita vorto aktuale komprenendas. En skribo mankas tiuj eksteraj helpiloj, tial la kompleksaj vortsignifoj displitiĝas, naskiĝas por ĉiu klare konturita signifero aparta vortoformo, tiel do skribo kreskigas la vortonombro de ĉiu lingvo. La kreskado akompanas la disvastiĝan procezon de skribo: la 15 310 vortan dramon *Cid* de Racine konsistigas 1 488 leksemoj, en samampleksa nuntempa franca dramo ni trovas minimume 2 500 diversajn leksemojn (Guiraud 1956: 12). Kaj iom post iom tiuj novaj vortoformoj eniras ankaŭ la parolan lingvo. Skribo influas ankaŭ la sintakson. En la buŝa lingvouzo abundas kunordigitaj propozicioj, kiujn plej ofte kunligas la konjunkcio 'kaj' – ili ne ŝarĝas multe la memorkapablon, ja ĉiam sufiĉas koncentriĝi nurnure al la ĝuste prononcata propozicio, ĉar ĉiu propozicio estas semantike memstara, ne ekzistas inter ili kompleksa interdependeco. Uzado de subordigitaj propozicioj – en kiuj propozicio esprimas iun frazelementon de la ĉefpropozicio – aperas unue en la skriba lingvo. En la kazo de subordigitaj propozicioj kompreno eblas nur ĉe samtempa konsidero de minimume du propozicioj (de la aktuale prononcata propozicio kaj de la ĉefpropozicio) – tamen tio ne ŝarĝas la memorkapablon, ja la skribita teksto daŭre staras antaŭ la okuloj de la leganto. Post certa tempo subordigitaj propozicioj, naskiĝintaj en la skriba lingvo, aperas ankaŭ en la parola lingvouzo.

### 3.4. Esperanto naskiĝis skribe

En tiu cirkonstanco kuŝas la plej signifa diferenco inter Esperanto kaj la etnaj lingvoj. Skribo ja ne registras la tuton de la lingvo, nur ian subtrahaĵon de ĝi. Literoj ne enhavas la plenan kvalitaron de la prononcendaj parolsonoĵoj, ili nur memorigas pri tiuj<sup>13</sup>, ili nur mobilizas la arsenalon de la akustika memoro, kiun konstruis, plenigis kaj riĉigis la ĉiutaga parola uzado de la lingvo. En Esperanto tiu ĉi akustika fono estas malpli firma, malpli evidenta. La unuaj parolaj uzantoj mem devis krei ĉi tiun fonon, kvazaŭ el nenio. Ili devis vesti per karno skeleton, ili devis doni radikojn al ekpompanta floro. Tiun ĉi akustikan fonon kompreneble ni jam havas, sed ni devas konscii, ke ĝi estas

<sup>13</sup> „The alphabet was and is an instrument of acoustic recognition, and only that” (Havelock 1982: 318).

iom magra, malstabila, kaj malhavas tiun fortan memevidentecon, kiun posedas la akustikaj lingvofonoj de etnaj lingvaj. Pro la esence diferenca funkciomodelo de Esperanto ĝia akustika lingvofono neniam povos atingi tiun de la etnaj lingvoj.

Pro la sekvaj kaŭzoj ajna lingvoteorio aŭ literaturkoncepto, staranta sur fonocentrisma kaj logocentrisma bazo, ĉiam trovos Esperanton kaj esperantan literaturan tekston ne plenvalora. La emancipiĝo de Esperanto kaj esperanta literatura teksto imageblas nur enkadre de tiaj teorioj, kiuj unuflanke rifuzas fonocentrismon (kaj kune kun ĝi ankaŭ logocentrismon), aliflanke aprezos la specifajn kvalitojn de skribo.

#### **4. Ni revuu lingvoteoriojn**

Ekzistas du bazaj lingvoteorioj, kiuj unuavide plene opozicias unu la alian: la Kartezia lingvoteorio, kaj la teorio pri lingva relativismo de Sapir kaj Whorf.

##### **4.1. La Kartezia lingvoteorio**

La tradicia lingvoteorio de la Eŭropa kulturo ligiĝas al la nomo de la franca filozofo René Descartes (latina nomo Cartesius, esperantigite Kartezio; 1596–1650), kiu en la 17a jarcento fakte nur formulis tiun lingvokoncepton, kiu ekde la antikveco regis la Eŭropan pensmanieron pri lingvo. La kerno de tiu ĉi lingvoteorio estas la jena: pensoj povas naskiĝi sen kaj sendepende de lingva formulado, kaj la tiel naskiĝintaj pensoj *povas poste ricevi* lingvan veston, sed *ne nepre ili ricevas* tion. Tiu ĉi lingvoteorio enhavas plurajn implicojn, kies verecon de tempo al tempo pridubas iuj filozofoj kaj lingvistoj. La unua tia implico estas tio, ke lingva signo – signifanto – estas travidebla, kvazaŭ neŭtrala, ĝi peras la signifaton firme, kun precizaj konturoj, lasante nenian dubon, ne nur ĉe denotacioj, sed ankaŭ ĉe konotacioj. Laŭ la Kartezia koncepto lingvo estas nura komunikada, reflektita ilo, nura *perilo* de la pensoj, kaj ĝia konstruo spegulas, mapas la arkitekturon de la perataj pensoj. Fakte el tiu ĉi implico sekvas ankaŭ alia, nome tio, ke lingva signo ĉiam konfidine referencas al la elementoj de realo. Kartezia lingvoteorio estas la bazo de neta diferencigo inter signifanto kaj signifato, bazo de la pensmaniero kiu donas nepran

prioritaton al la signifato, sekve ĝi estas ankaŭ bazo de logocentrismo, kiu estas – kiel jam montrite supre – 'signifat-centrismo'.

Oni opinias, ke Kartezian lingvokoncepton generis la sonregistra, alfabeto skribosistemo per tio, ke ĝi donis aŭtonoman, kvazaŭ palpeblan kaj daŭran ekziston al la signifanto, klare apartigante ĝin disde la signifato – antaŭ la invento de skribo pro la efemera ekzistotempo de la prononcata vorto signifanto kaj signifato kvazaŭ kunfandigis, signifato kvazaŭ ensorbis la signifanton.

Kartezia lingvoteorio influas la juĝon pri Esperanto esence negative ĉefe pro tiu implico, kiu hipotezas firman, konturitan rilaton inter signifanto kaj signifato ne nur koncerne denotaciojn, sed ankaŭ konotaciojn. Por la kritikantoj de Esperanto estas facile demonstri, ke tiu rilato inter signifanto kaj signifato en Esperanto estas malpli firma, ol en la etnaj lingvoj. Tio estas aparte okulfrapa fenomeno ĉe konotacioj: uzon kaj interpreton de konotacioj ĉe la plej multaj uzantoj de Esperanto sendube influas la gepatralingva semantika grundo. Do, resume: Kartezia lingvoteorio esence estas 'signifat-centrismo', logocentrismo. En Esperanto signifanto estas egale firma, kiel en etnaj lingvoj, sed signifato montras – ĉefe ĉe konotacioj – mapli klarajn konturojn, ol en tiuj lastaj: tial personoj, kiuj staras sur la bazo de Kartezia lingvotologio, necese juĝas pri Esperanto negative.

Kartezia lingvoteorio ĝis nun firme regas la publikan pensadon pri lingvo, kio tute ne estas mirinda, ja ĝiaj bazoj estas samtempe ankaŭ pilieroj de la okcidenta kulturo.

## 4.2. Lingva relativismo: la lingvoteorio de Sapir kaj Whorf

La lingvoteorio de Edward Sapir (1881–1939) kaj Benjamin Lee Whorf (1897–1941), kiun ordinare oni nomas 'hipotezo', rekte opozicias al la Kartezia koncepto. Ĝi formuliĝis nur meze de la dudeka jarcento, tamen ĝi ne malhavas antecedentojn: el tiuj antecedentoj elstaras la instruoj<sup>14</sup> de la germana lingvisto Wilhelm von Humboldt pri tio, ke lingvo estas ne finita produkto ('ergon'), sed ĝi estas plie la funkciado mem ('energeia').

---

<sup>14</sup> Ili estas eksplikitaj ĉefe en: *Über die Verschiedenheit des menschlichen Sprachbaues und ihren Einfluss auf die geistliche Entwicklung des Menschengeschlechts* (Berlin 1836).

La bazajn tezojn de lingva relativismo unuafoje formulas en sia studo Edward Sapir (Sapir 1929). La teorion detale eksplikas lia studento, Benjamin Lee Whorf. Li skribas interalie, ke lingvo „ne estas nure reproduktilo por esprimi pensojn, sed multe pli ĝi estas formanto de la pensoj [...] Ni dissekcas, kategorias la elementojn de la naturo laŭ tio, kiel tion skizas por ni nia gepatra lingvo<sup>15</sup>”. Lingvoj genealogie aŭ geografie proksimaj unu al la alia, aŭ kulture kunligitaj faras tiun dissekcadon laŭ tre simila (tamen ne sama!) maniero. Tia simileco konstateblas ĉe la Eŭropaj lingvoj: tiun similecon nomas Whorf *'Standard Average European'*. Esence ankaŭ Esperanto sekvas tiun averaĝan Eŭropan modelon.

Estas videble, ke lingva relativismo asertas plene la kontraŭon de tio, kion diras karteziismo. Karteziismo atribuas prioritaton al la pensado, dum lingva relativismo atribuas prioritaton al la lingvo.

La tezon de lingva relativismo pri la prioritato de la lingvo subtenas ankaŭ vico da tezoj lingvofilozofiaj kaj komunikadteoriaj – estas tre surprize, ke iliaj aŭtoroj neniam referencas, eĉ aludetas al la hipotezo de Sapir kaj Whorf, kvankam la nomitaj lingvofilozofiaj kaj komunikadteoriaj tezoj diras esence la samon, kion asertas lingva relativismo; aliflanke, ŝajne ankaŭ Whorf ne scias pri la ekzisto de tezoj tre parencaj al la lia. Jen, kelkaj el tiuj tezoj. Ludwig Wittgenstein (1889–1951) asertas, ke „ni ne povas esprimi per la lingvo tion, kion la lingvo mem esprimas” (Wittgenstein 1963: 34). Aliloke li diras la jenon: „Lingvo vestas la penson per maskovesto. Ĝi faras tion tiel, ke oni ne povas dedukti laŭ la ekstera formo de la vesto pri la formo de la vestita penso, ĉar la ekstera formo de la vestaĵo estis fasonita tute ne por fari rekonebla la formon de la korpo” (Wittgenstein 1963: 26). Martin Heidegger (1889–1976) sentencas, ke „La lingvo parolas, ne la homo. Homo parolas nur tiagrade, kiagrade li adaptiĝas al la lingvo”<sup>16</sup>. Heidegger aliloke: „La lingvo parolas. La lingvo mem parolas al ni en

<sup>15</sup> „[...]is not merely a reproducing instrument for voicing ideas but rather is itself the shaper of ideas. . . [...] We dissect nature along lines laid down by our native languages” (Whorf 1956: 212–214).

<sup>16</sup> „Die Sprache spricht, nicht der Mensch. Der Mensch spricht nur, indem er geschickt der Sprache entspricht” (Heidegger 2000: 79) .

la rakontitaĵoj<sup>17</sup>”. Derrida kvazaŭ daŭrigas ĉi tiun vicon de konstatoj – harmoniaj inter si, sed tute sendependaj unu de la alia –, kiam li diras, ke „ekzistas nenio ekster la teksto<sup>18</sup>”, t. e. ne ekzistas referencaĵoj kaj signifatoj, ekzistas nur signifantoj, kiuj – nurnure ili! – konstituas la tekston. McLuhan ampleksigas la validecon de tiu ĉi lingvokoncepto ankaŭ al aliaj periloj, kiam jam en la titolo de la unua ĉapitro de sia libro li asertas, ke „la perilo estas mem la mesaĝo<sup>19</sup>”. Ĉiukaze, estas fakto minimume tre atentinda, ke alfrontante la demandon pri pensado kaj lingvo, diversaj sciencoj alvenas esence al la sama konkludo.

En la teorio/hipotezo pri lingva relativismo kuŝas latent, kiu ebligas interpreton favoran por Esperanto. Lingva relativismo atribuas prioritaton al la lingvo, al la lingva elemento, do al la signifanto. Se Kartezia lingvoteorio estas logocentrisma, 'signifat-centrisma', do lingva relativismo estas iasence 'signifant-centrisma'. Se en la signifadprocezo prioritaton kaj emfazon havas signifanto, Esperanto povas havi nenian malavantaĝon kompare al etnaj lingvoj. Se la signifanto kreas la signifaton (kaj ne inverse) tiam la funkciado de Esperanto estas absolute la sama, kiel tiu de la etnaj lingvoj.

### 4.3. Du teorioj

Povas lanĉiĝi la demando, kiu el la du lingvoteorioj estas la ĝusta? Kiu el la du kaptas kaj respegulas la veran naturon de la lingvo? Oni ne povas dubi, ke la du teorioj laŭ formallogika rezonado ekskludas unu la alian. Tamen, samtempe ni spertas, ke iuj fenomenoj de la funkciado de lingvo priskribeblas kaj interpreteblas per la Kartezia teorio, dum aliajn lingvouzajn fenomenojn ni povas priskribi kaj interpreti pere de la teorio pri lingva relativismo. Malgraŭ ĉiaj logikaj rezonadoj ambaŭ teorioj ŝajnas esti ĝustaj, pravaj. Kiel tio eblas? Verŝajne tiel, ke neniuj el la du teorioj sukcesas kompreni la veran naturon de la homa lingvo – tio ĝis nun restas kaŝita por ni.

---

<sup>17</sup> „Die Sprache spricht. Das Sprechen spricht für uns im Gesprochenen” (Heidegger 2000: 107).

<sup>18</sup> „Il n’y a pas de hors-texte” (Derrida 1967: 227). Aliloke li ripetas tion: „Il n’y a rien hors du texte” (Derrida 1972: 42).

<sup>19</sup> „The Medium Is the Message” (McLuhan 1964).

Momente ni devas kontentiĝi per tio, ke gravan plimulton de la lingvofunkciaj fenomenoj eblas priskribi kaj interpreti ĉu per unu, ĉu per alia teorio, kaj la malkovro de la vera naturo de la homa lingvo restos kiel tasko por la lingvistoj de la estontaj generacioj.

Tre similan kazon montras por fizikistoj la naturo de lumo. Pri tio ekzistas same du teorioj. Unu teorio diras, ke lumo havas korpuskan karakteron, laŭ alia teorio lumo estas ondo. Iuj lumfenomenoj priskribeblas kaj interpreteblas per la korpuskla teorio, dum aliaj fenomenoj per la onda teorio. Ĉiukaze, gravan plimulton de la lumfenomenoj eblas priskribi kaj interpreti per unu el la du teorioj. Kiu el la du teorioj estas la ĝusta? Fakte tio estas neinteresa demando. Ne temas pri vero de teorioj, sed pri taŭgeco de matematikaj modeloj: por iuj fenomenoj unu el la du modeloj, por aliaj la alia modelo plej bone taŭgas por homa kompreno, por pedagogiaj priskriboj kaj prognozoj.

## **5. Ni revuu literaturkonceptojn**

Sub la termino 'literaturo' ĉi tie ni komprenos beletron, t. e. fikciajn prozajn tekstojn kaj poezion. En la ĉiutaga praktika vivo ĝenerale bone ni scias, kio estas literaturo, tamen doni precizan difinon mal-facilas. Kaj ni devas konscii, ke la konceptoj pri literaturo tra la jarmiloj, jarcentoj signife ŝanĝiĝis kaj ŝanĝiĝas.

### **5.1. Tradiciaj literaturkonceptoj**

*5.1.1. Fruaj literaturkonceptoj.* Klara apartiĝo de beletro disde aliaj tekstoj okazas fine de la epoko de klerismo, dum la dua duono de la 18a jarcento. Ĝis tiu tempo ĉio skribita estis rigardata literaturo, sendepende de tio, ĉu temis pri fikcia aŭ nefikcia teksto. Indas noti, ke la senkaŝa fikcieco aperas nur en tiu ĉi tempo, pli frue la aŭtoroj de fikciaj tekstoj provis prunti verecon kaj realecon al sia verko, referencante al trovita taglibro, al rakonto de travivinto de la prezentita historio ktp. Necesas aldoni, ke klasiĝis literaturo nur tio, kio estis skribita. Buŝe rakontitaj tekstoj, ekzemple popolfabeloj, ĝis la fino de la 18a jarcento restis sub la t. n. literatur-sojlo, t. e. ili ne estis rigardataj literaturo



La klaran separiĝon de tekstoj fikciaj kaj nefikciaj verŝajne eldevigis la rapida kresko de la nombro de libroj: taŭga orientiĝo inter la libroj necesigis ian bazan kategoriadon.

*5.1.2. Mimetismo.* La malnovgrekaj vortoj *μίμησις* (*mímēsis*) *μιμέομαι* (*miméomai*) origine signifas 'imito', respektive 'mi imitas', sed oni povas ĝin kompreni ankaŭ 'reprezento', 'respegulo', 'mi prezentas', 'mi respegulas'. Ili estas la bazo de tiu literaturkoncepto, kiun eksplikas Aristotelo en sia *Poetiko*. La greka filozofo trovas, ke la tasko de la arto – sekve ankaŭ tiu de la literaturo – estas imiti, reprezenti, respeguli la realan mondon. Tiu ĉi postulo montriĝis treege temprezista: kun malmulte ŝanĝiĝintaj emfazoj kaj etaj modifoj la Aristotela koncepto vivas ĝis nun. La unuajn fendojn en la marmortrono de mimetismo kaŭzis romantismo, kiu donis vastan terenon al fantazio. La detronigon de mimetismo plenumis postmodernismo en la dua duono de la dudeka jarcento, kiam ĝi pridubis la eblon referenci al la reala mondo per elementoj de la lingvo, t. e. per vortoj. Oni povas diri, ke tiu detronigo ĝis nun ne estas plena, ja en la publika pensado pri literaturo mimetismo ankaŭ nuntempe havas firmajn poziciojn.

Mimetisma literaturkoncepto esence staras sur la bazo de Kartezia lingvoteorio, ĝia sinteno estas logocentrismo. La pretendo imiti, reprezenti, respeguli la realan mondon implicas la kredon pri tio, ke la objektoj, personoj kaj fenomenoj de la reala mondo fidine estas referenceblaj per la vortoj de la homa lingvo. Mimetismo trovas mem-evidenta tion, ke al ĉiu signifanto apartenas klare konturebla signifato, kaj inverse, por ĉiu signifato troveblas adekvata signifanto. Laŭ mimetismo la esenca celo kaj tasko de literaturo estas la vera, fidela kaj nuancoriĉa imitado, respegulado de la reala mondo, la tasko de la signifantoj – la vortoj de la literatura teksto – estas elvoki en la leganto klare konturitajn signifatojn. En tiu senco mimetismo estas literaturkoncepto signifat-centrismo, ĝisoste logocentrismo.

*5.1.3. Romantismo.* La romantismo refreŝigis la literaturkoncepton de klasikismo per du novaj trajtoj. La unua novigo estis tio, ke en la skribaj beletraj tekstoj resurektas la karakterizaj trajtoj de la buŝa lingvofunkciado, kaj ili fariĝas ĉefaj valorkriterioj; la dua novigo estis

la kulto de originaleco. La du novigoj, je la unua vido sendependaj unu de la alia, fakte havas organikan interdependecon. Klasikismo preferis kaj aprezis regulecan, konscie konstruitan, zorge poluritan, perfekte harmonian, moderan stilon, kiu per mil fadenoj ligiĝis al la skriba lingvouzo. Spitante la klasikisman estetikon, romantismo preferas kaj aprezas la spontaneecon de la parola lingvouzo, trovante ĝin ankaŭ natura, kontraste al la artefarita perfekteco de la klasikisma idealo.

La kulto de originaleco kvazaŭ memevidente ligiĝas al la aprezo de la spontanea parola lingvo. La prefero de la parola lingvo sendube radikas en la jam en sekcio 2.2 referencita eseo de Rousseau pri la origino de lingvoj. Tiu prefero aperas en pluraj verkoj en klara, eksplicita formo; ekz. en la antaŭparolo de *Lirikaj baladoj* de Wordsworth kaj Coleridge (1798) – poemaro rigardata kiel unu el la uverturoj de la romantismo – oni povas legi, ke la poemoj en tiu ĉi libro estas eksperimento pri tio, kiel la konversacia lingvo de la mezaj kaj subaj sociaj klasoj uzeblas por poeziaj celoj<sup>20</sup>.

En la romantisma literaturkoncepto la akustika kvalito de literaturo verko daŭre estas unu el la ĉefaj valorkriterioj. En sia fama eseo (*Kiel estis farita la „Palto” de Gogol?*) Boris Eichenbaum (1886–1959) detale demonstros, kiel zorge atentis Gogol pri la akustiko de sia teksto (Eichenbaum 1919). Tiu insisto pri la akustika aspekto de la tekstoj en la epoko de Gogol povas ŝajni minimume stranga. Ja en tiu tempo literaturaj verkoj kreiĝis per silenta skribado, kaj ili estis legataj same silente<sup>21</sup>: do la grava plimulto (precipe la longaj prozaĵoj) de la romantisma epoko neniam gajnis akustikan konkretiĝon, t. e. tiuj tekstoj neniam estis laŭtlegitaj, tial ilia akustiko povis esti nur virtuala. Tamen la akustika valorkriterio, enkondukita de la romantismo, montriĝis daŭra kaj ĝi grave postvivis romantismon. La franca verkisto

---

<sup>20</sup> „The majority of the following poems are to be considered as experiments. They were written chiefly with a view to ascertain how far the *language of conversation* in the middle and lower classes of society is adapted to the purposes of poetic pleasure.”

<sup>21</sup> En la komencaj tempoj de la skriba kulturo homo legis ankaŭ por si mem laŭte. Ekzemploj de silenta legado estis notitaj jam ankaŭ en la antikveco, sed ĝi fariĝis ĝenerala nur fine de la 18a jarcento. Pri tio legu pli detale ĉe Balogh 1926.

Marcel Proust komence de la dudeka jarcento ne malpli ol Gogol zorgis pri la eŭfonio de siaj frazoj, kaj la kritiko multe aprezis tion.

La emfazo de la akustika vidpunkto malgraŭ la ne kontestata belsoneco de Esperanto ne utilas al la prijuĝo de la esperanta literatura teksto. Esperantlingva skribita teksto neniam povas havi tiel vastan kaj profundan akustikan fonon, kian havas etnolingvaj skribitaj tekstoj, ja en etnaj lingvoj la parola lingvouzo konsistigas minimume 90 procentojn de ĉiuj lingvouzoj, kaj restas maksimume 10 procentoj por skribo/lego, dum en la kazo de Esperanto tiu proporcio probable estas inversa. Tial ĉe esperanta skribita teksto la akustika akompanaĵo estas malpli firma, malpli konturita, malpli emfaza.

Malgraŭ sia emfaza fonocentrismo, romantismo ŝancelis la pli frue ŝtalfirmajn poziciojn de logocentrismo. La naskiĝanta kulto de originaleco donas pli da libero al la fantazio, kaj rezulte de tio la signifato iom perdas el sia konturiteco kaj pezo, do iomete da emfazo el ĝi transmetiĝas al la signifanto. Oni povas diri, ke romantismo rimarkinde kreskigas la pezon kaj gravecon de la vortoj.

*5.1.4. Enhavo kaj formo.* Ĉi tiun opozician nocioparon naskis logocentrismo, kaj la Eŭropa pensado ĉiam donis prioritaton kompreneble al *enhavo*. Tamen, koncerne literaturajn (ĉefe poeziajn) tekstojn jam ankaŭ en la antikveco lanĉiĝis formaj konsideroj, eĉ se tiuj estis grandparte metrikaj kaj stilaj. Kun la paso de la tempo ĉiam pli oni konsciis pri tio, ke ĉe certaj tekstoj la allogeco, la legindeco fontas malpli el la signifo de la vortoj, sed plie el ties formo kaj kombiniĝo.

En la unua duono de la 20a jarcento aperas pluraj skoloj kaj tendencoj, kiuj celas malkovri la formajn principojn, laŭ kiuj konstituiĝas literatura teksto. (Estas interesa fenomeno, ke tiuj skoloj kaj tendencoj elkreskas ĉefe el slava grundo, sufiĉas vicigi nur la ĉefajn nomojn, por vidi tion: Viktor Ŝklovskij, Miĥail Baĥtin, Roman Jakobson, Jan Muĉkařovský, René Wellek, kaj poste Tzvetan Todorov, Julia Kristeva ktp.) Ĉiuj tiuj skoloj kaj tendencoj vidis – kontraste al la pli fruaj psikologiaj kaj sociologiaj aliroj – en literaturaj verkoj antaŭ ĉio lingvan produkton. Tio signifas, ke la atento daŭre estis transmetiĝanta de la signifato al la signifanto.

## 5.2. Postmodernismo

5.2.1. Kiel turnopunkton en la procezo de la transmetiĝo de la atento disde la signifato al la signifanto oni vidas en la apero de la libro *Pri gramatologio* (*De la grammatologie*) de Jacques Derrida (1967a). La konstatoj de tiu libro havis enorman efikon, kaj ĝis nun ili baze difinas la pensmanieron pri la funkciado de literatura teksto. Per unusola movo li renversas samtempe du plurjarmilajn bazajn dogmojn de la Eŭropa pensado. La unua tia dogmo estas logocentrismo, kies bazo estas la hipotezita prioritato de signifato. Derrida nomas la signifaton transcenda, ĉar ĝia ekzisto ne estas pruvebla per la sensoj, kaj samtempe asertas, ke firman ekziston havas nur signifanto, kiu efektive mem produktas sian signifaton. Signifo ne estas 'perata' al ni, ĝin ni mem kreas aktive konforme al la kompleksa interludo de kodoj kaj konvencioj, eĉ se ni ne konscias pri tio<sup>22</sup>. Do, Derrida ne kompromisas inter signifato kaj signifanto, kiel tion faris la literaturteoriaj skoloj de la unua duono de la dudeka jarcento, sed plene submetas signifaton al signifanto; tiu submetiteco estas speco de kunfandigo, ne-plu-diferencigebleco. „La reprezentado kunfandigas kun la reprezentato, tiom, ke ni parolas tiel, kiel ni skribas, kaj ni pensas, ke la reprezentato estas nura ombro aŭ respugulaĵo de la reprezentanto. [...] En ĉi tiu ludo de reprezentado la originpunkto fariĝas nekaptebla. Estas aferoj, akvosurfacoj kaj bildoj, senfinaj referencoj de unu al la alia, sed ne plu ekzistas fonto. Ne plu ekzistas simpla origino<sup>23</sup>”.

La alia dogmo, kiun Derrida detruas, estas la prioritato de parolo antaŭ skribo. Li trovas, ke la koncepto de skribo nestas en la lingvo mem jam ekde la komencoj de la lingva ekzistado, kaj la grafika skribo, kiun ni konas, povis inventiĝi nur tial, ĉar skribo ekzistis latente ene de la lingvo jam antaŭe, kiel 'pra-skribo' (archi-écriture).

---

<sup>22</sup> „Meaning is not 'transmitted' to us – we actively create it according to a complex interplay of codes or conventions of which we are normally unaware” (Chandler 2000: 14).

<sup>23</sup> „La représentation s'enlace à ce qu'elle représente, au point que l'on parle comme on écrit, il pense comme si le représenté n'était que l'ombre ou reflet du représentant. [...] Dans ce jeu de la représentation, le point d'origine devient insaisissable. Il y a des choses, des eaux et des images, un renvoi infini des unes aux autres, mais plus de source. Il n'y a pas d'origine simple (Derrida 1967a: 54–55).”

Lingvo multe pli rekonas sin en la reguleco de skribo, ol en la akustika kaoso de la parolo. La ekzisto estas esence skriba, li diras<sup>24</sup>.

5.2.2. La epoksojlan libron de Derrida akompanas la apero de tezoj kaj teorioj, kiuj harmonias kun ĝi. En la jaro 1968 aperas eseo de Roland Barthes „La morto de la aŭtoro” (*La mort de l'auteur*), en kiu li fosas plu la sulkon komencitan de Derrida. La metafora titolo jam sugestas la kernon de la eseo: mortis la aŭtoro, kaj naskiĝis la leganto. Iom libere resumante la esencon: ne gravas, kiujn signifatojn atribuas la aŭtoro al siaj signifatoj (vortoj, teksto), gravas tio, kiujn signifatojn atribuas al ili la leganto. Per aliaj vortoj: la esenco de la tekstoj kuŝas ne en ties origino (t. e. ĉe la aŭtoro), sed en ties destino (t. e. ĉe la leganto).

Alia grava akompana tezo estis tiu pri *interteksteco*<sup>25</sup>. Ĝin starigis Julia Kristeva en jam 1966: ĝia esenco estas, ke literatura teksto interdependas kun ĉiuj aliaj literaturaj tekstoj iam naskiĝintaj, kaj tekstoj kvazaŭ generas unu la aliajn. Laŭ la tezo de interteksteco tekstoj multe pli kompariĝas kun aliaj tekstoj, ol kun siaj temoj, t. e., signifatoj multe pli kompariĝas inter si, ol kun siaj signifatoj – en la kerno de la tezo pri interteksteco do kaŝas sin la signifant-centrismo de Derrida. Cetere, la radikoj de la tezo pri interteksteco rekondukeblas ĝis la instruo de Saussure pri tio, ke lingvo estas sistemo de interdependaj elementoj, kaj la lingvaj elementoj (vortoj) gajnas sian memstarecon kaj signifon ne per sia pozitiva substanco (ekz. son-formo), sed per kompariĝo al aliaj similaj elementoj kaj per sia diferenco disde tiuj aliaj elementoj<sup>26</sup>.

La koncepto de interteksteco intime ligiĝas al la teorio de lingva relativismo, tiel same ĝi ligiĝas al la tezo de Derrida, laŭ kiu ekster la teksto ekzistas nenio (vidu sekcion 4.2.), kaj ĝi estas bazo de la poststrukturisma literaturscienco.

---

<sup>24</sup> „L'Être écrit” (Derrida 1967a: 31).

<sup>25</sup> Pri la fenomeno de interteksteco en Esperanto verkis studon Sabine Fiedler (Fiedler, 1999). Ŝi – kontraste al la supre eksplikita interpreto – reprezentas malvastan koncepton de interteksteco: ŝi konstatas intertekstecon nur tiam, kiam tekstoj rekte aludas unu al la alia.

<sup>26</sup> „Son contenu n'est vraiment déterminé que par le concours de ce qui existe en dehors en dehors de lui” (Saussure 2005: 160).

La tezo pri interteksteco fakte detruas ankaŭ mimetismon. Mimetismo ja diris, ke 'arto imitas la vivon', dum interteksteco diras ke 'arto imitas la arton'. Siatepe Oscar Wilde (1854–1900) plupensis tiun tezon, kaj provoke deklaris, ke 'vivo imitas la arton'. Multaj opinias, ke tekstoj estas konstruantoj ne nur de aliaj tekstoj, sed ankaŭ konstruantoj de niaj perceptmanieroj, t. e. ke ne ekzistas perceptoj sendependaj de la tekstoj, kiujn ni legis aŭ aŭdis<sup>27</sup>. La provoka tezo de Wilde ŝajnas do esti akceptita.

5.2.3. *Ŝanĝiĝo de la objekto de literaturo*. Lanĉiĝas la demando, kio povis elvoki la supre konturitajn bazajn kaj kernajn paradigmoŝanĝojn en la pensado pri lingvo kaj literaturo? La aŭtoro de tiu ĉi teksto hipotezas – ne ekskludante la kunefikon de aliaj faktoroj –, ke la paradigmoŝanĝoj elvokis ĉefe la ŝanĝiĝojn de la objekto de literaturo. Literaturaj ŝanĝoj ja povas efiki ne nur al literaturkonceptoj, sed ankaŭ al lingvorteorioj, ja literaturo en ĉiuj socioj estas rigardata tre altprestiĝa formo de lingvouzo.

Dum longa tempo la ĉefa objekto de literaturo estis la eksteraj okazaĵoj de la homa vivo, kaj oni trovas nur sporadajn provojn kapti per la lingvo la internajn okazaĵojn aŭ animan staton de la homo. Tiuj provoj en liriko estis pli oftaj, sed en la proza epiko vere nur tre sporadaj. Signifa ŝanĝo en tio okazis nur en la dua duono de la 18a jarcento, kiam preromantismo kaj poste romantismo direktis sian atenton al la interna mondo de la homo. Tiu atento ankaŭ post la fino de la romantisma epoko restis firma, eĉ kreskanta: sufiĉas aludi nur al la modo de psikologia romano dum la dua duono de la 19a jarcento. Tiun tendencon poste akcelis la apero de kino: ĝi kvazaŭ foruzurpis eksterajn okazaĵojn kiel temon – sur tiu kampo teksto ne kapablis konkuri kun la bildoj. Tial kvalita literaturo iom post iom preskaŭ plene limiĝis al la prezento de la interna, psika, anima mondo de la homo; eksteraj okazaĵoj en kvalitaj verkoj ĉiam havas certan meta-

---

<sup>27</sup> „Confounding the realist agenda 'art imitates life', intertextuality suggests that art imitates art. Oscar Wilde (typically) took this notion further, declaring provocatively that 'life imitates art'. Texts are instrumental not only in the construction of other texts but in construction of experiences ” (Chandler 2000: 205).

foran karakteron, en sia pura, nemetajforma formo ili aperas kiel temo nur en eksplicite poramuzaj verkoj.

La lingva reprezento de la internaj eventoj de la homo streĉis la povojn de la lingvo, ja ĝi kreigis por funkcii en interhomaj rilatoj, kaj tial en ĝia vortaro mankis vortoj por internaj eventoj de la homa vivo. Lingva reprezento de la internaj eventoj eblis nur per metajforma ekuzo de vortoj, kies baza signifo rilatis elementojn de la ekstera vivo. (Ekzemple la vorto 'skui' signifas baze rapide ripetatajn fizikajn movojn, kaj ni uzas ĝi metafore por signi tre fortan animan impreson: *La tragika novaĵo skuis lin.*) La temoŝanĝo de literaturo transformis la lingvozon kaj stilon de la verkoj. Dum en la klasika epiko la reprezentataj elementoj de la ekstera vivo montras tempan kaj spacan sinsekvon, tio estas iaspecan metonimian ordon, kontraste al tio en la moderna epiko la domino de la reprezento de animaj, psikaj eventoj donas ŝlosilan rolon al metajformo. Ĉi tiun fenomenon malkovris la unua David Lodge fine de la 1970aj jaroj (Lodge, 1977), sed li ne serĉis klarigon por la fenomeno.

La romano *La fremdulo (L'Étranger)* de Albert Camus (1913–1960) bele ilustras la kunapartenon de metonimiaj tekstostrukturoj kaj lingva reprezento de eksteraj eventoj unuflanke, kaj kunapartenon de metajformaj tekstostrukturoj kaj lingva reprezento de internaj, animaj eventoj aliflanke. La unuaj 83 paĝoj de la romano, kiuj rakontas kun protokola precizeco pri tio, kiel pasas la tagoj de la protagonisto Mersault, enhavas entute nur 15 metajformojn. Sur tiuj paĝoj Camus strebas esti tre objektiva, kaj evitas diri ion iajn pri la pensoj, sentimentoj de Mersault – do la rakontado tuŝas nur la eksterajn eventojn de la vivo de la protagonisto. Post tio okazas la pistolpafa senmotiva mortigo (far Mersault) de nekonata arabo sur la marbordo. Tio rakontiĝas en nur ses alineoj – kaj tiu kurta teksto enhavas 25 metajformojn (Ullmann 1964: 121). Kial tiu neproporcieco? La kaŭzo kuŝas en tio, ke tiuj ses alineoj temas pri la internaj eventoj de la psiko de Mersault, ja la murdofaro radikas en internaj eventoj; eksteraj, komun-evidentaj kaŭzoj por la faro de Mersault ne ekzistas.

Per kio la metaforiĝa procezo de la literatura lingvo povas esti katalizanto de la paradigmoŝanĝo prilingva kaj priliteratura? La respondo kuŝas en la funkciekanismo de metaforoj. Kiam ni kreas metaforon, ni ligas novan, plian signifaton al signifanto, kiu ĝis tiam havis nur unu signifaton, kaj de nun ĝi havas du signifatojn. Tiu duobl-iĝo de la signifato kaŭzas certan semantikan malfacilecon, osciladon, reduktas la evidentecon de la signifato, kaj tio nerekte sekvigas relativan fortiĝon de la pozicio de la signifanto en la semantika „triunuo” (1. signifanto, 2. signifato<sub>1</sub>, 3. signifato<sub>2</sub>). Tiamaniere do la ŝanĝiĝo de la ĉefa temo de literaturo povas rezultigi la fendiĝon de la marmortrono de logocentrismo, kaj direkti la atenton disde la signifato al la signifanto.

## 6. Konkludoj

Esperanto kaj ĝia literaturo tra la lupeo de la ŝanĝiĝanta (ĉu jam ŝanĝiĝinta?) pensmaniero pri lingvo kaj literaturo aspektas multe malpli „devia” fenomeno, ol ĝi ŝajnis esti en la prilumo de la tradiciaj lingvo-teorioj kaj literaturkonceptoj.

Fonocentrismo kaj logocentrismo, kiuj dum pluraj miloj da jaroj regis la Eŭropan pensadon pri lingvo kaj literaturo, aŭtomate asignis por Esperanto kaj esperanta literaturo duagradan rolon. Duagradan, ĉar fonocentrismo kaj logocentrismo nomis kernaj, esencaj tiujn elementojn de la lingvofunkciado, en kiuj elementoj Esperanto neniel povis konkuri kun la etnaj lingvoj. Tiuj du elementoj estas la primareco, prioritato kaj bazeco de la voĉa uzado unuflanke (t. e. fonocentrismo), kaj la firma, fiksa, kvazaŭ „natura” rilato inter signifanto kaj signifato aliflanke (t. e. logocentrismo). Oni devas serĉi verŝajne en la tradiciaj lingvaj kaj literaturaj paradigmoj la kaŭzon de tio, ke dum la pasintaj 120 jaroj Esperanto altiris relative multajn adeptojn el inter matematikistoj, natursciencistoj, kaj relative malmultajn el lingvistoj, kaj eĉ malpli multajn el literatursciencistoj. Probable temas pri tio, ke lingvistoj kaj literatursciencistoj ne povis akordigi la fenomenon Esperanto kun la regantaj paradigmoj de siaj fakoj. Tio tute ne estas mirinda, ja Esperanto okulfrape kontrastas al pluraj bazaj tezoj de la tradiciaj paradigmoj pri lingvo kaj literaturo. Oni notu, ke tiuj



kelkaj lingvistoj, kiuj tamen fariĝis adeptoj aŭ eĉ uzantoj de Esperanto, emfazis ĝiajn praktikajn aspektojn kaj utilojn, sed ili plejparte evitis fari teoriajn konsiderojn.

La novaj paradigmoj principe kreas pli favoran teorion fonon por la esplorado kaj priskribo de Esperanto kaj de ĝia literaturo. La favoriĝo de la teoria fono resumeblas en du punktoj.

1. La promocio de skribo (far Derrida) al primara ekzistoformo de lingvo forfaligas aron da rezervoj kaj eblaj kontraŭargumentoj, ja se skribo (en la formo de pra-skribo) nestas en la homa lingvo jam ekde la komenco de ĝia naskiĝo, la grafik-skriba genezo de Esperanto ne povas signifi malavantaĝon. Do, se homa lingvo kreiĝas esence skribe, Esperanto nur obeas la bazan, ĝeneralan modelon, kaj tute ne estas rigardebla io devia.
2. La promocio de signifanto kompare al signifato. En la nova paradigmo signifanto avancis signifaton: la unua kvazaŭ kreas la lastan en la menso de la leganto (dum laŭ la tradicia paradigmo firman ekziston havis la signifato, kaj por ĝi elektiĝis adekvata signifanto). Tiamaniere la sama signifanto povas krei diversajn signifatojn en la menso de la diversaj legantoj. La nova paradigmo do asertas, ke la semantika malcerteco, kiu sendube ekzistas ĉe esperantaj vortoj, ekzistas fakte ankaŭ en ĉiuj etnaj lingvoj. Ankaŭ en tiu ĉi punkto montriĝas, ke Esperanto kaj ĝia literaturo nur kondukas laŭ la baza, ĝenerala modelo, ili havas nenian devian trajton.

La novaj paradigmoj dum la lastaj jardekoj plene ekregis en la literaturscienco, filozofio kaj scienco pri komunikado, akiris gravajn poziciojn en lingvistiko, kaj komencis esti akceptitaj ankaŭ en la publika pensado. Estus dezirinde, ke esperantologio eluzu tiujn ŝancojn, kiujn proponas la paradigmoŝanĝo.

### Referencita literaturo:

- Balogh, József (1926): Beiträge zur Geschichte des lauten Lesens und Schreibens. In: *Philologus*, 82: 84–109. kaj 202–240.
- Chandler, Daniel (2002): *Semiotics. The Basics*. London: Routledge.
- Derrida, Jacques (1967a): *De la Grammatologie*. Paris: Les Éditions de Minuit.
- Derrida, Jacques (1967b): *La voix et la phénomène*. Paris: Presses Universitaires de France,
- Derrida, Jacques (1972): *La dissémination*. Paris: Le Seuil.
- Эйхенбаум, Б. М. (1919): Как сделана «Шинель» Гоголя.  
<http://opojaz.ru/manifests/kaksdelana.html>
- Fiedler, Sabine (1999): Tekstrilatoj. (Pri interteksteco en Esperanto.) In: Benczik, Vilmos (red.): *Lingva arto. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton*. Rotterdam: UEA, 50–60.
- Guiraud, Pierre (1956): *Index du vocabulaire du théâtre classique. Vol. III–XI*. Publiée sous la direction de Pierre Guiraud. Librairie C. Klincksieck, Paris, 1956–1964.
- Havelock, Eric A. (1982): *The Literate Revolution in Greece and Its Cultural Consequences*. Princeton: Princeton University Press.
- Heidegger, Martin (2000): *Das Ding, Die Sprache*. Sárvár: Sylvester János Könyvtár.
- Lausberg, Heinrich (1990): *Handbuch de Literarischen Rhetorik. Eine Grundlegung der Literaturwissenschaft*. 3. Auflage. Stuttgart: Franz Steiner Verlag.
- Lodge, David (1977): *The Modes of Modern Writing: Metaphor, Metonymy and the Typology of Modern Literature*. London: Arnold.
- McLuhan, Marshall (1964): *Understanding Media*. London: Routledge.
- Ong, Walter J. (1977): *The Interfaces of the Word. Studies in the Evolution of Consciousness and Culture*. Ithaca & London: Cornell University Press.
- Peirce, Charles Sanders (1909): *The Essential Peirce. Selected Philosophical Writings*. Vol. 2 (1893–1913), edited by the Peirce Edition Project. Bloomington and Indianapolis: Indiana University Press.
- Rousseau, J.-J. (1995): Essai sur l'origine des langues. In: Rousseau, J.-J.: *Œuvres complètes V*. Paris: Gallimard. 375–429.
- Sapir, Edward (1929): Linguistics as a Science. In: *Language*, 5; 207–214.
- Saussure, Ferdinand de (2005): *Cours de linguistique générale*. Paris: Payot.
- Stephen Ullmann (1964): *Language and Style*. Oxford: Basil Blackwell.

- Whorf, Benjamin Lee (1956): *Language, Thought, and Reality*. Cambridge: M.I.T. Press.
- Wittgenstein, Ludwig (1963): *Logikai-filozófiai értekezés*. Budapest: Akadémiai Kiadó.

## *APENDICO*

### **PRI LA LIBROELDONADO DE HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO INTER 1976–1990\***

Inter 1976 kaj 1990 funkciis en Hungario signifa libroeldona aktivado. Ĉar mi havis la ŝancon partopreni en ĝi, lastatempe pluraj amikoj instigis min resumi la atingojn de tiuj 15 jaroj. Komence mi rezistis al tiuj instigoj, sed kun la paso de la tempo ĉiam pli mi emas rekonii, ke tio povas havi iom da utilo. Se ne alian utilon, do tion, ke tiamaniere eblos eviti naskiĝon de mitoj pozitivaj kaj negativaj. Kiel bazaj fontoj de tiu ĉi artikolo servis du miaj detalaj raportoj, prezentitaj al la estrarkunsido de Hungara Esperanto-Asocio (HEA) la 19an de septembro 1986 (pri la esperantlingva libroeldonado; 13 paĝa hungarlingva dokumento), respektive la 19an de januaro 1990 (pri la hungarlingva libroeldonado fare de la Asocio; 6 paĝa hungarlingva dokumento). Pro la fakto ke ekde la printempo de 1986 pluraj influhavaj personoj en la Estraro kaj Komitato de HEA forte oponis la eldonan politikon, kiun preskaŭ plene difinis mi sola\*\* (kaj tio, mi rekonas, ne estis tute demokratia maniero), la ciferoj en tiuj du raportoj estis tre fidindaj, ja kia ajn statistika ĵonglado aŭ kosmetikado tuj estus malkovritaj de miaj oponantoj. Tial la spinon de tiu ĉi artikolo donas tiuj du raportoj (ties elektronikan kopion jam pli frue mi sendis al pluraj esperantistaj amikoj).

---

\*Fragmentojn el tiu ĉi teksto en 2014 Aleksandr Korĵenkov aperigis en *La Ondo de Esperanto*.

\*\* Kun la plena subteno de Tibor Vaskó, sekretario de HEA. La subteno kaj fido kiun mi ĝuis flanke de li, ebligis al mi eviti kverelojn kaj dediĉi min plene al la libroeldona kaj redakta laboro (Hungara Vivo). Tibor Vaskó printempe de 1986 ne estis reelektita kiel sekretario, kaj li plene retiriĝis el la movado. Mi perdis la ŝirmon, kiun ĝis tiam mi havis, kaj mi devis mem defendi la sekvitan eldonan politikon en la elektitaj organoj de HEA. Tiu cirkonstanco naskis la du raportojn. (Nur parenteze: la plimulto de la asocia membraro aprobis tiun eldonan politikon; tion pruve ilustras, ke printempe de 1990 – jam en tute liberaj elektoj – mi estis elektita prezidanto de HEA.)

## **Esperantaj libroj kaj esperantistoj en Hungario dum la jaroj de socialismo**

La plej trafa vorto, kiu karakterizis tiun situacion, estas *librosoifo*. Ekde la mezo de la sesdekaj jaroj, paralele kun la iompostioma moliĝo de la diktaturo, la interesiĝo por Esperanto vigliĝis, la nombro de la esperantistoj kreskis, sed legaĵoj mankis. Libroeldonado estis praktike ŝtata monopolo; eĉ okaze de la 51a UK en Budapeŝto (1966) povis aperi nur du esperantlingvaj libroj – rezulte de neproporcie grandaj klopodoj (*La tragedio de l' homo kaj Ora duopo*).

La librosoifon de hungaraj esperantistoj principe oni povus kontentigi per du eblaj manieroj: enlanda libroproduktado kaj libroimporto. Libroimporton praktike malebligis du cirkonstancoj. La importon el soclandoj draste limigis antaŭ ĉio tiu cirkonstanco, ke libroeldonado en tiuj landoj estis same ŝtata monopolo, tial nur sporade aperis esperantlingva libro tie kaj tie. La importon el la ceteraj landoj bremsis eĉ du kaŭzoj: 1. socialismaj ŝtatoj daŭre timis pri enfiltriĝo de nesocialismaj ideoj, kaj tial per burokrataj rimedoj daŭre malhelpis importadon de kulturaj varoj el nesocialismaj landoj; 2. la prez niveloj de soclandoj kaj okcidentaj landoj estis treege malsamaj: ekzemple importita libro de la Eldonejo Stafeto dum la sesdekaj jaroj kostis en Hungario ĉ. dudekoblon de samampleksa hungarlingva libro (hungarlingvaj libroj estis venditaj por prezoj forte subvenciitaj – tiamaniere evidente mankis vasta aĉetpovo por tiuj libroj).

Kiel supre jam estis aludite, enlandan libroeldonadon longe malebligis malpermesoj politikaj kaj ekonomiaj. Ĉi lastaj post 1968 komencis mildiĝi, ĉar pro la krizo de la centrisma ekonomia direktado la politika gvidantaro de la lando decidis fari kelkajn timemajn paŝetojn al merkata ekonomio: tio siavice rezultigis ankaŭ ioman moliĝon de diktaturo.

Dank' al tiuj cirkonstancoj povis okazi, ke iam en 1975 Tibor Vaskó, sekretario de HEA akiris malgrandan uzitan presmaŝinon (iu alta ŝtata oficejo ricevis novan, kaj la malnovan ĝi ne plu bezonis). Per tiu maŝino HEA pretigis presaĵojn (teknikajn priskribojn kaj similaĵojn) por diversaj entreprenoj, kaj per tio ĝi enspezis signifajn sumojn –

signifajn almenaŭ kompare al la ĝistiamaj rimedoj fontantaj el kotizoj kaj el la magra subvencio, ricevita de la ŝtato.

### **Startas esperantlingva libroeldonado**

La akirita presmaŝino – primitiva, trivita, ĉiutage paneanta, tamen: vera presmaŝino! – memevidente naskis la ideon produkti esperantlingvajn librojn, eĉ se komence en tre modesta teknika kvalito. Restis nur ricevi prespermeson ĉe la cenzura oficejo, sed dank’ al la daŭra moliĝo de la diktaturo solviĝis ankaŭ tio. Komence la oficejo volis postuli hungaran tradukon de ĉiu eldonota libro, sed post iom da argumentado flanke de mi la oficistoj lasis sin persvadi, ke tio tamen ne necesas.

La uverturo de la eldona agado estis kvarlibra serio: *Koko krias jam!* de Ferenc Szilágyi, la poemaro *Kvaropo* (de Auld–Dinwoodie–Francis–Rossetti), la esearo de Lajos Tárkony *De paĝo al paĝo*, kaj kolekto de unuaktaĵoj de Julio Baghy sub la titolo *En maskobalo*. Kiel videble, ĉiuj kvar libroj estis originale verkitaj en Esperanto, kaj ĉiuj kvar libroj estis represoj. Ne hazarde. La celo de la eldona politiko ekde la komenco estis akceli la kulturan integriĝon de la hungara esperantistaro en la internacian movadon, kaj tiun celon plej bone servis la akirebligado de la jam kanoniĝintaj pintaj verkoj de la esperanta literaturo. Tio, ke represi estas pli facile, ol prepari novajn verkojn, rolis nur kiel duaranga vidpunkto.

Ŝlosila punkto de la tuta projekto estis la realisma organizado de la vendado. Tio ne estis facila afero, almenaŭ pro du kaŭzoj. Unue pro tio, ke komence eblis kalkuli nur pri la hungarlanda merkato (pere de UEA ni povis vendi nur kelkajn dekojn da ekzempleroj el ĉiu titolo); kaj due pro tio, ĉar la hungara publiko kutimiĝis al la forte subvenciitaj malaltaj prezoj de la hungarlingvaj libroj. La starto tamen sukcesis tre bone: la unuajn kvar librojn eblis aboni kune (ni nomis tion ‘Libroserio 1’), ĉ. por 60% de la kuna prezo de la kvar libroj – kaj dum nur tri monatoj kolektiĝis ĉ. 900 abonantoj (kun antaŭpagoj)! Mi emfazas, ke nure en Hungario! La tiama hungara esperantistaro meritis ĉian laŭdon, ja manke de ia ajn subvencio la prezo de tiuj libroj superis ĉ. trioble la prezon de similampleksaj hungarlingvaj libroj. Tiu

starto bazis la esperon, ke ni povos funkciigi libroeldonan entreprenon, kiu kapablos finance vivteni sin mem. Kaj tiel fariĝis.

En Hungario formiĝis solida libromerkato. HEA funkciigis ĉiutage plentempe malfermitan librovendejon en Budapeŝto, kies oferto daŭre vastiĝis dank' al tio, ke per interŝanĝoj venis al Hungario amaso da alilande eldonitaj esperantaj libroj. Kompreneble tiu libroservo liveris ankaŭ perpoŝte, menditaj libroj alvenis al la mendinto ĝenerale ene de unu semajno.

### **Vendoj al Sovetio**

Post la enlanda vendado la plej grandan parton de la esperantaj libroj, eldonitaj en Hungario, englutis la sovetia merkato.

Sovetio estis merkato ekstreme grava por la hungarlanda Esperanta libroeldonado, pro pluraj kialoj. *Unue* kompreneble pro normala Esperanta solidareco: havigi al sovetiaj esperantistoj librojn, per kiuj ili povas intime ligiĝi al la internacia Esperanta kulturo. Tio gravis ĉefe ĉar tiuj malmultaj Esperantaj libroj, kiuj povis aperi en Sovetio, estis tradukaĵoj aŭ de klasikaĵoj el sovetiaj lingvoj, aŭ tradukaĵoj de politikaj broŝuroj – ĉiukaze ili havis nete endogenan karakteron. *Due*, tiu vendado estis gravega ankaŭ el financa vidpunkto, ja sovetiaj esperantistoj estis multnombraj kaj soifaj je libroj. La vendado al sovetiaj esperantistoj ebligis al ni atingi eldonkvantojn, kiuj grave superis la tiam kutimajn ciferojn de la tutmonda Esperanta libroeldonado, kaj dank' al tio la produktokostoj por unu ekzemplero malpliĝis. Tiamaniere ankaŭ aliaj aĉetantoj de hungarlandaj Esperantaj eldonaĵoj profitis el la vendado al Sovetio.

Tamen realigi tiun vendadon ne estis simpla afero. Malhelpoj amasis, ilin oni povas klasifiki je tri grupoj: valutaj, cenzuraj kaj burokrataj. El tiuj plej gravaj estis valutaj malhelpoj (tiujn en la nuna internaciĝanta mondo junaj legantoj apenaŭ povas kompreni). Loĝantoj de la landoj de la soctendaro estis 'nepagipovaj' ne nur al kapitalismaj landoj, sed ankaŭ al socialismaj. Socvalutoj eĉ inter si ne estis libere ŝanĝeblaj. Cenzuraj malhelpoj ankaŭ ekzistis, ja soclandoj almenaŭ formale cenzuris ankaŭ sendaĵojn, kiuj alvenis el alia soclando; tamen, certe mapli rigore ol tiujn, kiuj devenis el kapitalismaj landoj.

La vendado al Sovetio komenciĝis dank' al la kunlaboro de kelkaj sinoferaj lokaj esperantistoj, inter kiuj la plej agema estis Johannes Palu el Estonio. Oni notu, ke en Sovetio tia agado estis strikte malpermesita, do niaj perantoj entreprenis konsiderindan riskon. Signifis plian problemon la sorto de la kolektita mono, kiun ne eblis simple transsendi al Hungario. La problemo solviĝis dank' al la klopodoj de unu el la tiamaj vicprezidantoj de HEA, kiu havis altan funkcion en la Ministerio de Eksteraj Rilatoj (dum kelka tempo li estis ambasadoro en Belgio). La rubloj kolektiĝintaj ĉe la perantoj estis portitaj al la hungara ambasadejo en Moskvo, kaj post certa tempo la forinta ekvivalento aperis en la Budapeŝta bankokonto de HEA, kaj ĝi povis esti investita en la produktadon de pliaj esperantaj libroj.

Tiu peranta sistemo funkciis, tamen ĝi ne estis ideala, almenaŭ pro du kaŭzoj. Unue pro tio, ke ĝi ofendis la validajn sovetiajn kaj hungarajn leĝojn en almenaŭ deko da punktoj, do la risko estis tro granda. Due pro tio, ĉar la vendoprezoj, kiujn aplikis la perantoj, estis konformaj al la Hungarlandaj prezoj – kaj tiuj superis du-trioble la kutimajn (forte subvenciitajn) libroprezojn en Sovetio. Tiu proporcio validis ankaŭ por salajroj, do la hungaraj esperantaj libroj montriĝis tre multekostaj por la averaĝa aĉetpovo de sovetiaj esperantistoj.

Sovetio subvenciis ne nur la propran libroeldonadon, sed ankaŭ la libroimporton. La entrepreno *Mejknjiga* – la ŝtata libroeksporta/ importa firmao – zorge kribris (unuavice laŭ ideologiaj-politikaj vidpunktoj) kaj kvante limigis importitajn librojn, sed la vendoprezon de tiuj, kiujn ĝi decidis importi, ĝi konformigis al la kutima preznivelo de libroj, eldonitaj en Sovetio mem. Tiun fakton mi spertis jam pli frue, ĉar kiel instruisto de la rusa lingvo ofte mi veturis al Sovetio, kaj multekostajn hungarajn librojn (vortarojn, enciklopediojn ktp.) mi aĉetis duonpreze en la internacia librovendejo de Moskvo.

La celo do estis atingi iel, ke esperantaj libroj iru al Sovetio per la kanaloj de la oficiala eksporto/importo. Al la hungara ŝtata libroeksporta/importo firmao *Kultúra* ĉiujare ni faris oferton (kun detalaj priskriboj pri la ofertataj libroj), kiun ĝi pludonis al la sovetia *Mejknjiga*, sed tiu lasta persiste rifuzis mendi ion ajn. Post kelkjara



malsukceso mi decidis fari provon: mi formulis la priskribojn de la ofertataj libroj ruslingve (ĝis tiam laŭ la deziro de la hungara eksporta firmao la priskriboj estis en la hungara lingvo, kaj la firmao ilin tradukis al la rusa) en la kutima propaganda-patosa stilo de la sovetia gazetaro. Ekzemple *La verda koro* de Julio Baghy ricevis tian priskribon: „La romaneto de la granda esperanta verkisto-realisto en tiu ĉi romaneto priskribas la heroan batalon de la Ruĝa Armeo kontraŭ la imperiismaj invadantoj dum la civila milito.” Kaj la efiko estis mirakla: *Meĵknjiga* mendis tiam (kaj ankoraŭ dum pluraj jaroj poste, ĝis 1990) grandan kvanton el la hungaraj esperantaj libroj, kaj ĝi vendis ilin en la sovetiaj librovendejoj por ĉ. la triono de tiu prezo, kiun ĝi mem pagis por ili.

Tio tamen ne faris superflua la laboron de la perantoj, pro du kaŭzoj; unue, ĉar la importokvanto ne povis kontentigi ĉiujn aĉetemojn, kaj due, ĉar *Meĵknjiga* dividis la menditajn kvantojn inter la sovetaj respublikoj proporcie al ties loĝantaro. Tio rezultigis, ke ekzemple Turkmenio (kie vivis eble dek esperantistoj) ricevis trioble pli grandan kontingenton ol Estonio (kie vivis pluraj miloj da esperantistoj). La nevenditajn kvantojn *Meĵknjiga* jarfine resendis al Hungario. Dank’ al la sagaco de la sovetiaj esperantistoj tiu resendita kvanto neniam superis dek procentojn de la tuto – esperantaj libroj kuŝantaj sur la bretoj de la librovendejo de Alma-Ato aŭ Frunze per privataj klopodoj trovis la vojon al la esperantistoj en Latvio aŭ Ukrainio.

Post tiu enkonduko venu la ciferoj mem. La sekvaj tabeloj esperable donos imagon pri la dimensioj de la eldona kaj librovenda aktivado, plenumita en Hungario. La vendociferoj al Sovetio entenas nur la vendojn per la ŝtata eksporta kanalo, ĉar pri la vendoj pere de niaj perantoj ne postrestis ciferoj; mi taksas, ke ili vendis pli-malpli la saman kvanton, kiel *Meĵknjiga*.

	<b>Titolo</b>	<b>Paĝo- nombro</b>	<b>Eldon- kvanto</b>	<b>Venditaj ĝis septembro 1986 (El tio al Sovetio)</b>	<b>Stoko en septembro 1986</b>
<b>1 9 7 6</b>					
11.	Esperanta– Kamboĝa Vortaro	148	1000	842 (24)	158
12.	Szilágyi, Ferenc: Koko krias jam! (Originalaj noveloj)	197	2000	2000 (0)	0
13.	Kalocsay, Kálmán: El Streĉita Kordo (Originala poezio)	28	1500	1500 (0)	0
<i>Produkto en 1976: 3 titoloj, 373 paĝoj, 4500 ekzempleroj. Stoko el tio en 1986: 158 ekz.</i>					
<b>1 9 7 7</b>					
14.	Tárkony, Lajos: De paĝo al paĝo (Originalaj eseoj)	121	2000	1957 (0)	43
15.	Dorno: Satiroj (Originala prozo)	140	2000	2000 (0)	0
16.	Auld–Dinwoodie– Francis–Rossetti: Kvaropo (Originala poezio)	256	2000	2000 (0)	0
17.	Baghy, Julio: En maskobalo (Originalaj unuaktaĵoj)	141	2000	2000 (0)	0
<i>Produkto en 1977: 4 titoloj, 658 paĝoj, 8000 ekzempleroj. Stoko el tio en 1986: 43 ekz.</i>					
<b>1 9 7 8</b>					
18.	Ady, Endre: La morto de la ĉielarko (Tradukita poezio kaj prozo)	87	2000	2000 (0)	0
19.	Szathmári, Sándor: Kain kaj Abel (Originala prozo)	288	2000	2000 (0)	0
10.	Auld, William – Benczik, Vilmos (red.): 25 jaroj. Antologio de Belartaj Konkursoj (Originala poezio kaj prozo)	207	2500	2500 (200)	0

	<b>Titolo</b>	<b>Paĝo- nombro</b>	<b>Eldon- kvanto</b>	<b>Venditaj ĝis septembro 1986 (El tio al Sovetio)</b>	<b>Stoko en septembro 1986</b>
11.	Molnár, Ferenc: La knaboj de Paŭlo-strato (Tradukita prozo)	180	3000	2999 (165)	1
12.	Blanke, Detlev (red.): Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado (Dua eldono en 1986, 2500 ekz.)	228	2000	2000 (0)	0
13.	Lejzerowicz, Izrael: El la Verda Biblio (Originala prozo)	83	3500	3473 (0)	27
14.	Jókai, Mór: La filoj de l' ŝtonkora homo (Bildrakonto)	83	10 000	10 000 (250)	0
15.	Programdeklaro de Hungara Socialisma Laborista Partio	41	5000	3500 (180)	La resto fordonacita. 0
<i>Produkto en 1978: 8 titoloj, 1174 paĝoj, 28 000 ekzempleroj. stoko el tio en 1986: 28 ekz.</i>					
<b>1979</b>					
16.	Benczik, Vilmos (red.): Baza literatura krestomatio (Dua eldono en 1982, 3000 ekz.; tria eldono en 1986: 2320 ekz.)	281	3500	3500 (0)	0
17.	Pechan, Alfonz (red.): Gvidlibro por supera ekzameno (Dua eldono) (Tria eldono en 1981, 2000 ekz. [presita en Bulgario]; kvara eldono en 1983, 2000 ekz.; kvina eldono en 1985, 2466 ekz.)	370	2500	2500 (0)	0

	<b>Titolo</b>	<b>Paĝo- nombro</b>	<b>Eldon- kvanto</b>	<b>Venditaj ĝis septembro 1986 (El tio al Sovetio)</b>	<b>Stoko en septembro 1986</b>
18.	Rados, Péter (red.): Hund-bazaro (Antologio de hungaraj porinfanaj poemoj)	68	2000	1935 (247)	65
19.	Benczik, Vilmos: Libro de romanoj (Originalaj eseoj)	229	2000	2000 (0)	0
20.	Benedek, Elek: Hungaraj fabeloj ( <i>Dua eldono: en 1984, 2000 ekz.</i> )	71	2000	2000 (765)	0
21.	Móricz, Zsigmond: Malriĉaj homoj (Tradukita prozo)	36	5000	2913 (323)	2087
22.	Kalocsay, Kálmán: Kiel verki kaj traduki poemojn? (Originala eseo) ( <i>Dua eldono: en 1986, 1760 ekz.</i> )	27	2000	2000 (167)	0
23.	Horváth, Jozefo: 30 nap alatt eszperantóul (Lernilo por hungaroj)	290	20 000	19 881 (0)	119
24.	Barna, Zoltán: 133 tagoj (Pri komunisma ŝtato en Hungario en 1919)	237	2000	1298 (43)	702
<i>Produkto en 1979: 9 titoloj, 1609 paĝoj, 41 000 ekzempleroj. Stoko en septembro de 1986: 2973 ekz.</i>					
<b>1 9 8 0</b>					
25.	Móricz, Zsigmond: Ĉiela birdo (Tradukita prozo)	44	2000	1825 (281)	175
26.	Enciklopedio de Esperanto (Represo de la eldono de 1934.) ( <i>Dua eldono en 1986, 1394 ekz.</i> )	604	2000	2000 (0)	0

	<b>Titolo</b>	<b>Paĝo- nombro</b>	<b>Eldon- kvanto</b>	<b>Venditaj ĝis septembro 1986 (El tio al Sovetio)</b>	<b>Stoko en septembro 1986</b>
27.	Gárdonyi, Géza: La steloj de Eger (Bildrakonto)	51	10 000	8755 (1215)	1245
28.	Krilov: 111 fabloj (Tradukita poezio) (Presita en Slovakio)	137	1500 (plus nekonata kvanto por slovakia merkato)	1498 (0)	2
29.	Prus, Bolesław: La faraono (Bildrakonto)	35	10 000	7785 (660)	2215
30.	Kemalov, Naĉo: Naŭ jaroj en la infero (Rememoroj) (Presita en Bulgario)	111	1500 (plus nekonata kvanto por bulgara merkato)	844 (252)	656
31.	Karinthy, Frigyes: Vojaĝo al Faremido – Kapilario (Tradukita prozo)	182	2500	1787 (498)	713
32.	Grigorov, Asen: Gardu la pacon (Originala poezio) (Presita en Bulgario)	119	1000 (plus nekonata kvanto por bulgara merkato)	610 (165)	390
33.	Lienhardt, Albert: Amuzaj dialogoj en Esperanto (Dua eldono en 1983, 2150 ekz.; tria eldono en 1985, 1550 ekz.)	142	3000	3000 (0)	0
<i>Produkto en 1980: 9 titoloj, 1425 paĝoj, 33 500 ekzempleroj. Stoko en septembro de 1986: 5396 ekz.</i>					
<b>1981</b>					
34.	Horváth, Jozefo: ...már tudom, mi az eszperantó! (Varbilo por hungaroj)	63	10 000	10 000 (0)	0

	<b>Titolo</b>	<b>Paĝo- nombro</b>	<b>Eldon- kvanto</b>	<b>Venditaj ĝis septembro 1986 (El tio al Sovetio)</b>	<b>Stoko en septembro 1986</b>
35.	Mark Twain: La aventuroj de Tom Sawyer (Bildrakonto)	28	10 000	7292 (1685)	2708
36.	Kalocsay, Kálmán: Tutmonda sonoro I–II. (Tradukita poezio)	664	2500	2294 (166)	206
37.	Heltai, Jenő: La morto de la kuracisto (Dulingva rakonto)	17	5000	3657 (400)	1343
38.	Pechan, Alfonz (red.): Gvidlibro por supera ekzameno ( <i>Tria eldono de n-ro 17, presita en Bulgario</i> )	370	2000 (plus nekonata kvanto por bulgara merkato)	2000 (0)	0
<i>Produkto en 1981: 5 titoloj, 1142 paĝoj, 29 500 ekzempleroj. Stoko en septembro de 1986: 4257 ekz.</i>					
<b>1 9 8 2</b>					
39.	Baghy, Julio: Gramatika demandaro resuma ( <i>Represo en 1989, 4000 ekz.</i> )	39	4000	3423 (935)	577
40.	Golden, Bernard: Margene de la lernolibro (Originalaj eseoj)	58	2000	1311 (505)	689
41.	Benczik, Vilmos: Baza literatura krestomatio ( <i>Dua eldono de n-ro 16</i> )	281	3000	3000 (520)	0
42.	Baghy, Julio: La verda koro	104	4000	3781 (940)	129
43.	Mark Twain: La aventuroj de Huckleberry Finn (Bildrakonto)	32	5000	5000 (1020)	0
44.	Krúdy, Gyula: La rozo de l' sultano (Tradukita prozo)	54	2000	1537 (400)	463

	Titolo	Paĝo- nombro	Eldon- kvanto	Venditaj ĝis septembro 1986 (El tio al Sovetio)	Stoko en septembro 1986
45.	Barcsay, Zsuzsa: Metodiko en la praktiko	122	1250	952 (335)	298
46.	Blanke, Detlev: Pri la Interna Ideo (Originala eseo)	29	2000	2000 (0)	0
47.	Nemere, István: La fermita urbo (Originala prozo) (Dua eldono en 1985, 1045 ekz.)	128	2000	2000 (590)	0
48.	Lorjak: Iluzioj (Originala prozo)	184	1500	1287 (650)	213
49.	Tóth, Endre: Lappar, la Antikristo (Originala prozo)	139	1500	1493 (300)	7
50.	Nemere, István: La naŭa kanalo (Originala prozo) (Dua eldono en 1985, 1060 ekz.)	104	1500	1500 (590)	0
51.	Gajdar, Arkadij: Timur kaj lia taĉmento (Tradukita prozo) (Presita en Bulgario)	72	1900 (plus nekonata kvanto por bulgara merkato)	1089 (645)	811
52.	Elem, János: Ĉu vi vidis la piedsignon de l' profeto? (Tradukita dramo)	91	1000	1000 (0)	0
53.	Hules, Adalberto: Katoj kaj ĉevaloj (Originala poezio)	80	950	795 (155)	155
54.	Frank, Helmar: Kibernetiko de la homa lingvo	192	1200	716 (89)	484
Produkto en 1982: 16 titoloj, 1709 paĝoj, 34 800 ekzempleroj. Stoko en septembro de 1986: 3826 ekz.					
<b>1983</b>					
55.	Nemere, István: La blinda birdo (Originala prozo)	118	2000	1993 (550)	7

	<b>Titolo</b>	<b>Paĝo- nombro</b>	<b>Eldon- kvanto</b>	<b>Venditaj ĝis septembro 1986 (El tio al Sovetio)</b>	<b>Stoko en septembro 1986</b>
56.	Nemere, István: Sur kampo granita (Originala prozo)	127	1520	1445 (585)	75
57.	Pechan, Alfonz (red.): Gvidlibro por supera ekzameno ( <i>Kvara eldono de n-ro 17</i> )	370	2000	2000 (520)	0
58.	Velkov, Krum: Vilaĝo Borovo (Tradukita prozo) ( <i>Presita en Bulgario</i> )	130	600 (plus nekonata kvanto por bulgara merkato)	509 (185)	91
59.	Modest, Julian: Ni vivos! (Originala dramo)	53	850	850 (325)	0
60.	Benczik, Vilmos (red.): Hungara Antologio ( <i>Eldono de la ŝtata eldonejo Corvina, sed financita de HEA.</i> )	448	2000	1255 (118)	745
61.	Lienhardt, Albert: Amuzaj dialogoj en Esperanto ( <i>Dua eldono de n-ro 33</i> )	142	2150	2150 (930)	0
62.	Mikulás, József: Taskfolioj por komencantoj ( <i>Dua eldono en 1984, 2515 ekz.</i> )	-	2000	2000 (700)	0
Produkto en 1983: 8 titoloj, 1270 paĝoj, 13 120 ekzempleroj. Stoko en septembro de 1986: 918 ekz.					
<b>1984</b>					
63.	Lienhardt, Albert: Amuza legolibro en Esperanto ( <i>Represo en 1985, 1010 ekz., dua eldono en 1989, 4500 ekz.</i> )	216	2860	2860 (1920)	0



	<b>Titolo</b>	<b>Paĝo- nombro</b>	<b>Eldon- kvanto</b>	<b>Venditaj ĝis septembro 1986 (El tio al Sovetio)</b>	<b>Stoko en septembro 1986</b>
64.	Modest, Julian: Ora Pozidono (Originala prozo) ( <i>Dua eldono en 1985, 1000 ekz.</i> )	68	500	500 (200)	0
65.	Benedek, Elek: Hungaraj fabeloj ( <i>Dua eldono de n-ro 20.</i> )	71	2000	1091 (330)	909
66.	Lorjak: Eŭlalia (Originala prozo) ( <i>Dua eldono en 1985, 2000 ekz.</i> )	188	1650	1650 (1168)	0
67.	Nemere, István: Febro (Originala prozo) ( <i>Dua eldono en 1985, 1070 ekz.</i> )	131	1500	1500 (1060)	0
68.	Seppik, Henrik: La tuta Esperanto ( <i>Dua eldono en 1985, 2530 ekz.</i> )	181	1500	1500 (1030)	0
69.	Petőfi, Sándor: Johano la brava (Tradukita poezio)	60	2200	1287 (454)	913
70.	Révész, Sándor (red.): Dilemoj de la nuntempo – vide el Hungario (Tradukita eseoj)	101	1500	407 (146)	1093
71.	Szilágyi Ferenc (ne identas kun la esperanta verkisto): La vivo de Sándor Kőrösi Csoma (Tradukita biografio)	151	705	705 (150)	0
72.	Princz, Oszkár: Eszerperanto nyelvkönyv (Lernilo por hungaroj) ( <i>Dua eldono en 1985, 6550 ekz.</i> )	95	2900	2900 (0)	0
73.	Nemere, István: La monto (Originala prozo)	166	2450	1389 (754)	1061
74.	Aszlányi, Károly: Sep vangofrapoj (Tradukita prozo)	148	2400	1008 (705)	1392

	<b>Titolo</b>	<b>Paĝo- nombro</b>	<b>Eldon- kvanto</b>	<b>Venditaj ĝis septembro 1986 (El tio al Sovetio)</b>	<b>Stoko en septembro 1986</b>
75.	Almanako de bulgaraj esperantistoj ( <i>Presita en Bulgario</i> )	141	483 (plus nekonata kvanto por bulgara merkato)	406 (373)	77
76.	Gorov, Ĥristo: Ribela kordo (Originala poezio) ( <i>Presita en Bulgario</i> )	71	468 (plus nekonata kvanto por bulgara merkato)	315 (180)	153
77.	Esperanta lernolibro por vjetnamianoj ( <i>Sur la libro estas presita kiel eldonjaro '1983'. Du volumoj. La tuta kvanto sendita donace al Vjetnamio.</i> )	362	5000	-	-
78.	Mikulás, József: Taskfolioj por komencantoj ( <i>Dua eldono de n-ro 62.</i> )	-	2515	2363 (675)	152
Produkto en 1984: 16 titoloj, 2408 paĝoj, 29 371 ekzempleroj. Stoko en septembro de 1986: 5750 ekz.					
<b>1985</b>					
79.	Móricz, Zsigmond: Varmega kamparo (Tradukita prozo)	169	1500	858 (515)	642
80.	Elem, János: Betonterapio (Tradukita dramo)	35	1026	427 (240)	599
81.	Lienhardt, Albert: Amuzaj dialogoj en Esperanto ( <i>Tria eldono de n-ro 33.</i> )	142	1550	1024 (620)	526
82.	Lienhardt, Albert: Amuza legolibro en Esperanto ( <i>Represo de n-ro 63.</i> )	216	1010	451 (15)	559

	<b>Titolo</b>	<b>Paĝo- nombro</b>	<b>Eldon- kvanto</b>	<b>Venditaj ĝis septembro 1986 (El tio al Sovetio)</b>	<b>Stoko en septembro 1986</b>
83.	Seppik, Henrik: La tuta Esperanto (Dua eldono de n-ro 68.)	181	2530	2115 (1317)	385
84.	Lorjak: Eŭlalia (Originala prozo) (Dua eldono de n-ro 66.)	188	2000	1704 (580)	296
85.	Pechan, Alfonz (red.): Gvidlibro por supera ekzameno (Kvina eldono de n-ro 17.)	370	2466	983 (165)	1483
86.	Kalocsay, Kálmán: Dek prelegoj (Originalaj eseoj)	126	2320	1067 (657)	1253
87.	Nemere, István: La naŭa kanalo (Originala prozo) (Dua eldono de n-ro 50.)	104	1060	557 (451)	503
88.	Nemere, István: Febro (Originala prozo) (Dua eldono de n-ro 67.)	131	1070	1046 (295)	24
89.	Nemere, István: La fermita urbo (Originala prozo) (Dua eldono de n-ro 47.)	128	1045	553 (500)	492
90.	Tabi, László: La Damo de l' Fatalo (Tradukita komedio)	43	2022	930 (443)	1092
91.	Princz, Oszkár: Esperanto nyelvkönyv (Lernilo por hungaroj)	95	6550	5607 (0)	945
92.	Modest, Julian: Ora Pozidono (Originala prozo) (Dua eldono de n-ro 64.)	68	1000	973 (735)	27
Produkto en 1985: 14 titoloj, 1991 paĝoj, 27 151 ekzempleroj. Stoko el tiuj en septembro de 1986: 8776 ekz.					

1986					
	Titolo	Paĝo- nombro	Eldon- kvanto	Venditaj ĝis septembro 1986 (El tio al Sovetio)	Stoko en septembro 1986
93.	Nemere, István: La alta akvo (Originala prozo)	129	2370	491 (255)	1879
94.	Kalocsay, Kálmán: Kiel verki kaj traduki poemojn? ( <i>Dua eldono de n-ro 22.</i> )	27	1760	217 (167)	1543
95.	Gilbert, William: Landnomoj en Esperanto ( <i>Presita en Bulgario.</i> )	12	400	83 (0)	317
96.	Blanke, Detlev: Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado ( <i>Dua eldono de n-ro 12.</i> )	228	2500	115 (20)	2385
97.	Benczik, Vilmos: Baza literatura krestomatio ( <i>Tria eldono de n-ro 16.</i> )	281	2320	415 (345)	1905
98.	Dinnyés, József: Al venko! (Kantaro)	24	2291	267 (0)	2014
99.	Baghy, Julio: Hura! (Originala prozo)	426	1938	304 (215)	1634
100.	József, Attila: Urboranda nokto (Tradukita poezio)	141	2503	170 (70)	2333
101.	Gáll, István: Obsedita de l'suno (Tradukita prozo)	186	2500	115 (115)	2385
102.	Lorjak: Mariagnes (Originala prozo)	212	3500	670 (670)	2830
103.	Benczik, Vilmos: Baza legolibro por komencantoj	121	5000	1150 (1150)	3850
104.	Enciklopedio de Esperanto (Represo de la eldono de 1934.) ( <i>Dua eldono de n-ro 26.</i> )	604	1394	325 (180)	1069
Produkto en 1986, ĝis la 1a de oktobro: 12 titoloj, 2387 paĝoj, 28 476 ekzempleroj. Stoko el tiuj la 1an de oktobro 1986: 24 144 ekz.					

Kaj jen la resumo de la ciferoj de la supra tabelo:

<b>Resumaj ciferoj de la esperantlingva eldona aktivado de Hungara Esperanto-Asocio inter 1976 kaj oktobro de 1986</b>				
Nombro de libroaperoj	Suma paĝonombro	Suma eldonkvanto	Suma kvanto de venditaj ekzempleroj (El tiuj al Sovetio)	Nevendita stoko fine de septembro de 1986
<b>104</b>	<b>16 146</b>	<b>277 748</b>	<b>221 452</b> <b>(41 258)</b>	<b>56 296</b>

El la posta tempo vendorezultoj mankas, do mi vicigas nur la titolojn, paĝonombrojn kaj eldonkvantojn:

	<b>Titolo</b>	<b>Paĝonombro</b>	<b>Eldonkvanto</b>
<b>1986</b>			
105.	Barna, Zoltán: La laborista esperanto-movado en Hungario 1913–1934	184	1500
<b>1987</b>			
106.	Kníchal, Oldřich: Adiaŭ, Kuzko! (Originala prozo)	87	2000
107.	Vaha, Blazio: Adolesko (Originala prozo) ( <i>Kunlabore kun Oy Mendoservo Ak [Finnlando]</i> )	248	2000 (krome 700 por Finnlando)
108.	Princz, Oszkár – Rados, Péter András: Bemutatjuk az eszperantót (Varbilo por hungaroj)	36	10 000
109.	Nemere, István: La blinda birdo (Originala prozo) ( <i>Dua eldono de n-ro 55.</i> )	118	2500
110.	Modest, Julian: D-ro Braun vivas en ni (Originala dramo)	71	1500
111.	Nedelčeva, Nevena: Dum nokta deĵoro (Originalaj noveloj)	87	1500
112.	Mihalkov, Georgi: Mistera lumo (Originalaj noveloj)	90	1500
113.	Mihalkov, Georgi: Ni vivos! ( <i>Dua eldono de n-ro 59.</i> )	53	2500
114.	Nemere, István: Serĉu mian songon! (Originala romano)	171	2500
115.	Nemere, István: Sur kampo granita (Originala romano)	127	2500
116.	Nemere, István: Terra (Originala romano)	151	2000

	<b>Titolo</b>	<b>Paĝonombro</b>	<b>Eldonkvanto</b>
117.	Seppik, Henrik: La tuta Esperanto ( <i>Tria eldono de n-ro 68.</i> )	181	4500
118.	Hordijenko-Andrianova, Nadia: Vagante tra la mondo maltrankvila ( <i>Presita en Bulgario</i> )	102	500
<i>Produkto en 1987: 13 titoloj, 1522 paĝoj, 35 500 ekzempleroj. Pri vendoj informoj ne postrestis.</i>			
<b>1988</b>			
119.	Nemere, István: Dum vi estis kun ni (Originala romano)	165	2500
120.	MacGill, Stefan: La laŭta vekhoroĝo kaj aliaj atento- kaptiloj	200	4000
121.	Szathmári, Sándor: Perfekta civitano (Originala novelaro)	456	2500
122.	Nemere, István: Vivi estas danĝere (Originala romano)	159	2500
<i>Produkto en 1988: 4 titoloj, 811 paĝoj, 11 500 ekzempleroj. Pri vendoj informoj ne postrestis.</i>			
<b>1989</b>			
123.	Lienhardt, Albert: Amuza legolibro en Esperanto ( <i>Dua eldono de n-ro 63.</i> )	216	4500
124.	Rossetti, Reto: Arto kaj naturo (Originala esearo)	126	2000
125.	Princz, Oszkár – Rados, Péter András: Bemutatjuk az eszperantót (Varbilo por hungaroj) ( <i>Dua eldono de n-ro 108.</i> )	36	10 000
126.	Piron, Claude: La bona lingvo ( <i>Eldono kunlabore kun Pro Esperanto, Vieno</i> )	111	2000 (plus 1000 por Pro Esperanto)
127.	Mikulás, Helena kaj Jozefo: Esperanto por ni 1–4.	264	5000
128.	Dudás, Ildikó – Szabó, Imre: Esperanto-servoj	64	2000
129.	Baghy, Julio: Gramatika demandaro resuma ( <i>Represo de n-ro 39.</i> )	44	4000
130.	Szilágyi, Ferenc: La granda aventuro kaj aliaj rakontoj	151	2000
131.	Auld, William: Paŝoj al plena posedo ( <i>Kunlabore kun Heroldo de Esperanto</i> )	228	4000 (plus 1500 por Heroldo de Esperanto)
132.	Kalocsay, Kálmán: Sekretaj sonetoj	104	2500

	<b>Titolo</b>	<b>Paĝonombro</b>	<b>Eldonkvanto</b>
133.	Privat, Edmond: Tra l' silento (Kunlabore kun Pro Esperanto, Vieno)	28	700 (plus 700 por Pro Esperanto)
134.	Rossetti, Reto – Vatré, Henri: (red.): Trezoro. La Esperanta novelarto 1–2.	948	3500
135.	Nemere, István: Vi povas morti nur dufoje (Originala romano)	183	2500
<i>Produkto en 1989: 13 titoloj, 2503 paĝoj, 44 700 ekzempleroj. Pri vendoj informoj ne postrestis.</i>			
<b>1990</b>			
136.	Piron, Claude: Dankon, amiko! (Kunlabore kun Pro Esperanto, Vieno)	36	3500 (plus 1500 por Pro Esperanto)
137.	Tavanti, Corrado – Ertl, István: Tiu toskana septembro (Originala romano)	137	3500
138.	Štimec, Spomenka: Vojaĝo al disiĝo (Originalaj noveloj)	90	2500
<i>Produkto en 1990: 3 titoloj, 263 paĝoj, 9500 ekzempleroj. Pri vendoj informoj ne postrestis.</i>			

<b>Resumaj ciferoj de la esperantlingva eldona aktivado de Hungara Esperanto-Asocio inter 1976 kaj 1990</b>		
Nombro de libroaperoj	Suma paĝonombro	Suma eldonkvanto
<b>138</b>	<b>21 429</b>	<b>368 948</b>

## Hungarlingva libroeldonado

Dank' al la daŭra moligo de la diktaturo ekde 1986 Hungara Esperanto-Asocio povis aperigi ankaŭ hungarlingvajn librojn sen rekta konekso kun Esperanto. La hungarlingvan eldonan aktivadon motivis antaŭ ĉio la deziro rikolti monan profiton, sed paralele kun tio ankaŭ la popularigo de Esperanto. La spektro de la eldonitaj libroj estis sufiĉe bunta: troviĝis inter ili libroj kulture valoraj, kiel ankaŭ libroj sen specifa valoro, kiuj nur volis okupi efektivan aŭ supozatan breĉon en la libromerkato. Tamen ankaŭ tiuj lastaj portis utilon al la Esperanto-movado ne nur per la rikoltita monprofito (tre signifa), sed ankaŭ per tio, ke ĉiu libro enhavis informojn pri Esperanto, kelkaj el ili apendice eĉ koncizan gramatikon kaj vortaron. Tute specifa inter tiuj libroj estis *Szerelmi kultúránk – Kulturo de la amo*. Ĝi estis ilustrita libro pri seksaj teknikoj (sepdeko da korpaj pozicioj) – la

unua tiaspeca libro, kiu aperis en Hungario. Post kvardek jaroj de socialisma prudeco tiu libro havis enorman debiton – ĝi estis presita en 296 miloj da ekzempleroj, el kiuj dum kelkaj monatoj estis forvenditaj 286 mil ekzempleroj! La libro estis dulingva (la libroservo de UEA ĝis nun vendas ĝin), sekve tiutempe pli ol duonmiliono (ja tiaspecajn librojn oni kutime studas ne sola...) da hungaroj havis en sia litĉambro esperantlingvan libron...

Alia specifeco de la tiama hungarlingva libroeldonado estis la libraro de István Nemere. Nemere tiutempe estis sendube la plej populara aŭtoro en Hungario – ŝtataj eldonejoj per la aperigo de liaj hungarlingvaj verkoj atingis enormajn enspezojn. Nemere mem sugestis, ke Hungara Esperanto-Asocio aperigu ankaŭ liajn hungarlingvajn verkojn (liaj esperantlingvaj libroj jam de pluraj jaroj aperis ĉe HEA), kaj gajnu per ili monon ne la ŝtato, sed la Esperanto-movado. Lia libraro dividiĝis inter du specoj. La unua speco estis hungaraj versioj de liaj popularaj romanoj, el kiuj kelkaj pli frue jam eldoniĝis esperantlingve. La duan specon konsistigis libroj kun longaj artikoloj pri esoteraj temoj kaj historiaj misteroj – pri tiaj temoj la publiko soifegis, ĉar la socialisma kulturpolitiko pli frue plene malpermesis la aperon de tiaspecaj libroj.

Nemere ĉiupaŝe demonstris sian esperantistecon, al liaj libroj ĉiam estis aldonitaj diversspecaj apendicoj, en kiuj li alvokis siajn legantojn lerni Esperanton – liaj vortoj atingis centmilojn da homoj, kaj tiamaniere li multege (verŝajne pli ol iu ajn persono dum la historio de la hungara Esperanto-movado) kontribuis al la popularigo de Esperanto.

Plian specifan – mi eĉ povus diri: *kuriozan* – koloron reprezentis *Ortografia ekzercolibro*. Ĝi estis tre bone konstruita ampleksa libro, kiun ŝtata eldonejo de lernolibroj rifuzis aperigi. Mi konstatis la metodikajn valorojn de la libro, kaj decidis aperigi ĝin. La libro rikoltis merititan sukceson, kaj malgraŭ la de tiam forpasinta kvarona jarcento ĝi ankaŭ nuntempe estas la plej vaste uzata tiaspeca libro en Hungario. Tiam la fakto, ke la grava plimulto de la hungaraj mezlernejoj uzis por la instruado de la hungara ortografio libron eldonitan



de la asocio de esperantistoj, kvazaŭ subkonscie instigis la publikon rekoni la seriozecon kaj lingvan egalrajtecon de Esperanto.

La hungarlingvaj libroj eldonitaj de Hungara Esperanto-Asocio tiutempe troviĝis en la oferto de ĉiuj hungaraj librovendejoj. Krome la libroservo de HEA plenumis ankaŭ vaste poŝtajn mendojn – nure dum la jaro 1989 estis senditaj al la mendintoj iomete pli ol 70 mil poŝtaj pakaĵoj – t. e. ĉirkaŭ 200 pakaĵoj ĉiutage.

Inter 1986 kaj 1990 aperis 35-40 hungarlingvaj libroj. Pri ili fidindaj ciferoj disponeblas nur koncerne la periodon ĝis januaro de 1990. Ĝis tiam aperis

- 30 titoloj
  - la suma eldonkvanto de tiuj estis 1 924 000 ekzempleroj
  - el tiu eldonkvanto ĝis tiam estis venditaj 1 589 000 ekzempleroj
  - el tiu eldonkvanto (pro nevendebleco) estis fordonacitaj 16 000 ekzempleroj
  - el tiu eldonkvanto (pro nevendebleco) estis forigitaj el la stoko 84 000 ekzempleroj (tiuj ekzempleroj estis fatrasitaj)
  - restinta stoko en januaro 1990 estis: 235 000 ekzempleroj.
- Kaj jen, 16 konkretaj titoloj kun paĝonombro kaj eldonkvanto:

<b>Ĉerpo el la hungarlingva libroeldonado de Hungara Esperanto-Asocio inter 1986–1990</b>			
	<i><b>Titolo/priskribo</b></i>	<i><b>Paĝo- nombro</b></i>	<i><b>Eldon- kvanto</b></i>
1.	Panda mackó vendégségben (Hungara traduko de <i>Granda pando vizitis mian hejmon</i> – ĉina bildlibro)	28	35 000
2.	A kevély kiscica kalandjai (Hungara traduko de <i>La fiera multkolora kateto</i> – ĉina bildlibro)	44	35 000
3.	A rest kismadár (Hungara traduko de <i>La bela revulo</i> – ĉina bildlibro)	44	22 000
4.	Hol fészkelnek a madarak? (Hungara traduko de <i>Hejmoj de birdoj</i> – ĉina bildlibro)	40	22 000
5.	Miért van az állatoknak farka? (Hungara traduko de <i>Vostokonkurso</i> – ĉina bildlibro)	20	22 000
6.	A gyilkos későn érkezik (Hungara traduko de <i>Kazinski venas tro malfrue</i> – originala romano de Deck Dorval)	224	cifero mankas
7.	Hol a hulla? (Hungara traduko de <i>Ŝia lasta poŝtkarto</i> – originala romano de Serĝo Elgo)	240	cifero mankas

	<i><b>Titolo/priskribo</b></i>	<i><b>Paĝo- nombro</b></i>	<i><b>Eldon- kvanto</b></i>
8.	Deme László: Nyelveink jövője és jövőnk nyelve ('La estonto de niaj lingvoj kaj lingvo de nia estonto' – artikolaro de renoma hungara lingvisto pri Esperanto)	124	3000
9.	Bárczi Géza: A nemzetközi nyelvről ('Pri la Internacia Lingvo' – artikolaro de renoma hungara lingvisto pri Esperanto)	80	3000
10.	Kumevava, az őserdő fia (Hungara traduko de <i>Kumeaŭa, la filo de l' ĝangalo</i> – junulara romano de Tibor Sekelj)	96	50 000
11.	Hőség Rómában (Hungara traduko de <i>Varmas en Romo</i> – romano de Corrado Tavanti)	146	100 000
12.	Szerelmi kultúránk – Kulturo de la amo (Dulingva ilustrita libro pri seksaj teknikoj – la unua tiaspeca libro, aperinta en Hungario)	192	296 000
13.	Helyesírási gyakorlókönyv ('Ortografia ekzercolibro [de la hungara lingvo]' de Lajos Cs. Nagy)	386	75 000
14.	Új titkok könyve ('Libro de novaj sekretoj' de István Nemere. Libro pri historiaj misteroj kaj esoteraj temoj.)	240	242 000
15.	Gránitmezőn (Hungara versio de la romano <i>Sur kampo granita</i> de István Nemere)	138	100 000
16.	Amíg köztünk voltál (Hungara versio de la romano <i>Dum vi estis kun ni</i> de István Nemere)	152	100 000

Kaj jen, ni venis al la fino de tiu ĉi raporto – mi nur esperas, ke ne estis tute superflue verki ĝin.

## ESPERANTO KAJ MOLAJ DIKTATUROJ\*

Esperanto estas esence *demokratia* fenomeno. Demokratia internacie, ĉar ĝi, kiel neŭtrala lingvo donas egalajn ŝancojn al la anoj de ĉiuj popoloj, kaj demokratia socie, ĉar estante facila ĝi estas alproprigebla por signife pli da homoj, ol iu ajn etna lingvo. Tial *principe* la ideala socia medio por Esperanto estas demokratio: *nur demokratio* povas por longa tempo garantii la ekzistadon kaj prosperon de la Internacia Lingvo. Por diktaturoj Esperanto – kiel ankaŭ ĉiuj aliaj demokratiaj fenomenoj – estas io fremda, eĉ danĝera. Tial klasikaj diktaturoj – la Hitlera, la Stalina – konsekvence persekutis Esperanton, kaj tial oni ne „koleru” al tiuj diktaturoj: ili nur agis laŭ sia naturo.

Tamen, dum la lastaj kvar jardekoj regis en Orienta Eŭropo reĝimoj, kiuj laŭ okcidentaj kriterioj estis diktaturoj, tamen ne „klasikaj” – kaj en tiuj diktaturoj la Esperanto-movado atingis ŝatindajn rezultojn, kvankam ĝia evoluo tute ne estis natura. Tiujn reĝimojn politologoj baptis *molaj* diktaturoj, por iom distingi ili disde la „klasikaj” *duraj* diktaturoj. Tiaj diktaturoj regis en ĉiuj landoj de la Orient-Eŭropa regiono – krom en Rumanio kaj Albanio, en kiuj regis tipaj duraj diktaturoj –, sed kompreneble en ĉiuj el ili temis pri specifaj kombinoj de molaj kaj duraj diktaturoj, laŭ la „naciaj apartaĵoj”.

### Specoj de diktaturoj

Jen, iom skiza „tipologio” de diktaturoj. *Laŭ originoj* diktaturoj povas esti

- personaj diktaturoj

- (tiuj estas la praa formo de diktaturoj; ili estas ĉefe militistaj; la diktatura sistemo ordinare restas ĉe la politika sfero de la socio, kaj ceteraj rajtoj de la civitanoj ne estas signife limigitaj)

- ideologiaj diktaturoj

---

\* Tiu ĉi teksto aperis en la revuo *Hungara Vivo* 1990/3–4, p. 91–93. Nun ĝi represiĝas senŝanĝe; por mi estis interese relegi ĝin tra kvaronjarcenta distanco, kaj eble troviĝos ankaŭ aliaj, kiuj pensos same.

(tiuj estas „pli moderna” formo de la diktaturoj; ili malofte estas militistaj, sed kontraste al la personaj diktaturoj, tiuj ĉi plej ofte havas totalisman karakteron, do ili validiĝas ne nur en la politika sfero de la socio, sed en ĉiuj sferoj, inkluzive eĉ la privatan vivon de la civitanoj).

Kompreneble, tiuj du sferoj ne nete apartiĝas: plej ofte ankaŭ personaj diktaturoj uzis ideologiajn sloganojn kaj argumentojn; aliflanke, ankaŭ ideologiaj diktaturoj povis havi personajn aspektojn.

Diktaturoj diferencigeblas ankaŭ *laŭ la grado de la subpremo*:

– duraj diktaturoj

(ili povas esti kaj personaj, kaj ideologiaj; personaj: *Bokassa, Mobutu ktp.*; ideologiaj: *Hitler, Stalin, Pol Pot ktp.*)

– molaj diktaturoj

(ili nur esceptokaze estas personaj; mola diktaturo estas fakte degenera stato de la diktaturo: ĝi likvidas sin mem iom post iom; mola diktaturo estas la sekvo de la malkapablo de dura diktaturo certigi la kondiĉojn de la bazaj funkcioj de la socio: ekonomio, glata ŝtata administrado ktp.)

## **Molaj diktaturoj en Orienta Eŭropo**

Molaj diktaturoj disvolviĝis en Meza kaj Orienta Eŭropo ekde la morto de Stalin (1953), iom post iom. Temis pri daŭra moliĝo, tamen kun interrompoj. La moliĝo estis klare la sekvo de la misfunkcioj: katastrofa ekonomia malsukceso, masakroj inter la propra popolo, neniel pravigeblaj eĉ per la logiko de la diktaturo mem, entute la patologieco de la diktatura reĝimo.

La diktaturo moliĝis ĉefe en la satelitaj landoj de Sovetio, kaj malpli en Sovetio mem. Sed ankaŭ la diferenco en la satelitaj landoj grave variis, depende de la historiaj tradicioj de la koncernaj landoj, depende de la kontraŭstaro de la civila socio, kaj eĉ depende de tiaj hazardoj, kiel la personeco de la lokaj diktatoroj (vidu la diferencon inter Ceaușescu kaj Kádár: la rumana diktatoro kapablis revivigi duran diktaturon en medio, en kiu ja funkciis pli-mapli molaj diktaturoj).

## Esperanto en la molaj diktaturoj de Orienta Eŭropo

La sukcesojn de la Orient-Rŭropa Esperanto-movado plej ofte oni atribuas al tio, ke en tiuj landoj dum la intermilita periodo funkciis forta maldekstrula Esperanto-movado, kaj multaj personoj, kiuj postmilito okupis altajn postenojn en la diktaturaj reĝimoj, havis siajn pozitivajn travivaĵojn pri Esperanto, aŭ ili mem estis esperantistoj. Tio estas fakto, tamen en si mem malsufiĉa por klarigi la situacion de Esperanto. Esencan rolon havis la cirkonstancoj de la mola diktaturo, kaj la esperantisteco de la gvidantoj estis fenomeno nur duagrada, kvankam kompreneble ne neglektinda. (Oni pripensu: en Aŭstrio dum la prezidenteco de Franz *Jonas* Esperanto-movado povis atingi nekompareble malpli da sukcesoj, ol la landaj movadoj de la eksaj soclandoj, kvankam en tiuj lastaj neniam esperantisto atingis tiel altan postenon.)

Ni provu do katalogi, kiuj aspektoj de la molaj diktaturoj soclandaj ebligis la prosperon de la E-movado. Sen strebo al kompleteco, mi nomu kelkajn el ili:

1. En diktaturo decidoj naskiĝas arbitre, ilin faras nur malmultaj homoj – do por atingi decidon favoran al Esperanto, sufiĉis gajni la simpatian nur de malmultaj homoj.

2. Pri publikaj monoj same decidis malmultaj homoj – sen efika socia kontrolo! –, tiel do pli facile akireblis mono por movadaj celoj.

3. Ĉia ideologia diktaturo – kaj la komunista precipe! – inklinas al mesiismo, ĝi pretas provi feliĉigi la homojn kontraŭ ties volo, entute, ĝi inklinas al utopioj. Oni povas diri, ke la konceptoj „la fina venko de komunismo” kaj „la fina venko de Esperanto” el rezon-teknika vidpunkto ne multe distancas unu de la alia. Do, la klara mesiismo de la Esperanto-movado estis trajto nepre simpatia por komunista mentaleco.

4. La Orient-Eŭropaj diktaturoj daŭre havis legitimecajn problemojn internajn kaj *eksterajn*. Po ili eĉ la limigitaj eksterlandaj propagandebloj, kiujn prezentis Esperanto, estis ne neglektindaj. El tio fontas la relative vasta ŝtata aplikado de Esperanto.

5. La socie bunta Esperanto-movado dum mallonga tempo trovis en si la homojn, kiuj pli-malpli akcepteblis por la diktaturo, kaj tiel kreiĝis relativa harmonio inter la Esperanto-movado kaj la diktaturo. Tiun fenomenon oni povas interpreti kiel pruvon de la vivkapablo de la Esperanto-movado, sed certe ankaŭ kiel ĝian prostituigon. Dependas de la vidpunkto.

6. La diktaturoj ne toleris grupigojn de civitanoj, kiuj ne integriĝis en la specifan hierarkion de la sistemo. Tio tamen ankaŭ signifis, ke , ke organizaĵoj, kiuj iel gajnis la rajton por ekzisto, fariĝis iasence oficialaj, kvazaŭ „ŝtataj”. Tiu trajto helpis detrui la verdan izoligemon, sektemon, kaj ampleksigis la sociajn rilatojn de la esperantistaj organizaĵoj. La fakta rezulto de tiu tipe diktatura sinteno paradokse fariĝis tute pozitiva: oni povas diri, ke la diktaturo signife modernigis kaj profesiigis la esperantistan agadon en tiuj landoj.

7. Esperanto-movado tamen restis certagrade fremda elemento en la diktatura sistemo, tamen „ne tre danĝera” fremda elemento. Kiel tia, ĝi estis prezentita ankaŭ kiel pruvo de la demokratieco de tiuj sistemoj.

8. La diktatura sistemo ne lasis disvolviĝi libere la homajn energiojn. Valoraj homaj energioj, kiuj en demokratiaj sistemoj disvolviĝas ĉu sur ekonomia kampo, ĉu sur tiu de la libera politika agado, far la diktatura sistemo estis neuzitaj, se ili ne volis kvazaŭ-agadi en la kvazaŭ-politiko. Por tiuj energioj estis sufiĉe alloga tereno la Esperanto-movado, kiu – estante tamen periferia kampo el la vidpunkto de la potenco – estis mapli intense kontrolata, kaj tial la agado tie estis relative pli libera, ol sur aliaj, pli signifaj terenoj de la ŝtatpotence koreografiita socia-politika vivo. Tial la E-movado en la landoj kun mola diktaturo arigis relative pli da kapablaj homoj; probable proporcie pli ol en la demokratiaj socioj.

9. La centre direktita gazetaro simpligis ankaŭ la metodojn de informado pri Esperanto. La esence aŭtoritata sistemo signife helpis la esperantistajn propagandistojn (ekzemple la pozitivaj elpaŝoj de la ĉefa komunista gvidanto de Hungario, János Kádár).

## **Esperanto-organizaĵoj kaj la molaj diktaturoj**

Nun ni revuu, kion profitis konkrete la Esperanto-organizaĵoj en la cirkonstancoj de la mola diktaturo.

1. Ili estis ŝtate rekonitaj kaj „fidindaj” reprezentantoj de la esperantistoj, kaj tiu statuso inkluzivis devojn (subtenadon de la reĝimo) kaj rajtojn (efike disvastigi Esperanton). La E-organizaĵoj ricevis subvenciojn – kies grandeco tre variis laŭ landoj –, kiu sufiĉis minimume por baza agado (dungado de unu-du oficistoj, luado de taŭga ejo, eldonado de iu revuo ktp.). Ili povis rikolti eĉ pliajn sumojn por ideologie preferataj celoj, ekzemple disvastigo de Esperanto inter la anoj de laborista klaso – fakte soclandaj E-organizaĵoj malsukcesis pri tio, kaj tiu malsukceso konstante elvokis riproĉojn flanke de la potenco.

2. Estante kvazaŭ oficialaj instancoj, E-organizaĵoj ĝuis certajn privilegiojn (ekz. por eksterlandaj vojaĝoj, kiuj por ordinaraĵoj civitanoj en la komunistaj landoj signife limigitaj), kiujn la organizaĵoj povis peri al la membroj, kaj tio altigis ilian altirforton.

3. Esperanto-organizaĵoj ĝuis certajn ekonomiajn privilegiojn, per kiuj ili povis kompletigi la subvenciojn – foje eĉ tre signife, kompreneble depende de la lerto kaj sagaco de la gvidantoj.

4. Kiel premion por la ideologia kaj politika integriĝo, la reĝimo donis al la E-organizaĵoj relative prestiĝan pozicion en la socia hierarkio (ekz. en Hungara Esperanto-Asocio prezidantis kelkaj eksministroj – delegitaj far la altaj ŝtataj kaj partiaj organoj). Tio en certaj influhavaj rondoĵoj plu levis la socian reputacion de Esperanto.

5. La E-organizaĵoj daŭre povis ĉerpi el la valoraj homaj energioj, kiujn la diktatura sistemo kondanmnis al inertececo, kaj tiu eblo kompreneble bone servis al la efika agado.

## **Individua esperantisto en la molaj diktaturoj**

Kion donis Esperanto kaj la partopreno en la organizita Esperanto-movado por la individua esperantisto?

1. Ĉar la E-movado ne plene identiĝis kun la reĝimo (certe malpli, ol aliaj sociaj organizaĵoj), ĝi do donis kadrojn por relative libera socia

agado, sen demonstrita identiĝ-devo. Ĝi funkciis kiel specifa mikrosocio, donanta eblojn por certagrada spirita elmigrado.

2. Per aparteno al E-organizo, individuo povis certagrade „oficialigi” sin („oficialeco” en diktaturoj havas magian forton), kaj tiamaniere akiri certajn privilegiojn (eksterlandaj vojaĝoj, eksterlandaj libroj, gazetoj).

3. Dank’ al la aparteno al la oficiala E-organizo individuo povis havi certagrade aprobitajn kontaktojn kun eksterlando – tiaj kontaktoj en diktaturoj ĉiŝ portas certan ombron de tabueco.

4. En finance tre malriĉaj landoj eksterlandaj vojaĝoj (kaj entute kontaktoj) povis alporti eĉ financan profiteton (aĉeton de pli modaj vestoj, de horloĝoj, elektronikaĵoj ktp.).

### **Kion alportos la estonto?**

El pragmatisma vidpunkto Esperanto en la nuna momento ne multe ofertas al la socio. Cetere, la socioj en la iamaj soclandoj estas plensataj pri ideaj-ideologiaj-etikaj argumentoj – oni gurdas al la homoj dum jardekoj pri la fina venko de socialismo –, do ne eblos impresi ilin per tio, ke „la homaro faros en konsento / unu grandan rondon familian”.

Entute, homoj en Orienta Eŭropo deklariĝis de la memstara agado, kaj ili ne baldaŭ trovos la manieron de la sinorganizado, sed daŭre ili atendas paŝojn desupre.

Sed tiaj paŝoj ne venos. Ankaŭ ne faros ilin la movadaj gvidantoj, ja tiuj ĝis perfekteco evoluigis la arton efike funkcii en la cirkonstancoj de la mola diktaturo, sed eĉ imagon ili ne havas, kiel adaptiĝi al la novaj cirkonstancoj. La Okcident-Eŭropaj movadoj ne povas servi kiel modeloj, pro du kaŭzoj: unue, ĉar la Orient-Eŭropaj socioj ne fariĝis Okcident-Eŭropaj pro la nura fakto, ke la komunistaj partioj perdis la potencon; kaj due, ĉar la Okcident-Eŭropaj movadoj kaj E-organizaĵoj agadas esence laŭ „desuprismaj” konceptoj, do tiel, kvaŭ ili vivas en diktaturo.



Dum uzo naturaj lingvoj fariĝas certagrade artefaritaj, kaj artefaritaj lingvoj fariĝas certagrade naturaj – tiu ĉi tezo konkludiĝas el la jena libro. Esperanto havas konturitan kaj firman lingvan politikon – ĝin mi admiras. La esperantistaj personaj amikaj rilatoj, ofte traarkantaj kontinentojn, vekas en mi kelkan envion. Ni ĉiuj devus lerni iom ankaŭ Esperanton.

**Profesoro Géza Balázs,  
Universitato Loránd Eötvös,  
Budapest (Hungario)**

Atute! Bonvolu iom deturni vian oreilon de nia tepida solvado de ĉiuj mondaj problemoj. Atentu ĉi tiun vervan esperantistan engaĝiĝon kun la ĉefaj aktuale gravaj ideoj pri la naturo de la skribo, de la lingvo, de la signoj, de la literaturo. De post la lanĉo de la ideo ke Esperanto estus planlingvo, ĵen la plej grava rekonsidero de la fundamento de la esperantismo. Ĉiu instruanta aŭ studanta la esperantologion devegos legi ĝin. Teorio-malŝatantoj almenaŭ aŭskultu jenon: “la Okcident-Eŭropaj movadoj kaj E-organizaĵoj agadas esence laŭ „desuprismaj” konceptoj, do tiel, kvazaŭ ili vivus en diktaturo”.

**Profesoro Probal Dasgupta,  
Lingvistika Esplorfako de  
Hinda Statistika Instituto,  
Kolkato (Barato – Hinda Unio)**

Vilmos Benczik pensas profunde pri lingvoj kaj tutplaneda komunikado. En tiu ĉi libro li malavare invitas nin konatiĝi kun pensoj kaj spertoj pinte situantaj. Mi tre aprezas la rakonton pri liaj klopodoj dum jardekoj en la eldona fako en Hungarujo. Tre inspira estas lia prezento pri la analoga flanko de lingvoj kontraste al ties diskretigo. Tiu respondas al tre interesa kaj aktuala evoluo en matematiko kaj komputiko pri digitigo, pri digita geometrio kontraste al eŭklida geometrio, kaj kunportas pensigajn rezonadojn pri science kaj filozofie gravaj demandoj.

**Profesoro Christer Kiselman,  
Upsala Universitato (Svedio),  
matematikisto kiu parolas  
la svedan, esperanton,  
la anglan kaj la francan**